

Österreichische
Nationalbibliothek

701.801-C


Esp-


1912-
1913


701.801

Österreichische
Nationalbibliothek

Digitale Services











★ LIBERA PENSO ★

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JAROTIZO KUN LA MONATA BULTENO : 1 SM (FR. 2.50)

SEKRETARIEJO : RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

—o—

Administrejo de la gazeto : Kleine Beerstr., 45, Antwerpen.

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn al S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions, Washington D. C. Usono. Kotizmono kun bulteno : 50 c. = 1 Sm.

SENKULPIGON PETAS MI PRO LA MALFRUA
APERIO DE LA NUNA NUMERO. DE NUN LA
GAZETO APEROS REGULE JE LA KOMENCO DE
ĈIU MONATO. F. S.

PERSEKUTO.

Samideano en Ruslando, ano de nia societo, kiu jam antaŭ kelkaj jaroj intencis, ekŝigi el la grekortodoksa eklezio, petas la helpon de samideanoj. Laŭ la leĝo li tiutempe povis postuli, esti oficiale rekonata kiel senreligiulo ; sed la ministro rifuzis lian tiucelan peton kaj rekomendis, ke li elektu iun alian oficialan religion. Farinte la necesajn esplorojn, la persekutato tamen ne povis eniri iun alian religian unuiĝon pro tio, ke oni postulis de li kredon je dieco de Jesuo, difilecon de Jesuo, senkoitan naskon de fraŭlino Mario kaj similaj sensencaĵoj.

Nun, kiam pro la kontraŭevolucia reakcia regado la leĝoj pri la libereco de religianeco en Rusujo estas forigitaj, oni intencas, severe puni nian samideanon, se li ne nuligos la peton pri ekŝigo el la eklezio. Ni scias, ke Lev Nikolajevič Tolstoj sola, pro sia granda famo kaj la amo de la popolo al li, ne estis punata, kiam la grekortodoksa eklezio ekŝigis lin. Du samurbanoj de nia samideano, kiuj estis ekŝigataj, sidas nun en malliberejo. Sed en tiuj ĉi tri okazoj la personoj estis ekŝigataj kaj ne ekŝigis laŭ propra postulo.

Nia samideano nun havas la intencon, forlasi Rusujon ; sed ankaŭ tio estas tre malfacila por li. Li petas, ke la societanoj de Libera Penso metu al lia dispono taŭgan monsumon, por ke li ne estu senmona, kiam li troviĝos ekster Rusujo ; sed tiu mono ne atingus lin, se ĝi estus sendata al li nun ; li devas ricevi ĝin, kiam li troviĝos ekster la rusaj limoj. La monon li konsideros kiel prunton redonatan al la donintoj. S-ro Linarés konsentas al li Sm. 40.— por tiu celo.

Rusa regno estas konata modelo de mallibereco, kaj hontindaj estas la influoj, kiujn tio havas sur la publikan

vivon. La hebreoj ekzemple estas tiom persekutataj kaj tiom malfacile ricevas loĝpermeson en urboj ne speciale difinitaj al ili de la registaro, ke rusaj hebreaj studentinoj, kiuj volas studi en Peterburgo, anoncas sin al la polico kiel prostituĉinoj ; ĉar nur tiaj ili ricevos loĝpermeson estante hebreaj.

Kiu volas helpi per mono aŭ ago la persekutaton, bonvolu sin turni al S-ro Frans Schoofs, Kleine Beerstraat, 45, Antwerpen, Belgujo.

Alvoko el Antverpeno.

Baldaŭ la internacia liberpensa esperantistaro, havos la plej belan okazon, helpi la Antverpenan sekcion de « Libera Penso » en ĝiaj klopodoj, disvastigi nian lingvon inter la liberpensuloj.

La Antv. liberpensa societo « de Solidairen » — la sama, kiu multe helpis la Antv. sekcion en ĝia bonsukcesinta propagando dum la 7a kongreso — aranĝas baldaŭ liberpensan ekspozicion. Tie ankaŭ Esperanto havos sian lokon.

La ekspozicio konsistos el ĉiuspeca liberpensa literaturaĵo, bildoj, karikaturoj, bildkartoj k. t. p.

Ni estas konvinkataj ke niaj fremdlandaj kamaradoj nun montros ke reciproka helpo de l'esperantistoj ekzistas ne nur teorie, sed efektive, kaj ke ili baldaŭ sendos ĉiuspecajn liberpensajn esperantaĵojn, broŝurojn k. t. p. : ankaŭ ne liberpensaĵoj estos danke akceptataj.

Oni sendu al la jena adreso : **Frans Schoofs, Kleine Beerstraat, 45, Antverpeno, Belglando.**

Kamaradoj, helpu nin !

La Antverpena sekcio de

« Libera Penso ».

701.801-C.Ep -
1912-1913

L O U R D E S

La tuta nuda vero troviĝas en la fama verko de Emile Zola. Mi travivas ĉiujn impresojn kaj mi vidas per la propraj okuloj la bildojn, pentritajn de la glora aŭtoro. Mi estis en iu solena indulgona festo. Poste mi ekscios, ke tiuj festoj okazas ĉiutage. ĉiam, ĉiam.

Dimanĉo. Mi restigas en hotelo mian biciklon, sur kiu mi vojaĝas; mi direktiĝas al la baziliko kaj mirakla groto. Malsupre mi trovas la preĝejon de Rozario (du Rosaire). Interne malpleneo. De la du flankoj de la preĝejo, dividita per kupolo, iras grandioza ŝtuparo, gvidanta al la ĝusta baziliko. Ĉi-tie regas silento, malhelpata nur de murmureto de pekkonfesantaj pilgrimoj. Mi ne priskribas la grandiozecon de tiuj du konstruaĵoj. Mi ankoraŭ malsupreniras, por vidi tion, kio estas plej interesa: banojn kaj groton, troviĝantaj dekstre de la baziliko. Piscines aŭ «miraklaj» banejoj estas cirkaŭbaritaj per fera malalta palisetaro. Sur la placeto, interne de la palisetaro, prezentigas antaŭ miaj okuloj bildo kiun mi neniam forgesos.

Oni rigardas multajn vicojn da veturiloj kaj portseĝoj troplenigitaj de malsanuloj. Ftizuloj kun kaviĝintaj vangoj kaj vitraj okuloj, nemoviĝkapablaj paralizituloj, malfeliĉaj blinduloj kun truoj en la kapo anstataŭ okuloj, malsaĝe ridantaj idiotoj, ĝemantoj kaj plorantoj de doloro el teruraj vundoj sur la tuta korpo k. t. p. Jen, la abomena vidaĝo de malfeliĉuloj! La banejo havas du partojn, viran kaj virinan. Inter veturiloj kaj portiloj turniĝas elegantaj sinjoroj kaj sinjorinoj kune kun pastroj kaj servistoj transportante malfeliĉulojn ĝis bano, kiu eble redonos al ili sanon.

Tiuj «plenaj de kristanamo» elegantaj gesinjoroj estas floro de la franca kaj fremda aristokrataro. Malgraŭ vidaĝo de homa mizero kaj sufero, sur la mienoj de tiuj personoj mi vidas ian humoron kaj kontentecon. Tiuj rozkoloraj vizaĝoj plenaj de sano kaj forto faras teruregan kontraston kun tiuj, kiuj alvenis ĉi-tien ricevi de la Dio sanon (?). Ĉiam malfirmiĝas la pordetoj de la mirakla banejo, por enlasi aŭ ellasi malsanulon. Dum la farado de tiuj banoj, la pastroj, estantaj en la placeto, laŭtege preĝas kaj post ili ripetas la popolo staranta ekstere de la barilo. Mi volis vidi kiel aspektas la banoj. Mi ekkuraĝis kaj mi eniris internen de la barilo. Mi troviĝis inter malsanuloj. Al mi alpaŝis iu maljuna serioza princo aŭ grafo aŭ barono kaj demandis ĉu mi volas preni banon. Mi respondis, ke mi ne intencas min bani, sed mi volas nur vidi, kiamaniere tio plenumiĝas. Mi povis forlasi placeton; ĉi-tie estas nur loko por tiuj, kiuj kredas kaj deziras bani en la sankta (?) akvo.

Por vizitado estas destinita nur unu horo inter 2-3 posttagmeze. Ĉar mi ne volis atendi ĝis morgaŭ, do mi decidis, laŭ volo de scivoleco, preni banon. Mi eniris ankoraŭ post la barilon, eksidis sur la benko, atendante mian vicon. Fine oni min enkondukis en la internon. En la vira parto troviĝas tri bankuvoj, tri ĉambretoj. Mi rapide senvestiĝas.

Sur la femurojn oni ĵetis al mi antaŭtukon. Mi fervore ensaltis ĝis bankuvo, kaj subakviĝis, rifuzante la helpon de kliniĝantaj super mi pastroj. Mi ekaŭdis super mi preĝojn de asistantoj ĉe tiu stranga ablucio. En la bankuvo mi vidis du kranojn, tamen oni ne ŝanĝis akvon por mi. Al mi ŝajnis, ke la akvo estis kvazaŭ densa malhelgriza... Mi eksentis la abomenon kaj elsaltis ankoraŭ pli rapide el bankuvo, en kiu antaŭ mi oni enprofundigis centojn da malsanuloj de diversa speco. — En Barcelono mi vidis batalon de bovoj, en Romo mi vidis Sanktan Patron-Papon, en Norimbergo torturilojn de Sankta Inkvizicio.

Oni devas ĉi-tie ankaŭ eksenti la plenecon de sanktaj romkatolikaj esprimoj. Super bankuvo mi ekvidis kelkajn tabulojn kun preĝo en diversaj lingvoj. Tamen la preĝon anstataŭ mi, ekmurmetis asistantaj funkciistoj de la sankta ceremonio (?) Mi rifuzis murmureti. Tuj post piscines troviĝas 12 kranoj de fonta akvo. Ĉiuj trinkas ĝin plezure, ĉerpante en la glaso, potetoj kaj boteloj, prenante provizojn de tiu akvo hejmen. Ĝi estas tre bongusta kaj freŝa.

Se por ĉiu bananto oni ŝanĝus akvon, oni povus fari ĉi-tie tre efikan hidropatian kuracadon. Sed tiel, kiel oni plenumas, brrr tiu bano faras abomenon. Mi iras al apuda groto. Je la dekstra flanko de statuo, juna pastro el ŝtona sukceso suprenlevas al ĉielo ploremajn preĝojn, tio estas pastro-asketo. Duonronde kunvenis malsanuloj sur la veturiloj, litoj kaj aliaj diversaj transportiloj, proksime de ili ondiĝas multmila fanatika amaso, ripetante post la monaĥo verbojn de preĝo. Jen eksonas ĝemoj, plorado de malsanuloj kaj infanoj, kriado de idiotoj. Sub la figuro de Madono mi vidas altaron. Tuta groto estas iluminata per milo da kandeloj. Sesa horo posttagmeze. Banoj finiĝas kaj ankaŭ adoroj al Madono. Austataŭ tio, oni komencas procesion kun plej sankta sakramento. Imponanta procesio. Sur la grandega placo antaŭ preĝejo du Rosaire kolektiĝas amasoj, al portiko de preĝejo marŝas la standardportistoj kun riĉaj silkaj flagoj ornamitaj per oro kaj arĝento, diverskolora vestitaj pastroj kaj monaĥoj; tuta kvadrato estas cirkaŭita de popolamaso en nombro de dekmiloj.

Supro de la baziliko ankaŭ estas superplena de popolo. En la unua vico sur la placo oni enlokiĝis malsanulojn. Kelkaj pastroj, starantaj en la centro de placo komencas laŭtege preĝojn. Mi aŭskultis tiujn preĝojn en kelkaj lingvoj: itala, hispana, franca. Ĉiu pastro el centro reprezentas partoprenantan en ceremonio pelgrimantaron. Kreduloj ripetas tiujn preĝojn en sia patra lingvo, kriante, plorante. Oni malfermas la pordegon de preĝejo kaj eliras la procesio. Celebranto estas kondukata de alta pastraro. Mi ne konas tiujn gradojn.

Tamen mi vidas ĉi-tie ruĝajn, blankajn, bluajn, nigrajn kaj aliajn episkopojn. Ĉiu aro estas pompa, grandioza, majesta, bonsana, feliĉa, kontenta, dika, plensata. Baldaŭkenon super celebranto portas francaj aristokratoj. Tiu ceremonia marŝo stariĝas antaŭ ĉiu malsanulo. Celebranto



benas per la plej sankta sakramento ĉiun malsanulon kaj tiu marŝo daŭras longe, longe...

Fine lasta malsanulo ricevas benon. Sekvas ĝenerala beno kaj reveno preĝejon. Loka fotografisto fotografas ĉeestantojn. Kredantoj disiras. Kinematografaj teatroj kun dia martiro kaj biografio de sankta Bernadetto invitas internen. Eniro 50 cmoj! Vespero. Sur la proksimaj montoj oni ekbruligis lumojn. Krucoj el elektraj lampetoj, aranĝitaj sur altaj montoj faras esprimon, ke ili pendas sur la ĉielo...

Hoteloj kaj restoracioj tute pleniĝas per la riĉaj kaj bonsanaj kredantoj, kiuj, sataj de spiritaj emocioj, avidas al suferanta malsaton korpo doni nutraĵon. Kaj kion faras malriĉaj, malfeliĉaj malsanuloj? Kiel ili finas tagon? Ĉu senpripensa kredo kaj fanatismo, kiuj alpelis ilin ĉi-tien el malproksimaj landoj atingos resanigon aŭ almenaŭ kvietigon? Kelkaj el ili efektive je la influo de ekscitiĝo de morala skuo kaj de miraklkredo eksentos la momentan resanigon. Pri tio vastege anoncas loka klerikala ĵurnalaro. Tamen la plimulto suferas, kaj suferas multfoje terurege, mortas kaj eĉ plenumas memmortigon kaŭze de senespero.

La suferoj de tiuj homoj kortuŝis min kaj elprenis el miaj okuloj larmojn. Kaj se mi povus, mi parolus al ili: « Iru tiuj hospitalojn, al kuracistoj, al mineralaj akvoj. Ĉi-tie oni vin senhonte trompas, per vanaj kaj mallertaj rimedoj pligrandigas viajn dolorojn kaj suferojn. Tie vi trovos efektivan kuracistan helpon, tie vi povos reatingi perditan sanon ». Ni liberpensuloj miregas, ke tiel libera kaj sendogma lando kiel sendube estas Francujo permesas en siaj limoj « ĝis hodiaŭ » tian krimon, por kelkaj dubaj kaj momentaj resaniĝoj arigi dekmilojn da diverslandaj mizeruloj al tiu « mirakla » loko.

Frank Sandecki.

Liberaĵoj de la pastro MELLIER

Jean Mellier (citata ankaŭ sub la nomoj Meslier kaj Mesliers) vivis de 1664 ĝis 1729 jaro kaj estis pastro de Etrépigny kaj But en Champagne (Francujo). Li plenumis sian pastran oficon laŭdeve, sed jam dum sia vivo li ĉiam defendis la rajton de l' malriĉuloj kontraŭ la perforto flanke de potencaj nobeloj. Ĉiam doninte almozojn dum sia vivado, li mortis malriĉa kaj postlasis al siaj paroĥanoj ne kapitalon sed « testamenton », en kiu li faris konfeson pri siaj veraĵoj. Jen parto el la antaŭparolo de tiu testamento:

Vi konas, fratoj miaj, mian neprofitemon; mi tute ne oferas mian kredon al malnobla profitemo. Ke mi okupis profesion tiom rekte kontraŭstarantan miajn sentojn, tio tute ne okazis pro avideco; mi obeis miajn gepatrojn. Mi estus kleriginta vin pli frue, se mi estus povinta fari tion senpune. Vi estas atestantoj de tio, kion mi eldiras. Mi neniel malnobligis mian oficon, postulante la honorariojn, kiujn ĝi rajtigas. La ĉielo atestas, ke mi ankaŭ multege

malestimis tiujn personojn, kiuj ridis pri la simplanimeco de la blindigitaj popoloj donantaj pie grandajn sumojn, por aĉeti preĝojn. Kiom terura estas tiu monopolo!

Mi ne mallaŭdas la malestimon, kiun havas pri siaj misteraĵoj kaj superstiĉaĵoj tiuj, kiuj grasigas sin per via ŝvito kaj per via penado: sed mi malestimegas ilian nesatigeblan avidemon kaj la malnoblan plezuron, kiun ili kaj iliaj similuloj ĝuas, mokante la nescion de tiuj, kiujn ili zorge ĉiam restigas en tia stato de blindeco.

Ili kontentigu sin, ridante pro sia propra bonstato; sed ili almenaŭ ne plimultigu la erarojn, profitante per la blinda pieco de tiuj homoj, kiuj per sia simplanimeco havigas al ili tiom senpenan vivadon. Certe, karaj fratoj, vi konsentos al mi la justecon, kiun mi meritas.

La delikata sento, kiun mi ĉiam montris pri viaj suferadoj, ŝirmas min kontraŭ plej malgranda suspekto via. Kiom ofte mi senpage plenumis la funkciojn de mia ofico! Kiom ofte mi suferis pro tio, ke mi ne povis helpi vin tiom multfoje kaj tiom riĉe, kiom mi deziris! Ĉu mi ne ĉiam pruvis, ke donado donis al mi pli da ĝojo ol ricevado?

Mi zorge evitadis, admoni vin al la bigoteco, kaj laŭeble plej malofte mi parolis al vi pri viaj mizeraj dogmoj. Tamen, mi ja devis, kiel pastro, plenumi mian oficon. Sed kiom mi suferadis en mia interno, kiam mi devis prediki al vi tiujn piajn mensogojn, kiujn mia koro malamegis!

Kiam malŝategon mi havis kontraŭ tiu superstiĉa meso kaj tiuj ridindaj disdonoj de l' sakramentoj, speciale kiam mi devis fari tiujn servojn kun tia soleneco, kia altiris vian piecon kaj vian bonan fidon! Kiom da konsciencaj doloroj kaŭzis al mi via kredemo!

Mil fojojn mi apenaŭ evitis, eksplodigi publike miajn sentojn, por montri al vi la veron; sed supera timo subite retenis min kaj devigis min al silentado ĝis mia morto.

Ekzameninte la motivojn, pro kiuj la homoj starigis religion, parolinte pri la eraroj de l' kredo, pri la konformeco de la antikvaj kaj novaj mirakloj, doninte la pruvon pri la falseco de la religio, kiu bazas sur la asertitaj vizioj kaj diaj apokalipsoj, ekzameninte la malnovan kaj la novan testamenton, doninte kvaran pruvon bazantan sur la eraroj de l' doktrino kaj de l' moralo, la aŭtoro ekkrias:

Ekzameninte kelkajn mizeraĵojn atribuatajn de la kristadoruloj al dio, ni daŭrigu, dirante kelkajn parolojn pri iliaj misteraĵoj. Ili adoras iun dion en tri personoj aŭ tri personojn en unu dio, kaj ili arogas al si la scipovon, fari diojn el pasto kaj el faruno (hostio) kaj eĉ fari da ili tiom, kiom ili deziras; ĉar laŭ siaj principoj ili bezonas eldiri nur kvar parolojn super iu kvanto da glaso kun vino aŭ da tiaj ĉi malgrandaj bildaĵoj el pasto, por fari el ili saman kvanton da dioj, eĉ se estus milionoj. Kia frenezaĵo! Malgraŭ la tuta asertata scipovo de ilia kristo, ili ne scipovas fari la plej malgrandan mauŝon, kaj ili kredas, fari milon da dioj!

Oni devas esti frapita de stranga blindigo, por aserti tiom mizerajn aferojn, kaj eĉ sur la vana bazo de la erarigaj diroj

de fanatikulo. Ĉu ne ankaŭ ili vidas, ke la samaj motivoj, kiuj evidentigas la vanecon de la dioj aŭ de la ŝtonaj idoloj k. c. kiujn adoras la paganoj, sammaniere evidentigas la vanecon de la dioj el pasto kaj el faruno, kiujn adoras niaj kristadoruloj? Laŭ kiu rilato ili mokas pri la falseco de l' paganaj dioj? Ĉu ne pro tio, ke ili estas nur produktaĵoj faritaj per la homaj manoj, mutaj kaj sensentaj bildaĵoj? Kaj kio do estas niaj dioj, kiujn ni konservas enfermitaj en skatoloj pro timo je l' musoj?

Kiaj do estas la vanaj rajtigaj principoj de la kristadoruloj? Ĉu ilia moralo? Je l' fondo ĝi estas la sama, kia estas en ĉiuj religioj; sed kruelaj dogmoj estas naskitaj el ĝi kaj instigis la persekuton kaj la timon. Ĉu iliaj mirakloj? Sed kiu popolo ne havas siajn, kaj kiu saĝulo ne malŝatas tiujn fablojn. Ĉu iliaj profetaĵoj? Ĉu oni ne pruvis ilian falsecon? Iliaj moroj? Ĉu ili ne estas ofte malnoblegaj? La starigo de ilia religio? Sed ĉu la fanatikemo ne komencis, ĉu la intrigo ne starigis, ĉu ne la forto videble subtenis tiun ĉi konstruaĵon? Ĉu la doktrino? Sed ĉu ĝi ne estas la pinto de l' absurdeco?

Mi kredas, karaj amikoj, ke mi donis al vi sufiĉan protektilon kontraŭ tiom da frenezaĵoj; via racio efikas ankoraŭ pli forte, ol miaj paroladoj, kaj espereble ni havos motivon plendi nur pro tio, ke ni estis trompataj! Sed la homa sango fluadas jam de la epoko ke Konstantino pro la starigo al tiuj teruraj hipokritaĵoj. La eklezioj roma, greka, protestanta, sama nombro da vanaj disputoj kaj sama nombro da hipokritaj ambicioj dezertigis Eŭropon, Afrikon kaj Azion. Alkalkulu, amikoj, al la arego da homoj, kiujn tiuj malpacoj mortigis, la amasojn da monaĥoj kaj monaĥinoj fariĝintaj sterilaj (t. e. nenaskiga aŭ nenaska) pro sia ofico; vidu, kiom da kreitaĵoj estas perditaj, kaj vi ekvidos, ke la kristana religio pereigis la duonon de l' homaro. Mi finos, petegante Dion tiom ofendatan de tiu sekto, ke li revoku nin al la religio natura, kies pozitiva malamiko estas la kristanismo; al tiu sankta religio, kiun Dio metis en la koron de ĉiuj homoj kaj kiu instruas, ke kontraŭ iu alia ni ne agu tiel, kiel ni ne volus, ke oni agu kontraŭ ni. Tiam la universo konsistis el bonaj civitanoj, el patroj justaj, el infanoj obeemaj, el delikatsentaj amikoj. Dio donis al ni tiun ĉi religion, donante al ni la racion. Ne plu falsigu ĝin la fanatikemo! Mortante, mi pli multe deziras tion, ol mi esperas tion.

La tradukinto prenis tiun ĉi tekston laŭ la formo, en kiu Voltaire transdonis ĝin al ni. Bedaŭrinde ĝia tia formo donas nur malprecizan ideon; ĉar Voltaire, nomante la stilon originatan de Mellier « stilo de ŝarĝveturila ĉevalo » kaj opiniante, ke Mellier esprimis sin iom tro senĝene libera. « dolĉigis » kelkajn dirojn. Laŭ certaj fontoj, la ideo de dio enhavata en la Voltaire' a transskribo tute ne troviĝis en la originala « testament » de Mellier; ĉar Mellier neis la ideon de Dio.

Flanke de la eklezio kaj ĝiaj partianoj oni provis, neigi la ekzistintecon de Mellier. Duonan jarcenton post la morto de Mellier la ateismo fariĝis laŭmoda en la medio de la

aristokrataj intelektuloj, kaj ŝercoj pri la religio estis plej oftaj tie; sed tiu ateismo ne estis sincere konfesa, kaj oni evitis, montri kaj instrui ĝin al la « popolo ».

O. B.

EL FRANCUJO.

Multaj famuloj, literaturistoj, artistoj kaj politikistoj komencis movadon por la liberigo de la revoluciisto Gustave Hervé, kiu loĝadas en malliberejo pro ĵurnalaj artikoloj. Ni tradukas nur unu el la leteroj senditaj al lia ĵurnalo La Guerre Sociale (La Socia Milito), tiun de Anatole France.

« Hervé estas malliberigita ĉar li esprimis sian penson, kaj ni kredas nin libera popolo! Sed ĉu la leĝa persekuto, kiu estas farata kontraŭ Hervé, povas efiki alie ol montrante la grandecon de lia karaktero? Vi donas al liaj ideoj nekompareblan privilegion: li suferas pro ili. Ni neniam suferis pro la niaj. Kaj tio estas nia malsupereco.

Fariĝintaj fine saĝaj kaj justaj, sciuj ni aŭdi eĉ tion, kio malplaĉas al ni, kaj ni punu nenium, ĉar li kuraĝis paroli laŭ sia konscienco ».

Goethe pri la Biblio.

Mi bone konas ĝin; la tuta libro tia estas.
Perdiĝis jam pro ĝi multnombraj horoj miaj;
ĉar nesolvebla kontraŭdiro ĉiam restas
sekreto por sciantoj kaj sensciaj.
Amiko, kredu min: farante tian bruon,
la homoj — ne nur nun, sed ĉiam — celas,
el unu fari tri, el tri — unuon,
kaj tiel veron la malver' forpelas.
Predikas kaj instruas, tiel babilante,
la malsaĝuloj; ne atentu tion.
Plej multaj homoj, vortojn nur aŭdante,
supozas tuj en ili grandan scion.

El « Faust » trad. O. B.

EL HISPANA LINGVO

Disputante pri negrovo
Figas estis vangfrapata.
Li tuj estis duelata
Kaj refrapata per glavo.
Tiel restis morta Figas
Sed honora, tial ke
Vangofrap' malhonorigas
Sed la glavovundo ne.

Al Bigotulino
Vi petas vian panon
Kiam vi preĝas;
Pri l' pano de l' aliaj
Vi ja forgesas.
Ĉiam la samo
Eĉ en viaj preĝoj
Estas neamo.

Tradukis
FERNANDO REDONDO.



Mia Onklo Benjamino

De Claude Tillier (Francujo, 1801-1874)

TRADUKIS R. DESHAYS

I. — Kia estis mia onklo.

Mi ne scias ja vere, kial la homo tiel volegas vivi. Kion do li trovas tiel agrabla en tiu sengusta intersekvo de la noktoj kaj de la tagoj, de l' vintro kaj de l' printempo? Ĉiam la sama ĉielo, la sama suno; ĉiam la samaj verdaj herbejoj kaj la samaj flavaj kampoj; ĉiam la samaj reĝaj paroladoj, la samaj friponoj kaj la samaj trompatoj. Se Dio ne povis fari pli bone, li estas filaboristo, kaj la maŝinisto de l' opero estas pli klera ol li.

Denove pripersonaĵoj, vi diras, jen nun vi diras pripersonaĵojn kontraŭ Dio. Kion vi volas? Dio estas, verdire, oficisto, kaj eĉ alta oficisto, kvankam lia ofico ne estas senlabora. Sed mi ne timas, ke li postulos kontraŭ mi ĉe la jurista firmo Bourdeau kompensaĵojn sufiĉajn por konstruigi preĝejon, pro la malutilo, kiun mi estos farinta al lia honoro.

Mi scias ja, ke la magistrataj Moŝtoj estas pli inciteblaj pri lia famo, ol li mem; sed jen guste tio, kion mi juĝas malbona. Pro kiuj titoloj tiuj nigruloj prenas por si la rajton venĝi ofendojn, kiuj estas tute personaj por li? Ĉu ili havas rajtigon subskribitan « Jehovo », kiu ilin aŭtoritas?

Ĉu vi pensas, ke li estas tre kontenta, kiam la korekcionala polico prenas el lia mano lian tondron, kaj per ĝi brute fulmofrapas malfeliĉulojn, pro kulpo de kelkaj silaboj? Kio pruvas cetere al tiuj Moŝtoj, ke Dio estis ofendata? Li estas tie ĉeestanta, ligita ĉe lia kruco, dum estas ili en sia apogseĝo. Ili demandu lin; se li respondos jese, mi konsentas esti malprava. Ĉu vi scias, kial li faligis de l' trono la dinastion de l' Kapet'oj, tiun malnovan kaj respektindan salaton da reĝoj, kiun ŝmiris tiom da sankta oleo? Mi scias tion, mi, kaj mi tuj diros ĝin al vi. Estas tial, ke ĝi faris la leĝon pri sakrilegio.

Sed tio ne estas la temo.

Kio estas vivi? leviĝi, kuŝiĝi, matenmanĝi, tagmanĝi, kaj rekomenci morgaŭe. Kiam de kvardek jaroj oni faras tiun taskon, tio fine fariĝas ja sengusta.

La homoj similas rigardantojn, unuj sidantaj sur veluro, aliaj sur nuda trabo, plej multaj starantaj, kiuj aŭdas ĉiuvespere la saman dramon, kaj oscedas ĉiuj sufiĉe por dismeti la makzelon; ĉiuj konsentas, ke tio estas mortige enuiga, ke ili estus multe pli bone en la lito, kaj tamen neniu volas delasi sian sidlokon.

Vivi, ĉu tio meritas la penon malfermi la okulojn? Ĉiuj niaj entrepenoj havas nur komencon; la domo, kiun ni konstruigas, estas por niaj hereduloj; la ĉambrorobo, kiun ni ame vatigas, por envolvi nian maljunecon, utilos por fari vindotukojn al niaj genepoj. Ni diras al ni: Jen la tago finita; ni ekbruligas nian lampon, ni flamigas nian fajron;

ni pretigas nin pasigi dolĉan kaj pacan vesperon apud nia kameno: tok tok! iu frapas la pordon; kiu estas tie? estas la morto: ni devas foriri. Kiam ni havas ĉiujn dezirojn de l' juneco, kiam nia sango estas plena je tero kaj alkoholo, ni ne havas unu moneron; kiam ni ne plu havas dentojn nek stomakon, ni estas milionuloj. Ni havas apenaŭ la tempon diri al virino: Mi cin amas! kiam je nia dua kiso, ŝi estas kaduka maljunulino. La imperioj apenaŭ estas firmigitaj, kiam ili ruiniĝas; ili similas tiujn formikejojn, kiujn per grandaj penoj konstruas mizeraj insektoj; kiam mankas nur unu pajlero por ilin fini, bovo faligas ilin sub sia larĝa piedo, aŭ ĉaro sub sia rado. Tio, kiun vi nomas la vegetala tero de tiu globo, tio estas mil kaj mil mortotukoj supermetitaj unu sur alia de la generacioj. Tiuj grandaj nomoj, kiuj sonadas en la buŝo de la homoj, nomoj de ĉefurboj, de monarkoj, de generaloj, ili estas frompaĵoj de antaŭaj imperioj, kiuj bruigas. Vi ne povus fari paŝon ne levigante ĉirkaŭ vi la polvon de mil aĵoj detruitaj antaŭ finiĝo.

Mi estas kvardekjara; mi jam pasis tra kvar profesioj; mi estis repetitoro, soldato, instruisto, kaj jen mi estas ĵurnalisto. Mi estis sur tero kaj sur oceano, sub tendo kaj ĉe fajrujo, post krado de malliberejo kaj inter la liberaj spacoj de la mondo; mi obeis kaj mi ordonis; mi havis riĉecajn momentojn kaj mizerecajn jarojn. Oni min amis kaj oni malamamis min; oni min aplaudis kaj oni min ridindigis. Mi estis filo kaj patro, amanto kaj edzo; mi spertis la sezonon de la floroj kaj la sezonon de l' fruktoj, kiel diras la poetoj. Mi trovis en neniuj el tiuj statoj, ke mi povus multe min gratuli, ĉar mi estis enfermita en haŭto de homo, prefere ol en tiu de vulpo, ol en la konko de ostro, en la ŝelo de arbo aŭ en la ŝeto de terpomo. Eble se mi estus rentulo, rentulo kun kvindek mil frankoj, mi opinius malsame.

Dume, mia opinio estas, ke homo estas maŝino, kiu estas farita speciale por doloro; ĝi havas nur kvin sentojn por ricevi la plezuron, kaj la sufero trafas ĝin per la tuta surfaco de ĝia korpo; ĉe kiu ajn loko oni ĝin pikas, ĝi sangas; ĉe kiu ajn loko oni ĝin bruligas, naskiĝas veziketo. La pulmoj, la hepato, la internaĵoj povas doni al ĝi neniun ĝuon; tamen la pulmo inflamaciĝas kaj tusigas ĝin; la hepato obstrukciĝas kaj febrigas ĝin; la internaĵoj tordiĝas kaj faras kolikon. Vi ne havas unu nervon, unu muskolon, une tendonon sun la haŭto, kiu ne povus kriigi vin pro doloro.

Via organizaĵo ĉiumomente malaranĝiĝas kiel malbona horloĝo. Vi levas la okulojn al la ĉielo por ĝin preĝi, en ilin falas ekskremento de hirundo, kiu ilin sekigas; vi iras al balo, elartikigo vin kaptas ĉe la piedo, kaj oni devas reporti vin hejmen sur matraco; hodiaŭ vi estas granda verkisto, granda filozofo, granda poeto; fadeno en via cerbo rompiĝas vane oni sangeltiros, metos glacieron sur vian kapon, morgaŭ vi estos nur mizera frenezulo.

La doloro staras post ĉiuj viaj plezuroj; vi estas manĝemaj ratoj, kiujn ĝi logas al si per lardero bonodora. Vi

estas ĉe la ombro en via ĝardeno, kaj vi ekkrias. Ho, la bela rozo! kaj la rozo pikas vin; Ho, la bela frukto! Estas interne vespo, kaj la frukto mordas vin.

Vi diras: Dio faris nin por lin servi kaj ami. Tio ne estas vera, li faris vin por suferi. La homo, kiu ne suferas, estas maŝino malbone farita, kreitaĵo malsukcesa, morale kriplulo, abortaĵo de l' naturo. La morto ne estas nur la fino de ĝia vivo, sed ankaŭ ĝia kuracilo. Oni estas nenie tiel bone, kiel en la ĉerko. Se vi kredus al mi, anstataŭ nova palto, iru mendi ĉerkon. Ĝi estas la sola vesto, kiu ne ĝenas.

Tion, kion al vi mi ĵus diris, vi konsideros kiel filozofian ideon aŭ kiel paradokson, estas ja por mi indiferece; sed mi vin petas ke almenaŭ vi ĝin akceptu kiel antaŭparolon, ĉar mi ne povus fari al vi pli bonan, nek pli taŭgan por la malĝoja kaj plorinda historio, kiun mi tuj havos la honoron rakonti al vi.

Vi permesos al mi revenigi mian historion ĝis la dua generacio, kiel tiun de princo aŭ de heroo, pri kiu oni faras funebran paroladon. Vi eble ne perdos pro tio. La moroj de tiu tempo egalvaloris ja la niajn: la popolo portis katenojn, sed kun ili ĝi dancis, kaj sonigis ilin kvazaŭ manklakilojn.

Ĉar, atentu tion, gajeco ĉiam najbariĝas kun servuto. Ĝi estas bono, kiun Dio, la granda kompensisto, kreis speciale por tiuj, kiuj estas sub dependo de mastro aŭ sub la malmola kaj peza mano de la malriĉeco. Tiun bonon li faris por ilin konsoli pri iliaj mizeroj, kiel li faris iajn herbojn por flori inter la pavimŝtonoj piedpremataj, iajn birdojn por kanti sur la malnovaj turoj, kiel li faris la belan verdaĵon de l' hedero por rideti sur la domaĉoj grimacantaj.

Gajeco pasas, kiel hirundo, super la grandaj tegmentoj brilegantaj. Ĝi haltas ĉe kortoj de kolegioj, ĉe pordo de kazinoj, sur ŝtonoj ŝimaj de malliberejoj. Ĝi sin sidigas, kiel bela papilio, sur la plumo de l' lernanto, kiu skribfuŝas puntaskojn. Ĝi glasfrapas, ĉe soldatbudo kun la maljunaj grenadistoj; kaj neniam ĝi kantas pli laŭte — tamen kiam oni lasas ĝin kanti — ol inter la nigraj muregoj, kie oni enfermas la malŝelulojn.

Cetera la gajeco de l' malriĉulo estas iaspeca fiereco. Mi estis malriĉa inter la plej malriĉaj; nu, mi trovis plezuron dirante al la fortuno: Mi ne kurbigis sub via mano; mi manĝos mian malmolan panon tiel fiere, kiel diktatoro Fabricius manĝis siajn rapojn; mi portos mian mizeron, kiel la reĝoj portas sian diademon; frapu kiom vi volos, frapu ree; mi respondos viajn vipadojn per mokegoj; mi estos kiel la arbo, kiu floras, kiam oni ĝin tranĉas ĉe la piedo; kiel la kolono, kies metala aglo brilas en suno, dum pioĉo estas ĉe ĝia bazo!

Karaj legantoj, estu kontentaj pri tiuj klarigoj, mi ne povus liveri al vi pli saĝajn.

Kiel malsimilis tiu tempo kaj la nia! La konstitucia homo ne estas ridema, tute alie.

Li estas hipokrita, avara kaj profunde egoista; al kiu ajn demando li puŝas sian frunton, lia frunto sonas kiel tirkesto plena je kupraj moneregoj.

Li estas afekta kaj ŝvelinta pro vanteco; la spicisto nomas la sukeraĵiston, sian najbaron, sia honorinda amiko, kaj la sukeraĵisto petas la spiciston akcepti la certigon de la distinga ŝato kun kiu li havas la honoron esti... k. t. p., k. t. p.

La konstitucia homo havas la manion voli sin distingi de l' popolo. Patro portas bluan kotonan kitelon kaj filo mantelon el Elbeuf. Nenia ofero ĝenas la konstitucian homon por kontentigi sian manion ŝajni io. Li volas simili la flosantaj bastonojn. Li vivas per pano kaj akvo; li restas sen fajro vintre, sen biero somere, por havi veston el delikata drapo, kaŝmiran veŝton, flavajn gantojn. Kiam oni lin konsideras kiel bonsocietan homon, li ja sin konsideras kiel grandan homon.

Li sin pene, regulege gravigas; li ne krias, li ne laŭte ridas, li ne scias kien kraĉi, li ne faras unu geston, kiu superas alian. Li diras tre bone: Bonan tagon, Sinjoro; bonan tagon, Sinjorino. Tio ja estas bona sintenado; nu kio estas bona sintenado? Mensoĝa lako, per kiu oni ŝmiras lignon, por ŝajnigi ĝin junko. Tiel oni sin tenas antaŭ la sinjorinoj. Bone; sed antaŭ Dio, kiel oni devos teni sin?

Li estas pedanta, li anstataŭas la spriton, kiun li ne havas, per afekta pureco de la lingvo, kiel bona dommas-trino anstataŭas la meblojn, kiuj mankas, per ordo kaj pureco.

Li ĉiam estas sub dieto. Se li ĉeestas festenon, li estas muta kaj priokupata, li engutas korkon kiel panpecon, kaj prenas kremon kiel blanksatcon. Li atendas por trinki ĝis oni toastos. Li havas ĉiam ĵurnalon en poŝo, li parolas nur pri komercaj regnokontraĵoj kaj fervojaj linioj, kaj li ridas nur ĉe la deputata ĉambro.

Sed je la epoko, al kiu mi vin rekondukas, la moroj de la urbetoj ankoraŭ ne estis pudrigitaj per eleganteco; ili estis plenaj de ĉarma malafekteco kaj de amindega simpleco. La karaktero de tiu feliĉa tempo estis la nezorgemeco. Ĉiuj tiuj homoj, ŝipoj aŭ nuksoŝeloj, sin allasis kun fermitaj okuloj al la fluo de la vivo, ne pripensante, kien ili albor-diĝos.

La burĝoj ne petadis oficojn; ili ne trezoramasis; ili vivis hejme en ĝoja abundeco, kaj elspezis siajn rentojn ĝis la lasta ludoviko. La vendistoj, tiam nemultaj, malrapide riĉiĝis, ne farante multan penon, kaj nur per naturaj efikoj; la dungitoj laboris, ne por monŝpari, sed por trafi ĝuste la neceson. Ili ne havis post kalkanoj tiun teruran konkurencon, kiu nin puŝas, kiu krias al ni senĉese: Iru do! tial ili penis nur laŭplaĉe; ili estis nutrinitaj siajn patrojn, kaj kiam ili estis maljunaj, iliaj idoj devis ilin siavice nutri.

Tia estis la senĝenemo de tiu regaliga societo, ke tuta advokataro kaj membroj mem de l' juĝistaro iris en la drinkejon kaj publike diboĉis; por ke tio ne ignoriĝu, volonte ili estus pendigintaj sian ĉapon ĉe la branĉoj de l' abia bud-

montrilo. Ĉiuj tiuj, grandaj kiel malgrandaj, ŝajnis ne havi aliajn aferojn farotajn, krom amuziĝo; ili elpensadis nur efektivigon de bona farso, aŭ imagon de bona fabelo. Tiuj, kiuj tiam havis spriton, anstataŭ ĝin elspezi por intrigoj, ĝin elspezis por ŝercoj.

La senokupuloj, kaj ili estis grandnombraj, kolektiĝis sur la placo; la vendaj tagoj estis por ili komediaj tagoj. La kampuloj, kiuj venis alporti provizaĵojn al la urbo, estis iliaj martiroj; ili faris al ili kruelaĵojn plej burleskajn kaj plej spritajn; ĉiuj najbaroj alkuris por partopreni la spektaklon. La hodiaŭa korekcionala polico uzus pri tio tonon de akuzparolado; sed la tiama juĝistaro amuziĝis kiel la aliaj pri tiuj ridigaj scenoj, kaj ofte ja prenis en ili rolon.

Mia avo do estis portisto de devigaktoj; mia avino estis malgranda virino, kiun oni riproĉis ĉar ŝi ne povis vidi, kiam ŝi iris en preĝejon, ĉu la sanktakvujo estas plena. Ŝi restis en mia memoro kiel knabineto sesdekjara. Post ses jaroj de edziniĝo, ŝi havis kvin idojn, ĉu knabojn ĉu knabinojn; ĉio tio vivis per la eta profito de mia avo kaj fartis mirinde. Oni tagmanĝis sepoje per tri haringoj, sed oni ricevis panon kaj vinon laŭvole, ĉar mia avo havis vinberkampon, kiu estis neelĉerpebla fonto de blanka vino. Ĉiuj tiuj infanoj estis utiligataj de mia avino laŭ ilia aĝo kaj iliaj fortoj. La unua, kiu estis mia patro, estis nomita Gaspardo; li lavis la manĝilaron kaj iris al la viandvendejo; ne estis hundeto en la urbo pli bone dresita ol li; la dua balais la ĉambron; la tria tenis la kvaran sur brakoj; kaj la kvina rulis sin en sia lulilo. Dum tiu tempo mia avino estis en la preĝejo, aŭ babilis ĉe la najbarino. Cetere ĉio iris bone, oni alvenis rekte malrekte ne farante ŝuldojn ĝis la fino de la jaro. La knaboj estis fortaj, la knabinoj ne malbelaj, kaj la gepatroj feliĉaj.

Mia onklo Benjamino havis loĝejon ĉe sia fratino; li estis alta kvin futojn kaj dek kolorojn, portis grandan glavon ĉe la flanko, havis veston el skarлата vila lano, pantalonon samkoloran kaj samŝofan, silkajn ŝtrumpojn perlgrizajn, kaj ŝuojn kun arĝentaj bukoj; sur lia vesto agitiĝadis granda nigra harvosto prekaŭ tiel longan, kiel lia glavo, kiu senĉese tien kaj ĉitien iranta, estis pentrinta lin per pudro, tiama-niere ke la vesto de mia onklo similis, kun ĝiaj nuancoj rozaj kaj blankaj, brikflankon elfrotitan.

Mia onklo estis kuracisto, jen kial li havis glavon. Mi ne scias, ĉu la malsanuloj tre fidis la medecinon; li ofte diris, ke kuracisto sufiĉe estas farinta, kiam li ne mortigis sian malsanulon. Kiam mia onklo Benjamino estis ricevinta kelkan trideksoldan moneron, li iris aĉeti grandan karpon kaj donis ĝin al sia fratino por fari al li vinkuirajon, per kiu regaliĝis la tuta familio. Mia onklo Benjamino, laŭ diro de ĉiuj, kiuj lin konis, estis la homo plej gaja, plej ridiga, plej sprita de la lando, kaj li estus estinta la plej... kiel mi diros por ne malrespekti la memoron de mia praonklo?... li estus estinta la malplej sobra, se la urba tamburisto, tiel nomita Cicero, ne estus partopreninta lian gloron.

Tamen mia onklo Benjamino ne estis tia, kian vi triviale nomas drinkulo, atentu ne kredi tion. Li estis epikurano, ĉe kiu filozofeco atingis ebiecon, kaj nenio plie. Li havis stomakon plenan je alteco kaj nobleco. Li ŝatis la vinon ne pro ĝi mem, sed pro tiu frenezeco, kiun ĝi donas dum kelkaj horoj, frenezeco kiu ĉe spritulo sensaĝiĝas tiel naive, spicekaj originale, ke oni dezirus ĉiam tiel esti saĝa. Se li estus povinta ebriiĝi legante la meson, li estus leginta ĉiutage la meson. Mia onklo Benjamino havis principojn: li asertis, ke netrinkinta homo estas homo ankoraŭ dormanta; ke la ebrieco estus unu el la plej grandaj bonfaroj de la kreinto, se ĝi ne dolorus la kapon, kaj ke la sola afero, kiu donas al la homo superecon super la bruto, estas la kapablo ebriiĝi.

La prudento, diris mia onklo, ĝi estas nenio; ĝi estas la povo senti la estantajn malbonojn, kaj memori. La privilegio abdikis sian prudenton estas io. Vi diras, ke la homo, kiu dronigas sian prudenton en la vinon, brutiĝas: estas kasta fiereco, kiu vin tiel paroligas. Ĉu vi do opinias, ke la situacio de la bruto estas pli malbona ol la via? Kiam vi estas turmentata de l' malsato, vi ja volus esti tiu bovo, kiu sin paŝtas en herbo ĝis la ventro; kiam vi estas en malliberejo, vi ja volus esti la birdo, kiu trairas per liberaflugilo la ĉiel lazuron; kiam vi estas senbienigota, vi ja volus esti tiu malbela heliko, kiun neniu minacas senŝeligi.

La egalecon, kiun vi revas, la bruto posedadas. Estas en la arbaroj nek reĝo, nek nobeloj, nek tria klaso. La problemon pri komuna vivo, kiun serĉas vane viaj filozofoj, insektaĉoj, formikoj, abeloj solvis depost miloj da jarcentoj. La bestoj ne havas kuracistojn; ili estas nek unuokuloj, nek ĝibaj, nek lamaj, nek kriplaj, kaj ili ne timas la inferon.

(Daŭrigota).

LA SOCIETO

INSISTE ni petas ĉiujn societanojn de « Libera Penso », ke ili senprokraste sendu sian kotizaĵon por la jaro 1912 al S-ro René Deshays, Sens. (Francujo).

ALIĜOJ

S-ro Tyl, Jaroslov, 57 Olomoucha Prostejov, Moravio, Aŭstrio.

Cooperativa Luz, Rua Renador Eusebio 31, Rio de Janeiro, Brazilujo.

Luis Santamarina, Str. Benito Gutierrez 4, 3a int. izq., Madrid.

Aŭgusto Kolomyjski, Inĝeniero, Nowy Sacz 6, Galicio.

Ladislao Dr. Safar, Egyhazter 7 sz., Debreczen, Hugarujo.

Per Lamm, 7 rue de Lille, Paris.

Bikupravol, W., Hozud, Imustchestw, Ruslando.

H. T. Bailey, 31 Caversham Road, Kentish Town, London.

E. Perret, 20 rue Masséna, Nice, Francujo.

Richard Felser, del. UEA, fervojoficisto, Welsberg (Tirolo)

H. R. Lock, ĉe Burrell Bros & Co., 52 Commercial Rd., Southampton.

J. Van As, Prinsestraat 2, Antwerpen, Belgujo.
 J. Aerts, Beekstraat 4, Antwerpen.
 C. Bornstein, Kepplerstrasse, 15, Mannheim, Germanujo.
 N. Bestermann, Wetstraat 96, Antwerpen.
 Drion, Leemstraat 144, E. M. Berchem-Antwerpen.
 Frans Engels, Borgerhoutschestraat 36, Antwerpen.
 Melis, Kloosterstraat 134, Antwerpen.
 Nabbé, Offerandestraat 94, Antwerpen.
 F-ino Nabbé, Offerandestraat 94, Antwerpen.
 F-ino Van den Ostende, P., Van Maerlandstraat 32, Antwerpen.
 Peeters, Carnotstraat 104, Antwerpen.
 F. Prat, Somméestraat 54, Antwerpen.
 Reindjes J., 12^e rég. de ligne, 2^e bat., 2^e comp., Liège.
 F. Scheveneels, Bervoetstraat, 40, Antwerpen.
 F-ino M. Timperman, Nijverheidstraat 36, Antwerpen.
 Léon Van de Voorde, Dambruggestraat 118/2, Antwerpen.
 S-ino R. Weisz, Montenstraat 124, Borgerhout-Antwerpen.
 EKSIĜIS: Chevalier, F-ino Engels.
 ENTUTE: 222 societanoj.

KASO.

NOVEMBRO-DECEMBRO 1911.

Enspezoj:	Reportite	Fr. 367.75
Kotizo de Richard		2.50
Drudin, kun 1-jara kolekto		5.—
Lecat, 2 jaroj		5.—
Jaroslav		2.40
Niedzwuedzki		2.50
Maranhao		4.90

Fr. 397.65

Elspezoj: Poŝtmarkoj	»	4.—
(Sm. 155,15)	En Kaso	Fr. 393,65

JANUARO-MARTO 1912.

Enspezoj:	Reportite	Fr. 393.65
Kotizo de Heriberto Dias Lopez		5.—
Aug. Kolmyjski		2.50
Safar		2.50
Lamm		2.25
Drudin		2.25
F-ino Beynard		3.—
Timus		2.25
Padfield		2.50
Bikupravoi		2.40
Bailey		2.50
Perret kun 1-jara kolekto		5.—
Felser		2.50
Santamarina		2.50
Abono de Calvo		2.25
Vendo apartaj numeroj		1.25

Fr. 434.30

Elspezoj:		
Preso bulteno N° 10 (Kongreso)	Fr.	33.—

Preso bulteno N° 11	18.—
Preso bulteno N° 12	18.—
Sendo bulteno N° 10	20.—
Sendo bulteno N° 11	17.50
Sendo bulteno N° 12	17.—
Leterpapero	5.—
Poŝtkartoj	4.—
Kovertoj (leteroj)	4.50
Poŝtkartoj-Voĉdonado 1911	3.25
Kovertoj (bulteno)	5.—
Poŝtelspezoj (Antverpeno) de Julio	22.—
Poŝtelspezo (Sens)	3.— 170.25
(Sm. 105.60)	En Kaso: Fr. 264.05

RICEVITAJ VOĈDONOJ DE KOMITATANOJ.

Stromboli: Prez. Büneman, Vicprez. Deshays, Sek. Schoofs.
 Guillemin: Sek. Schoofs.
 Fridrich: Prez. Deshays, Vicprez. Bünemann, Sek. Schoofs.
 Deshays: Prez. Bünemann, Vicprez. Stromboli, Sek. Schoofs.
 Schoofs: Prez. Bünemann, Vicprez. Deshays, Sek. Stromboli.

Liberpensulojn nepre interesos INTERNACIA SOCIA REVUO, monata Esperanta gazeto. Redakcio ĉe S-ro J. L. BRUIJN, Weimarstraat, 22, Hago (Nederlando). Abonprezo: jare 1.40 Sm; duonjare 0.80 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London.

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de

D-ro L. L. Zamenhof.

Administracio: HACHETTE & K^{io}
 Paris. — 79, Boulevard St-Germain, 79. — Paris.

JARABONO: Francujo: Fr. 6.— (Sm. Fr. 2.40).
 Ceteraj landoj: Fr. 7.— (Sm. Fr. 2.80).

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

Eliranta inter la 15 kaj la 20 de ĉiu monato

— LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ GAZETOJ ESPERANTISTAJ —
 Fondita en 1895

La Plej Enhavoriĉa! La Plej Malkara!

48 PAĜOJ da **5** FR. (2 Sm.)
 dense presita Abonprezo
 teksto en plej por
 korekta kaj plej UNU JARO
 klasika stilo.

Por ricevi specimenon oni sendu unu poŝtan respondkuponon
 Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Presejo Esperantista; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.

★ LIBERA PENSO ★

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARFOTIZO KUN LA MONATA BULTENO : 1 SM (FR. 2.50)

SEKRETARIEJO : RENÉ DESHAYS, Seds (Francojo)

—o—

Administrado de la gazeto : Kleine Beerstr., 45, Antwerpen.

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn al S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions, Washington D. C. Usono. Kotizmono kun bulteno : 50 c. = 1 Sm.

PERSEKUTO.

Rilate je nia artikolo sub tiu ĉi titolo en nia antaŭa numero ni povas nun sciigi al niaj legantoj, ke la persekutato nun trovis akcepton en reformema terkolonia societo kaj pro tio ne plu bezonas la dankindan helpon de la samideanoj.

KONGRESO en MÜNCHEN.

La Internacia Federacio de la « Libera Penso », kies sidejo estas en Bruselo, kaj kiu kunligas la Liberpensajn organizaĵojn plej gravajn en la tuta mondo, decidis fari sian XVIan kongreson en München (Bavarlando), de la 31 Aŭg. ĝis la 4 Sept. Tiu kongreso, la unua, kiun la L.P. Federacio havos en Germanujo, certigas de nun pri granda sukceso, dank' al la partopreno de l' majstroj de la homa penso.

TAGORDO :

Sabate 31an de Aŭgusto vespere, prepara kaj privata kunsido.

1an, 2an kaj 3an de Septembro estos diskutataj la jenaj demandoj :

- 1-e. Determini la celon de la Internacia Federacio de la Libera Penso.
- 2-e. Pri la disigo de la Eklezio kaj de la Regno.
- 3-e. La edukado kaj la Libera Penso.

Privata kunsido, ekskluzive rezervata al la delegitoj de l' Federacioj kaj de l' Societoj aliĝintaj al la Internacia Federacio, estos dediĉata al la reformo de l' statuto de la Federacio kaj aliaj administraj demandoj.

• NOTU niaj esperantistaj anoj tiun avizon, kaj tiuj, kiuj ne veturos Krakovon peni por ĉeesti en München. Nia Societo estos nepre reprezentata de almenaŭ unu delegito ; sed ni esperas, ke multaj societanoj partoprenos tiun bonegan okazon por propagando.

Kiel parolis Zarathushtra.

(Friedrich Nietzsche)

La kredo al dieco signifas : esti sklavo kaj almozulo, eterne servuti al malsana fantazio, eterne almozpeti la kompatojn de l' ĥimeraj potenculoj. Dio estas la nokto, en kiu vagadas la senkonsciuloj. Universo estas la ĝenerala racio, la homo estas ĝia plejperfekta parto, pro tio oni devas serĉi dion en la libera homa racio kaj ne en la ĥimeraĵoj. La dioj estas tiranoj, kiuj ekzistas nur por tiuj, kies prudento estas infana. Servuti al la imagitaj tiranoj signifas tion saman, kion malsana cerbo. La preĝejoj estas malliberejoj, en kiujn la popolo propravole iradas. La religio estas asocio de l' malfeliĉuloj kiuj neniam eksentis la entuziasmigon de l' libereco.

La diservo en la preĝejoj estas nenio alia, ol la funebra meso al la konscienco de tiuj homoj, kiuj iradas preĝejon. Kiam ajn vi ekkomencas la preĝon al la diecoj, vi deklaru unue, ke vi falas en mallumigan fantazion de difektita cerbo, malinda je homo libera. Se vi jam tiel malalten estas falintaj, ke vi bezonas la religion, vi serĉu ĝin ĉe la infanoj, ĉar nenie vi povas trovi tiom da ecoj de ia religio, kiom ĉe l' infano.

La racio estas la sola dio en la universo, la konscienco estas ĝia filino. Vi faru la diservojn en la templo de Racio kaj vi estos aŭdantaj la voĉon de l' libera penso.

La sola dio, kiu eterne estos vivanta estas Racio, ĉiuj ceteraj dioj de multnombroj religioj estas mortemuloj. Ĉiuj religioj kuradas ĉielon, kondukantaj la homojn per mallumaj, ĥimeraj ŝtupetaroj de l' mensogo al la ĉielo, estante malkapablaj krei al la homaro feliĉan vivon sur la tero.

Se la religioj estus saĝaj, tiam ili ne estus rifuĝantaj en la ĉielon, kie povas ripozi nur malsana fantazio de l' homaj sklavoj. Forprenu de la religioj la ĉielon, tiun « alian mondon », kaj vi sciu, ke vi estas forpreninta de ili la animon, ĉar tiu plejgranda mensogo estas ilia animo. Se vi volas

La Marto 1912 Junio 7 - 700.153 - C Period.

vidi la tutan sensecaĵon de l' religioj, vi iru preĝejon kaj rigardadu la diservojn al la diecoj, kiuj havas tiom da senco, kiom la laboro de tiuj, kies cerbo estas difektita. Sian savadon serĉi ekster la racio signifas same tiom, kiom : serĉi la homon ekster la homaro. La religio estas senfrukta dezerto, sur kiu vaĝadas malprobantoj de l' racio, serĉante sian fantazian dion, de kiu ili estos ricevantaj la rekompencon por sia senlaborado.

Nenio estas tiel evidenta, kiel la sensenco de l' religioj, kaj tamen la homoj tiel malvolonte perceptas tiun plej grandan mondmensogon, kiu supren leviĝis ĝis la adorado. La homoj kun religio estas nenio alia, ol idiotoj, kiuj nehavante sufiĉe da forto por akcepti la belan kaj klaran lumon, de l' spirito, akceptas la mallumon. Vi, kiuj kuradas al viaj dioj kaj forlasas la grandiozan racion, ĉu vi ne vidas, ke rompita estas via ĉielo, sur kiu estis logintaj viaj dioj ! Ho, kion ja faros vi nune kun via « alia mondo », kiam vi plue ne havas vian ĉielon, ĉar ĝi jam de longe estas faligita de kelkaj homaj spiritoj ; mizeraj estas tiuj viaj dioj, kiuj el la ĉielaj rompitaĵoj estas diskurintaj kiel timemaj infanoj, kaŝinte sin en la polvoplenajn bibliojn simile al la tineoj, kiuj mordetante la biblion, elmordetos ankaŭ sin mem.

Ho, vi kun viaj ektimiĝintaj dioj, enrigardetu almenaŭ unufojon en la luman templon de l' racio, kaj vi vidos grandiozajn verojn, pri kiuj vi ĝis nun eĉ ne konjektis, vi perceptos vian grandan memkonscion, vi ekkonos unu grandan kaj novan mondon, plenan de vero kaj laboro, plenan de kontenteco kaj libereco, plenan de l' homa indeco.

Kiel parolis Zarathustra.

TRADUKIS P. STANIŜIĈ.

August Strindberg.

Mortis la 14an de majo 1912a August Strindberg, unu el la plej gravaj, se ne la plej grava mem, el la svedaj literaturistoj. Li naskiĝis en 1849 kiel filo de malriĉaj gepatroj, kiuj nek povis doni al li la edukon kaj instruon korespondantan al liaj fortaj spiritaj kapabloj, nek donis al li taŭgan ekzemplon de estiminda familia vivo.

La influoj de la gepatra hejmo kaj la kuntuŝo kun plej malsamaj medioj dum lia ŝanĝriĉa vivo efikis forte sur lin. En ĉiama ŝanĝo troviĝis la idearo de Strindberg ; sed unu firma punkto estis en ĝi : la senkonsidera, senkompromisa veremo kaj konsekvenĉemo de Strindberg kontraŭ si mem.

La esperantistoj havis en Dresdono okaze de majstra prezentado en Esperanto la okazon, admiru la fortan spiriton, la senkonsideran kritikon kontraŭ la difektoj de nia falsa kulturo, en la dramoj « Fraŭlino Julie » (Fröken Julie) kaj « Pario » (Parias). Same forta estas la romano « Cirkaŭita de l' Maro » (I havsbandet). Tiu ĉi libro, same kiel la kolekto de noveloj « Utopiaĵoj Efektivigitaj » (Utopier i Verkliggheten) montras la literaturan kapablon de Strindberg, priskribi pejzaĝojn. La libro « La ruĝa ĉambro » montras la iluziojn

kaj la falsecon de nia socia vivo. En « Inferno » (« La Infero ») la aŭtoro publikigas sian taglibron de la tempo de liaj plej gravaj ideŝanĝoj. Li fariĝis historia kaj trovis savon kaj konsolon en la katolika religio. Kun la biblio en la mano li mortis, la granda batalanto de l' ateismo. Tamen, tio kio donis al Strindberg lian famon kaj kio faros liajn verkojn senmortaj, estas nur la periodo de lia batalo, kiam li estis kontraŭreligia, kiam lia spirito ankoraŭ estis sana.

O. B.

(Mi citis nur la librojn, kiujn mi legis ; la verkaro de Strindberg estas grandampla. La raportinto.)

Mia Onklo Benjaminio De Claude Tillier (Francujo, 1801-1874)

TRADUKIS R. DESHAYS

(Daŭrigo)

Mia onklo Benjaminio estis dudekokjara. Jam de tri jaroj li praktikis la medicinon ; sed la medicino ne estis farinta rentojn al li, tute kontraŭe ; li ŝuldis tri vestoj el skarlato al sia drapvendisto, tri jaroj de kaparango al sia perukisto, kaj li havis ĉe ĉiu el la gastejoj plej famaj en la urbo beletan noteton, el kiu estis nur kelkaj antaŭzorgaj kuraciloj dekal-kulotaj.

Mia avino estis tri jarojn pliaĝa ol Benjaminio ; ŝi estis lulinta lin sur siaj genuoj, portinta sur la brakoj, kaj ŝi konsideris sin kiel lia Mentoro. Ŝi aĉetis por li liajn kravatojn kaj naztukojn, fikis liajn ĉemizojn, kaj donis al li bonajn konsilojn, kiujn li aŭskultis tre atente, oni devas tion konfesi, sed kiujn li tute ne uzis.

Ĉiuvespere regule, post la manĝo, ŝi lin instigis preni edzinon.

— Fi ! diris Benjaminio, por havi ses idojn kiel Machecourt (Maŝkur) — tiel li nomis mian avon — kaj vespermanĝi per naĝiloj de haringo.

— Sed, mizerulo, ĉi havos almenaŭ panon.

— Jes, panon, kiu estos tro ŝvelinta hodiaŭ, morgaŭ ne sufiĉe, kaj kiu postmorgaŭ estos morbila ! Panon ! Kio estas tio ? Tio taŭgas por malebli morti, sed tio ne taŭgas por vivigi. Mi estos ja multe profitinta, kiam mi havos edzinon, kiu opinios, ke mi metas tromulte da sukero en miajn boteletojn kaj tromulte da pudro en mian harveston, kiu venos preni min ĉe l' gastejo, kiu esploros miajn poŝojn kiam mi kuŝos, kaj aĉetos al si tri manteletojn, dum mi unu veston.

— Sed ĉiajn kreditorojn, Benjaminio, kiamaniere ĉi pagos ?

— Unue, dum oni havas krediton, estas kvazaŭ oni estus riĉa, kaj kiam viaj kreditoroj estas kreditaj el bona kreditora pasto, kiam ili estas paciencaj, estas kvazaŭ oni havus nenian. Poste, kion mi bezonas por min relevi ? bonan epidemian malsanon. Dio estas bona, mia kara fratino, kaj ne lasos en embaraso tiun, kiu fikas lian plej belan verkon.

— Jes, diris mia avo, kaj kiu ĝin tiel bone sentaŭgigas ke oni devas ĝin porti en teron.

— Nu, respondis mia onklo, tio estas la utileco de la kuracistoj, sen ili la mondo estus tro multloĝata.

Por kio utilis, ke Dio prenu la penon sendi al ni malsanojn, se troviĝus homoj, kiuj povus ilin forkuraci?

— Laŭ tiu rezono, ci estas malhonestulo, ci ŝtelas la monon de tiuj, kiuj cin alvokas.

— Ne, mi ne ŝtelas ĝin, ĉar mi trankviligas ilin, ĉar mi donas al ili la esperon, kaj mi ĉiam trovas rimedon por ilin ridigi. Tio valoras ja iom.

Mia avino, vidante ke la konversacio ne plu havis la saman temon, findecidis ekdormi.

II.

KIAL MIA ONKLO DECIDIS EDZIĜI.

Tamen terura katastrofo, kiun mi havos la honoron tuj rakonti al vi, ŝancelis la decidon de Bejamino.

Ian tagon, mia kuzo Page (Paĝ) advokato ĉe la landjuĝejo de Clamecy (Klamsi) venis lin inviti kun Machecourt por festi Sanktan Yvon. La noktomanĝo estis farota ĉe ia fama drinkejo, kuŝanta je du paŝspacoj de la antaŭurbo; la kunmanĝantoj cetere estis elektitaj personoj. Benjaminon ne estus doninta tiun vesperon por unu tuta semajno de sia kutima vivo. Tial, post vesproj, mia avo, ornamita per sia edziĝa vesto, kaj mia onklo, kun la glavulo ĉe la flanko, estis je la rendevuejo.

La kunmanĝantoj estis preskaŭ ĉiuj kunvenintaj. Sankta Yvo estis belege reprezentita ĉe tiu konveno. Estis unue advokato Page, kiu pledis ĉiam nur inter du drinkoj; la skribisto de la tribunalo, kiu estis kutimiĝinta skribi dormante; prokuratoro Rapin, kiu, ricevinte donace de pledanto barelon da vino acidiginta, lin asignigis por lin devigi havigi al li unu pli bonan; notario Arthus, kiu estis manĝinta salmon kiel deserton; Millot-Rataut (Mijo-Rato), poeton kaj tajloron, aŭtoron de la granda Kristnaska Kanto; maljuna arkitekto, kiu de dudek jaroj ne estis malebriiĝinta; Sro Minxit, kuracisto de la ĉirkaŭaĵo, kiu ekzamenis la urinojn; du aŭ tri komercistoj gravaj... pro ilia gajeco kaj apetito, kaj kelkaj ĉasistoj, kiuj estis abunde provizintaj la tablon per ĉasaĵo. Vidante Benjaminon, ĉiuj kunmanĝantoj faris aklamon kaj deklaris, ke oni devas sidi ĉe tablo. Dum la du unuaj prezentoj, ĉio iris bone. Mia onklo estis ĉarma per sprito kaj ŝercoj; sed je la deserto, la kapoj ekscitiĝis: ĉiuj komencis samtempe krii. Baldaŭ la konversacio estis nur klakado de epigramoj, maldelikataj vortoj, spritaĵoj kune eksplodantaj, kaj penantaj mallaŭtigi unu la alian; ĉio tio bruis kiel dekduo da glasoj samtempe interfrapiĝantaj.

Sinjoroj, ekkriis advokato Page, mi devas regali vin per mia lasta pledo. Jen la afero: « Du azenoj estis malpacintaj sur herbejo. La mastro de unu, malbonulo ja se iu tia ekzistas, alkuras kaj bastonfrapas la alian azenon. Sed tiuĉi kvarpiedulo ne estis tolerema; li mordas nian homon ĉe la malgranda fingro. La posedanto de la mordinta azeno estas

asignata ĉe Sinjoro Landjuĝisto kiel respondan pri la faroj kaj agoj de sia besto.

» Mi estis la advokato de la defendato. Antaŭ alveni al la demando pri fakto, mi diris al la landjuĝisto, mi devas instrui vin pri la moraleco de l' azeno, kiun mi defendas kaj pri tiu de l' plendanto. Nia azeno estas kvarpiedulo tute neatakema; li ĝuas la estimon de ĉiuj, kiuj lin konas, kaj la kampogardisto havas por li grandan ŝaton. Nu mi vetas kun la homo, kiu estas nia kontraŭulo, ke li ne povas diri tiel. Nia azeno estas portanto de atesto de sia komunumestro — kaj atesto efektive ekzistis — kiu certigas lian moralecon kaj bonkonducon. Se la plendanto povas montri saman ateston, ni konsentas pagi al li mil ormonerojn kiel kompensajon ».

— Sankta Yvo benu cin, diris mia onklo; poeto Millot-Rataut devas kanti al ni sian grandan Kristnaskon: Genuen, kristanoj, genuen!

Jen kio estas superege lirika. Nur la Sankta Spirito povas esti inspirinta al li tiun belan version.

— Faru do tian, ci, ekkriis la tajloro, ĉe kiu Burgonja vino estis koleriga.

— Mi ne estas tiel malsprita, respondis mia onklo.

— Silentu! interrompis advokato Page frapante per sia tuta forto sur la tablon; mi deklaras al la kortumo, ke mi volas fini mian pledon.

— Poste, diris mia onklo, ci ankoraŭ ne estas sufiĉe ebria por plēdi.

— Kaj mi ja diras al ci, ke mi tuj pledos. Kiu ci estas, ci kvinfutulo, por malebligi al advokato plēdi?

— Atentu, Page, diris notario Arthus, ci estas nur plumulo, kaj la afero estas al ci kun glavulo.

— Konvenas ja al ci, forkulo, salmonmanĝulo, paroli pri la glavuloj; por ke ci timigu iun, tiu devus esti kuirita.

— Benjaminon estas efektive terura, diris la arkitekto. Li estas kiel la leono: per bato de sia vosto li povus deĵeti homon.

— Sinjoroj, diris mia avo ekstarante, mi min deklaras grantulo por mia bofrato; li neniam verŝis sangon, se ne per lia lanceto.

— Ĉu vi kuraĝus ja tion aserti, Machecourt?

— Kaj ci, Benjaminon, ĉu ci kuraĝus aserti la malon?

— Tiuokaze, ci tuj donos al mi elpagon por tiu insulto; kaj ĉar ni havas ĉitie nur unu glavon, kiu estas la mia, mi konservas la ingon, kaj ci prenos la klingon.

Mia avo, kiu tre amis sian bofraton, por ne kontraŭstari al li, akceptis la proponon. Dum la du kontraŭuloj ekstaris:

— Momenton, Sinjoroj, diris advokato Page, estas necese fiksi la kondiĉojn de l' batalo. Mi proponas, ke ĉiu el la du kontraŭuloj, por ne fali antaŭtempe, tenu sian sekundanton ĉe la brako.

— Akceptite, ekkriis ĉiuj kunmanĝantoj.

Baldaŭ Benjaminon kaj Machecourt staras unu kontraŭ la alia.

— Ĉu ci estas preta, Benjamino?

— Kaj ci, Machecourt?

Per sia unua glavbato mia avo tranĉis ĉe la mezo la ingon de Benjamino, kvazaŭ ĝi estus skorzonero, kaj faris al li ĉe la manradiko vundon, kiu estis devigonta lin dum almenaŭ une semajno trinki per la maldekstra mano.

— Mallertulo! ekkris Benjamino, li min altranĉis!

— Nu kial, respondis mia avo kun ĉarma simplanimeco, ci havas glavon, kiu tranĉas?

— Malgraŭ tio, mi volas mian revenĝon, kaj restas al mi sufiĉe por cin devigi peti kompaton, kun la duono de tiu ingo.

— Ne, Benjamino, rediris avo, estas cia vico por preni la glavon. Se vi min pikos, ni estos samkalkulaj, kaj ni ne plu ludos.

La kunmanĝintoj, malebriigitaj per tiu akcidento, volis reveni urben.

— Ne, Sinjoroj, ekkris Benjamino per sia Stentota voĉo, ĉiu reiru ĉe sia sidejo; mi volas fari al vi proponon. Machecourt, ĉe sia provbato, kondutis plej brile; li taŭgas batali kun la plej mortigema de l' barbiroj, se nur tiuĉi cedos al li la glavon kaj konservos la ingon. Mi proponas nomi lin skermomajstro: nur kun tiu kondiĉo mi povos konsenti lasi lin vivi; kaj eĉ, se vi sekvos mian opinionon, mi bonvolos prezenti al li la maldekstran manon, tial ke li kripligis min ĉe la dekstra.

— Benjamino estas prava, kriis multegaj voĉoj, brave, Benjamino! Ni devas akcepti Machecourt kiel skermomajstron.

Kaj ĉiu kuras al sia loko, kaj Benjamino postulas duan deserton.

Dume la famo de tiu akcidento estis disvastiĝinta en Clamecy. Pasante de buŝon al buŝo, ĝi estis mirinde grandiginta, kaj kiam ĝi atingis mian avinon, ĝi estis alpreninta la gigantajn proporciojn de mortigo farita de ŝia edzo kontraŭ ŝia frato.

Mia avino, en korpo longa unu ulnon, portis karakteron plenan je firmeco kaj energio. Ŝi ne iris al la najbaroj por kriegadi kaj ĵetigi al si vinagron sur la vizaĝon. Kun tiu vigleco, kiun la doloro donas al la fortaj animoj, ŝi tuj vidis, kion ŝi devas fari.

Ŝi enlitigis la infanojn, prenis la tutan monon, kiu estis en la domo kaj la malmultajn juvelojn, kiujn ŝi posedis, por liveri al sia edzo la rimedojn por eliri el la lando, se necese; faris pakon el tuko taŭga por fari vindaĵojn kaj ĉarpion kuraconte la vunditon se okaze li estus ankoraŭ vivanta, fortiris matracon el sia lito, kaj petis najbaron, ke li sekvu ŝin kun ĝi; tiam sin envolvante en sia mantelo, ŝi direktis sin sensanceliĝe al la fatala drinkejo. Je l' enirejo de la antaŭurbo ŝi renkontis sian edzon, kiun oni triumfe rekondukis kronitan per korkoj. Li estis apogata sur la maldekstra brako de Benjamino, kiu tutgorĝe kriegis: « Ni al ĉiuj ĉeestantoj konigas, ke Sinjoro tielnomita Machecourt, baston persekutisto de Lia Reĝa Moŝto, ĵus estas proklamita skermomajstro, rekompense pro... »

— Hundo drinkulo! ekkriis mia avino ekvidante Benjamino; kaj ne povante rezisti al la emocio, kiu de unu horo ŝin sufokis, ŝi falis sur la pavimon. Oni devis ŝin reporti hejmen sur la matraco, kiun ŝi estis destininta por sia frato.

Tiuĉi ekmemoris sian vundon nur morgaŭ matene almetante sian veston; sed lia fratino havis fortan febron. Ŝi estis ok tagojn danĝere malsana, kaj dum tiu tuta tempo Benjamino restadis apud ŝia lito. Kiam ŝi estis kapabla lin aŭdi, li promesis al ŝi, ke de tiam li kondutos pli regule, kaj ke li pensas pri pago de siaj ŝuldoj kaj pri edziĝo.

Mia avino baldaŭ restariĝis. Ŝi komisiis sian edzon por ekserĉi edzinon por Benjamino.

Post kelke da tempo, vespere je la monato novembro, mia avo alvenis kotkovrita ĝis la dorso, sed ĝojradianta.

— Mi trovis super nia espero, ekkris la bonegulo premante la manojn de sia bofrato; Benjamino, jen ci estas nun riĉa, ci povos manĝi vinfiŝaĵon kiom ci volos.

— Sed kion do ci trovis? diris ĉiu siaflanke mia avino kaj Benjamino.

— Unikan filinon, riĉan heredulinon, la filinon de l' patro Minxit, kun kiu ni festis Sanktan Yvon antaŭ unu monato.

— De tiu vilaĝa kuracisto, kiu ekzamenas la urinojn?

— Ĝuste. Li cin akceptas senkondiĉe; li estas ĉarmita per cia sprito; li juĝas cin tre taŭga, pro cia maniero kaj parolemo, helpi lin en sia industrio.

— Diable! diris Benjamin gratante sian kapon, sed mi ne tre deziras ja ekzameni la urinojn.

— Ha, granda naivegulo! tiam, kiam ci estos bofilo de l' patro Minxit, ci sendos lin al la diablo kun liaj boteteletoj, kaj ci kondukos cian edzinon en Clamecy.

— Jes, sed ja Fraŭlino Minxit estas ruĝhara.

— Ŝi estas nur blonda, Benjamino, mi donas al ci pri tio mian honorparolon. (Daŭrigota).

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de

D-ro L. L. Zamenhof.

Administracio: HACHETTE & K^o
Paris. — 79, Boulevard St-Germain, 79. — Paris.

JARABONO: Francujo: Fr. 6.— (Sm. Fr. 2.40).
Ceteraj landoj: Fr. 7.— (Sm. Fr. 2.80).

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ
Eliranta inter la 15 kaj la 20 de ĉiu monato

— LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ GAZETĴOJ ESPERANTISTAJ —
Fondita en 1895

La Plej Enhavoriĉa!

La Plej Malkara!

48

PAGĴOJ da
dense presita
teksto en plej
korekta kaj plej
klasika stilo.

5

FR. (2 Sm.)

Abonprezo

por

UNU JARO

Por ricevi specimemon oni sendu unu poŝtan respondkuponon
Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Presejo Esperantista; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.

★ LIBERA PENSO ★

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARFOTIZO KUN LA MONATA BULTENO : 1 SM (FR. 2.50)

SEKRETARIEJO : RENÉ DESHAYS. Sens (Francujo)

—o—

Administrejo de la gazeto : Kleine Beerstr., 45, Antwerpen.

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn al S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions, Washington D. C. Usono. Kotizmono kun bulteno : 50 c. = 1 Sm.

La " sankta milito "

En la prusa parlamento la konata socialdemokrata deputito Hoffmann jam duan fojon eldiris :

« La milito restas mokego pri dio, pri la kristanismo kaj pri la humaneco ».

Kiel jam la unuan fojon, ankaŭ la duan fojon la prezidanto, barono v. Erffa, faris al li proordan admonon. Li diris :

« Sinjoro Hoffmann, pro tiu ĉi eldiro mi faris al vi proordan admonon dum la unua preparolo pro tio, ke la prezidanto estas rajtigita, fari admonon ne nur, kiam insultoj kontraŭ parlamentanoj kaj reprezentantoj de registaro estas eldirataj, sed ankaŭ kiam la religiaj kaj patriotaj sentoj de anoj de tiu ĉi parlamento estas vundataj. Mi vidas en via diro (kaj pro tio mi faras al vi proordan admonon) insulton al nia granda heroo imperiestro (Vilhelmo Ia), kiu dum tri grandaj militoj kondukis nin, insulton al nia plej alta armeestro (Vilhelmo IIa) kaj insulton ankaŭ al la patriota sento de nia popolo, kiu dum milito akiris sian nacian liberecon. »

Jen plej klara monstro, ke la gvidantoj de la reganta kulturo eĉ ne povas toleri liberan kritikon pri la hontindaj kontraŭdiroj en nia ŝajnkulturo. La deputito Hoffmann estas ateisto, liberpensano, kaj li citis dion kaj la kristanismon pro tio, ke li intencis montri, kiom neunuigebla estas la militado kun la vera plenumo de tio, kion oni tiom hipokrite starigas kiel bazon de nia kultura vivado.

La deputito Hoffmann reprezentas en la prusa parlamento tiun partion, kiu sendis al la tutgermana parlamento la plej grandan nombron da anoj. Li prezentas do la opinion de la plimulto de la popolo pri la milito, kaj la aserto de la prezidanto pri la « patriota sento » de la popolo ne estas atentinda.

Ke tiu opinio pri la milito ne estas pli forte reprezentata en la prusa parlamento, tio venas de la fakto, ke en Prusujo la elektado estas nesekreta kaj farata laŭ maljustega proporcio de tri klasoj.

Estas necese, diri ĉi tie, ke en Germanujo, kiel decas por civilizita lando, flanke de la popolo la milito estas konsiderata kiel hontindega kaj foriginda mokego pri ĉiu vera kulturo, kaj ke la diro de la prezidanto de l'parlamento pri la tri « insultitaj » objektoj tute ne korespondas al la opinio de la germana popolo ĝenerale.

Militon al la milito!

O. B.

LETERO de ELIE RECLUS

30 Sept. 1858.

Mia fratino, respondu, ĉu vi estas kristana? Ĉis nun mi pensis vin nek senkreda nek kredema, kaj bone sciante, ke vi ne estas respublikana, mi ankaŭ ne sciis vin kristana; kaj vidante, ke vi jam dubis pri la dogmoj de l'religio, sed ke vi ankoraŭ ne konis la vivon, la mondon kaj la naturon, mi diris al mi: Estas afero pri disvolvo. Ĉar ŝi serĉas la veron kun tro da fervoro kaj sincereco por ne fine ek trovi de ĝi kelkajn radiojn.

Dume, vi trovis la veron en Glasgow, en Skotlando, ĉe Doktoro Rainay, la veron laŭ prebiterana maniero, kompreneble, kaj anoncanta al mi tiun fakton mirigante, vi alĵetis al mi mezbrusten, ke, « tedita pri nia partio » vi eniras la tendaron de niaj kontraŭuloj.

Nu, tiu partio, kiu vin tedis, estas tiu de la libereco, kaj vi preferis la aŭtoritaton-klarvorte, tiranecon kaj servuton.

Ĉar mi kore vin amas, mia fratino, estis dolore al mi, vidi vin eniri ĉe la malamikon, kaj ĉar mi amas eĉ pli ol mian vivon, eĉ pli ol edzinon kaj idon, tiun noblan

*Fre
bone*

partion, kiun nomante mia vi min honoras, mi estis korvundita vidante ĝin tiel malŝatata, kaj kun kolero, kiu estis amo, kaj kun amo, kiu estis kolero, mi, via frato, mi estis antaŭenirinta al vi, kaj kriis al vi: Reeniru la tendaron de la skavoj, kaj silentu.

Nun ĉar la afero estas ekstreman puŝita, ĉar ni faris unu al la alia batojn eble senutilajn, klarigu ni tion, kio estas klarigebla. Tre povas esti, ke la aminda gracieco de kelkaj bonaj sinjorinoj, la bonvolema indeco de maljunulo, la intima kontenteco, kiun vi ĝuis en hejmo ĉiurilate agrabla, aferoj ĉiuj bonaj kaj laŭdindaj en si mem, kaj kiujn mi resumis krude en unu vorto: la religio de l' komforto, aldonita al la memoro de l' sankteco de nia patro kaj al la humoro eble acidiĝinta de iu, kiun vi scias, povis inspiri al vi atakon de sentimentala religiemo kaj ŝajniĝi al vi la kredon preferinda ol la scienco, la religio de l' estonto. Se do estis ne decide senŝanĝa kristanismo, sed nur ekvolo pli malpli kristanema, mi estus respondinta al vi: komparu principon al principo, homamason al homamaso, sed ne komparu homojn kontraŭ dogmoj, principojn kontraŭ individuoj, akcidenton kontraŭ institucio..... Serĉu en la kristanismo mem kaj en ĝia historio la pruvon de la vereco, sed ne serĉu ĝin en la historio pri Mirabeau aŭ pri episkopo Frayssinous.

Tiun pruvon de l' kristanismo ĉu vi trovis? ĉu vi ĝin serĉas, aŭ volas ĝin serĉi? Se vi ĝin trovis, ĉu ĝi estas alia pruvo ol jena: S-ro Jacques Reclus kaj S-ro D-ro Rainax estas ja honestaj personoj; ili estas tiel honestaj, ke mi absolute ne dubas, ke la bona Dio faris la mondon en ses tagoj, ke Noa faris arkeon, ke Jesuo Kristo naskiĝis de virgulino, reviviĝis, ke stelo marŝis antaŭ la magoj, ke estas infero kaj ke la morto de la Reaĉeinto forlavis de ni la pekojn k.t.p., kaj fine, ke la respublikanoj estas individuaĉoj. Honesta S-ro Jacques Reclus! Honesta S-ro Rainay! kaj, ĉu mi tion diros, honesta fratino!

Estas ĉar mi vin amas el plej profundo de mia koro, ke tiu okazaĵo, kiu malutilas al nia amo, estis al mi tiel dolora. Vi pensas, ke tio ne multe efikas, kaj efektive mi esperas, ke nenio bedaŭrinda okazos pro tiu kaj tiam la belaj tagoj revenos. Sed se malfeliĉe ne estus tiel okazante, ĉu vi kredas, ke dum vi estus decide kristana, kaj mi revoluciana, ne malpli decide, dum mia vivo estus nur rapida falado en la eternan perdiĝon de l' inferoj, dum la via estus supreniĝo al la eterna ripozo de l' sanktuloj kaj feliĉeguloj, ĉu vi kredas vere, ke estaĵoj tiel malsimilaj, kiel la benito kaj la malbenito, kiel la malvirtulo kaj la sanktigita spirito, povus havi la samajn simpatiojn kaj la samajn esperojn, povus havi komunan vivon!

Je l' nomo de nia amikeca, je l' nomo de nia frateco, kiun morto minacas, mia kara fratino, ne finfermu viajn

serĉadojn, viajn studojn pri la vero, per ne pripensita decido. Diru «Mi kredas» nur kiam vi povos diri: «Mi scias kial mi kredis».

Mi vin amas tre. Via frato.

ELIE RECLUS.

Batalo kontraŭ la Dio

Post infanaĝo plena de pieco,
Junulo, kiu sentas sian forton,
Scivole mi malfermis la okulojn,
Mi volis vidi ĉion, scii ĉion.

Kun la profunda Budho meditema
Mi volis solvi la enigmon grandan
De la komenco, fino kaj ekzisto.
Antaŭen iris paŝo post la paŝo,
Brust' mia ŝvelis, koro ĝojis;
Mi ĉiam proksimiĝis al la celo...
Subite jen spirito granda staris
Nebule antaŭ mi: ordonis halton.
«La sekvo estas mi, ne plu serĉu,
Mi estas ĉar neesplorebla. Amen.»
«Sed kio estas vi?» — «La Dio!»
Komenco antaŭ la sciodeziro
Barata estis, do la finon, celon
Kun fervorec' komencis mi serĉadi.
Jen, mi feliĉa estas nun, sed miloj
Kaj milionoj ŝvitas kaj laboras,
Malsaton, morton, zorgojn kaj suferojn
Sur sian dorson prenas, sed por kio?
Humile homoj genuflekse staras
Po mil jen antaŭ teranaĉoj kelkaj,
Per propraj turmentegoj ili savas
Ilian vivon gloron kaj feliĉon.
Versiĝas sango de nacioj, rasoj,
Popoloj ekstermiĝas krulege,
Plej noblaj, saĝaj kaj valoraj homoj
Amase perdas vivon kaj feliĉon,
Trenataj al la eŝafod' en fajron.
Por kia cel'? En kies nomo? Kial?
— Nebulon vidis mi denove. «Haltu!»
Elsonis el nebu l' ne travedebla.
«Sed kial, kiu estas vi, Malhelpo?»
«La Dio». Tuj mi ĉesis la serĉadon.

Malpermesata serĉi la komencon
Kaj finon, mi decidis iri kampon
Pli maldanĝeran, kie mi ne devos
Ĉe tria paŝo halti pro la Dio, —
La bestojn vidis mi, la vegetaĵojn
Kaj ĝuis la belecon kaj odorojn
De l' floroj, ultilecon de l' kreskaĵoj,
Lertecon, formojn de la bestoj: ĉiujn

Miraklojn de l' natur' nin ĉirkaŭanta.
Ĉi tiu pia goj' ne longe daŭris :
Scivolo mia tuj min ekinstigis
Al observado. Mi ekvidis partojn
Similajn en la granda viva mondo.
Rigardis ankaŭ min mem : jen parencaj,
Eĉ samaj leĝoj ŝajnis min regadi,
Principoj samaj min direkti, kiel
La bestan kaj la vegetaĵan mondon.
Komencis mi ĉi tie grandajn leĝojn
Konjekti : mi antaŭirintojn sekvis.
Jam staris antaŭ mi la granda ordo.
Momenton nur ankoraŭ, tuj mi vidis
Komunan fonton de vivaĵoj ĉiuj !
Tuj nebulaĵ' ekkovris horizonton,
El tiu ŝajnis bestoj kaj kreskaĵoj
El paŝi, kvazaŭ tiu naskus ilin.
Denove « haltu » sonis. « Sed mi volas
Antaŭeniri, nur malmulto mankas,
Ekvidos tuj mi la esencon, lasu ! »
» Mi estas la esenco ! » « Kiel ? Lasu,
Vi estas nebulaĵ' kaj ne esenco ! »
« Jen : plaĉis al mi la vivantan mondon
« Ĉi tiel krei. Ne plu serĉu. » « Kiu
Vi estas ? » « Dio ! » Mi reiri devis.

En multaj vojoj mi scivole penis
Antaŭeniri : ĉie la nebulo
Haltigis min. Mi trovis ke malgranda
Malliberejo estas mia mondo
Kaj tion ĉirkaŭpremas ĉiuflanke
Nebul' sufoka, lumon retenanta.
Ne povis fari paŝojn mi antaŭen,
Mi ĉie trovis baron : la Nebulon,
La Dion kaj anstataŭ lumo,
Ŝlosata estis mi en nuksan ŝelon.
Mi penis agi : Jen la monda ordo
Ne justa estas. Ni aŭdigu juĝon
Pri tio, penu malfeliĉon, ŝviton,
Suferon, zorgon de la ter' forigi.
— Denove la nebulo, halt', reiro.

Senesperigis fine min ĉi tiu
Mallibereco. Kaj la limiteco
Min ribeligis — ha, terure — kontraŭ
La Dio, Patro kaj Kreinto,
Ĉiuscianto, kiu jen envie
La scion al la homoj malpermesas.
Mem Dio estis mia plej proksima
Objekto, kiun mi esplori volis.
Kaj malgraŭ ĉiu « haltu » malpermeso
Kuraĝe mi enpaŝis la nebulon,
Pensinta : plie mortu mi momente.
Ol vivi en karceru mallarĝega.

Mi vidis nur nebulon, plu nenion.
Nebulon, kiu malhelpadas vidon ;
Nebulon, kiu lumon ne enlasas ;
Nebulon, kies fulmoj nur eksteren,
Sed ne interne povas tondri, bati.
La Dion serĉis mi en la nebulo,
Sed vane. Mi nenie trovis dion.
La laŭta krio senresponde sonis :
« Nu, venu, montru vin, ke mi eksciuj,
Vi kio estas efektive, Dio !
Aperu antaŭ mi, ho Ĉiupova,
Permesu ankaŭ al mi, ke mi sciu ! »
Nenia voĉo : « Do vi ne ekzistas ! »
Mi kriis tuj blasfeme kaj triumfe.
Tuj kiam mi eldiris tiujn vortojn,
Figurojn homajn vidis mi antaŭ mi.
« Ho li ekzistas — diris unu al mi —
Ĉu vi ne vidas tiun ĉi nebulon,
Nebulon, kiu ne permesas vidon,
Kaj kiu ne allasas lumon, scion ;
Nenion, tamen fortan mistikaĵon,
La nekuraĝan kiu retimigas ;
Perforte la kuraĝan, jen, ne lasas
Antaŭen iri, per hokuspokusoj,
Teatraj fulmotondroj kaj per sanga
Fanatiko de la timigitaj
Popolamasoj nombraj kaj bigotaj.
Jam multoj vagas tie en mallumo
Serĉantaj ĝiajn vojojn kaj sekretojn.
Lumiga lampo de la sciencemo,
Varmega fajro de la brulŝtiparoj,
Martiroj de la scio kie brulas,
Disvaporigos fine la nebulon.
Vi trovis, ke mallarĝa estas via
Malliberejo permesata de ĝi :
Laboro de jarcentoj plilarĝigis
Jam paŝo post la paŝo ĝian spacon.
Vi helpu ankaŭ en laboro tiu,
Forigi tiun ĉi nebulon densan,
Ĉis kiu atendiĝas homa saĝo,
Kaj kiu kaŝas antaŭ ni la veron ! »

Vi scias do, ke kial mi anstataŭ
Vivadi pace kaj ne ofendadi
La sentojn piajn de kunhomoj miaj,
Batalas mi kontraŭ la Ĉielano.
Kuraĝe neas mi lian ekziston,
Ne timas lian forton kaj potencon,
Ne petas lian benon kaj helpadon,
Kvankam mi scias, ke li ja ekzistas :
En tim' de la piuloj, nesciuloj,
La Nekonatan kiuj timas treme ;
En forto de la potenculoj, kiuj

Turmentas, malsatigas malriĉulojn
 En lia nomo. Kaj li estas en la
 Mallaboremo de la malsaĝulo,
 Anstataŭ serĉi, ŝanĝi au labori,
 Kun nom' de Dio kiu argumentas,
 Se oni volas ĝeni lin en sia
 Mallarga kaj malluma, egoisma
 Senlaboremo, bestaj ĝuoj siaj.
 Li estas en la humilec' de tiuj,
 Turmentojn, humiligon, malriĉecon,
 Kaj batojn kiuj jen toleras,
 Ĉar ordon, de la Dio ordonatan,
 Malpermesate, peke estas ŝanĝi.
 De tie devas ni forpeli Dion.
 Kaj se sukcesos ni ekzili fine:
 Nur tiam povas esti la homaro
 Feliĉa kaj libera sur la tero.

Originalaĵo de R. RAJCZI
 Debrecen, Hungarlando.

CIKLO DE LEGAĴOJ

(jarkolekto de pensoj el tutmondaj filozofoj elektitaj de
 L. N. TOLSTOJ)

Moskva eldonisto J. J. Gorbunov-Posadov estas kondamnita de Peterburga Senato je unu jaro en fortikaĵo pro la libro « Ciklo de Legaĵoj » pri la vero, vivo kaj konduto, kunmetitaj de L. N. Tolstoj.

Neniu juĝo de tribunalo povas esti tiom stranga! Enŝlosi en fortikaĵon maljunan, plej amatan amikon de Tolstoj eminentan poeton, verkiston, redaktoron de plej ideemaj ĵurnaloj, administranton de plej estimata granda libroeldonejo « Posrednik » (Peranto), nelacigeble laborinta por la rusa popolo sian tutan vivon nacie kaj internacie en plej alta senco de la vorto, vegetaranon, amikon de infanoj kaj mem patron de malgrandaj infanoj — unua el la rusaj amikoj de Tolstoj pro la celado al Universala Frateco, oficiale konfesinta la Esperantismon eldoninta la « Fundamento » de D^{ro} Zamenhof por la rusoj kaj kelkajn lernolibrojn de D^{ro} Kabanov. — Ni esperu ke la publika opinio en Ruslando kaj ĉie en la mondo protestos kontraŭ tia juĝo, kondamnanta solan eldoniston pro tutmonda filozofia libro, tradukita jam alilingven kaj interesanta ĉiujn pensantajn homojn.

Ni esperu ke la Peterburga Senato mem neniigos tiun strangan kondamnon kaj la respektinda moskva maljunulo ne estos enŝlosita. — Laŭ la lastaj sciigoj la peterburga Senato prokrastas la plenumon de ĝia kondamno rilate al S^{ro} J. J. Gorbunov-Posadov ĝis la aŭtuno. Ni esperu, ke tiu prokrasto finu per definitiva neniigo de la kondamno.

Kelkaj diroj de FRIEDRICH NIETZSCHE

1): Gardu vin antaŭ la bonuloj kaj justuloj! Ili emas krucumi tiujn, kiuj elpensas siajn proprajn virtojn, — ili malamas la solemulon.

2): Malsanuloj kaj mortantuloj estis tiuj, kiuj ekmalŝatis la korpon kaj la teron kaj elpensis ĉielan paradizon kaj la savantajn sangogutojn; sed eĉ tiujn dolĉajn kaj misterajn venenojn ili prenis de l' korpo kaj de l' tero!

Forkuri ili volis el sia mizereco, kaj la astroj estis tro malproksime por ili. Tiam ili ĝemis: « Ho, ke ekzistu ĉielaj vojoj, sur kiuj oni povas kaŝe aliri alian ekziston kaj feliĉon! » — kaj jen ili elpensis siajn ruzojn kaj sangajn trinkaĵojn!

For de siaj korpoj kaj de tiu ĉi mondo ili nun imagis sin, tiuj nedankemuloj. Sed al kiu ili ŝuldas dankon pro la krampa ĝojo kaj feliĉeco de sia foreco? Al sia korpo kaj al tiu ĉi mondo.

3): Multaj malsanemaj homoj estis ĉiam inter tiuj, kiuj poezias kaj estas diemaj; furioze ili malamas la ekscianton kaj tiu plej junan virton, kies nomo estas: Sincereco.

Malantaŭen ili ĉiam rigardas al misteraj epokoj; tiam vere imago kaj kredo estis io alia: freneziĝo de l' racio estis disimileco, kaj dubo estis peko.

Societo kaj Kaso. — Tiuj du rubrikoj estas prokrastataj ĝis la proksima numero.

Liberpensulojn nepre interesos INTERNACIA SOCIA REVUO, monata Esperanta gazeto. Redakcio ĉe S-ro J. L. BRUIJN, Weimarstraat, 22, Hago (Nederlando). Abonprezo: jare 1.40 Sm; duonjare 0.80 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London.

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de

D-ro L. L. Zamenhof.

Administracio: HACHETTE & K^o
 Paris. — 79, Boulevard St-Germain, 79. — Paris.

JARABONO: Francujo: Fr. 6.— (Sm. Fr. 2.40).
 Ceteraj landoj: Fr. 7.— (Sm. Fr. 2.80).

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ
 Eliranta inter la 15 kaj la 20 de ĉiu monato

— LA PLEJ MALNOVA EL ĈIuj GAZETOJ ESPERANTISTAJ —
 Fondita en 1895

La Plej Enhavoriĉa! La Plej Malkara!

48 PAĜOJ da **5** FR. (2 Sm.)
 dense presita Abonprezo
 teksto en plej por
 korekta kaj plej UNU JARO
 klasika stilo.

Por ricevi specimenon oni sendu unu poŝtan respondkuponon
 Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Presejo Esperantista; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.

★ LIBERA PENSO ★

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO : 1 SM (FR. 2.50)

SEKRETARIEJO : RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

—o—

Administrerejo de la gazeto : Kleine Beerstr., 45, Antwerpen.

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn al S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions, Washington D. C. Usono. Kotizmono kun bulteno : 50 c. = 1 Sm.

Mia Onklo Benjamins

De Claude Tillier (Francujo), 1801-1874

(Daŭrigo)

— Oni diras, tiom da lentugoj ŝi havas, ke oni ĵetis al ŝi plenmanon da brano en la vizaĝon.

— Mi vidis ŝin hodiaŭ vespere, mi certigas cin, ke estas preskaŭ nenio.

— Plue, ŝi estas alta kvin futojn kaj tri colojn; mi timas verdire difekti la homan rason; ni naskos idojn longajn kiel stangoj.

— Ĉio, kion ci nun diras, estas malbonaj ŝercoj, diris mia avino; mi renkontis hiarau cian drapvendiston, li nepre volas pagiĝi, kaj ci bone scias, ke cia barbiro ne plu volas cin kaparangĝi.

— Tiel vi volas, mia kara fratino, ke mi edzinigu Fraŭlinon Minxit; sed vi ne scias, vi, kion signifas tio, Minxit. Kaj ci, Machecourt, ĉu ci scias tion?

— Certe mi tion scias: tio signifas la patron Minxit.

— Ĉu ci legis Horatius, Machecourt?

— Ne, Benjamins.

— Nu, Horatius diris: Num minxit in patrios cineres. Estas tiu tripona preterito, kiu min ribeligas; plue, mia kara fratino ne estas plu malsana. Sro Minxit, Sino Minxit, Sro Rathery Benjamins Minxit, knabo Johano Rathery Minxit, knabo Petro Rathery Minxit, knabino Adelo Rathery Minxit. Nu en nia familio estos sufiĉe por turnigi muĝilon. Poste, por paroli al ci malkaŝe, mi ne tre deziras edziĝi. Estas ja kanteto, kiu diras:

Oni estas feliĉega

En la ligoj geedziĝaj!

Sed tiu kanteto ne scias, kion ĝi kantas. Nur fraŭlo povas esti ĝin verkinta.

Oni estas feliĉega

En la ligoj geedziĝaj!

Tio estus prave, Machecourt, se la viro estus libera elekti al si kunulinojn; sed la necesoj de la socia vivo ĉiam nin devigas edzinigi ridinde kaj kontraŭ niaj inklinoj. Viro edzinigas doton, virino edzigas profesion. Poste, kiam oni estas festinta edziĝon kun ĉiuj brilaj amuzoj, kiam oni reeniris en la solecon de l' hejmo, oni ekrimarkas, ke oni ne konvenas unu al la alia. Tiuĉi esta avara, kaj tiu elspezegema, la edzino estas koketa kaj la edzo ĵaluzema, unu amas norden, la alia suden; oni volus esti je mil mejloj unu de la alia, sed oni devas vivi en la fera rondo, en kiu oni sin enfermis, kaj resti kune usque ad vitam eternam.

— Ĉu li estas ebria? diris mia avo al la orelo de sia edzino.

— Kial, respondis ĉitiu.

— Ĉar li parolas prudente.

Tamen oni konvinkis mian onklon, kaj estis konsentate, ke li iros morgaŭe dimanĉe viziti Fraŭlinon Minxit.

III.

KIEL MIA ONKLO RENKONTIS MALJUNAN SERĜENTON KAJ PUDELON, KIO MALEBLIGIS AL LI IRI ĈE Sro MINXIT.

Morgaŭe, je la oka matene, mia onklo estis vigla kaj kaparaĝita; li plu atendis por eliri nur paron da ŝuoj, kiun estis alportonta al li Cicerono, pri kiu ni jam parolis, kaj kiu kunigis la profesion de ŝuisto kun tiu de tamburisto.

Cicerono baldaŭ alvenis. Je tiu epoko de bona simpleco, estis kutimo, kiam laboristo alportis faritaĵon en domon, ne lasi lin eliri ne trinkiginte al li kelkajn glasojn da vino. Tio estis malbonmaniera, mi konfesas; sed tiuj bonvolemaj faroj proksimigis la rangojn: la malriĉulo estis danko al la riĉulo pro la cedoj, kiujn li faris, kaj ne ĵaluzis lin. Tial oni vidis, dum la Revolucio, admirindajn memoferojn de servistoj por iliaj mastroj, de farmistoj por iliaj sinjoroj, de laboristoj por iliaj estroj, kiuj, je nia

epoko de malrespekta aroganteco kaj ridinda fiereco, nepre ne ree fariĝus.

Benjamins petis sian fratinton, ke ŝi iru eltiri botelon da blanka vino, por toasti kun Cicerono. Lia fratino eltiris unu, poste du, poste tri, ĝis sep.

— Mia kara fratino, mi petas vin, unu botelon plu.

— Sed ĉu do vi ne scias, malfeliĉulo, ke ci estas je la oka?

— Vi ja scias, kara fratino, ke inter ni ni ne kalkulas.

— Sed ci scias ja, ke ci devas fari vojaĝon.

— Plu tiun lastan botelon, kaj mi foriras.

— Jes, ci estas en bela stato por foriri! Kaj se oni venus voki cin por viziti malsanulon?

— Kiel malmulte vi scias, mia kara fratino, juĝi la efikojn de la vino!... Oni vidas, ke vi trinkas nur la diafanajn akvojn de Beuvron. Ĉu mi devas foriri? mia pezcentro estas ĉiam je la sama loko. Ĉu mi devas sangeltiri?... Sed pri tio, mia fratino, mi devas eltiri sangon al vi. Machecourt avertis min pri tio elirante. Vi matebe plendis pri granda kapdoloro, sangeltiro utilos al vi. Kaj, Benjamins prenas sian ilarujon, kaj mia avino sin armas per fajrpreniloj.

— Diable! vi estas malsanulo tre malcedema. Nu, interpaciĝu ni: mi ne sangon eltiros al vi, kaj vi iros preni por ni okan botelon da vino.

— Mi ne eltiros eĉ unu glason.

— Estos do mi, kiu ĝin eltiros, diris Benjamins; kaj preŝante la botelon, li sin direktis al la kelo.

Mia avino, vidante nenion pli taŭgan por lin haltigi, pendigis sin ĉe lia harvosto; sed Benjamins, ne atentante pri tiu okazo, foriris al la kelo kun paŝo tiel firma, kvazaŭ li havus nur bulbaron ĉe l' ekstremo de la vosto kaj revenis kun sia botelo plena.

— Nu, mia kara fratino, estis ja necese, duope iri al la kelo por unu eta vinbotelo; sed mi devas vin averti, ke, se vi persistus en tiuj malbonaj kutimoj, vi devigus min fortranĉigi mian voston.

Tamen Benjamins, kiu ĵus konsideris kiel tedegan taskon la vojaĝon al Corvot, nun obstiniĝis foriri. Mia avino, por tion malebligigi, estis enŝlosinta liajn ŝuojn en la ŝrankon.

— Mi diras al vi, ke mi foriros!

— Mi diras al ci, ke ci ne foriros!

— Ĉu vi volas, ke mi vin portu ĝis Sro Minxit ĉe la ekstremo de mia vosto?

Tia estis la dialogo, kiu okazis inter la frato kaj la fratino, kiam mia avo alvenis. Li finigis la diskuton deklarante, ke morgaŭe li bezonas iri je La Kapelo, kaj ke li kunkondukas Benjamins.

Mia avo staris antaŭ la tagiĝo. Kiam li estis skribaĉinta sian asignon kaj notinta sube « Kies kosto estas ses frankoj kvat soldoj ses denaroj », li viŝis sian plumon sur la maniko de sia surtuto, akurate lokis siajn okulvitrojn en

la ingon, kaj iris vekti Benjamins. Tiuĉi dormis kiel Princo de Condé — se la princo ne ŝajnis dormon — antaŭ bataltago.

— Nu, ho, Benjamins, stare! estas plena tago!

— Ci eraras, respondis Benjamins kun grunto kaj retur. nante sin al la muro, estas nigra nokto.

— Levu la kapon, ci vidos la helon de l' suno sur la planko!

— Mi diras al ci, mi, ke estas helo de l' lanterno.

— Sed vere, ĉu ci ne volus ekiri?

— Ne; mi sonĝis tutnokte pri seka pano kaj vinaĉo, kaj se ni ekvojaĝus, eble okazus al ni malfeliĉo.

— Nu mi deklaras al ci, mi, ke, se post dek minutoj ci ne estos ellitiĝinta, mi sendas al ci cian karan fratinton: se kontraŭe ci estos ellitiĝinta, mi boras tiun bareleton de malnova vino, kiun ci bone scias.

— Ci estas certa, ke ĝi estas vino el Pouilly (Puji), ĉu ne? diris Benjamins eksidante; ci donas al mi pri tio cian honorparolon?

— Jes, per mia persekutista honoro!

— Tiel, iru bori la barelon; sed mi cin avertas, ke, se okazos al ni malprospero sur la vojo, estas ci, kiu respondos pri tio al mia kara fratino.

Post unu horo, mia onklo kaj mia avo estis sur la vojo al Moulot. Je kelka distanco de la urbo, ili renkontis du kampulajn knabojn, el kiuj unu portis kuniklon sub la brako, kaj la alia havis du kokinojn en sia korbo. La unua diris al sia kunulo:

— Se ci konsentos diri al Sro Cliquet, ke mia kuniklo estas sovaĝa kuniklo, kaj ke ci vidis min kaptantan ĝin per laĉo, ci estos mia kamarado.

— Mi ja konsentas, respondis ĉi tiu, sed kondiĉe ke ci diros al Sro Deby, ke miaj kokinoj donas ovon dufoje ĉiutage, kaj ke iliaj ovoj estas grandaj kiel anasovoj.

— Vi estas du ŝtelistetoj, diris mia avo; kaj iam baldaŭ mi diros al Sro Policestro, ke li tiru viajn orelojn.

— Kaj, mi, miaj amikoj, diris Benjamins, mi petas vin, ke vi akceptu ĉiu po tiun moneron dekdudenaran.

— Jen donaco ĝuste lokita, diris mia avo, levante la ŝultrojn; sendube ci frapos per glavplato la unuan malfeliĉulon honestan, kiun ci renkontos, ĉar ci hontinde donas cian monon al tiuj du sentaŭguloj.

— Sentaŭguloj por ci, Machecourt, kiu vidas nur la ŝeton de ĉio; sed por mi, ili estas du filozofoj. Ili ĵus elpensis maŝinon, kiu, bone organizita, riĉigus dek honestajn homojn.

— Kaj kiu do estas la maŝino, diris mia avo kun nekreda mieno, kiun ĵus elpensis tiuj du filozofoj, kiujn mi serioze bastonus, mi, se ni havus la tempon halti?

— Tiu maŝino estas simpla, diris mia onklo; jen ĝi tia, kiel ĝi konsistas:

Ni estas dek amikoj, kiuj, anstataŭ kunveni por tagmanĝi, kunvenas por riĉiĝi.

— Tio almenaŭ valoras la penon kunveni, interrompis mia avo.

— Ni estas, ĉiuj dek, inteligentaj, lertaj, eĉ ruzaĵ laŭbezone. Ni havas paroladon laŭtan, diskuton imponan; ni manumas la vortojn tiel lerte, kiel ŝonglisto manumas siajn bulojn. Por la moraleco de l' afero, ni estas ĉiuj kapablaj en nia profesio, kaj la bonvolaj personoj povas diri, ne tro kompromitigante, ke ni valoras pli ol niaj kolegoj.

Ni formas, laŭ bono kaj honoro, societeton por nin reciproke rekomendi, por enblovi, por ŝveligi kaj ŝatimigi nian meriteton.

— Mi komprenas, diris mia avo, unu vendas ratmortigilon kaj havas nur tamburegon, la alia svisan teon, kaj havas nur paron da cimbaloj. Vi kunigas viajn rimedojn por brui kaj...

— Estas ĝuste tio, interrompis Benjamino. Ci komprenas, ke se la maŝino taŭge funkcias, ĉiu el la societanoj havas cirkaŭ si naŭ instrumentoj, kiuj faras teruran bruegon.

— Ni estas naŭ, kiuj diras: Advokato Page tro trinkas; sed mi kredas, ke tiu diabla homo infuzas la foliojn de la Provinca Leĝaro en sia vino, ke li enboteligis la logikon. Ĉiujn procesojn, kiujn plaĉas al li gajni, li gajnas; kaj ĵusan tagon, li havigis gravan kompensaĵon al nobelo, kiu estis mortbatinta kamparanon.

— Persekutisto Parlanto estas iom malrektema; sed li estas la Annibalo de l' persekutistoj. Lia korporeco estas neevitebla; por forkuri de li, lia ŝuldanto devus ne havi korpon. Li metus ja la manon sur la ŝultron de Duko.

Nun Benjamino Rathery, li estas senzorgulo, kiu ĉion mokas kaj ridas al la febro en la vizaĝon, li estas, se vi volas, telerulo kaj botelulo; sed precize pro tio mi preferus lin super liaj kolegoj. Li ne ŝajnas unu el tiuj funebraj kuracistoj, kies registrolibro estas tombejo; li estas tro gaja, kaj digestas tro bone, por havi multajn mortaktojn riproĉotajn al si mem.

Tiel ĉiu el la societanoj estas naŭobligata....

— Jes, diris mia avo, sed ĉu tio donos al ci naŭ ruĝajn vestojn? Naŭoble Benjamino Rathery, kiom tio estas?

— Tio estas naŭcentoble Machecourt! respondis vive Benjamino. Sed lasu min fini mian pruvon, ci ŝercos poste.

Jen naŭ vivantaj reklamiloj, kiuj ĉien sin enŝtelas, kiuj rediras al vi morgaŭe, sub alia formo, tion, kion ili diris al vi hieraŭe: naŭ afiŝoj parolantaj, haltigantaj la pasantojn ĉe la brako; naŭ elpendaĵoj, kiuj promenas tra la urbo, kiuj diskutas, kiuj faras dilemojn, entimemojn kaj vin mokas, se vi ne opinias kiel ili.

Rezultas de tio, ke la famo de Page, de Rapin, de Rathery, kiu pene rampis en la muroj de ilia urbeto, kiel advokato en malĝusta logikecirklo, subite mirige ekflugas. Hieraŭ ĝi ne havis piedojn, hodiaŭ ĝi havas flugilojn. Ĝi larĝiĝas kiel gazo, kiam oni malfermis la vazon, kie ĝi estis enfermita. Ĝi disvastiĝas tra la tuta provinco. Klientoj alvenas al tiuj homoj de ĉiuj punktoj de la juĝteritorio; ili

alvenas de sudo kaj Akilono, de aŭroro kaj sunsubiro, kiel en Apokalipso la elektitoj alvenas al la urbo Jerusalemo. Post kvin aŭ ses jaroj Benjamino Rathery estas mastro de bela riĉeco, kiun li elspezas, kun grandaj bruoj de glaso kaj de boteloj, por tagmanĝoj kaj noktomanĝoj; ci, Machecourt, ci ne plu estas portisto de asignoj; mi aĉetas al ci oficon de landjuĝisto. Cia edzino estas kovrita per silko kaj punktoj kiel sankta reĝino; cia plej maljuna filo, kiŭ jam estas akolito, eniras en seminarion; cia lastnaskita, kiu estas malfortema kaj flava kiel kanaria birdo, studas medicinon; mi transdonas al li mian famon kaj miajn malnovajn klientojn, kaj liveras al li liajn ruĝajn vestojn; el cia duanaskita ni faras robulon. Cia plej maljuna filino edziniĝas kun skribulo. Ni donas la plej junan al riĉa burĝo, kaj tuj post la edziĝa festo, ni formetas la maŝinon en la subtegmenton.

— Jes, sed cia maŝino havas malbonaĵeton, ĝi ne taŭgas por honestuloj.

— Kial do?

— Tial.

— Sed fine...?

— Ĉar ĝia efiko estas malmorala.

— Ĉu ci povus pruvi tion al mi per ĉar kaj per do?

(Daŭrigota).

Tolstoja Biblioteko

Ni ĵus ricevis la 9 unuajn numerojn de la Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj, kiuj prezentas ĉiuj verketojn de la granda apostolo plej interesajn por liberpensuloj.

Lasu ni flanko la artan vidpunkton, laŭ kiu rakontoj, kiaj estas La sieĝo de Sebastopolo, La Kaŭkaza militkaptito, aperas kiel admirindaj ĉefverkoj pro ilia vivpleneco kaj impresa sentforto. Ni, kiuj ilin jam legis en naciaj tradukoj, ĝojas pliproksimiĝi, pli internen penetri en la originalon dank' al esperanta teksto, kiun oni sentas zorge fidela kaj fidinda. F-inon Anna Ŝarapov kaj S-ron N. Kabonov ni sincere gratulas, nur notigante al la unua kelkajn preseraretojn (nº 3 paĝo 9 fine ne nur anstataŭ ne nur ne; paĝo 41 belle), al la dua, krom esprimoj originalaj sed perfekte korektaj, kiel amasi, unu ofte aperantan, kiu estas nepre kontraŭa al la fundamento, ekzemple nº 6 p. 10: por ke traŭri.

Nu, tiu beleco mem de la stilo de Tolstoj estas ja konforma al la liberpensaj emoj, ĉar ĝi konsistas precipe el vereco: neniu ornamento, neniu falsaĵo, nur eksterordinara vidpotenco, kaj imago kiu egalas la realon, tial ke ĝi sekvas ĝuste ĝin. Pro tio eĉ naivaj religiemoj fabeletoj, aŭ pli precize fabloj (nº 4: Per kio homoj estas vivaj; nº 6: Du maljunuloj) sukcesas ĉarmi plej sciencemajn spiritojn.

Ni ne bezonas memori niajn legantojn, ke Tolstoj

estis unu el niaj unuaj honormembroj, kaj kion li suferis pro la libereco de sia penso. Tiu sendependeco de ĉiu regna kaj eklezia aŭtoritato, tiu malŝato de l' mondumaj opinioj kaj altrudoj, aperas per la simpleco mem de l' rakontoj, per la elekto de l' personoj, plej ofte senedukaj, malkleraj, sed bonkoraj vilaĝanoj, per la konstanta alvoko ne al pastra saĝeco aŭ skribaj instruoj, sed al la intima sento.

Cetera libera estas ĉiu forta penso, kaj la penso de Tolstoj estas mirinde potenca. Plej plaĉas al ni tiu logikemo, kiu tuj iras ĝis la fundo de l' demandoj. Legu la numeron 3-an: Unua Ŝtupo, pri senmortiga nutrado. Eĉ tiuj el ni, kiuj decide estas ne vegetaranoj, pasie sekvas ne nur la krudajn priskribojn de buĉejo, sed la impresan rezonadon, kiu reiras ĝis evidenta difino de la bono kaj malbono, kaj lume klarigas la sinsekvon de la virtoj. Taŭga temo tie kuŝas por utilaj diskutoj en liberpenso revuo: ni poste provos ĝin repreni.

Fine, en tiuj verkoj ni klare vidas la limon de l' Tolstoj penslibereco, aŭ por pli ĝuste diri, la fonton, la econ kaj la kampon de tiu penso.

Tiu ĉi granda pentristo de l' rusa vivo estas rusa. Li naskiĝis ja en tiu ankoraŭ kristana lando, inter tiu sendifekte pia popolo, kiun li ĉie priskribas. Tiuj homoj, kiuj ĉiuokaze preĝas, lin ĉirkaŭadis: tiu Dio, kiun oni nomis apud li je ĉiu parolo, eniĝis en lian animon, vivis kun li mem, grandiĝis kun lia penso, altiĝis kun lia koro. Kiel la granda franca pensulo Pascal, naskita du jarcentojn antaŭ la Revolucio en familio plej pia, Tolstoj servis genian per son al kredo naskiĝe heredita kaj kreskigita per la infanaj kutimoj. Sed Pascal, katolika en religiema tempo, obeis kaj volegis pravigi per la racio la katolikan dogmaĵon, dum niatempe Tolstoj konservis nur kaj kulturis la fundamentan piecon, ĥi forĵetis ĉion, kio kontraŭstaris lian kredon larĝigitan al Dio purigita.

R. D.

Ni ĉi-sube represas la klarigan antaŭnoton de la eldonanto.

POR KIO ESTAS ELDONATA « TUTMONDA BIBLIOTEKO JE LA MEMORO DE L. TOLSTOJ. »

« Unu animo en ĉiuj » — vere diras L. Tolstoj. Tial ĉefa tasko de homa vivo estas ĉiam pli granda frata unuiĝo de homoj, de gentoj kaj de popoloj kaj, plue, unuiĝo de ĉio vivanta sur la tero.

Nia eldona firmo « Posrednik » (Peranto), kiu estas fondita de L. Tolstoj en 1885 jaro, kaj kiu nun estas esperantia entrepreno, starigis kiel sian taskon eldonadon de libroj, disvastigantaj ideojn de la frata unuiĝo de homoj kaj de ĉio vivanta en mondo. Pro tio, ke la internacia lingvo Esperanto estas kreita nome por tia celo de la unuiĝo de homoj de ĉiuj gentoj kaj popoloj, nia eldona firmo nun komencas eldonadon de libroj en lingvo Esperanto.

Plej alta, plej ĝojiga unuiĝo de homoj estas unuiĝo en komunaj sentoj de frateco, de amo, de heroo kaj modesta ĉiutaga sindonemo, de kompatemo rilata al ĉiuj vivaj estaĵoj, de frata kunhelpado kaj kunlaborado de homoj por komuna bono. Pro tio libroj de esperanta fako de nia eldona firmo estos celantaj ĉefe disvastigadon de tiuj ĉi sentoj, de tiuj ĉi ideoj.

Serio de niaj esperantaj eldonaĵoj estas nomata « Tutmonda Biblioteko » kaj estas dediĉita al la memoro de nia amiko Lev Nikolaeviĉ Tolstoj, granda predikanto de la unuiĝo de ĉiuj vivoj en mondo.

Komencante tiun ĉi aferon, ni terte esperas subtenadon de ĉiuj, kunsentantaj al la afero. Tiu ĉi subtenado povas esprimiĝi en komunikadoj al ni de verkoj kaj de artikoloj, presitaj en iaj ajn lingvoj kaj plej konformantaj al la fundamentaj ideoj de « Tutmonda Biblioteko », kaj en helpado de kiel eble plej vasta disvastigado de libretoj de « Tutmonda Biblioteko » en ĉiuj landoj, kie estas uzata la lingvo Esperanto.

Amikoj en ĉiuj landoj! akceptu saluton de nia frata amo. Ni laboru amike kune por komuna sankta al ni celo.

Ĉefa redaktoro-eldonanto de firmo « Posrednik »

L. GORBUNOV-POSADOV.

Moskvo, Arbat, 36.

Liberpensulojn nepre interesos INTERNACIA SOCIA REVUO, monata Esperanta gazeto. Redakcio ĉe S-ro J. L. BRUIJN, Weimarstraat, 22, Hago (Nederlando). Abonprezo: jare 1.40 Sm; duonjare 0.80 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London.

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de

D-ro L. L. Zamenhof.

Administracio: HACHETTE & Co

Paris. — 79, Boulevard St-Germain, 79. — Paris.

JARABONO: Francujo: Fr. 6.— (Sm. Fr. 2.40).

Ceteraj landoj: Fr. 7.— (Sm. Fr. 2.80).

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

Eliranta inter la 15 kaj la 20 de ĉiu monato

— LA PLEJ MALNOVA EL ĈIuj GAZEToj ESPERANTISTAJ —

Fondita en 1895

La Plej Enhavoriĉa!

La Plej Malkara!

48 PAĜOJ da **5** FR. (2 Sm.)
dense presita Abonprezo
teksto en plej por
korekta kaj plej UNU JARO
klasika stilo.

Por ricevi specimenon oni sendu unu poŝtan respondkuponon
Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Presejo Esperantista: J. B. Madou-Cop, Antwerpen.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 Sm. (Fr. 2.50)

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn al S-ro B. F. SCHUBERT, Bureau of Pensions, Washington D. C. Usono. Kotizmono kun bulteno: 50 c. = 1 Sm.

La Seksa Demando

prezentata al la instruitaj plenaĝuloj⁽¹⁾

de AŬGUSTO FOREL

Eksprofesoro de Psikiatrio ĉe la Universitato en Zurich.

Enkonduko.

Mia celo estas studi la seksan demandon el ĉiuj ĝiaj vidpunktoj sciencaj, etnologiaj, patologiaj kaj sociaj, kaj serĉi la plej bonan praktikan solvon de la multaj problemoj, kiuj rilatas al ĝi. Malfeliĉe en la verkoj, kiuj ekzistas pri tiu temo, erotiko kutime ludas grandegan rolon kaj la aŭtoro malfacile povas ĝin ne konsideri, ĉar malgraŭ lia volo ĝi respeguliĝas en lia penso. Ĉar ĉiu sento pli malpli falsas la juĝadon, la scienca kritiko devas flankelasi erotikon, por resti preciza kaj senpartia. Tial ni faros ĉion al ni eblan por liberigi nin de ĝi en la jena studaĵo.

La seksa demando havas fundamentan gravecon por la homaro, kies estontaj feliĉo kaj bonstato grandparte dependas de la plej bono solvo de tiu grava problemo. Traktante tiom delikatan temon, mi klopodos eviti spiritan mallarĝecon kaj antaŭjuĝojn; mi detenos min de lacigantaj citaĵoj kaj uzos teknikajn terminojn nur en okazo de neceso, ĉar tie ĉi ili estas iom malutilaj al kompreno kaj ĝenerala vido. Mi ĉiuokaze atentos klarigi tiujn, kiuj ŝajnos al mi neeviteblaj.

Miaj opinioj pri la seksa demando baziĝas unuflanke sur miaj sciencaj studoj rilataj al homa cerbo, al psikologio kaj animala biologio, aliflanke sur la longa propra sperto de frenezisto, kiu okupiĝis preskaŭ tiom pri norma spiriteco kaj demandoj de socia higieno kiom pri patologia spiriteco. Tamen mi estis en la neceso apogi min sur la fundamenta verko de Westermarck kaj resumi lin en tio, kio rilatas al etnologio, ĉar tiu fako estas fremda al mi. Por la seksa psiko-patologio mi obeis la klasifikon de von Krafft-Ebing.

La seksa demando estas eksterordinare komplika, kaj oni ne povas pensi trovi por ĝi simplan solvon kiel por demandoj pri alkoholismo, sklaveco, turmentado, k. a.

⁽¹⁾ Paris. G. Steinheil. 1911. 3a eldono, 1 vol. (25 je 16,5) VIII-632 p. Sm. 4.

Tiuj lastaj solviĝas per unu vorto: forigo. Forigo de sklaveco kaj turmentado; forigo de la uzado de alkoholaĵoj trinkaĵoj en nia nutrada regularo. Tie la demando estas pri ulceroj nenature produktitaj kaj konservataj en la homa socio, ulceroj kiujn oni nur devas elradikigi. Ilia forigo havigas nur profiton, ĉar anstataŭ ol ligiĝi al la normaj kondiĉoj de la ekzistado de la homo, kontraŭe ili metas ĝin en pereon. La seksaj sentoj kaj instinktoj kontraŭe havas siajn radikojn en la vivo mem; ili estas intime ligitaj al homaro kaj do postulas tute diferencon kuracadon. Sed la homa socio direktis ilin sur falsajn kaj malutilajn vojojn. Urĝas deturni ilin de tie por samtempe trankviligi kaj reguligi ilian fluon, ilin endigigante kaj enkanaligante.

La fundamenta aksiomo de la seksa demando estas la jena: Ĉe la homo, kiel ĉe ĉiuj vivantaj estaĵoj, la nepra celo de ĉiu seksa funkcio, sekve ankaŭ de seksa amo, estas reproduktado de la speco. Estas do necese trakti la demandon ĉe la vidpunkto de naturaj sciencoj, de fiziologio, de psikologio kaj de sociologio. Oni jam faris tion pli ol unufoje, sed ordinare en traktadoj kleraj kaj kiuj konsideras nur unu flankon de la demando, aŭ kontraŭe en formo supraĵa, ofte malserioza.

Por sia feliĉeco, homaro devas deziri reprodukti sin en maniero, kiu laŭgrade altigas ĉiujn korpajn kaj spiritajn kapablojn de la homo, tiom ĉe la vidpunktoj de saneco kaj korpa forteco kiom ĉe tiuj de sentado, de inteligenteco, de volo, de kreanta imago, de amo al laborado, de ĝojo pro vivo kaj de sento de socia solidareco. Ĉiu provo farota por solvi la seksan demandon devos do esti direktata al estonteco kaj feliĉeco de niaj idoj.

Estas necesa multe da malprofitemeco por serioze labori al seksa reformo. Sed, ĉar la homa estaĵo estas el treege malforta esenco, ĉar liaj vidoj estas mallongaj, precipe pri la temo, kiu nin okupas, estas absolute necese, se ni ne volas fali en utopion, akordigi la fundamentan celon de la seksa kuniĝo kun la feliĉo kaj ĝojo, eĉ ni diru kun la naturaj malfortoj de la homo.

En la neceso de tia aranĝo kuŝas la fundamenta malfacileco de la problemo, kaj tiu malfacileco postulas ke ni nenigu la antaŭjuĝojn, la tradiciojn kaj la prudenton. Jen tio, kion ni volas provi.

Konsiderata el supera vidpunkto, la seksa vivo estas

tiel bela kiel bona. Kio estas honta kaj malbona, tio estas la malpureco kaj la malnobleco, kiujn la brutaj pasioj de malsindonemeco kaj de malinteligenteco, ligitaj al nescieco, al erotika scivoleco kaj al la mistikaj superstiĉoj, metis en ĝin, kuniĝante sin ofte kun la sociaj narkotikaj envenenigoj kaj kun la cerbaj anormecoj.

Ni dividos nian temon en dek-naŭ ĉapitroj. La 1a ĝis 7a ĉapitroj traktos la naturan historion kaj la psikologion de la seksa vivo, la 8a ĉapitro ĝian patologion, kaj la 9a ĝis 18a ĝian socian rolon, t. e. ĝiajn rilatojn kun la diversaj fakoj de la socia vivo de la homoj.

Racia Selektado aŭ Eŭgenismo.

Estas ja tempo por anstataŭigi tiujn du ekstrecojn (1e: intensa reproduktado laŭ la doktrino de Bebel; 2e: nova-malthusismo, unu tiel malsaĝa kiel la alia) per selektado racia, pripensita kaj bone ekzamenita. Necese estas praktike instrui, aŭ eĉ trudi, la novamalthusismon al la malsanuloj, nekapabluloj, malsprituloj, senmoraluloj kaj krimuloj kaj al la malsuperaj rasoj. Kontraŭe estas necese fari ĉion por direkti la fortulojn, sanulojn, bonulojn kaj la superajn spiritulojn al reproduktado tiom fortega kiom ili povas, Ni estas certa ne erari, vidante en tio unuagradan nerektan faktoron por politika ekonomio bone komprenita. Mi eĉ kuraĝas opinii, ke ĝi estas la plej grava el ĉiuj. Ĝia agado sendube estas treege malrapida, kaj jarcentoj estos necesaj por ricevi per ĝia helpo plenan kaj klaran rezultojn. Sed se la principo pri la bona homa selektado iom post iom sukcesas triumfi, ni povas esperi kun fido belan estontecon por niaj idoj, kiuj scios ĝin aprobi kaj praktiki. Tiun principon Francis Galton nomis per la termino eŭgenismo kaj li defendas ĝin jam de multaj jaroj (Essays in Eugenics; the eugenics educational Society, k.t.p.).

Venos tago, kiam la homa loĝantaro de la tero restos pli-malpli ne ŝanĝanta laŭ la nombro. Se de nun al tiam la homa spirito povos sukcesi senteble plibonigi sian kvaliton kaj laŭgrade forigi la korpan kaj spiritan proletarian akompanatan de mizero, de malsato kaj de brutiĝo, kiu invadaĉas nian nunan mondon, nur tiam la dogmoj de niaj modernaj novamalthusanoj povos akiri ian pravecon por ĉiuj.

Se homaro ne baldaŭ komencos degeneri pro brutiganta ĥina enamasigo, sed kontraŭe trovas kaj ĝustatempe praktikas la rimedojn por laŭgrade plibonigi sian kvaliton, niaj estontaj idoj ja evitos forlasi la racian selektadon. Homo kapabla, agema kaj bona, multe pli donas ol prenas al la socio, kaj tial li estas ekonomia valorajo. Korpa kaj spirita invalido kontraŭe pli prenas ol donas al la tuto, kaj tial li estas ne nur senvaloraĵo, sed ekonomia malprofito.

Tio estas unu el la kaŭzoj pro kiuj kelkaj malmulte loĝataj landoj estas malriĉaj malgraŭ riĉa tero, kaj aliaj multe loĝataj estas riĉaj malgraŭ malriĉa tero. Kio formas la veran riĉecon de lando, tio precipe estas la laboro kaj la korpa kaj spirita valoro de ĝiaj loĝantoj. La nutraĵa produktado de la tero sendube havas

limojn, sed ili estas iom elastaj, kaj mallaboremaj ĝuemaj nesciuloj povas morti pro malsato en riĉa lando.

El la franca lingvo kun permeso de l' verkinto tradukis

CAMILLE CHANDELLIEZ,

Atestulo pri Kapableco de la S. f. p. E.. 69 Strato des Noes, Troyes (Francujo).

Daŭrigota.

RAPORTO

pri la XVIa Internacia Kongreso de la Libera Penso en München

(31a de Aŭg.—4a de Sept. 1912).

La Kongreso de München antaŭ ĉio diferencis de tiuj de Romo, Parizo kaj Bruselo per la malesto de iu ajn manifestado sur la stratoj. Nur grandaj alegoriaj afiŝoj dum 14 tagoj atentigis la loĝantaron pri la por Germanlando vere rimarkinda okazo — unua en la lando de pensuloj kaj poetoj: „Internacia Kongreso de la Libera Penso“ kaj je la lasta kongrestago oni manifestadis en grandega ejo „Bürgerbräukeller“, kie estis aranĝita granda publika kunveno, vizitita de pli ol tri mil personoj. Ĉiuj oratoroj havis grandegan sukceson, kaj la francoj, precipe k-do Gustave Hubbard, estis demonstrative aplaudataj de la vizitintoj tiun grandan „Propagando-kunvenon“.

Je la 31a de Aŭg. la alvojaĝantaj kongresanoj estis en la stacidomo akceptataj de la loka organiza komitato. Vespere la kongrespartoprenantoj kunvenis en la kongresejo. Ĉeestis proksimume kvin cent personoj. En longa serio sekvis salutaj alparoloj de P. Schmal (sekretario de la Germana Ligo de la liberpensuloj), Dr. P. A. Rüdts (je la nomo de pli ol mil liberpensuloj-socialdemokratoj, membroj de Münchena Unuiĝo „Darvin“, kies fondinto kaj prezidanto li estas), L. Furnémont (la dua prezidanto de la Internacia Federacio), Dr. Aigner (je la nomo de la Germana Ligo de la monism'anoj kaj je la nomo de la kartelo de 4 Münchenaj unuiĝoj: nome de monism'anoj, por la Etika Kulturo, jungermana kulturligo kaj liberreligia societo), Vogtherr (Wernigerode), Profesoro Bandini (Romo), E. Bazire (Rouen), Profesoro F. Buisson, Dr. O. Karmin (Svisujo), Dr. Bartosek kaj L. Riess (Prago) kaj multaj aliaj. Aparte mi volas nomini nian samideanon R. Felser (Tirol), parolintan al la kongresanoj Esperante kaj germane je la nomo de nia societo, kaj la honoran membron de nia societo S-ron Andrej Niemojevski (Varsovio). La lasta venis kongreson apenaŭ forlasita el la fortifikaja malliberejo, kie li estis arestata dum dekunu monatoj pro siaj verkoj „Kateĥismo de liberpensulo“ kaj „Jesuo“. Fine oni traegis multenombrajn telegramojn kaj leterojn. Inter aliaj — la leterojn de Prof. Hector Denis kaj Prof. Ernst Haeckel.

La demandoj, kiujn dum la sekvintaj tagoj pridiskutadis la kongreso, estis la jenaj:

1. Determini la esencon kaj la celon de la Internacia Federacio de la L. P.
2. Pri la disiĝo de la Eklezio kaj de la Ŝtato.
3. La edukado kaj la Libera Penso.

La spaco en nia bulteno ne permesas detale raporti pri la diskutado, nek vorte citi la rezoluciojn. Tial mi nur ege mallonge resumas.

Al unua programpunkto la kongreso deklaras, ke la Libera Penso estas laika, demokrata kaj socia, tio signifas, ke ĝi je la nomo de la homindeco malakceptas la trispecan (trioblan) jugon: la fian potencuzadon de la aŭtoritato en la demandoj koncernantaj la religion; de la privilegioj en la politikaj kaj de l' kapitalo en la ekonomiaj demandoj. Al dua punkto — la kongreso i. a. esprimas la deziron, ke, por prepari la leĝan disigon de la Eklezio kaj de la ŝtato, kaj de la Eklezio kaj de la instruado, oni propagandu ĉie kaj ĉiam kaj plenumu la eliĝon el la Eklezio. Kaj precipe jam antaŭ disigo efektivigita de la Eklezio kaj de la ŝtato oni zorgu pri la laika edukado de la infanaro.

Al tria punkto oni akceptis kvin rezoluciojn: de S-ro F. Buisson (Parizo), Domela Nieuwenhuis (Holando), Bogaerts (Belgujo), Dr. Rüd't (München) kaj D-ro Dobner (Krakovo).

Laŭ la rezolucio proponita de S-ro Buisson la Kongreso invitas la liberpensulojn sin organizante laŭ iliaj landkondiĉoj metode propagandi devigan kaj laikan popolinstruadon, plenumatan je la nomo de la nacio kaj en la nacia lingvo. Tia instruado devas enhavi la elementojn de la civita moralo, sendependa de la Eklezio.

El la ceteraj rezolucioj mi petas la permeson citi en la venonta N. de nia bulteno la tre interesan proponon de Domela Nieuwenhuis. Mi citos ĝin vorte.

En la fina kaj privata kunsido, ekskluzive rezervata al la delegitoj de l' Federacio kaj de l' Societoj aliĝintaj al la Intern. Federacio, oni unuanime akceptis la reformon de l' regularo de la Federacio kaj longe, tro longe diskutadis pri la propono de Gustave Hubbard: je la nomo de Intern. L. P. manifestadi en la tuta mondo per grandaj afiŝegoj kontraŭ la militarismo, kontraŭ la milito. Fine la propono estis kontraŭ unu voĉo akceptata.

La lasta demando pridiskutata de la Internacia delegitaro estis la propono de la Intern. Esperantista liberpenso societo „Libera Penso”. 1. Alpreni la internacian lingvon „Esperanto” kiel oficialan helpan lingvon en la diskutoj de l' Intern. kongresoj de la Libera Penso. 2. Alpreni la uzadon de „Esperanton” por la koresponda do de la konstanta oficejo de la internacia Federacio de la L. P. kaj en ĝia jarlibro.

Tiu propono, kiel niaj societanoj scias, estis de la XVa kongreso en Bruselo transdonita al la speciala komitato, kiu devis prijuĝi krom nia propono ankaŭ aliajn. La rezultato estas, ke la komitato malakceptis la enkondukon de nia lingvo kiel oficialan, motivigante sian decidon per tio, ke ankaŭ la Idistoj samrajte povas postuli la enkondukon de sia lingvo, kaj la komitato ne povas juĝi, kiu lingvo estas pli taŭga. Sed la komitato proponas al la Kongreso permesi uzi inter aliaj lingvoj laŭvole ankaŭ intern. helplingvojn.

Malgraŭ la klarigoj kaj argumentoj de la ĉeestantaj delegitoj de nia societo, la kongreso akceptis la decidon de la komitato.

Por nia propono voĉdonis D-ro Dobner (Esp. el Krakovo), Wieser (Esp. el München), R. Felser kaj la skribanto de tiu raporto. Por la propono de la komitato entute voĉdonis 9 delegitoj. La ceteraj ĉeestantoj atente aŭskultis, sed evidente sin konsideris nekompetentaj en tiu demando.

Sed mi devas konstati, ke la intereso por nia lingvo kreskas. Tion pruvus la interparoloj kun multaj kongresanoj, la akcepto kiun trovis nia bulteno kaj Esperanto-propagandiloj, kaj fine la propono de du redaktoroj: Dr. Bartosek kaj

Vogherr presadi en siaj gazetoj artikolojn en Esperanto kaj pri Esperanto.

Do nia tasko estas ankoraŭ pli fervore propagandi inter lokaj liberpensuloj: ĉiu en sia urbo, por ke fine la plimulto konsideru nian postulon tiel grava, kiel ĝi efektive estas.

D. JWANSKY.

LA SOCIETO.

PROTOKOLO

de la kunsido de Liberpensuloj okazinta la 16an de Aŭgusto 1912 dum la VIIIa Esperantista Kongreso en Krakovo.

Ĉeestas 23 samideanoj reprezentantaj 9 diversajn naciojn.

Prezidas sinjoro D-ro Stromboli Alfredo el Genova, Italujo. Sekretario: sinjoro Vladislavo Kolomyjski el Nowy Sacz en Galicio (Aŭstrujo).

Post elĉerpiga diskutado kaj unuanima voĉdonado oni decidis:

1e. Elekti sinjoron Richard Felser el Welsberg en Tirolo en Aŭstrujo kiel reprezentanton de nia societo dum la ĉi-tiujara kongreso en München.

2e. Dankante al sinjoro Deshays, licea profesoro en Sens (Yonne), Francujo pro lia ĝisnuna sindonema laboro por nia afero, la kunvenintoj petas, ke li bonvolu denove rekomenci la eldonadon de nia Bulteno, rimarkante tiuokaze, ke la politikaj demandoj estu en ĝi laŭeble forigitaj por ne malutili nek malhelpi la movadon esperantistan.

La kunvenintoj oferas sian materialan kaj moralan helpon.

La sekretario,
V. KOLOMYJSKI.

La prezidanto,
D-ro A. STROMBOLI.

Skriba Voĉdonado 1912.

Ĉar la sperto montris al ni, ke malmultaj societanoj povas efektive partopreni la ĝeneralan kunvenon, ni kutimas ĉiujare fari skriban voĉdonon preparitan per la diskutado kaj per la deziresprimoj de la membroj kunvenintaj.

Laŭ la supre legita protokolo, la Krakova kunveno celis nur la urĝan reorganizon de l' administrado: tio estas nun afero farita.

En la unua no. 1912 sin akuzis pro la malreguleco de l' bulteno la administranto s-ro Schoofs; veran respondecon havas la sekretario, kiu, pro manko de tempo, estis trudinta al s-ro Schoofs sekretariajn laborojn. Nun la sekretario reprenas sian taskon kaj la administradon de l' bulteno, kiu estos presata per zorgoj de societano Nutters en Amsterdam. Nur dankojn ni ŝuldas al s-ro Schoofs, kiu daŭrigas sian fruktodonan laboron ĉe la Antverpena sekcio de „Libera Penso”, kiun li fondis.

Pri la deziro esprimita ĉe la kunveno, „ke la politikaj demandoj estu en la bulteno laŭeble forigitaj por ne malutili nek malhelpi la movadan esperantistan” ĉiu membro devas voĉdoni, klarigante precize kiel li komprenas la demandon. La administranto tuj lojale aplikos la decidon de la plimulto: sed li rimarkigas de nun, ke la afero estas grava kaj malsimpla, kaj devos estas funde kaj larĝe traktata ĉe la venonta kunveno; la signifo mem de nia societo dependas de la solvo.

Per la skriba voĉdonado ni devas ankaŭ elekti 2 komitatanojn kaj 2 rezervajn. Eliras kiel plej malnove balotitaj s-roj O. Bunemann (Germano) kaj Guillemin (Franco); la rezervaj, kiuj ĉiujare balotiĝas, estas nun f-iro Fryer (Anglino) kaj

D-ro Batek (Bohemo). Ĉiuj estas reelekteblaj. Post la elekto la komitato mem elektos laŭstatute la estraron.

LA SEKRETARIO.

Ĝenerala Kunveno 1913.

Okazante dum la Kongreso de Esperanto en Genova ĝi akurate prepariĝos per nia komitatano D-ro Stromboli: ĝi estos samtempe tutmonda liberpensa kongreseto ĉe niaj italaj kunbatalantoj, kaj plej grava studokunveno por nia societo. De nun pripensu kaj sendu niaj membroj temojn kaj proponojn por la tagordo. Nia lingvo komencas penetri, almenaŭ teorie, la liberpensulajn rondojn; nia societo komencas firmigi sian lokon en la Esperantistaro. Ni devas propagandi per la plej efika maniero, per laboro kaj kreskado.

Novaj aliĝoj.

S-ro Walter Grotte, 411 East 17-th st., New York.

S-ro Stewart Kerr, ĉe Francisko Ferrer Association, 104 East 12-th st., New York N.Y.

S-ro A. Zednik, bankoficisto, Neustiftstr. 53/35, Wien VII, Aŭstrio.

S-ino Amor Rolan, 18 Guzman el Bueno, Leon, Hispanujo.

S-ro L. M. Kanervo, Lapua, Finnlando.

S-ro W. Nutters, 94 Van Ostadestraat, Amsterdam, Nederlando.

S-ro Z. Z., Aŭstrio-Moravio.

Entute 231 membroj.

KASO (Aprilo—Aŭgusto 1912).

Enspezoj:

Reportite	Fr. 264,05
Por kolekto 1911	- 1,50
Kotizajo 1912 Czubrynski	- 2,50
" " Fridrich & Chyla	- 5,10
" " Weiner	- 2,40
" " Martin	- 2,50
" " Walter Grotte	- 2,50
" " Batek	- 2,40
" " Ptaĉnikova	- 2,40
" " Iwansky & S-ino	- 4,90
" " Engst	- 2,90
" " S-ino Hankel	- 2,40
" " Kanervo	- 2,40
" " F-ino Rouff	- 2,50
" " " Newcomb	- 2,50
" " " Amor Rolan	- 2,50
Por kolekto al Davidov	- 2,90

Sume Fr. 308,35

Elspezoj:

Preso Bulteno 1—2	Fr. 36
Sendo "	- 18
Preso Bulteno 3—4	- 18
Sendo "	- 17
Preso Bulteno 5—6	- 18
Sendo "	- 17
Preso Bulteno 7—8	- 18
Sendo "	- 17
Poŝtmarkoj	- 5

Sume Fr. 164

Restas en kaso Er. 144,35.

Septembro 1912.

Enspezoj:

Reportite	Fr. 144,35
Kotizajo 1912 Collot & Lobbedez	- 5,—
" Kunitaro Fukuta	- 2,40
" Zednik	- 2,50
" Chandelliez	- 2,50
" Morton, Stewart Kerr, Klajin	- 7,50
" Doyle & Kerr	- 5,—

Sume Fr. 169,15

Elspezoj:

Poŝtmarkoj	- 4,—
Restas en kaso Fr. 165,15.	

Oktobero 1912.

Enspezoj:

Reportite	Fr. 165,15
Kotizajo 1912 Stromboli	- 2,50
" Cros	- 5,—
" Schubert, Vich, S-ino Kurtz	- 15,45
" Hinglais & Priou	- 5,—

Sume Fr. 193,10

Elspezoj:

Papero	Fr. 0,50
Poŝtmarkoj	- 2,—
Kotizajo al la Internacia Fed. de L. P.	- 15,25

Sume Fr. 17,75

Restas en kaso Fr. 175,35 (Sm. 76,46).

Liberpensulojn nepre interesos INTERNACIA SOCIA REVUO, monata soc. gazeto, 12 paĝa. Redakcio ĉe S-ro W. NUTTERS, Ostadestraat 94, Amsterdamo (Nederlando). Abonprezo: jare 1.40 Sm.; duonjare 0.80 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London.

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de

D-ro L. L. Zamenhof.

Administracio: HACHETTE & K-io.

Paris. — 79, Boulevard St. Germain, 79. — Paris.

JARABONO: Francujo: Fr. 6.— (Sm. Fr. 2.40).

Ceteraj landoj: Fr. 7.— (Sm. Fr. 2.80).

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

Eliranta inter la 15 kaj la 20 de ĉiu monato

La plej malnova el ĉiuj gazetoj Esperantistaj

Fondita en 1895

La plej enhavoriĉa!

Le plej malkara!

48

PAĜOJ da dense presita teksto en plej korekta kaj plej klasika stilo.

5

FR. (2 Sm.) Abonprezo por UNU JARO

Por ricevi specimenon oni sendu unu poŝtan respondkuponon
Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 Sm. (Fr. 2.50)

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn al S-ro B. F. SCHUBERT, 1505, North Capitol Str., Washington, Usono. Kotizmono kun bulteno: 50 c. = 1 Sm.

La Seksa Demando

prezentata al la instruitaj plenaĝuloj

de AŬGUSTO FOREL + 1911

Eksprofesoro de Psikiatrio ĉe la Universitato en Zurich.

Utopiaj ideoj pri la idealo de la geedziĝo en la estonteco.

La ekstera vivo de la homo estas grandparte puŝata de la frapoj de la estanta momento; sed ĝia interna vivo estas determinata de la memorajoj pri la estinteco kuniĝantaj kun la hereda mnemo (!), kaj tiel ĝi naskas la penojn al la estonteco. Estus do bone, ke la estinteco neniam estu la tirana kaj kristaligita gardisto de niaj estonteco kaj estonteco, sed ĉiam biblioteko uzata por kunigi per nia imago la eksperimentojn de nia vivo konservitajn en nia mnemo kaj la novajn impresojn, kiujn ni ricevas de la ekstero, por tiri el ili frukto-plenajn ideojn kaj decidojn.

La geedziĝo en la estonteco supozas homojn plene instruitajn jam de ilia infanaĝo pri la naturaj seksaj rilatoj kaj pri iliaj eventualaj danĝeroj. Ĝi supozas homojn nutritajn sen alkoholo kaj sen alia narkotiko, posedantajn la rajton uzi la produkton de sia laboro por la vivo kaj konservo de sia propra persono. Sed nek kapitaligi por si kaj siaj idoj, nek fari individuajn heredaĵojn al aliuloj, t. e. fondi, per mono kaj por profitaj celoj, potencon uzatan por ekspluatado de la aliaj. Ĉiu scios jam de infanaĝo, ke laboro estas kondiĉo de ĉies ekzistado.

Komune edukitaj kun absolute egalaj rajtoj, knabinoj kaj knaboj konscios la diferencon de siaj taskoj en la vivo, tiaj kiajn montras la diferencoj de sekso kaj de individueco. Ĝis la aĝo de dek ses jaroj, eble eĉ pli longe, ili estos instruitaj ĉe la popola lernejo, harmonie per la samtempa pliboniĝo de la inteligenteco, de la korpaj kaj teknikaj ekzercoj, de la estetiko, de la mo-

(!) *Semon*, nomas incito: energiecan agon sur la organismo, kiu determinas, malsimplajn, sanĝojn en la incitebla substanco de la vivanta organismo. Kiam, incitado tute ĉesis, la incitebla substanco de la vivanta organismo estas sanĝita en daŭranta maniero, *Semon* parolas pri engrafia agado. Li nomas engramo la sanĝon mem. La sumo de la tiel produktitaj heredaj kaj individuaj engramoj de vivanta estaĵo estas nomata per la termino mnemo.

ralaj kaj sociaj sentoj kaj de la volo. Ne ilin timiginte per la fantomo de eternaj suferoj kaj ne ilin alloginte per promesoj pri postmorta paradizo, oni prezentis al ili kiel celo de nia nedaŭra individua ekzistado la daŭran penadon direktatan al pura homa idealo. Oni instruis al ili serĉi kaj trovi sian plej veran kaj plej altan kontentiĝon nur en la diligenta plenumado de la plej diversaj devoj laŭ siaj taŭgecoj kaj en la komuna laborado por la bono de la socio kaj de sia ĉirkaŭantaro. Krom tio oni instruis ilin malŝati la neutilajn ludojn, la mal-seriozecon kaj la lukson, ne doni gravecon al la propra posedo kaj meti sian tutan ambicion en la kvanto kaj kvalito de la utila laboro, kiun ili liveras.

Tiel preparitaj, ili kutimas gajni mem ĉiun ĝuon kaj eĉ ne postuli la necesajn nutraĵojn kaj loĝejon, ne farinte ion por ilin meriti.

En aĝo diferenca laŭ la individuoj, la seksa inklino sentigos sin en ili. Ekzercitaj jam de infanaĝo ne cedi al ĉiu deziro sed kontraŭe submeti siajn dezirojn al la bono de la komuno, ili ne cedos tuj. Aliparte ili konos la signifon de tiu inklino. Ili scios krom tio, ke ilia pacienco ne estos submetata al tro longa provo kaj ke ili senĝene povas paroli pri seksaj temoj al siaj instruantoj kaj gepatroj kaj eĉ al siaj aliseksaj kamaradoj.

Kiuj do estus la konsekvencoj de tia stato? La inklinoj frue formiĝos. Sed anstataŭ fari kiel nun ĉiaspecajn kalkulojn pri mono, socia stato, klaso, k. t. p. de tiu, kiun ili amas, anstataŭ ol kaŝi siajn pensojn sub formoj de pure konvencia ĝentileco, anstataŭ ol eviti honestan klarigon pri la plej grava punkto de la demando aŭ apenaŭ pasi sur tiu klarigo kiel kato sur brulkarbajo, anstataŭ ol precipe pensi nur al briligo de siaj superaĵoj por mirigi tiun, kiun ili volas kapti, la geamantoj en la estonteco meznombro estos multe pli senartifikaj kaj malkaŝemaj, ĉar estos multe malpli da kaŭzoj por kaŝi. Oni interŝanĝos siajn estontecajn planojn, oni reciproke provos siajn konstantecon kaj lojalecon, ne timonte tro da babiloj kaj malbondiroj.

La du seksoj povos libere kaj sendanĝere interrilatiĝi, unue ĉar ili ambaŭ estos instruitaj pri la seksa demando, kaj due ĉar la moroj estos pli liberaj. Malgraŭ ke la ĝuste diritaj seksaj rilatoj ne estos necesaj, tiel du geamantoj povos baldaŭ vidi, ĉu iliaj temperamentoj bone taŭgas unu por la alia.

Kaj dank' al ilia libereco la epoko de la gefianciĝo

permesos al la du partoprenantoj libere interŝanĝi iliajn ideojn pri la vivo kaj plene sin studi reciproke; tiel ili baldaŭ vidos, ĉu ili estas aŭ ne faritaj, por post tempo akordiĝi en geedza kuniĝo. La demandoj pri heredeco, nasko, edukado povos esti traktataj senĝene en tuta trankvileco. Tio certe estos pli morala ol la nunaj interparoladoj de la „bone edukitaj” gefianĉoj, kiuj krom ia konvenciaj nuancoj akceptataj de la amindumo, kuraĝas stari nur sur komunaj temoj.

Talenta junulo, kiu volos fari longajn studojn, tute ne estos malhelpita de tio por edziĝi. Ekzemple li de dekkvarjara povos edziĝi kun dekokjara junulino kaj ankoraŭ studi ĝis dudeksesjara. La malbono ne estos tre grava, ĉar la simpleco de la moroj estos sekvita de tiu de la maŝtrajo, kaj oni facile povos, se necese, dank' al la kontraŭgravedaj rimedoj, atendi unu aŭ du jarojn antaŭ ol naski idojn.

Kia iĝos la geedzaro mem? Unue oni malgrandigos ĝis minimumo ĉiun neutilan lukson kaj ĉiun konvencian formaron. La edzo kaj la edzino ambaŭ laboros, ĉu kune ĉu ĉiu siaflanke laŭ cirkonstancoj. Parto de la laboro nature estos dediĉata al la idoj. Kiel nun, la edzo povos partopreni ilian personan edukadon, se li havas por tio pli da kapableco ol la edzino. Tiu okazo ne estas malofta.

La egalrajteco de la du seksoj kaj la matriarkato tute ne iĝos malpli intimaj la geedzajn rilatojn, sed kontraŭe profundigos iliajn radikojn, altigante ilian moralan valoron. Oni ne plu konos la oficialajn invitojn kun gratuloj, ĉiuspecaj malsimpligoj, digestaj vizitoj, k.t.p. Tio estas aferoj faritaj por la mallaboremaj riĉuloj, kiuj havas tempon por perdi kaj monon por revendi. Se venas amiko aŭ konato, se oni havas sufiĉon por lia manĝo kaj tempon por lin ricevi, oni invitas lin en alia formo kaj hazarde de la pota ĉe la familia tablo.

La laborado kaj la penado direktataj al la idealo de la socia vivo estas kaj restas tio, kio plej sane disigas de la seksa inklino. Kontraŭe la senokupeco, la luksemo kaj la malvirteco de la moroj en la grandaj urboj degenerigas ĝin. Ĝin dresante laŭ sia maniero kaj igante ĝin ĝia propa celo, kiel oni povas vidi ĉe la ĉiuseksaj herooj de tiom da salonoj, de niaj proletariaj drinkejoj kaj de niaj modernaj romanoj. Plie laborado refreŝigas amon kaj lasas malmulton da tempo por la geedzaj interinsultoj.

Oni provu praktike efektiviĝi nian utopion anstataŭ ol moki ĝin, altege starante sur siaj malnovaj aŭtaŭjuĝoj. Per iom da karaktera sendependemo, jam nun oni povas ĝin grandparte praktiki por si mem, kontraŭstarante la ricvilitajn antaŭjuĝojn.

Dr. A. FOREL, Yverne près Aigle (Svislando).

El la franca lingvo kun permeso de l' verkinto tradukis
CAMILLE CHANDELLIEZ,
Atestulo pri Kapableco de la S. f. p. E.. 69 Strato
des Noes, Troyes (Francujo).

Pri la Eŭkaristia kongreso.

La kongreso en Wien komencis la 10an de Septembro. La tuta urbego estis tre solene ornamita per flagoj, precipe ja preĝejoj. Alvenis tre multaj pilgrimantoj el ĉiuj landoj

de la tuta monarĥejo, eĉ el Ameriko. Ĉe la ĉefa procesio kun Eŭkaristio dimanĉon antaŭtagmeze pluvegis, sed la fanatikuloj estis tiom multaj, ke la alfluo devis esti barita per policanoj kaj soldatoj. La entuziasmigitoj ne atentis la stratan koton, sed ĝenufleksadis por ricevi benon de Monsinjoro Van Rossum.

La Germanaj liberpensuloj en Wien eldonis informilon precipe direktitan kontraŭ la kongreso, kaj oni disdonadis ĝin sur la stratoj. Pro tio estis arestitaj 200 homoj! Sed la pastroj povas disdonadi ĉiudimanĉe siajn propagandilojn kaj senpune.

Oni aranĝis la kongreson por entuziasmigi eĉ pli multe la fanatikulojn, por savi la regadon de kristsocialuloj en la viena urbestro. La estraro donacis 50000 kronojn por la kongreso, kaj la malsanulejoj estas en tia fia stato, ke la malsanuloj ne estas akceptataj en ili, kaj la malriĉuloj mortas ie en angulo sen ia helpo.

A. ZEDNIK.

Por la revizio de la proceso de Ferrer.

Okazis en Madrido la 2an de Novembro, sub prezido de D-ro Simarro, granda kunveno por peti la revizion de la proceso de nia neniam forgesota martiro Ferrer. Ĉiuj liberpensaj famuloj kaj societoj de la tuta mondo sendis aliĝon al la ripara entrepreno. Jen la letero de „Libera Penso”, represita en la ĵurnalo „El Pais” (12 Nov.):

„Al S-ro D-ro Luis Simarro, profesoro de l' Universitato, Madrid. Por la kunveno 2 Nov. La Esperantista Internacia Societo „Libera Penso”, kies membro estis Ferrer, protestas kontraŭ la abomena verdikto, kiu mortigis la martiron, kaj unuigas sian voĉon al la krio de ĉiuj liberpensuloj, de ĉiuj honestaj konsciencoj en la tuta mondo, por postuli la revizion de l' proceso.

La sek. R. D.”

JAROSLAV VRCHLICKY.

La reĝo de l' bohemiaj poetoj, Jaroslav Vrchlicky, mortis la 9an de Sept. en Domajlice (Bohemujo) post dujara malsaneca suferado.

En li perdis la Ĉeĥoj la plej modernan homon, kiu donis plenan direkton al la tuta ĉeĥa poezio. Li postlasis verkojn de senmezura prezo; li volis fari el ĉeĥoj nacion kulturan, eŭropan, el nia literaturo eŭropan kulturon. Li tradukis tre multajn ĉefverkojn el romaj lingvoj, de Hugo, Balzac, Baudelaire, France, Petrarca, Dante, Carducci, Poe, Shelley, Witman, Ibsen, Goethe, Schiller, Mickiewicz. Li malfermadis riglilojn al ĉiuj tutmondaj poezioj, per sia scio de 15 lingvoj, kantante pri humanismo, libereco, amo, frateco, civilizacio.

La plej granda ĉeĥa poeto iris kune kun la nuna evolucio. Li skribis tre multe, estis tiel fruktodona kiel Zola, Balzac, Hugo, Shakespeare. Li devis elskribi ĉion, kion li sentis.

Foriris la plej fidela propagandisto de Libereco de Penso, kvankam izolulo, sed ĉiam helpanta kaj amanta.

Sed ne forgesu, ke ni vivas en la ŝtato, kie oni estas punata ne demetante ĉapelon antaŭ Eŭkaristio, kie la pastroj perfortas poeton eĉ en agonio. Al la majstro kiu skribis „La pastro anstataŭis al homoj la dion, la homaron krucumis” oni entrudis, kiam li estis jam mortanto, la lastajn sakramentojn. La poeto estas mortinta, li ne povas sin defendi, sed lia verkaro lin brile defendos.

Jen mi tradukas libere senakcente la poemon skribitan por la kongreson de Libera Penso en Praha 1907.

„Malsupreniru al ni, ho filino de ĉielo, el altaĵoj de kosmoj malsupreniru jam! El uragana bolo de sango de ĉiuj pensantoj, eniru en vian regnon! Vi unu sola povas esti la ponto kiu ligas la naciojn, per ligilo de libero kaj forto, beleco, sano kaj interkompreno. Kaj ne nur vi la pontojn ekvolbos. Vi la vojojn rektigos, sur kiuj jam de nepoj iros sindona kaj maldormema gardo. Al herooj ĉiuj lumis via rideto el lignamasoj, el arestejoj de teruro. Kien vi vipis, la Homo ekstaris, parolis genio de la Homaro!”

A. ZEDNIK.

La vojo al vivado.

Devizo: Esti tuthomo, signifas: sin okupi je io pro ĝi mem. (WAGNER.)

Ĉu tio ĉi estis ĝishodiaŭa kutimo, mi ne kuraĝos decidi. Ke tio ĉi fariĝu tuthoma farmaniero, tiu estu nia laboro kaj arda penado. Survoje troviĝas iu, kiu sin aligas kaj kuninteresiĝas. Li eble iomete entuziasmiĝas por la komuna afero. Eĉ oferoj eble estas farataj. Jen ekvenas tago de tute neatendita senreviĝo. La ŝajniintereso devojiĝis kaj laŭiris flanken. Nun oni ekscias, ke li ne havis la animeton daŭrigi. Li eble havis kromcelojn. Tiaj spertoj saĝigas per senluziigo.

Okupi sin je io pro ĝi mem, signifas: tiele povante kreskadi. Multo eble nin interesiĝas, kelko nin povas allogi. Ni nin trovas je iuspeca agadcelo, elektita laŭ ies bontrovo, sed pli ofte destinata de neceso aŭ neceseco. Povas ja okazi, ke tiu ĉi celtasko fariĝas nia vivtasko. Sed ne estu tiel. Surrigardante la atingiĝojn en ĉiuj fakoj, ni estas konvinkitaj, ke kreaĵoj plejofte eliĝas de tiuj, kiuj havas tute malsaman vivcelon kaj ili atentigas pri novaj direktoj sekvotaj. Tial, okupi sin je io pro ĝi mem, oni tuteprave nomas la vera vivelemento de l' homo. Ni nur kreskadus je tio, kiomgrade ni nin okupos je io elkore. La plej riproĉa senreviĝo travivita de l' homo estas: eksciigi, ke oni estas erariĝinta, aŭ se oni baldaŭ ekscios „Tio ĉi tute ne meritas pluan atenton”, sed oni ne plu sin povas ekmalligi kaj tial, anstataŭ esti superulo kaj majstro, oni fariĝas ĝia subulo kaj sklavo.

Ne konsiderante tiajn bedaŭrindajn komplikaĵojn, la homo fariĝas feliĉa nur tiuokaze, kiam li sin okupas je io pro ĝi mem. Tion farante, oni nur atingos la mezpunkton. Estas tute nesignife, je kiu ajn punkto de l' cirklo oni komencas, sed estas plensignife, ke oni al si retenu la kapablon, el kiu ajn punkto ekmovi al la mezpunkto. Tiamaniere sin malkaŝas la profundeco de l' aĵo kaj de l' laboraĵo rilate atingiĝoj kaj okazintaĵoj. Tio okazos nur pro amo, pro tuta submetiĝo al la aĵo mem. Tiamaniere oni devigas ĝin al kontraŭamo, al kontraŭsubmetiĝo. Ĉar la aĵo, kiu fakte intencas kunigi kaj kontentigi la animon kaj koron, estas jaluza. Nenio ajn meritplena, en la tuta mondo, sin montras al okaza ekrigardo aŭ laŭkaprica palpserĉado; la kaŝito estas la ejo de ĉiu ajn forto. Oni kreskadus alten, kiam la radikoj kreskadus ĝisprofunden.

Mi traspertis tiun feliĉon, sin ĝisfunde okupi je io ajn. Ne sukcesas ĉiufoje, sed kiam ni trovas, oni nobliĝas estis aprobinta iliajn projektojn, kiujn li juĝis konformaj

pli multe ol antaŭe. Multon oni estas malatentinta, kio ŝajnis esti multmerita kaj sin nun montras en ĝia vera tutmalgrandeco. Tute aliloke oni estas estinta, kvazaŭ oni estus formigrinta el la multatejo en plejmalvastan ejon plena je lumo, ĉe kiu oni sin sentis tuthejme. Kiam do la tagiĝo nin vekas je ĝiaj nuraj malgrandaĵoj, oni eksentas sin kvazaŭ songinto. Ekfoje ni estis laŭirintaj la vojon de l' vera vivado kaj senpera konscienco. Ni estis kreskiĝintaj en nia propra esteco, kaj la mistera kontraŭdira vorto malkaŝis sian profundan verecon, ke nur tiu vere sin gajnas, kiu kapablas sin ĝis profundigi. Tio ne estas eldiro de utopisto. Estas la sola vojo al vera vivado.

Io pro ĝi mem, liberigas. Nur tiu fariĝas libera, kiu sin ĝisfundigas en la plej granda aĵo.

B. F. SCHUBERT.

LA DIOJ SOIFAS.

Sub tiu titolo, la glora franca liberpensulo Anatole France priskribis en romano la sangan fanatikecon de tiuj puraj animoj, kiujn dum la Revolucia Teruro (1793) plenigis samtempe mirinda amo al patrolando kaj al libereco, profunda naiveco pri la boneco aŭ tuja bonigebleco de la homo, kaj religia kredo al la parolo de l' gvidantoj.

Oni povas juĝi pri la kutime ĉarmega, ĉi tie fortimpresa kaj tragedia ironio de la majstro per la jena elĉerpaĵo: ni vidas la modestan heroon de l' romano, Evariston Gamelin, aŭdantan ĉe la Jakobana klubo la ĉiupovan parolon de Robespierre.

„Robespierre eldiris per klara voĉo elokventan paroladon kontraŭ la malamikoj de la Respubliko.

Li frapis per metafizikaj kaj teruraj argumentoj Brissot kaj liajn kunkulpulojn. Li parolis longatempe, kun abundeco, kun harmonio. Ŝvebante en la ĉielaj sferoj de l' filozofio, li ĵetis la fulmon al la komplotintoj, kiuj rampis sur la tero.

Evaristo aŭdis kaj komprenis. Ĝis tiam, li estis akuzinte la Girondon prepari la restarigon de la monarĥio aŭ la triumfon de l' Orleansana partio kaj primediti la ruiniĝon de la heroo urbo, kiu liberigis Francandon, kaj kiu liberigos iam la mondon. Nun, laŭ la voĉo de l' saĝulo, li distingis veraĵojn pli altajn kaj pli purajn; li konceptis revolucian metafizikon, kiu levis lian spiriton super la krudaj malnecesoj, for de l' eraroj de l' sentoj, en la regionon de l' absolutaj certaĵoj. La estantaĵoj per si mem estas miksitaj kaj plenaj de malklareco; la komplikeco de la faktoj estas tia, ke oni konfuziĝas en ili. Robespierre simpligis ilin al li, prezentis al li la bonon kaj la malbonon en simplaj, klaraj formuloj Federaciismo, nedividebleco: en unueco kaj nedividebleco estas la savo, en federaciismo, la malsavo. Gamelin ĝuis la profundan ĝojon de kredanto, scianta la vorton, kiu savas, kaj la vorton, kiu kondannas. De nun la Revolucia Tribunalo, kiel antaŭe la ekleziaj tribunaloj, juĝos pri la absoluta krimo, pri la parola krimo. Kaj ĉar li havis la spiriton religian, Evaristo akceptis tiujn rivelojn kun severa entuziasmo; lia koro ekscitiĝis kaj ĝojis pro la ideo, ke de nun por distingi la krimon kaj la senkulpecon, li posedas simbolon. Vi anstataŭas ĉion, ho trezoroj de la kredo!

Saĝa Maksimiliano lin lumigis ankaŭ pri la perfidaj intencoj de tiuj, kiuj volis egaligi la havaĵojn kaj disdividi la bienojn, ĉesigi la riĉecon kaj la malriĉecon kaj starigi por ĉiuj la feliĉan mezecon. Logite de iliaj sentencoj, unue li

kun la principoj de vera respublikano. Sed Robespierre, per siaj paroladoj ĉe la Jakobanoj estis malkovrinta al li iliajn intrigojn, kaj koniginta, ke tiuj homoj, kies intencoj ŝajnis puraj, celis la renverson de la Respubliko, kaj timigis la riĉulojn nur por krei al la leĝa aŭtoritato potencajn kaj nepacigeblajn malamikojn. Efektive, tuj kiam la posedo minaciĝis, la tuta loĝantaro, despli konservema pri siaj havaĵoj, jupli malmultajn ĝi posedis, sin subite returnis kontraŭ la Respubliko. Timigi la profitaron, tio estas konspiri. Ŝajne preparantaj universalan feliĉon kaj regon de la Justeco, tiuj kiuj proponis kiel celon alpenindan por la civitanoj la egalecon kaj la komunecon de l' havaĵoj, estas perfidantoj kaj krimuloj pli danĝeraj ol la federaciistoj.

Sed la plej granda revelo, kiun estis alportinta al li la saĝeco de Robespierre, estis la krimoj kaj la malnobleco de l' ateismo. Gamelin neniam estis neinta la ekziston de Dio; li estis deisto, kaj kredis je Providenco, kiu zorgas la homojn; sed konfesante al si, ke li konceptas nur tre malklare la superegan Estajon, kaj tre amate la konsciencliberecon, li volonte akceptis, ke honestuloj povas, laŭ la ekzemplo de Lamettrie, de Boulanger, de barono D' Holbach, de Lalande, de Helvetius, de civitano Dupuis, nei la ekziston de Dio, sub kondiĉo starigi naturan moralon kaj trovi en si mem la fontojn de la Justeco kaj la regulojn de virta vivo. Eĉ li estis sin sentinta simpatia kun la ateistoj, kiam li estis vidinta ilin insultataj kaj persekutataj. Maksimiliano malfermis lian spiriton kaj malŝtopis liajn okulojn. Per sia virta elokventeco, tiu granda homo rivelis al li la veran karakteron de l' ateismo, ĝian naturon, ĝiajn intencojn, ĝian efikon; li pruvis al li, ke tiu doktrino, formita en la salonoj kaj la buduaroj de l' aristokrataro, estas la plej perfida elpenso, kiun la malamikoj de l' popolo trovis por ĝin senmoraligi kaj sklavigi; ke estas krime, fortiri el la koro de l' malfeliĉulojn la konsolan penson pri rekompensante Providenco, kaj lasi ilin sengvide kaj senhaltige al la pasioj, kiuj malaltigas la homon kaj faras el li malnoblan sklavon; kaj fine, ke la monarĥana Epikurismo de ekzemple Helvetius, kondukas al malmoraleco, krueleco, ĉiuj krimoj. Kaj de kiam la instruoj de l' granda civitano estis edukintaj lin, li malamegis la ateistojn, precipe kiam ili estis tiaj kun malfermita kaj ĝoja koro, kiel maljuna Brotteaux (Broto)."

Ni citos nun kelkajn dirojn de ĉi tiu ĵusnomita maljunulo, diskutanta kun religiulo, kiun li loĝigas, danĝere pri sia vivo, en sia subtegmenta ĉambraĉo:

„Pri via Dio, mia Patro, kiel vi juĝas lian konduton en la nuna revolucio?

— Mi ne komprenas vin, sinjoro.

— Epikuro diris: Aŭ Dio volas malebligi la malbonon kaj ne povas, aŭ li povas tion kaj ne volas, aŭ li nek povas nek volas, aŭ li volas kaj povas. Se li ĝin volas kaj ne povas, li estas senpotenca; se li ĝin povas kaj ne volas, li estas malvirta; se li ĝin nek povas nek volas, li estas senpotenca kaj malvirta; se li ĝin volas kaj povas, kial li ĝin ne faras, mia Patro?

Li estis rimarkinta, ke dum la forteco de l' juneco la religioj estas plej furiozaj kaj kruelaj, kaj ke ili mildiĝas maljunigante. Tial li deziris, ke oni konservu la katolikismon, kiu estis formanĝinta multe da viktimoj je la tempo de sia forteco, kaj kiu nun, premate sub la pezo de la jaroj, kun negranda apetito, kontentiĝis per kvar aŭ kvin rostroj de hereziuloj en cent jaroj.”

Trad. R. D.

LA SOCIETO.

Novaj aliĝoj.

S-ro Depardieu, Usine des Eaux, Arras, Francujo.
S-ro Reinhard Eisner, 31 Kaiserstr., Nürnberg, German.

Ŝanĝo de adreso:

S-ro & S-ino O. Bünemann, 24 via A. Saffi, Milano, Ital.

Eksiĝis:

Schlatt (mortinta); Erichsen (for, sen adreso); Lock.

KASO Nov. 1912.

Enspezoj:

Reportite	Fr. 175,35
Kotizaĵo Liberiga Stelo, Sens	2,50
„ Redondo	2,50
„ Depardieu	2,50
„ R. Eisner	2,40
„ Czubrynski	2,40
„ P. J. Richard	2,60
„ T. Soriano	2,50
„ Perros	2,50
Sume	195,25

Elspezoj:

Poŝtmarkoj	Fr. 4
Dogano (pako)	2,55
En Antwerpen	8,30
Sume	14,85
En kaso Fr. 180,40 (Sm. 71.43).	

Liberpensulojn nepre interesos INTERNACIA SOCIA REVUO, monata socialista gazeto. — Redakcio: W. NUTTERS, Ostadestraat 94, Amsterdam (Nederlando). Abonprezo: jare 1 Sm.; duonjare 1/2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London.

Serio da broŝuroj de „Int. Socia Revuo“:
La Evangelio de la Horo, el franca lingvo de PAUL BERTHELOT: prezo 8 sd.
Kio estas socialismo, el itala lingvo, de ENRICO FERRI; prezo 8 sd.
Pri la Esenco de Konstitucio, el germana lingvo, de FERDINAND LASSALLE; prezo 8 sd.
Mendebaj ĉe adm. de „Int. Socia Revuo“, Nederlando, Amsterdam, Ostadestr. 94. Konto ĉe la Ĉekbanko.

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de

D-ro L. L. Zamenhof.

Administracio: HACHETTE & K-jo.
Paris. — 79, Boulevard St. Germain, 79. — Paris.

JARABONO: Francujo: Fr. 6.— (Sm. Fr. 2.40).
Ceteraj landoj: Fr. 7.— (Sm. Fr. 2.80).

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

Eliranta inter la 15 kaj la 20 de ĉiu monato

La plej malnova el ĉiuj gazetoj Esperantistaj
Fondita en 1895

La plej enhavoriĉa!

Le plej malkara!

48

PAĜOJ da dense presita teksto en plej korekta kaj plej klasika stilo.

5

FR. (2 Sm.)
Abonprezo por
UNU JARO

Por ricevi specimenon oni sendu unu poŝtan respondkupponon
Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 Sm. (Fr. 2.50)

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizajojn al S-ro B. F. SCHUBERT, 1505, North Capitol Str., Washington, Usono. Kotizmono kun bulteno: 50 c. = 1 Sm.

Bonan Jaron ni deziras, persone kaj familie, al ĉiuj niaj geanoj! Progresan Jaron ni volas, kaj, eble, ni faros al nia Societo, al ĉiuj pensoj liberaj!

LA HOMO,

El la libro „DAS LIEBESLEBEN IN DER NATUR“, (La amvivo en la naturo) de W. Bölsche.

I. EKKONO KAJ VIVO.

Por niaj idoj.

Kiam oni celas, kiel nia societo, antaŭ ĉio homedukon, kiam oni havas nepre por si la estontecon, oni ne povas ne pensi pri la infanoj. De nun do Libera Penso difinas ĉiam parton por ili. De nun, societanoj gepatroj, vi avertu viajn ideojn ke la stela fofo estas ankaŭ ĉi.

Miestis besto, mi ne estas plu, kial mi hontus do? — La homo estus deveninta de la simio?... Jes, tion hodiaŭ la paseroj fajfas de l' tegmentoj... La profesoroj ĝin docentas. La filistro ĝin komencas kredi... Kaj l' infanoj de Dio kaj l' infanoj de l' mondo bataladas pro ĝi... Kaj tamen la pli granda amaso de l' homaro estas tiel ege trompita per ĝi. Ĉar la fakto kuŝas tute alie por ili. Demando estas ĉu ni jam, ĉiu por si, estas reale homoj.

Ili trovos jam en ĝi mallongajn lingvajn ekzercojn, baldaŭ amuzajn legojn; eĉ ili mem kunlaboros poste al la redaktado: ni faros al ili demandojn; ili (unue per helpo de l' patro aŭ patrino, kiu nur tenos la esperantan plumingon) sendos la respondon de sia simpla koro kaj de sia knaba sperto. Ili ankaŭ skribos al ni — tio estas al si reciproke — la rimarkon, la scivolojn, la dezirojn, kiujn inspiros al ili la vivo ekobservata, la penso maltimiganta.

La vera limo inter besto kaj homo ne troviĝas en la grizo de praaj tagoj, inter kranioj, el kiuj la unu per sia cerba grandado superas l' alian je kelkaj kubikcentimetroj. Ĝi iras meze tra la homoj de hodiaŭ kiel granda ruĝa tranĉo. Ĝi disigas la homon kiu serĉas ekkonon de tiu, kiu nur vivas.

Malofta estos je tiu interparoleto, sed eble despli impresa. Ni ne bezonas amason da semoj; la tero estas bona (la gepatroj ne kontraŭdiros), la medio favora, la ĉielo libera: forte kreskos la ideoj!

La homo kiu nur vivas, hodiaŭ ankoraŭ ne per unu colo superas la beston. Li povas tute ne deveni de ĝi, ĉar li estas ĝi ankoraŭ. Li sidas kiel la akaro sub la fromaĝkloŝo, havante antaŭ si ĉi tiun senfinan fromaĝmonton de l' vivo. Li manĝas kaj puŝas kaj sin defendas intersanĝe kun akarfiero kaj akarrezigno. Kelkafoje li ekfrapas al la granda ŝtonmalmola fromaĝkloŝo. Tiam li ploraĉas, ĉar io estus falinta sur lian kapon, por kio li trovas tiam nomon, ian malnovan sorĉan kaj saman nomon de sia nutristinedukado.

ALFABETO.

Amu	Gajnu	Klara	Scio
Belon	Ĝojon!	Lumo	Ŝprucas
Ci ne	Ho! en	Monto	Tra la
Ĉesu	Ĥoron	Nobla	Urboj;
Doni	Iru	Ondo	Aŭdu!
El ci	Jam, kaj	Pura	Veron
Fratan koron.	Ĵetu floron!	Ridas rave;	Zorgu brave!

La homo de l' ekkono per sia unua puŝo disbatas la kloŝon... kaj vidas lumi stelojn, mondojn, laktostratojn. La homo ordinara estas ankoraŭ la ludo de mil nekomprenitaj, blinde en li agantaj instinktoj, atavismoj, akomodajoj, ŝirmiloj, singardoj kaj konsideraĵoj de l' homo de transiro. Ĉio, kiel egale ĝin havas la besto. La alia homo sian tutan valoron metis sur unu finakomodajon, konscia pensado pri la mondo. Tion besto ne havas. Tiu ĉi homo staras super la besto. Ĝuste li povas senembarase diri pri si, ke liaj prapatroj antikvegaj estis iam reale bestoj, ankaŭ en l' eksteraĵo, kun haroj kaj ungegoj kaj vosto kiel en la legendo de Satano. Lin ne ĝenas tio. Li ja mem elestas, kaj tio estas la ĉefajo!

LA CIFEROJ.

Nur unu buŝo por babili. Sep la gamnotoj por muziki.
Sed du oreloj por aŭskulti. O kfoje ok por kokinkanti.
Nu, tri ekpenoj por sukcesi. Naŭ belaj Muzoj por kleriĝi.
Jen kvar anguloj por kurludi. Ĉu dek aĝjaroj por saĝiĝi?
La kvin fingretoj por tenadi. Al vi cent batoj kiel puno,
Ses grandaj tagoj por labori. Aŭ tuj mil kisoj al patrino!

Li revidas en la jarmilojn de la kulturevoluado. Kaj ĉiam

701 801-e

tie jam du bordoj. Malgranda amaseto kiu transsaltas. Jen homoj! Ne ekstera rango ilin difinas. Nepre ne, kvazaŭ ili transsaltus per helpo de kronoj, insignoj kaj banknotoj. Estas nudaj animoj, sed kun lumanta rigardo, kun rigardo de sopirego kiu fandas ferajn ĉenojn kiel neĝon. La plej bonaj el ĉiuj tempoj transvenis. Buddah estis homo. Sokrates estis homo. Epikuro estis homo. Spinoza estis homo. Ĉiuj devenis de l' simio: ili estis superintaj ĝin.

Ili tie transe bastoniĝu aŭ ankaŭ trankviliĝu pri la tezo: ĉiam ili estas malpravaj kaj ĉiam ĝi restas pikilo por ili. Ili ne devenas de dioj, kiel ili deziras. Ili estas besto, ne diido. Sed ili ankaŭ ne jam devenis de l' besto. Ili estas ĝi ankoraŭ mem. Antaŭ miljaroj jam ekzistis homoj, kiuj ne estis plu besto. Hodiaŭ ankoraŭ ekzistas miloj da homoj, kiuj ne estas jam „homo“.

Sed ĉi tiu tranĉo ankaŭ iras tra ĉiu aparta homa fako, kiun ajn vi elektas. Ni parolu pri l' amo. Vi diras ke la homo devenas de l' simio. Kaj de pli sube ankoraŭ. De aro da bestoj. Ĝis la praĉelo. Darwin ĝin instruas. Kaj nova scio de nia tagoj ĉi tie komenciĝas. Kaj de ĉi tie do ankaŭ la amproblemo volas esti rigardata denove. Sed tio antaŭe devas esti klarigata: ankaŭ en la kompreno de l' amo la tranĉo unue iras tra inter homo kaj homo... homo ordinara kaj homo pripensema. Vidante tute klare ĉi tie, vi vidas eĉ tuj plu apartaĵon por nia kazo... Forjetu fojon vian ekkonemon. Estu unu el tiuj homoj, kiuj ne estas fakte jam homoj... Kaj nun en tiu vivo amebrio... Virino en viaj brakoj... Amo... Ne ekkonaĵo, sovaĝa faro... Nun vi estus tute kiel tiu ĉi naturo ĉirkaŭanta vin. Kio vin disigas de la florpolvero, kiu flugas tra l' aroj, de l' enamiĝa noktuo, kiu vokas en la pinoj, de ĉia dezirego kaj malkvieto en birdo kaj ĉasaĵo kaj floro kaj arbo ĝis suben al la konkono en la mallumkovrita lagoprofundo? Ili kiel vi, vi kiel ili... Bedaŭrinda malsaĝulo... Ankaŭ tio nur estas trompiĝo. Vi estas ankoraŭ besto, sed vi ne estas plu ĉiom besto. Vi ne estas jam homo. Sed ankaŭ vi jam kovritakape troviĝas sur la vojo al la homo. Jus vi, kiu nur volas vivi, vivas kaj amas jam ne kiel arbo, konkono kaj noktuo tie. Ĉirkaŭ vi volviĝis grandega korseto el ĉiaj provoj, trovsercoj, akomod-eksperimentoj inter vere malsupra besto kaj vere supra homo... Ankaŭ en l' amo kaj precipe tie... Vi volas libere ami en sankta somera nokto, sen ekkono, sen penslumero: kaj kio vin ĉirkaŭungegas kiel la hidro de l' mito? Angoro, ĉagreno, prudeco, moralaj konscienciprotoj ĉiuspecaj, miliono de formulaĵoj, mallarĝigoj, duboj. En ŝvito kaj turmentoj vi kuŝas fiksite. Ne plu arbo kaj konkono, ankoraŭ ne homo de ekkono. Vi volas vivi en l' amo... kaj malhela ruĝo tegas vian fidelan vizaĝon, ruĝa de l' honto. Serĉu la konkono tie sube en la lago, demandu la sempolveton de la kreskaĵo, kiu en dezirego ŝvebas sur la misteraj noktaeroj: ĉu ili ruĝiĝas en la amrevo?...

Malnova legendo eksonas, kun ekskuiga vereco. Tamen nur parta vereco. La legendo ja estas malnova kaj konis de la okazintaĵoj nur l' unuan parton. Adamo kaj Evo estas en la paradizo... Nudaj sed gajaj... Ili vivas kaj amas kiel konkono, floro kaj arbo, senkulpe. Ilia vivo estas sia penso. Ne ekzistas duboj, ne novo kaj malnovo. Sed en la paradizo kreskas la arbo de la Ekkono. Ili manĝas de ĝi nur unu pomon. Tiam surfalas ilin kiel frosttremo. Anĝelo kun fajra glavo staras antaŭ la naturparadizo. Kaj ili estas en dezerta kampo, solecaj. Kaj ili vidas ke ili estas nudaj. Ilia amo

estas peko. Ili plektas al si antaŭtukon kaj kovras siajn seksorganojn. Ili ne plu estas kiel konkono, floro kaj arbo. Ili estas forpeltitaj, perditaj, malbenitaj....

Ĉi tie finiĝas la legendo. Ĝi estas la fabelo de miljaroj de l' fariĝanta homaro. La legendo tamen ne finiĝas ĉar la evolucio finiĝis, sed ĉar oni tiam ne sciis jam la daŭrigon, kiam oni elpensis ĝin.

Hodiaŭ ankoraŭ miloj kaj miloj staras ĉi-tie, kaj tial, kiel ĝuste, ili ankaŭ la legendon estimegas kiel sanktan tradicion, kiu neniam povas progresi. Sed en la miljaroj tiu malgranda amaseto transvenis trans tiun ruĝan fendon en la novan regionon. Kaj ili trovis la daŭrigon, per kiu nur la legendo fariĝas veraĵo.

Adamo kaj Evo frandis de l' ekkono, sed ne decide nutriĝis de ĝi. Ili estis nur la antaŭhomo. Ne plu besto. Ne jam homo. La simplan vivon ili perdis, sed ankaŭ de l' ekkono ili posedis ne pli ol buŝenhavon, ĵus sufiĉe unue al amareco. Tie ĉi tiam komencis longa, longa migrado. Longa, profunda, malfacila evoluado. Sed unu tagon Adamo kaj Evo revenis al la paradiza pordo. Ili estis ree nudaj kaj ridis pri la ursofelo, kiun ili tiam en neeldirebla angorego volvis ĉirkaŭ siaj koksoj tremantaj. Sed super ilia nova nudeco nun fluis io kiel diamanta ŝajno. Ili fariĝis veraj homoj, homoj, kiuj postulis ekkonon, kaj ne nur volis frandi. Kaj antaŭ ĉi tiu postulo la malnova serafo kun sia glavo forandigis kiel neĝo. Ili eniris en la paradizon kaj kuŝiĝis sub la senfina verda baldakeno de l' Arbo de la Ekkono. Ĉiu folio estis laktostrato kaj ĉiu ruĝa floro estis nova ŝtupo de la evoluado. En la ombro de ĉi tiuj folioj kaj floroj ne ekzistis hontiga nudeco. La ekkono estis ree tute nuda kiel maja rozo, al kiu ankaŭ la plej hontema ne volus supertiri bankalsonon. Kaj tamen ili ne estis plu ĉi tiu rozo. Ili estis homo.

Esperantigis J. LOHMANN.

NOTO. Ĉiuj legantoj negermanaj, al kiuj plaĉis ĉi tiu peceto, estas petataj sendi esperantan salutleteron al s-ro W. Bölsche, Schriftsteller, in Friedrichshagen, bei Berlin (Germanujo) aldonante Ĉefeĉlosilon por germanoj, ĉie haveblan, kaj same provante lin konvinki pri la utileco de Esperanto precipe por la liberpensismo. La gajnado de ĉi tiu viro, kies libroj estas tre disvastigitaj tra tuta Germanujo, estus gravega gajno por nia movado inter liberpensuloj kaj entute. Tio estus nova sed efikega propagando, kiu ankaŭ al nia societo povus tre utili.

LA PESIMISMO.

La pesimismo estas malgaja teologia heredato. Mi estas optimista, tial ke mi kredas en la destinoj de mia raso, mi kredas en la scienco, mi kredas en la progreso, mi kredas en la estonteco de mia lando. Mi estas optimista, tial ke feliĉeco ne estas en la ĉielo sed sur la tero; ne for de ni mem. La franca poeto Sully Prudhomme por feliĉigi du personojn el unu el siaj poemoj, malproksimigis ilin de la homoj. Oni diras: estas kontraŭseno ke scienco eliris armita el la kapo de Minervo; estas necese ke feliĉeco eliru armita el niaj koroj kaj el niaj voloj.

Kio malhelpas la homan feliĉecon estas sociaj antaŭjuĝoj. La unua batalota antaŭjuĝo estas la timo al ĝeheno. La

morto estas tiel normala okazintaĵo kiel la vivo. Science, ĝi estas progreso, tial ke ĝi aliformigas. Kio okazus al la homoj se ili estus eternaj kaj la institucioj havus absolutan karakteron?

La dua antaŭjuĝo estas tiu de la rasoj. Se oni proklamas la liberecon de konscienco, kial ne proklami la egalecon de rasoj? Ne la haŭtkoloro sed la morala kapableco malkunigas la homojn.

La tria antaŭjuĝo, tiu de klasoj kaj seksoj, estas en la sama kazo; ili estas vestaĵoj de antikvaj civilizacioj, kiujn la moderna jura opinio malŝatas je la nomo de la socia konscienco.

La libera penso, kiun oni povas kaj devas konsideri kiel scienco, kiel sociologia aspekto, estas precipe antaŭ ĉio batalo kontraŭ la antaŭjuĝoj, kiuj malhelpas la feliĉecon, kiun egale rajtas ĉiuj homoj kaj ĉiuj popoloj.

MAGALHAES LIMA (Trad. F. REDONDO).

Mia onklo Benjameno.*)

de CLAUDE TILLIER (Francujo), 1801-1874.

(Daŭrigo.)

— Iru al la diablo kun ĉiuj ĉar kaj do. Ĉi, kiu estas scienculo, ĉi rezonas per sia inteligento; mi, kiu estas via asignoportisto, mi sentas per mia konscienco. Mi asertas, ke ĉiu homo, kiu akiras sian riĉecon per aliaj rimedoj ol sia laboro kaj siaj talentoj ne estas juste posedanto de ĝi.

— Estas tre bone, tio kion ĉi nun diras, Machecourt, ek-kriis mia onklo; ĉi estas perfekte prave. La konscienco, jen estas la plej bona el ĉiuj logikoj, kaj la ĉarlataneco, sub kia ajn formo ĝi sin kaŝas, estas ĉiam trompŝtelo. Nu, rompu ni nian maŝinon, kaj ne plu parolu pri ĝi.

Tiel konversaciante, ili proksimiĝis al la vilaĝo Moulot; ili ekvidis, sur la sojlo de pordo de vinarbejo, iaspecan soldaton profunde enkadrigitan inter la rubusoj, kies brunaj kaj ruĝaj tufoj vunditaj de la frosto, intermikse falis kiel hararo. Tiu homo havis sur la kapo pecon de kornĉapelo sen kokardo; lia ruina vizaĝo havis ŝtonan nuancon, tiun oran nuancon, kiun havas la antikvaj monumentoj sub la suno. Du grandaj blankaj liphararoj enkadrigis lian buŝon kiel du krampoj; li estis kovrita per malnova uniformo. Sur unu el la brakvestoj etendiĝis transverse malnova forfrotita galono.

La alia brakvesto, senigita de sia insigno, prezentis jam nur rektangulon, kiu distingiĝis de la cetera ŝtofo per lano pli nova kaj pli malpalnuanca. Liaj nudaj kruroj, ŝvelintaj pro la malvarmo, estis ruĝaj kiel betoj. Li faligis el kukurbo kelkajn gutojn da brando sur malfreŝajn pecojn nigra pano; pudelo de l' granda speco sidis antaŭ li sur sia postaĵo, kaj atentis ĉiujn movojn liajn, simila al mutulo, kiu aŭskultas per okuloj la ordonojn, kiujn donas lia mastro.

Mia onklo estus preteririnta plivole branĉelpendaĵon, ol tiun homon. Haltante sur la rando de la vojo:

— Kamarado, li diris, jen malbona matenmanĝo!

— Mi faris eĉ pli malbonajn, sed Fontenoy (Fontnúa) kaj mi, ni havas bonan apetiton.

*) Tia estas la formo uzita de D-ro Zamenhof, kiun ni uzos de nun anstataŭ Benjamino. Bonvolu tiel korekti en la antaŭaj numeroj.

— Kiu Fontenoy?

— Mia hundo, tiu pudelo, kiun vi vidas.

— Diable, jen bela nomo por hundo. Efektive, la gloro estas ja por la reĝoj: kial ĝi ne estus por la pudeloj?

— Tio estas ĝia militnomo: ĝia familia nome estas Azor.

— Kaj kial vi ĝin nomas Fontenoy?

— Ĉar je l' batalo je Fontenoy, li militkaptis anglan kapitanon.

— Nu kiel do? diris mia onklo tute mirigita.

— Tre simple, haltigante lin per unu basko de lia vesto ĝis mi povas meti la manon al li sur la ŝultron; tia kia li estas, Fontenoy estis citata je la tagorde de l' armeo kaj havis la honoron esti prezentata al Ludoviko la XV-a, kiu bonvolis diri al mi: „Sergento Duranton, jen vi havas belan hundon!”

— Jen reĝo tre afabla por la kvarpieduloj; mi miras, ke li ne donis nobeldiplomon al via pudelo. Kiel do okazis, ke vi forlasis la servadon de tiel bona reĝo?

— Ĉar oni faris al mi malrajtaĵon, diris la serĝento, kun okulo fajra kaj nazo ŝvelanta pro kolero: jam de dek jaroj mi havas tiujn orajn ĉifonojn sur la brako; mi faris ĉiujn militojn de Maŭrico de Saksujo, kaj mi havas sur la korpo pli multe da cikatroj ol estus necese por fari du servetatojn. Ili estis promesintaj al mi la epoleton; sed nomi oficiro filon de teksisto, tio estus skandalo sufiĉa por ekstarigi sur la kapoj ĉiujn kolombflugilajn hararojn de l' reĝolando Francujo kaj Navarujo. Ili pasigis super mi iaspecan kavaliroton freŝe rompintan sian paĝian ovŝelon. Ĝi taŭgos tamen lasi mortigi sin, ĉar ili estas bravaj; oni ne povas rifuzi tion al ili; sed ĝi ne scias diri: kapon... dekstren!

Je tiu parolo de la militteorio forte akcentita de l' serĝento, la pudelo soldate turnis la kapon dekstren.

— Atentu, Fontenoy! diris lia mastro: ĉi forgesas, ke ni ekŝiĝis de la servado. Kaj li reparolis: Mi ne povis pardoni tion al la Reĝo Tre Kristana; de tiu momento, mi malpacigiĝis kun li, kaj mi postulis de li mian forpermeson, kiun li ĝentile donis al mi.

— Vi bone faris, Bonulo, ekkriis Benjameno, frapante sur la ŝultron de la maljuna soldato, malsingarda gesto, kiu preskaŭ igis la pudelon lin manĝegi. Se mia aprobo povas esti al vi agrabla, mi ĝin donas al vi plene. La nobeloj neniam malutilis al mia rangaltiĝo; sed tio ne malhelpas, ke mi malamas ilin tutkore.

— Almenaŭ ĝi estas malamo nur teoria, interrompis mia avo.

— Prefere diru malamo filozofia, Machecourt. Nobelego estas la plej absurda el ĉiuj aferoj. Ĝi estas evidenta ribelo de la despotismo kontraŭ la Kreinto. Ĉu Dio faris pli altaj unu ol la alia la herbojn de la paŝtejo? ĉu li gravuris ŝildojn sur la flugiloj de l' birdoj aŭ sur la felo de l' bestoj? Kion signifas tiuj superaj homoj, faritaj de reĝo per sigelakto, kiel estas farataj doganisto kaj revendisto? „De l' tiutaga dato, vi rekonos sinjoron Tian kiel supera homo. Subskribis Ludoviko la XVI-a, kaj sube Choiseul.” Ho kiel bone starigita estas jena supereco!

Malnobelo estas farata grafo de Henriko la IVa, ĉar li prezentis bongustan anseron al tiu Majesta Moŝto; kaponon kun la ansero, kaj li estus farita markizo; bezonus nek plimulte da inko nek da pergamento por tio. Nun la idoj de tiuj homoj rajtas nin bastoni, nin, kies prapatroj neniam havis okazon por prezenti al reĝo flugilaĵon de kortbirdo.

— Kaj vidu ja de kio dependas la grandecoj de tiu mondo!

Se la ansero estus iom pli aŭ malpli kuirita, se oni estus metinta fingroprenon de salo plie aŭ da pipro malplie, se estus falinta iom da fulgo en la fritpladon aŭ iom da cindro sur la pantranĉaĵojn, se oni estus ĝin alportinta iom plifrua aŭ malfrue, estus en Francujo unu nobela familio malplie. Kaj la popolo klinas la frunton antaŭ tia grandeco! Ho! mi volus, kiel Caligula pri la romana popolo, ke Francujo havu nur unu paron da vangoj por vangfrapi ĝin.

Sed diru, malsprita popolo, kian voloron do vi trovas en la du literoj, kiujn tiuj homoj metas antaŭ sia nomo? ĉu tio aldonas unu colon al ilia kresko? ĉu ili havas plimulte da fero ol vi en la sango? plimulte da cerba medulo en la osta skatolo de sia kapo? ĉu ili povus manteni glavon pli pezan ol la via? ĉu tiu miriga „de” kuracas la cikatrojn? ĉu ĝi gardas sian posedanton kontraŭ la koliko, kiam li tro vespermanĝis, aŭ kontraŭ ebrieco, kiam li tro trinkis? Ĉu vi ne vidas, ke ĉiuj tiuj grafoj, baronoj, markizoj estas grandaj literoj, kiuj malgraŭ la loko, kiun ili okupas en la linio, tamen havas nur la valoron de simplaj literoj? Se Granda Duko kaj arbaristo estus kune en amerika stepo aŭ meze en dezertego Sahara, mi volus ja scii, kiu el la du estus plej nobela?

Ilia tria prapatro svingis la glavegon, kaj via patro fabrikis kotonĉapojn, kion tio pruvas por ili kaj kontraŭ vi? ĉu ili naskiĝas kun la glavego ĉe la flanko? ĉu ili havas ĝiajn markojn gravuritajn sur la haŭto? Kio estas tiu grandeco, kiu transpasas de patro al filo, kiel nova kandelo, kiun oni ekbruligas per kandelo estingiganta? Ĉu la fungoj, naskiĝantaj sur restaĵoj de mortinta kverko, estas kverkoj?

Kiam mi ekscias, ke la reĝo kreis nobelan familion, ŝajnas al mi vidi kulturiston plantantan en sia kampo grandan malspritan papavon, kiu infektos dudek sulkojn per sia semo, kaj produktos ĉiujare nur kvar ruĝajn foliojn.

(Daŭrigota.)

LA SOCIETO.

Rezulto de l' voĉdonado.

Ĝisnun ricevitaj... trideko da voĉoj.

Pri la forigo de politiko el la bulteno, 18 voĉoj el 26 estas kontraŭ la forigo, 6 konsideras precipe la oportunecon kaj proponas ke la demando estu resendata al la kunveno 1913, 2 proponas ke la bulteno traktu nur ideojn, komunajn al ĉiuj membroj, do nek politikajn nek eĉ religiajn.

Atendante ke la Ĝenerala Kunveno en 1913 klare difinos la vorton „politiko” kaj decidus ĉu nia societo Libera Penso celas defendi la liberecon de ĉiu penso kaj gastu en sia bultenon ĉiun persekutitan verkon, aŭ propagandi la opiniojn de siaj membroj, ni pensas ke ni kontentigos la deziron esprimitan en Krakow ne per ŝanĝo de nia spirito kaj malfideleco al nia regularo, sed per singardemo kaj neatakemo en nia maniero.

Novaj aliĝoj.

S-ro J. Lohmann, 2 Südstrasse, Verden (Aller) German.
S-ro F. Ransohoff, 41 Gladstone st., London S. E., Angl.

Eksigis:

Vilardell. Entute 227 membroj.

Ŝanĝitaj adresoj.

S-ro P. J. Richard, ĉeftelegrafisto, rue Roger, quartier Delaup, Cannes, Franc.

S-ro A. Zednik, oficisto de Bohema Industria Banko Nachod, Bohem.

Kaso Decembro 1912.

Enspezoj:

Reportite	Fr. 180,40
Kotizaĵo 1912 de Nutters (deprenite)	
" " Forestier	2,50
" " Guillemin	2,50
" " G ^o Sebert	2,50
" " Ligo Rajtoj de l'	
H. Sens	2,50
" " Boucon	2,50
" " S-ino Hankel	2,40
" " F-ino Adam	1,90
" " Stanišič	2,90
" " F-ino Fryer	6,30
" 1912 kaj 1913 de Uitterdijk	4,90
" 1913 de Lohmann	2,60
Donaco de F-ino Meunier	12,50
Vendo de prop. kartoĵoj	2,40
Sumo	228,80

Elspezoj:

Papero	Fr. 2,25
Sendite al S-ro Nutters, por pres.)	27,75
kaj sendkostoj Bulteno 9—10)	
Poŝtmarkoj	4
Sume	34

Restas en kaso Fr. 194,80 (Sm. 77,13).

Liberpensulojn nepre interesos INTERNACIA SOCIA REVUO, monata socialista gazeto. — Redakcio: W. NUTTERS, Ostadestraat 94, Amsterdam (Nederlando). Abonprezo: jare 1 Sm.; duonjare 1/2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London.

Serio da broŝuroj de „Int. Socia Revuo”:

La Evangelio de la Horo, el franca lingvo de PAUL BERTHELOT; prezo 8 sd.

Kio estas socialismo, el itala lingvo, de ENRICO FERRI; prezo 8 sd.

Pri la Esenco de Konstitucio, el germana lingvo, de FERDINAND LASSALLE; prezo 8 sd.

Mendeblaj ĉe adm. de „Int. Socia Revuo”, Nederlando, Amsterdam, Ostadestr. 94. Konto ĉe la Ĉekbanko.

Framasonoj!

Abonu la Bultenon por framasonaj interrilatoj, Fr. 3,50.

Direktoro QUARTIER-LA-TENTE,
26 rue des Beaux Arts, Neuchatel, Svisujo.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 Sm. (Fr. 2.50)

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizajojn al S-ro B. F. SCHUBERT, 1505, North Capitol Str., Washington, Usono. Kotizmono kun bulteno: 50 c. = 1 Sm.

Por niaj idoj.

Kantu ĉiun version malrapide laŭ la gamo.

Fervore kantu kun mi tuj!
Nu, supren, ĝis la lasta ŝtup'!
Post paŝo, paŝ'; post peno, pen',
Kuraĝe marŝu ni al cel'!

Kantu ĉiun versaron laŭ alteniranta kaj returnen malantaŭen-iranta gamo.

Altiĝu voĉoj al la ĝust',
Penadu koroj al la just'!

Grandigu nin, ho bona pan'!
Bravigu nin, ho bona san'!

Al suno kreskas verda herb';
La veron serĉas juna cerb'.

La revoj flugas tra l' aer'.
Revenu, saĝo, al la ter'!

Lingvaj ekzercoj: pronomoj.

Falas iu;
Ridas ĉiu;
Kuras kiu
Al plorinto?
Brave tiu!
Ho! neniu
Moke krii
Al falinto.

Ĉe vantulo.

MI estas la perfekto.
Silentu CI, insekto!
LI? homo ordinara.
ŜI? bela, sed vulgara.
ĜI estas certa, ĉar
MI juĝis sen erar'
NI brilas, ĉarma rondo.
VI — kio en la mondo?
Ĝis ILI, la aliaj,
Ne iras pensoj miaj.

Avizo.

Dum la Paska libertempo, la 22, 23, 24an de Marto 1913, okazos en Toulouse la Franca nacia Kongreso de Esperanto.

Ĉar multaj el la partoprenontoj estas ankaŭ membroj de Libera Penso, tiuj kunvenos Dimanĉon 23an je 12 h. por kune tagmanĝi. Tio ne estos ia labora kunveno nek publika manifestado, sed nur amika, senceremonia kunmanĝo. Ĉiuj partianoj de libera pensado estas kore invitataj ĉeesti.

Por bona organizo, oni estas petata sendi kiel eble plej frue sian aliĝon kaj kotizajon Fr. 2 al F-ino C. BEYNARD, 83 route de Revel, Toulouse.

En nobela salono.

La jenan pentraĵon ni elĉerpis el plej sprita romano de franca nuna verkisto Abel Hermant: „Monsieur de Courpière marié” (S-ro de Kurpjer edziĝinta). En la du libroj, kies temo estas la nomita Sinjoro, la klarvida kaj viglega ironisto priskribis tipon de elegantulo tiel instinkte, tiel nature, tiel genie sinvendisto, ke li superas riproĉon. Ni tradukis nur la paĝojn, kie aperas, plej ĝuste observitaj, la klopodoj de nobela, tre miksitaj sed riĉega societo kontraŭ la penso libera.

Mi unue rimarkis konstantecon neimageblan, eĉ ridindan, por malaprobi ĉion, kio estas novdata; decidon unufoje prenitajn atribui ĉiun malbonon, kiu okazas, al la registaro, aŭ pli malprecize al la epoko; facilecon por nomi sektanoj la homojn uzantajn la racion, aŭ eĉ la komunan prudenton; manion reformi la historiajn juĝojn plej bone fiksitajn, ekzemple pravigi la St. Bartolomean nokton aŭ la nuligon de l' „Edikto de Nantes”; sufokan certecon, ke ĉiu katastrofo estas instruo de l' Providenco, kaj pro kio decas ĝoji, precipe kiam oni persone ĝin evitis; fine ekstremojn de plezuro kaj preskaŭ petolsaltojn, ĉiufoje kiam la ĵurnaloj publikigis fenomenon, kiun oni povis, kun iomete da komplezo, ŝajnigi mirakla. Mi citos la eltrovon de l' radiumo, kiu konfuzis ĉiujn kapojn. Ĉar unu el la doktoroj de l' salono estis pruvinta, mi nescias kiel, ke la radiumo kontraŭstaras la fundamentajn leĝojn de la scienco, tiu metalo fariĝis, se mi povas tiel diri, eminente reakciula. Mahulot malfermis en sia ĵurnalo rubrikon pri la radiumo; S-ino Lambercier patrino, kiu ne estis de post semajnoj donacinte la ducent-

milfrankan sumon, aĉetigis plurajn barelojn de la peĉblendo, kaj monprovizis laborejon, por ke oni daŭrigu serĉadojn tiel utilajn al la afero.....

Oni varbis tiam literaturistojn... Mi miris vidi ilin tie. Mi pensis ilin pli sendependemaj kaj larĝeflugaj. Ili donis al mi la okazon rimarki ke, je la epokoj krizaj, kaj mi diros revoluciaj, kiel la nia, la du plej fortaj motivoj de opinio estas la snobeco kaj la timaĉo. Kiam la inteligento albatas la limojn de l' kuraĝo, ĝi rompas siajnflugilojn, kaj la plej alta spirito falas de sia alteco. La amikoj de S-ro de Courpière akceptis tiujn pereintojn, falintajn de la liberaj spacoj en ilian korton.

Mi aŭvenas al la ĉefa okazo, kiu rezultigis la fikson de la doktrino. Aperis en la ĵurnalo de Mahulot, sub la subskribo de Ignaco Lesage, artikolo, kiun mi ne legis, pro du motivoj. La unua estas, ke mi malamas pedantecon, sofisteccon, la polemikajn morojn renovigitajn el la Ligo, kaj ke, spite de la laŭdistoj, kiuj proklamas Ignacon Lesage geniulo, mi juĝas lin ja pedanta, malafabla, fierŝvela kaj stulta. Mia alia motivo por ne legi la artikolon estas, ke mi estis trarigardinta ĝin. Tiu rapida vido estis al mi sufiĉinta por konstati, ke ĝi nur simple reeldonis, sub formo pli skolastika, banalajon, kiun de multaj jaroj oni ĉie surpaŝas: nome, ke la homaro irus tre malrekte, se ĝi lasus sian direktadon al la homoj, kiuj almonopoligas la inteligenton. Mi ne pensis, ke tiaj rediroj estus tre tuŝontaj la opiniantaron, eĉ tiun ĉe S-ro de Courpière: mi multe eraris. Tiu polemikaĵo estis ĝuste la deklaro, kiun ĉiuj atendis. Ignaco Lesage estis ĵus fondinta la unuan principon de la doktrino: li estis senhonte neinta la valoron de la inteligenteco.

Multfoje mi ĉeestis apaŝdancojn ĉirkaŭ kadavro (mi figure parolas), sed mi ne pensas, ke iam mortinto estis tiel ĝoje piedpremata, kiel tiun vesperon ĉe S-ro grafido de Courpière la idolo de la dia Saĝo. Oni ja vidis, ke precipe la virseksuloj prenas revenĝon, kaj satigas malamon malnovan, eble de la kolegia tempo, kiam malestimo de la senprepoziciaj kapabluloj estis ilin humiliginta; malamon malnoblan, pli malnoblan ol tiu de l' malriĉulo kontraŭ la riĉulo, kiun senkulpigas malsufiĉo; malamon heredan, unuvorte vere kastan malamon. Efektive, la vera socia danĝero, ĉu ne estas la disvastigo de l' kompreno? Ili ne estis pli kontentigitaj, eĉ la tagon kiam ili vidis malpurigita, dum proceso pri moroj, la noblan nomon Estetikulo. Kia bonŝanco! Inteligentulo fariĝis siavice insultaĵo, kaj kiu scias, baldaŭ eĉ malpurajo. Tio, kio plidelikatigis ilian plezuron — ĉar ili estas nebonaj ĉe la normalo, sed superaj ĉe la malvirtego, estis ke la anatemo ĵetiĝis kontraŭ la inteligentuloj de homo, kiu ne povis tamen fieriĝi pro alia titolo. Plie, tiun ĉi titolon ja ili per ridiga memkontraŭdiro, apostulis.....

Mi diris la bazon de l' sistemo: la inteligenteco, entute, estis neita. Farinte tiun ekzekuton, la detruisto ne opiniis jam esti finfrapinta la veron, kaj buĉinte ĝin unubate, kiel diras la viandistoj, li ĝin distranĉadis. Li forigis unue la racion. Je la nomo de la pozitiva scienco kaj de la eksperimento li proklamis la vanecon de l' eternaj kaj necesaj principoj; kaj tio, kion li tiel instruis, ne estis ja nova; sed kio estis tia, kaj mirinda, ĝi estis la interpretado, kiun faris de tio liaj zorgatoj: ili ekstremen puŝis la aferon, kaj naive certiĝis, ke kredi „du plus du estas kvar” estas la plej granda pruvo de stulteco.

Uzinte la scienccon por mortigi la racion, la pedantaĉo

mortigis la scienccon, ne plu ricevante utilon el ĝi. Al liaj argumentaj kontraŭ ĝi mankis ankaŭ noveco, kaj mi estis aŭdinta, longatempe antaŭ lia veno, liajn mem nunajn dis-ciplojn prezentantajn similan rezonadon, kiam ili denuncis bankroton de l' homa scio je ĉiu neregulaĵo ĉe la telefona ofico kaj je ĉiu nefunkcio de la aŭtomobilo. Sed malmulte lin interesis la noveco aŭ la kvalito de l' argumentoj: la ĉefo estis nuligi ĉiun konon neakordeblan kun la kredo, kaj konkludi al senescepta skeptikismo, por dogmigi poste senĝene.

Dume, ĉar li estis forjetinta la du provilojn de la vero, kiuj estas la rezono kaj la sperto, li urĝe devis eltrovi aliajn. La liaj estis la tradicio kaj la regista motivo. Ĉio, kio devenas al ni de l' prapatroj, de l' mortintoj, estis laŭ li sankta. Plie, ĉar la superega leĝo estas la savo de l' socio, ĉio kio estas kondiĉo de ĝia ekzisto devas, sen plua informo, konsideriĝi kiel justa, aŭ prefere kiel necesa, kaj kiel morala aŭ vera. Tiel li restarigis ekzemple la religion, kiun li ne kredis, kaj kiun kredi li juĝis tute nenecesa, se nur oni ĝin subtenus kaj uzus kiel regilon.

Ankaŭ pri tiuj diversaj punktoj, plej kurioza estis ne la doktrino de l' majstro, sed la formdifektoj, kiujn suferigis al ĝi la dis-ciploj, kaj la ekstremaj konsekvencoj, kiujn ili tiris el ĝi, sume kun sufiĉa logikeco. Ili forjetis, kiel li, la komunajn provilojn de la vero, sed ili ne alprenis precize la liajn. Ili restis, pri inteligento, ĉe ia „Credo quia absurdum”, kaj pri praktiko ĉe regulo tre konata: „la celo pravigas la rimedojn”.

Ili gaje iris ĝis la fino de l' senprudenteco kaj de la memoraleco, kiuj ŝajnis al ili, dank' al la dialektiko de ilia pedanto, prudento kaj moralo transcendantaj. Ili identigis aliparte la tradicion kun siaj antaŭjuĝoj, kaj la faman registmotivon kun sia kasta utilo aŭ persona profito. Tiaspeca egoismo estas homa kaj instinkta, sed mi juĝas eksterordinara, ke oni ĝin starigas kiel dogmon.

Fanatigitaj de la aŭtoritata kaj malafabla profeto, kiu ilin katekizis, ili malmimigis ĝis perfekta reakciismo, al kiu neniu, eĉ en ilia partio, esperis, ke oni povus iam reveni. Ili estis utopiistoj — kontraŭdirekten, sed utopiistoj, kaj milojaristoj, kiel ĉiuj utopiistoj: ili atendis Mesion, savonton. Ili imagis sin tradiciistoj kaj ili estis Cezaristoj. La pedantaĉo, kiu mirinde komprenis sian aŭdantaron, gajigis siajn sekajn lecionojn per brilarioj, imitante Joseph de Maistre, sian dion. Li faris la laŭdadon de l' providenca soldato; li priskribis iavespere kun ĝuego la sangajn teturaĵojn de l' venonta ribelo, kondukota de l' orduloj. Ŝajnas al mi, ke mi lin aŭdas kiantan inter aplaŭdoj de ĉiuj, precipe de l' timulaĉoj: „Oni krevigos ventron al la kanajlaro! Oni ĝin sencerbigos!” — „Kaj vin, mi pensis, vin oni regilotinos!”

Trad. R. D.

Kopiite en franca urba preĝejo.

Preĝo tre efika. Granda Sanktulo Antono, memoru ke la morto, la eraro, la malfeliĉegoj, la demono, la malsanoj plej gravaj estas forigataj per via peto.

Per vi la malsanuloj rehavas la sanon, la maro kvietigas, la ĉenoj de l' malliberuloj rompiĝas, la kripluloj retrovas siajn membrojn, la objektoj perditaj revenas al siaj rajtaj posedantoj.

La infanoj kaj la maljunuloj, kiuj vin alvokas, estas kontentigataj, la danĝeroj, en kiuj ili sin trovas, malaperas, iliaj necesoj forkuras.

Plena de konfido, mi turnas min al vi. Montru hodiaŭ vian potencon, donante al mi la favoron, kiun mi deziras. Tiel estu!

Miraklaj respondoj. Se vi petas por mirakloj, la morto, la eraro, la malfeliĉo, la lepro forkuras.... k.t.p.

Dio estas en Sia Ĉielo; ĉio ĉe Dio estas en ordo!

Mi kredas, ke estis Browning, la Angla poeto, kiu diris „Dio estas en Sia Ĉielo, ĉio ĉe la mondo estas en ordo”.

Sendube la kristana poeto eraris; male li devis diri: „Dio estas en Sia Ĉielo, ĉio ĉe Dio estas en ordo!”

Je la nuntempo mia vilaĝo maltrankviliĝas per „embriaj” pastroj, kreskantaj misiistoj, homoj, kiuj en la estonto predikos, hejme kaj eksterlande, pri ĉiopova, ĉiabona Dio, kies dolĉa miserikordo, ili diros, kovras ĉiujn liajn farojn.

Mi konsentas, ke multaj el ĉi-tiuj junaj disĉiploj pleniĝas de brulanta zelo por labori pro sia tiel dirita Majstro, Jezuo Kristo. Oni zorgis ilin preparis en teologiaj kolegioj kaj ili nepre kredas ke Jahveh estas la nuruna vera Dio, ke Jezuo de Nazareto estas lia nure naskita filo kaj ke la Sankta Biblio estas lia rivelado, lia malkaŝo al pekanta homaro.

Kredante, kiel ili ja kredas, ke la homoj posedas senmortan animon, kiu postulas aŭ bezonas lavadon en la sango de la ŝafido de Dio, kaj savadon el la eterna kondamno, ili sin oferas al la predikado kaj disvastigado de la tiel nomata Evangelio de la Sinjoro Jezuo Kristo. Tial do, ili rakontas mirigantajn rakontojn pri la efiko de la Jezua Sango; pri tio, kion ĝi jam faris por si kaj pri tio kion ĝi faros por aliuloj. Pro tio ke mi opinias ke oni estas trompinta ĉi-tiujn burĝonantajn pastretojn, ke oni montris al ili nur unu flankon de la temo, mi decidis prediki predikon uzante kiel tekston la vortojn „Dio estas en Sia Ĉielo, ĉio ĉe Dio estas en ordo”. La diro ne estas ŝerco, sed ĝi estas prezentata je tuta seriozeco, kun la espero ke ni, tiumaniere, alvenos al la vero, se eble, pri ĉi tiu multe fanfaronita Evangelio de Sango.

Dio estas en Sia Ĉielo! Unue, kiu aŭ kio estas Dio? Mi ne scias. Ankaŭ la teologistoj ne scias. Dum multaj miljaroj la homoj kreis multajn diojn: diojn sensencajn, diojn ridindajn, diojn virajn kaj virinajn, kaj la plej mirinda dio, kiun ĝis nun oni iam kreis estas sendube la tri-kapa Triunuo de la kristanoj, tiu dio kies diversaj partoj estas patro, filo kaj sankta spirito, aŭ laŭ fama ateista diro „Jahveh, filo kaj kompanio”, tiu mistika kaj mistikiganta tri-en-unu kaj unu-en-tri kiun neniu povas kompreni nek komprenigi.

Ordinare, antaŭ ol kredi, senculoj postulas pruvojn. Sed, kiam oni parolas pri dioj kaj diabloj, eĉ sencaj homoj ofte perdas siajn sencojn kaj kredas la plej nekredindajn historiojn.

Ekzemple, se mi dirus ke iufoje mi vidis bluan drakon ĉirkaŭflugantan la vilaĝan preĝejan turon, miaj kristanaj amikoj nepre ridus je mi. Ili ankaŭ kredeble, dirus ke mi estas aŭ sensenca aŭ ke mi posedas la „bluajn diablojn”

(postdrinka deliro). Tamen, ĉi tiuj samaj nekredantoj kristanaj englutas, pogrande, multe pli malkredindajn fabelojn kiuj troviĝas en la Biblio, pritraktantajn ĉi-tiun sian dion. Ekzemple, ili kredas ke Jezuo Kristo aliformigis akvon en vinon, ke li redonis al blinduloj la vidon, ke li levigis la mortintojn, ke li, per kvin bulkoj kaj kelkaj malgrandaj fiŝoj satigis kvin mil homojn, ke li marŝis sur la maro kaj multajn aliajn malsaĝajn fabelojn. Kial do ili kredas tiajn ridindajn rakontojn? Pro tio ke ili legas ilin en la libro kiu nomiĝas la Sankta Biblio! Sed, kial ili kredas la Bibliion? Ĉi estas nur ordinara libro, enhavante kontraŭdirajn informojn, plena je malmoraj rakontoj, mensogaj diraĵoj, malprava rezonado kaj malhelpaj instrukcioj. Neniu scias kiu estas la aŭtoro de iu ajn parto de tiu libro. Neniu scias kiam ĝi estis skribata, nek kie, nek en kia lingva kaj nenia originala manuskripto estas trovebla en la nuna tempo.

„Dio estas en sia ĉielo”. Kie (en la nomo de l' ĉielo kaj pro Dio) estas la „ĉielo”?

Ree oni devas respondi, neniu scias. Demandu al via pastro kaj li neniel respondos!

Laŭ la Biblia Apokalipso, la ĉielo estas loko iom simila menaĝerion de ĉia speco de strangaj bestoj, kiuj vagadas tien kaj reen, ĉiam kantantaj „Sankta! sankta! sankta! Sinjoro Dio Ĉiopova!” Kaj kara maljuna Dio sidas sur sia trono aŭskultante la ĉiaman blekadon „Sankta! sankta! sankta!”

Estas bedaŭrinde, ke li ne trovas laboron pli utilan kaj pli profitan ol tio!

„Dio estas en sia ĉielo, ĉe Dio ĉio estas en ordo”. Se ĉielo estas loko de senfina ĝojo, kiel la kristanoj diras, certe do ĉio devas esti en ordo ĉe Dio.

Sed, malsupreniru en la mondon, ĉi tiu Dio de l' kristanoj! Li laboru en la minejoj, la fabrikejoj, la laborejoj, kie malsanaj laboristoj laboradas ŝvite por ke la reĝoj, la regantoj kaj la pastroj vivu senlabore, meze de nelaboremo kaj riĉeco!

Eniru ĉi tiu kristana Dio ĉi tiun mondon, lasante sian feliĉan ĉielon, li eniru la amasiĝon de subpremitaj homoj, kie marŝas malsato, malsano kaj morto; kie la fortuloj premeblas la malfortulojn; kie la krueluloj pereigas la bonkorulojn; kie justo kaj bono kaj miserikordo, escepte en tre maloftaj okazoj, estas nur malplenaj vortoj en la buŝo de predikemaj predikistoj de la Palestina pastro, la ŝafido de Dio, kiu diris „La malriĉulojn vi ĉiam havos”.

Mi ne kredas je tiu Dio. Mi diras al vi, leganto, ke li estas neekzistanta, ke li estas nur sonĝo, aĵo fabrikita el la timoj kaj duboj kaj nescio de niaj pravaĵoj kiuj estis miregigitaj de preskaŭ ĉio.

La kristana religio estas mensogema. Ĝi malnoble subtenas institucion kiuj en ĝiaj metodoj estas pli komercema; kiu en ĝia despotismo estas pli kruela; kiu en ĝiaj agoj inter la homoj estas pli maljusta ol eĉ la komerca borsó kun ĉiuj ĝiaj spekulacioj en la „viando kaj sango” homaj.

La mondo bezonas, eĉ kriege vokas, la homan amon, la homan simpation. Ĉie, niaj gefratoj kontraŭbataladas la malmolaĵojn kaj maltrankvilaĵojn de l' vivo. Ĉie la infanoj elploreblas por la pano kiu pereas. Kaj, pastroj kaj paroĥestroj kaj piaj politikistoj preĝas kaj preĝadas al ĉi tiu timema Dio kiu sin kaŝas en sia kaŝejo nomata ĉielo.... kaj, la homaro daŭre suferadas!

Semajno post semajno el miloj de predikaj seĝoj supreniras — la kristanoj tion diras — preĝoj al ĉi tiu ĉiopova, ĉiabona Dio, lin petegante prizorgi la vidvinojn,

esti patro por la georfoj, redoni vidon al la blinduloj, sanigi la malsanulojn kaj komfortigi la malfeliĉulojn.

Kaj semajno post semajno, la larmoj kaj ĝemadoj de la homoj suferantaj, premegitaj de la malpura sistemo kiun ni nomas la „kristana civilizado“, plivastiĝas!

Niaj dimanĉaj-lernejaj amikoj lernigas la infanojn ke ili-kantu „Venu, amikoj, la mondo bezonas riparon“. Imagu mondon kreiton de ĉiopova Dio kiu laŭ la Biblio, ekzamenis sian faritaĵon kaj deklaris ĝin tute perfekta, imagu se eble tiun bonan de-bona-Dio-donitan mondon bezonantan riparadon!

Ne, tute ne! la mondo ne bezonas riparon! la fendigintaj kranioj de ĝiaj piuloj, sen ia dubo, postulas riparon!

Elĵetu, forĵetu viajn diojn kaj diablojn!

Serĉu kaj vi trovos viajn najbarojn kiuj bezonas vian helpon, vian simpation.

Faru bonon, timu neniun, ne eĉ la kristanan Dion, tiel timiganta kiel li estas pentrita, kaj la mondo baldaŭ resaniĝos.

Nur la homo helpas la homon, nur la homo elsendas la amon kiu iom post iom forigos la malsaton kaj la homan mizeron.

Se Dio ekzistas, lia unua devo sen ia dubo estas doni tutklaran konon de si-mem al ĉiu gefilo de la homoj!

Originale verkita de HARRY SHAW, ano de la Angla Liberpenza Asocio.

La libereco de la penso en Anglujo.

Ni elĉerpas el letero de unu el niaj anglaj anoj la jenajn sciigojn sen komentario.

„Pro la malkaŝa prediko de miaj ideoj en la ĉirkaŭaĵo mi estas malamata de centoj de miaj samvilaĝanoj. La pastroj provas min ruinigi, oni persekutas min kaj mian familion ĉial kaj ĉie. Sed spite ĉion, mi ĝojas ke la okuloj miaj estas malfermitaj kaj mi estas preta suferi eĉ la kristanan inferon plivole ol teni fermita la buŝon.

En Anglujo oni devas kontraŭbatali specialajn kondiĉojn kiuj ne troviĝas sur la kontinento. Nur la piuloj sukcesas havigi al si komfortajn oficojn, kaj la laboristoj malfidas tiel multe kiel ili malamas la liberpensulojn. Tiu, kiu sin nomas ateisto sin kondamnas al la plej kruela bojkoto“.

El dialogoj de Voltaire.

Predikistoj kaj milito. — La dungitaj moralistoj, kiujn oni nomas predikistoj, neniam eĉ kuraĝis prediki kontraŭ la milito. Ili deklamas kontraŭ la sentdeziroj, sorbinte sian ĉokoladon. Ili anatemas amon, kaj elirinte el la katedro, kie ili kriis, gestadis kaj ŝvitis, ili sin viŝigas de siaj piulinoj. Ili lacigas siajn pulmojn por pruvi misterojn, pri kiuj ili ne havas eĉ plej etan ideon: sed ili evitas malfamigi la militon, kiu kunigas ĉion, kio en la perfideco estas plej malbrava, ĉe la proklamoj, ĉion, kio en la malnobla friponeco estas plej malinda, ĉe la provizado al la armeoj, ĉion, kio en la rabado estas malbelega, ĉe la kaptado, perforto al virinoj, ŝtelo, hommortigo, dezertigo, detruo. Kontraŭe, tiuj bonaj pastroj benas ceremonie la standardojn de l' mortigo; kaj iliaj kolegoj kantas, pro monpago, hebreaĵojn kantojn, kiam la

tero kovriĝas de sangfluado. La Hebreaĵoj predikistoj iris eĉ pluen. Oni vidas edife la humanajn preĝojn, de kiuj plenaj estas iliaj psalmoj. Temas nur meti la dian glavon sur la femuron, tranĉi ventron al virinoj, dispremi la suĉinfanojn kontraŭ la muro.

Tr. R. D.

LA SOCIETO.

Komitato por 1913.

Prezidanto: S-ro Oscar Bünemann, 24 via Aurelio Saffi, Milano, Italujo.

Sekretario-kasisto: S-ro R. Deshays, Sens, Francujo.

Komitatanoj: S-ro R. Fridrich, Rejskova 10, Prostejov, Moravio; s-ro A. Guillemin, 53 rue Damesme, Paris, Francujo; s-ro F. Schoofs, 45 Kleine Beerstraat, Antwerpen, Belgujo; s-ro B. F. Schubert, 1505 North Capitol st., Washington U.S.A.; s-ro D-ro Stromboli, 3 via Gropallo, Genova, Italujo.

Rezervaj komitatanoj: F-ino Fryer (Anglujo); D-ro Batek, Bohemujo.

Novaj Aliĝoj.

S-ro Vilhosetälä, studento en la universitato, Merilinna, Helsinko, Finnlando.

S-ro C. Hedler, Hahnemannstr. 14 prt., Leipzig, Germanio.

S-ro D. Hallet, Esperantista firmo, Charleroi, Belgujo.

Eksiĝis:

Demoulin, Montaron, Menneveau, Melet, Ricaud.

Entute 225 membroj.

Kaso Januaro 1913.

Enspezoj:

Reportite	Fr. 194.80
Kotizaĵo 1913 Felser	2.50
„ 1912 en 1913 Shaw	5.—
„ Zajchowski	2.40
„ 1912 en 1913 Wolf kaj S-ino	9.90
„ 1912 Fromageot, Nuidan, Coppenet	7.50
„ 1913 Kolomyjski	2.40
„ 1913 Drudin	2.50
„ 1913 Maranhao	2.40
„ 1911, 1912, 1913 Roux	10.—
„ 1913 Calvo	2.50
„ 1913 Ransohoff	3.15
„ 1913 Stromboli	2.50
„ 1912 kaj 1913 Korpelainen	5.—
„ 1913 Gottgetreu	2.50
„ 1912 Vilardell	2.50
„ 1913 F-ino Beynard	3.—
Sume	260.55

Elspezoj:

Poŝtmarkoj	5.—
Preso & sendo No. 11-12, 1912 al S-ro Nutters	33.15
Dogano	0.35
Sume	38.50

Restas en kaso Fr. 222.05 (Sm. 87.91).

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 Sm. (Fr. 2.50)

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizajojn al S-ro B. F. SCHUBERT, 1505, North Capitol Str., Washington, Usono. Kotizmono kun bulteno: 50 c. = 1 Sm.

Por niaj idoj.

Ĉu nun, geamiketoj, vi komencas iom legi nian belan mondlingvon? Ĉu vi komencas fariĝi ne nur Germanknaboj, Francidoj aŭ Amerikanetoj, sed ankaŭ Homidoj, gefratetoj el la tuta tero? Vi vidos, ke vi ĉiuj, en kiu ajn lando vi loĝas, egale komprenos ĉion, kion ni diros al vi, kaj egale inter vi reciproke kompreniĝos.

Jen fabelo por vi farita. Viaj gepatroj povos rakonti ĝin al vi en via naskiĝa lingvo: sed poste vi mem legu ĝin, iom post iom, en la gazeto. Kaj se vi konas ian belan rakonton, kiu tre plaĉas al vi, sendu aŭ sendigu ĝin al ni: ni prezentas ĝin tie ĉi por ĉiuj viaj kamaradoj.

SONĜO DE L' MENSOGULETO.

Patrino devas tuj eliri, lasante hejme sian karan Paŭlon. La knabon zorge preparas kajerojn kaj skribilaron: ĉar la instruisto donis al siaj lernantoj longan laboron por morgaŭ. „Paŭlo, nun vi estas sufiĉe serioza por resti sola, okaze.”

Jen revenas la patrino. „Paŭlo, kion vi faris?” „Mian taskon, patrineton.” „Bone. Prenu tiun ĉi kukon, kiun mi reportis al vi.” Paŭlo manĝas la kukon... Kaj Paŭlo en si ridas: li ricevas rekompencan, nu, anstataŭ labori, li estis esplorinta la grandan misteran ŝrankon, kiun patrino estis forgesinta ŝlosi!

Kiam bona patrino vespere kisas lin en la lito, Paŭlo fariĝas malpli gaja: mensogi al la severa lernejestro, al plendemaj najbaroj, perfekte! Sed al tiel indulga patrino... Tamen li baldaŭ dormas.

Muso kuras en la ĉambro, jen, tie, nun sub ja liton... Prenu mi fajroprenilon por ĝin forpeli, mortigi! Sed kian krion mi aŭdas? — Miaŭ, miaŭ! — Estas kato. La musoj ne scias ja imiti la katan krion. Strange! Ĉu estas vi, muso? — Miaŭ! — Ĉu ĝi volas trompi min? Neeble. Mi nepre eraris, kredante vidi museton.

Jen la pordo malfermiĝas. Jam suno en la ĝardeno. Ho la bela ruĝa pomo! Mi soifas. Ne estas nur la kukoj kiuj plezurigas por manĝi. Delikate mi ĝin prenas: kia allogaodoro! Mordu ni!... Ve! estas ŝtono! Dento rompiĝas, sango fluas! Ho, kion fari, kion fari, se nun eĉ la fruktoj erarigas?

Ho ci, mia brava hundo, mia fidela kamarado, kun kiu tiel gaje mi petolas, venu al mi, konsolu min! Diru, bona hundo, ke la pomo estas malica, malsprita... Boju, boju

kontraŭ ĝi! — Hi ha! hi ha! hi ha! — Kio? ĝi azene blekas? — Hi ha! hi ha! hi ha! — Mi ektemas, mi frostas! ensorĉita, mia hundo? Ho! ankaŭ li volas min timigi, min perfidi! Ĉi mensogas, ĝi mensogas!”

Kaj plorete vekiĝas nia malgranda kulpulo. „Patrino, patrino! Venu! Mi sonĝis terure... ĉio, bestoj, objektoj, ĉio min konfuzis, ĉio ja mensogis, patrino... kiel mi, hieraŭ...” Kaj li rakontas ĉion.

„Vi mem vidis, mia filo, kio estas la mensogo: danĝera, abomena faro! Nu, ne utilas plu plori: pripensu, memoru, kaj unue tuj riparu, rapidante fini la taskon forgesitan.”

R. DESHAYS.

Korektita Avizo.

La kotizajo por la kunmanĝo organizota en Toulouse dum la franca kongreso Esperantista por la Dimanĉo 23a de Marto, de F-ino C. Beynard (83 route de Revel, Toulouse), estas definitive fiksita je Fr. 2.50 (1 Sm.).

La Logiko de la Persekutado.

Tradukita de HARRY SHAW, kun permeso de la aŭtoro s-ro G. W. FOOTE, la fama redaktoro de la angla ĵurnalo „La Liberpensulo” (The Freethinker) ĉiusemajne eldonata kaj mendebla ĉe The Pioneer Press, 2 Newcastle St. London E. C., Anglujo.

Nek la krueleco de tiranoj, nek la ambicio de venkintoj estas farintaj tiom da malbono kaj suferado kiom faris la principo de persekutado. La krimoj de Nero, la ruinigoj de Attila malĝojigis la mondon nur dum mallonga tempo, kaj poste, forgesite, ĉesis aŭ nur daŭras en la memoro de la homara kroniko. Sed la persekutado efikas senĉese kiel natura potenco. Same universala kiel la lumo, la persekutado radias ĉiudirekten.

Same en la aroganta palacon kiel en la humilanta dometon ĝi eniras. Ĉiu rilato de la vivo estas tuŝata. Ĝia agado montriĝas publike per malliberigo, turmentego, sangoverŝo, kaj malpublike per la larmoj de la mizero kaj la ĝemoj de la malespero. Sed tio ne estas la plej malbona rezultato de la persekutado. La korpoj mortmalsatas kaj la koroj rompiĝas, sed fine alvenos „la dolĉa dormo”, la finiĝo de ĉio. La malĝojo enteriĝas en la tombo, la naturo ĝin kovras per herbo kaj flora mantelo, kaj la piedoj de ĝojo gaje saltetas

sur la vojoj foje premitaj de pezpieda zorgego. Sed la pli maldensaj efektoj de persekutado daŭras ĉe la vivantoj; oni ne ilin premas en ĉerkon kaj ilin enterigas kun la mortintoj. Anstataŭe, ili fariĝas parto de la infekta atmosfero de malkuraĝeco kaj hipokreteco, kiu konsumas la intelektan virecon de l' homaro, tiel ke la klarvidanta esplorado perdiĝas en nescianta fido, kaj la riĉa vivpovo de aktiva pensado defalas en kadukecon de timema kaj mallaborema submetiĝo.

Kia estas ĉi tiu principo de persekutado kaj kiel ĝi naskiĝas kaj disvolviĝas en la homa menso? Nuntempe, ĉar ĝi senkreditiĝas, la kristanaj apologiuloj komencas ĝin alskribi al la natura malamo de l' homaro esti kontraŭdirata.

La homoj diskutadas kaj malpaciĝas, kaj se intelektaj malkonsentoj incitas kontraŭecon en la nuna civiliza tempo, kiel facile ili devis inciti la plej dolorigan malamikegecon en la pli malkleraj kaj barbaraj pratempoj. Jen la preteksto nun ofte antaŭenpuŝata! Sendube ĝi ŝajne portas kredeblecon, sed iom da enketo montras ĝian erarigon.

La homoj tiom diferenciĝas laŭ menso, karaktero, sorto kaj interesiĝoj, ke, lasite al si mem, ili nepre disiĝas en multecon de ĉiam-ŝanĝantaj partioj, sektoj, modoj kaj juĝoj; kaj, dum ĉiu povas kontraŭstari, kiel arogantecon, la malkonsenton kontraŭ sian propran normon, la diverseco de la tuta amaso devas konservi ĝeneralan ekvilibron de egalfareco, pro tio ke ĉiu sekto, dezirante persekuti, estus kontraŭstarata de ŝarĝeganta plimulto de malsamopiniuloj. Do, memvideble, la persekutado estas nur indulgebla se ia speciala opiniaro regas; kaj se ĉi tiu opiniaro estas artefarite disvastigita; se ĝi rezultas ne el scio kaj meditado, sed el kutimo kaj edukado; se mallongavorte ĝi estas superstiĉo pli ol kredo, troviĝas kondiĉoj tre favoraj al la deviga subpremado de herezo.

Nu, tra la tuta historio homa, unu ampleksa formo de juĝoj estas artefarite vastigita, juĝoj, kiuj estas akceptataj per kredo kaj ne per esplorado, kiuj concernis la pretenditajn okazintaĵojn de la malproksima pasinto aŭ la neatingeblan estontecon, kaj kiujn armeo da instruistoj ĉiam laŭsisteme konservis en „praaĝa pureco“; instruistoj kiuj sin dediĉis al la enradikigo de la antikva kredo, sen almiksaĵo de sia propra inteligenteco. Tiu formo de juĝoj estas la Religio. Sekve ni devus atendi trovi ke ĝia kariero estas ĉiam akompanata de persekutado kaj la atendo plene sin pravigas; oni devas nur rapide tuŝeti la historion de ĉiu kredo. Troviĝas ja unu escepto, sed uzante popularan, kvankam neakuratan frazon, oni povas diri ke ĝi estas la escepto kiu pruvas la regulon. La Budeismo ja neniam persekutis. Sed la Budeismo estas filozofio pli ol religio; aŭ se ĝi estas vere religio, ĝi ne estas teologio, kaj en ĉi tiu artikolo oni konsideras religion laŭteologie.

Ĉiuj teologiaj religioj estas persekutintaj, ankoraŭ persekutas kaj dum sia ekzistado ĉiam persekutos. Tamen, oni ne devas imagi, ke la herezuloj estas punataj pro la malkaŝa kaŭzo ke la plimulto devas esti prava, dum la malplimulto devas esti malprava, aŭ ke kelkaj homoj rajtas pensi, dum aliaj rajtas nur alkonsentiĝi. Ne, tute ne! Jen tro senhonta malkaŝa konfeso! Kaj ĝi ne estus la serioza vero.

Troviĝas principo en religioj, kiu ĉiam estas la sankcio de persekutado, kaj se tio estas vera, la persekutado estas pli ol justa, ĝi estas devo. Tiu principo estas Salvado per Kredo.

Se ia kredaĵo estas necesa por la salvado, se rifuzi ĝin akcepti estas meriti kondamnon kaj se sukcese kontraŭbatali ĝin estas danĝerigi la eternan bonstaton de aliuloj, tiam restas nur unu vojo al ĝiaj aliĝantoj: ili devas konduti kontraŭ la herezulo same kiel kontraŭ vipero. Li estas venena kreitaĵo, kiun oni devas rapide detruiri. Sed ne tro rapide, ĉar ĉu li ne havas animon ankoraŭ savotan! Sekve, li estu apartigata por al li malhelpi fari pluan malbonon; oni provu lin konverti, poste oni lin punos kaj la ceteron lasos al Dio! Ke lia konvertado estas provata per turmentego, aŭ korpa aŭ mensa, ne estas absurdaĵo: ĝi konformiĝas al la doktrino de salvado per kredo. Ĉar se Dio nin punas aŭ nin rekompencas laŭ nia kredo aŭ laŭ nia malkredo, sekvas ke la kredo estas volebla. Tial la herezulo, kiel diris Doktoro Martineau, estas memorigita ne de argumentoj sed de motivoj; ne de atesto sed de la timo; ne de la pruvoj sed de la danĝeroj; ne de kaŭzoj sed de ruiniĝo. Tamen, kiam ni rekonas ke la komprenemo agas sendepende de la volo kaj ke la minaco de puno, dum ĝi povas igi la silenton aŭ hipokritecon, ĝi ne povas ŝanĝi kredon, ĉi tiu metodo de agado nin frapas kiel monstra malspritaĵo; sed se la kredo je la doktrino de savado per kredo estas prava, necese sekvas ke ĝi estas kaj logika kaj rajta. Se la herezulo ne volas kredi, evidente li estas malbonega, ĉar ĉu li ne malakceptas la veron kaj samtempe insultas Dion! Li estas pripensite elektinta la vojeton inferan; ĉu do estas grave ĉu li vojaĝas malrapide aŭ rapide al sia difinita loko? Sed ĉu ne estas grave ĉu li vojaĝas sole aŭ kun si kunkondukos aliulojn, al la eterna mizerego? Tia estis la logiko de la inkvizitoroj, kaj kvankam iliaj kruelaĵoj estas malamindaj, oni devas konsenti pri ilia unuformeco.

La Katolikoj havas neerareman eklezion, la Protestantoj neerareman Biblion. Tamen, samproporcie kiel la instruado de la Biblio fariĝas afero de interpretiĝo, tiel la neeraremece de ĉiu eklezio decidiĝas en la neeraremece de ĝia pastraro. Ĉiu asertas ke iu kredo estas necesa por la savado. Tial, la libereco religia neniam eniras la imagon de iu aŭ alia. La Protestantoj kiuj ribelis kontraŭ la pontefika regado, malkaŝe konfesas la principon de persekutado.

Luther, Beza, Calvin kaj Melancthon estis, kredeble, pli netoleremaj ol iu papo de sia epoko; kaj se la Protestantaj persekutadoj ne estis, entute, tiel sangsoifantaj kiel tiuj de la Roma Katolika Eklezio, tio rezultas nur el la fakto ke la katolikismo travivis kruelegan historian epokon, dum la Protestantismo aperis dum epoko de pli granda lumo kaj humaneco. La persekutado ne povas esti ĉiam sanga sed ĝi ĉiam surmetas sur la herezulojn tiom da suferado kiom la opiniaro de la socio toleras.

La dogmaro de la savado per kredo ja estis pli malutila ol ĉiuj aliaj teologiaj iluzioj. Kiel estas pravaj la vortoj de Pascal: „Jamais on ne fait le mal si pleinement et si gaie-ment que quand on le fait par un faux principe de conscience.“ (Oni neniam malbonon faras malkaŝe kaj gaje tiel, kiel oni ĝin faras pro neĝusta principo de la konscienco).

Feliĉe eklumas pli bela tago; la lumo de la vero anstataŭigas la mallumon de la malvero. Korekta kredo estas treega grava sed oni ne povas ĝin devigi. La kredo estas sendependa de la volo. Male, la karaktero dependas de la volo kaj pro tio la filozofo aprobas aŭ malaprobas agojn anstataŭ ol mallaŭdi kredojn. Tamen la teologio firme alteniĝas al siaj malnovaj moroj. Tial, „malfideluloj“ devas esti

minacataj kaj ne argumente alparolataj; kalumniitaj kaj ne konvinkitaj; kaj kiam ĉi tiuj bataliloj sin montras vanaj, sekvas la persekutado de la silento.

Tio tamen utilas nur por mallonga tempo, eble ĝi obstrukcias sed ne sukcesas haltigi la disvastiĝon de malkredo. Ĝi similas vualon kontraŭ la lumo. Ĝi eble malheligas la tagiĝon por la sensprituloj kaj la malsciamantoj, tamen baldaŭ la plej blindaj dormemuloj inter la kredemaj ŝafoj fine ekvidos ke la suno ja estas leviĝinta.

En Parizo.

La 7-an de Februaro okazis en la Hotelo de la Sciencaj Societoj la unua kunsido organizita de la Pariza Liberpensularo sub patronado de la Nacia Unuiĝo de la Francaj Liberpensuloj.

Antaŭ plena ĉambrego, tre miksitaj aŭdantaro, la prezidanto Gustave Hubbard malfermis la kunsidon kaj legis la jenan leteron de la eminenta romanverkisto Paul Brulat:

„Mia kara Hubbard, iom malsana, mi bedaŭras ne povi ĉeesti la belan manifestadon, kiun vi organizis je la honoro de la franca liberpensularo. Pli bone ol mi, kun via granda elokventeco, tiel plena de pensoj, vi diros la sentojn, kiuj nin instigas, la necescon ĉiam batali kontraŭ tiu malesperiga pesimismo, kiu rifuzas koncepti homaron kapablan sin kontentigi per sia konscienco kaj sia racio, jam liberigitan de l' malnovaj superstiĉoj.

Al tiu kristana pesimismo, ni permesas al ni kontraŭstarigi la saĝan optimismon, kiu kredas la progreson, kiu havas pli bonan opinion pri la homaro, kiu ĝin respektas sufiĉe por instrui al ĝi la veron, juĝante ke la vivo estas akceptebla sen la mensogo, kaj ke sufiĉas al la honestulon pasi farante sian taskon.

Jes, la demando estas, kiu estas prava, ĉu tiu optimismo, kiu konsistigas la vivoĝojon el la plena elflorado de la homaj kapabloj, ĉu tiu terura pesimismo, kiu timas la inteligenton, la lumon, la sciencon, kiu ŝajnas juĝi la homon estaĵo nature malbonfaranta, ĉu al plej malvirtaj eksceso, kiam oni estos liberiginta lin de l' teruro, en kiu lin tenadas la religioj.

Cetere, la ekonomia problemo multe superas la problemon religian. Donu panon al la homoj kaj vi estos farinta pli multe por ilia feliĉo ol la pastroj kiuj promesas la paradizon; kaj vi estos plimulte farinta ankaŭ por plifruigi la regadon de l' universala frateco, ekvidatan, en la ideala malproksimo, ĉar la homoj estas malamikoj kaj sin reciproke disŝiras nur pro la severega neceseco de terura batalo por la vivo. Iom pli da socia justeco forpuŝos la persekutadon de l' ideo pri malbono multe pli ol la timo pri ĉielaj punoj.

Nia reĝolando estas en tiu ĉi mondo, ne en la ĉielo, fantaziaĵo de l' imago. La religio, ĉiuj religioj, ĉiam nur trompis. De la pratempo ili estas subpremilo profita por la tiranoj. La pidifektoj, kiujn transdonas la heredo, igas generaciojn humilajn kaj timemajn, popolojn degenerajn kaj obeemajn facila kaptajo al la potenculoj. Oni ekspluatas la popolojn, oni rabas, oni elmanĝas ilin, kiam ili konsistigis la penadon de sia volo nur el la akiro de la alia vivo.

Ne, ne! ne povas esti sana idealo ekster la malrapida venko de l' racio, tra la mizeroj de l' korpo kaj de la inteligento... La racio antaŭ ĉio, estas savo nur en la racio.

Ho, sendube, ni estas envolvitaj en nekonato, sed la nekonato restu nekonato kaj ne fariĝu eraro.

Aliparte, kia malbono estas, se la scienco ne dispelas ĉiujn la mallumojn? Ĝi ne malpli pro tio restas nia sola dendiĵo kontraŭ la malsaĝoj kaj la krimoj de la superstiĉo. Nur ĝi al ni alportas certajojn. Ekster ĝi nenio restas krom la nebela privilegio erari de dubo al dubo, en la senfima kampo de l' malprecizaj hipotezoj, de l' metafizikaj teorioj, de l' senhavaj revoj kiuj malkuraĝigas kaj senesperigas. Fine ĝi estas la sola, kiu super la fiaj politikajoj, la vana agitigo de l' sektanoj kaj de l' ambiculoj, laboras por la morgaŭa homaro, kaj preparas la veron, la juston kaj la pacon!”

Poste paroladas s-ro J. Claraz, ekspastro kiu malkaŝe, noble forlasis la eklezion kaj taŭgis konservi la estimon de ĉiuj siaj ekskolegoj. Li klarigas kiel li malkovris la sciencan mondon, kiu estis tiel zorge kaŝita al li; li pravas per tekstoj la bankroton de la dogmoj kaj fiere respondas al atakoj de kelkaj pastramaj junuloj.

Siavice Gustave Hubbard prezentas kun mirinda fervoro kaj precizeco sian hodiaŭan programon: redono de la preĝejoj al la popolo, kaj kiel unua donaco de la triumfanta Liberpensulo, la internacia paco!

Fine li respondas al kontraŭparoladoj per sprita kondamno de la monduma skeptikismo, kiu pro snobeco prosperigas la bataleman katolikismon.

Esperu ni ke Parizo, nun oficiale reprezentata de la malantaŭenuloj, ree fariĝos la urbo de Voltaire, Diderot, Renan, Zola.

El Hispanujo.

Tie ĉi la liberpensula movado havas karakteron politikan, ĉar la eklezio estas ŝtata afero; oni bezonas ankoraŭ batali pri praktikaj detaloj. Estas ja pli efike ataki trunkon ol branĉojn, sed ĝenerale la hispanoj estas tre indiferentaj pri ideoj, ilia katolikismo estas plej ofte supraĵa, kutima afero, do neatingebla; kiel bati la venton? Tiu indiferenteco, kompreneble, ankaŭ malutilos al la Esperantista movado. Krom ĉio, 80 % da loĝantoj scias nek legi nek skribi, kaj la alia 20 % tre malmulte legas.

P. L.

Bibliografio.

Homaro, Monata internacia gazeto por Progresemaĵ Kulturceladoj, Esperanta organo de l' Instituto por internacia interŝanĝo de progresaj spertoj (P-ro D-ro Broda, 59 rue Claude Bernard, Parizo), oficiala organo de l' Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo, de Esperanta Framasono, de Vegetara Ligo Esperantista. Jara abonprezo Sm. 1. Administrejo: Julio Mangana Rosenörn, San Bernardo 96, Madrid, Hispanlando.

La titoloj mem de tiu ĉi nova revuo garantias ĝian specialan intereson por la liberpensuloj. La unua numero enhavas, krom klarigo de la celoj, komencan studon pri Kulturpolitiko kaj rasa higieno, de L. Hamerschlag, tradukita de D-ro Uhlmann kaj artikolojn de liberpensa kontraŭ-eklezia spirita. Bonan sukceson al vi, kuraĝa kolego!

Kion patrino povas suferi de H. Conscience, el Flandra lingvo tradukis Frans Schoofs.

Nia Antverpena amiko esperantigis en perfekta stilo rakonton kortuŝan pri mizero kaj bonfarado. Eble kredantoj vidos en ĝi laŭdon de la kristana almozo; sed liberpensuloj trovos tie, kiel ĉie, temon por interesaj observoj kaj liberemaj juĝoj: ili nome rimarkos tiun naturan senton, ofte kaj malkaŝe aperantan en tiuj emociaj scenoj, kiu per la suferoj de aliuloj intime ĝuigas la savanton. „Mi vidis mizeron, kara Adela, mizeron, kiu disrompis la koron. Malsato, malvarmo, malsano, nudeco — estas nekompreneble. Ho, kiel mi sentas min feliĉa pro tio ke mi estas riĉa; ĉar bonfarado estas tiel ĝojiga!” Ĉu ne verega estas la pentraĵo, naive impresa, kaj per la faktoj mem incitanta liberan penson pli ol kontraŭkristanaj deklamoj?

Laborista klaso kaj socialismo, de Marcel Cachin, Membro de la Pariza Urbestro, esperantigis S-roj Berland kaj Vergnaud, eldonis la E.S.F.I.O., 49 rue de Bretagne, Paris. Prezo Fr. 0,25 (respondkupono).

Tiun klarege verkitan kaj tradukitan broŝuron ni rekomendas al niaj anoj, kiel ni rekomendus ankaŭ kontraŭsocialistan, se nur ĝi estus, kiel tiu ĉi, interesa kaj pensiga. Lingvan rimarkon ni prezentus al la lertaj tradukintoj: kial ili ne uzas la ofte aperintan radikon kooperativ, anstataŭ la pli ĝenerala kaj nepreciza „kunhelpo”?

El la dialogoj de Voltaire 1763.

Se Jesuo parolis pri tiu ĉi leĝo tiel antikva kiel la mondo, pri tiu leĝo starigita ĉe la Hurono kiel ĉe la Ĥino „Amu vian proksimumon kiel vin mem”, la leĝo de la kristanoj estis „Malamu vian proksimumon kiel vi mem”. Atanazanoj, persekutu la Eŭsebianojn, kaj estu persekutataj; cirilanoj, mortpremu la infanojn de l' nestoranoj al la muroj; gelfoj kaj gibelanoj, faru civitan militon da kvin cent jaroj, por scii ĉu Jesuo ordonis al la tiel dirita posteulo de Simono Barjono eltronigi la imperiestrojn kaj reĝojn, kaj ĉu Konstantino alcedis la imperion al papo Silvestro. Papistoj, pendigu je pendigiloj altaj tridek futojn, disŝiru, bruligu malfeliĉulojn, kiuj ne kredas, ke pastpeco ŝanĝu je Dio per voĉo de kapuceno aŭ rekolet, por esti manĝata de l' musoj sur la altaro, se oni lasas la hostivazon malfermita. Poltrot, Baltazaro Gerard, Jakobo Clément, Chatel, Guignard, Ravailac, akriĝu viajn sanktigatajn ponardojn, ŝargu viajn piajn pafilojn. Eŭropo, naĝu en sango, dum la vikario de Dio, Aleksandro la sesa, malpurigita per mortigoj kaj venenigoj, dormas inter la brakoj de sia filino Lukreco; dum Leono la deka naĝas en la plezuroj, dum Paŭlo la tria riĉigas sian bastardon per la rabaĵoj de l' nacioj, dum Julio la tria faras sian simiportiston kardinalo (honoro eĉ pli taŭga por la simio ol por la portisto); dum Pio la kvara sufokigas kardinalon Caraffa, dum Pio la kvina ĝemigas la romanojn sub la ŝteloj de sia bastardo Buon-Compagno, dum Clemento la oka verĝbatas la grandan Henricon la kvaran sur la postvangoj de kardinaloj Ossat kaj Duperron. Miksu ĉie la ridindon de viaj italaj komediaĵoj kun la terureco de viaj raboj: kaj poste sendu Fraton Trigaut kaj Fraton Bouvet prediki „La Bonan Anoncon” al la Ĥinoj.

Trad. R. D.

Pensoj de Victor Cherbuliez.

Oni kredas tial ke oni kredas, kaj neniam oni havos pli bonan motivon por kredi.

Multaj homoj ofertas al Dio sian racion, kiu estas al ili malmulte kara, kaj zorge evitas oferi al li eĉ la plej malgrandan el siaj pasioj, kiuj estas al ili tre karaj.

Tiuj kiuj havas dogmojn kutime ne forigas la perfortajn rimedojn, ĉar estas el la esenco de la dogmoj esti persekutemaj.

Analizo aplikata al la sanktaj aferoj estas granda ĝenanto.

Laŭ iuj eklezioj, konfesi estas pli merita ol ne peki.

Multaj homoj elektas prosperecon por doni mirindajn ekzemplojn de rezignacio kaj de sankta submetiĝo al la ĉielaj voloj.

La animoj vere kredantaj trovas ĉiam senkulpigojn al sia Dio, kiam li trompas ilin.

Homoj bonpensaj konsideras la bonan Dion kiel tre potenca kamaradon, kies subhelpo estas utila por sukcesi en tiu ĉi mondo kaj en la alia.

Estas miktikuloj kiuj speciale estimas la varbon de animoj loĝantaj en belaj korpoj.

Estas iuj, kiuj sin vergas sur la dorso de l' proksimumoj.

Al kiu ne okazis, profunde kaj subtile rezonadi pri temo, kiu ne ekzistas?

Trad. R. D.

LA SOCIETO.

Eksigis: Levisage. Entute 223 membroj.

Ŝanĝita adreso:

S-ro R. Eisner, 18 Schenkstr. Jena-ort, Germanujo.

Kaso Februaro 1913.

Enspesoj:

Reportite	Fr. 222,05
Kotizaĵo 1912 de Garcia	„ 2,50
„ „ L. Beuve	„ 2,50
„ „ E. Beuve	„ 2,50
„ „ Mossmann	„ 2,50
Por anonco	„ 2,50
Sume	Fr. 234,55

Elspesoj:

Ricevo de pako	„ 0,35
Poŝtmarkoj	„ 3
Sume	„ 3,35
Restas en kaso Fr. 231,20 (Sm. 86,58).	

ANONCO.

LONDONO.

PENSIO POR GESINJOROJ.

Ĉiuj hejmaj komfortoj, bano. Moderaj prezoj: de Sm. 10 ĝis 12,50 ĉiusemajne, enkalkulante ĉion. Oni parolas angle, esperante kaj france. D-ro O'CONNOR instruas la anglan lingvon al alilanduloj.

Adreso: Madame O'CONNOR, Esperanto House, 17 St. Square, Bayswater, London W.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 Sm. (Fr. 2.50)

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizojn al S-ro B. F. SCHUBERT, 1505, North Capitol Str., Washington, Usono. Kotizmono kun bulteno: 50 c. — 1 Sm. — En Parizo, kotizojn kaj ailgojn ricevas S-ro GUILLEMIN, kaj S-ro DAUPHIN (Librejo HACHETTE).

FUNEBRO.

JEAN DONS, nia sindona Honormembro kaj amiko, kasisto de la Internacia Federacio de la Liberpensuloj, mortis en Bruselo. Lin priploras la belgaj liberpensuloj, kiuj proksime admiras la simplan konstantecon de l' maljuna batalanto, la sama kiu, antaŭ la naskiĝo de belga liberpensularo, sekvis sola, sub insultoj, la senreligian enterigon de malriĉa laboristo; lin priploras ĉiuj altkoruloj el la tuta mondo, kiuj konis lin en la internaciaj kunvenoj, pro perdo de unu el la plej puraj homanimoj; lin priploru aparte ni esperantistoj, kies noblan celon li tuj komprenis, kies laboron li helpis, dum la Brusela kongreso de la Libera Penso, kun efika simpatio

sukcesegon havis lia libro por geknaboj „Cuore” (Koro). Pli ol 300.000 ekzempleroj disvendiĝis dum malmultaj jaroj; ĝi tradukiĝis en ĉirkaŭ 20 lingvojn.

La ses rakontoj — kiujn ni publikigas laŭ ĝentila permesraĵo de la milanaj eldonistoj Fratoj Treves — estas eltiritaj el „Cuore”.

Ni estas certaj, ke la tutmonda esperantista legantaro bonakceptos tiun eldonadon, kiu havas du precipajn meritojn: 1e esti elokventa kaj realeca pentraĵo de l' karaktero de l' itala popolo; kaj 2e montri ekzemplon de la lernejaĵ libroj, per kiuj tiu popolo edukiĝas kaj morale evoluadas.

I. LA ETA PATRIOTO PADOVA.

Mi ne estos soldato malkuraĝa, ne: sed mi irus multe pli volonte lernejen, se nia instruisto farus ĉiutage rakonton kiel hodiaŭ matene. Li diris, ke ĉiumonate li faros tion: ke li donos al ni kopion de l' rakonto, kiu, ĉiel, pritraktos pri ago bela kaj vere farita de knabo. Tiu ĉi titoliĝas: la eta patrioto padova. Jen ĝi:

Franca vaporŝipo levis la ankronejn de Barcelono, en Hispanujo, Genova'n. Kunvojaĝis Francoj, Italoj, Hispanoj kaj Svisoj. Inter aliaj estis deknunajara knabo, malbone vestita, solestarema kiel sovaĝa besto kaj rigardanta ĉiujn severaokule. Kaj tute li pravis severaokule rigardadi ĉiujn. Antaŭ du jaroj liaj gepatroj, laboristoj de l' ĉirkaŭaĵo de Padova, vendis lin al ĵonglistestro, kiu per pugnobatoj kaj piedfrapoj lin ĵonglistiginte, kondukis lin tra Francujo kaj Hispanujo, batante ĉiam kaj neniam satigante la malfeliĉulon. Fine, en Barcelono, ne povante plu toleri la batojn kaj la malsaton, en kompatindega stato, tiu ĉi sukcesis forflugi de sia turmentisto kaj alkuri por protekto ĉe l' Italan konsulon, kiu kompateme enŝipigis lin sur tiun ŝipon, doninte al li leteron por la poliestro de Genova, kiu devis lin realveturigi hejmen: al la gepatroj, kiuj estis lin vendintaj kiel beston. La mizera knabo estis je vestoj disŝiritaj kaj malsaneta. Oni asignis al li duaklasan kajuton. Ĉiuj rigardis lin; iu lin aldemandis; sed li ne respondis, kaj ŝajnis malami kaj malŝati ĉiujn, tiel malbonigita de la senigoj kaj de la batoj.

Tamen tri kunvojaĝantoj, insistinte per demandoj, sukcesis malfermi al li la buŝon; kaj tiam li per malmulte da krudaj vortoj, iom venetaj, iom francaj iom hispanaj, rakontis sian historion. Italoj ne estis la tri kunvojaĝantoj: tamen ili komprenis kaj ĉu pro kompatemo ĉu pro vineksitateco donacis al li monerojn. Tiumomente sinjorinoj eniris la

POR NIAJ IDOJ.

EDMONDO DE AMICIS.

ITALAJ RAKONTOJ *)

Esperanten tradukitaj el la itala teksto de P. C. MOUTI.

ANTAŬPAROLO.

Edmondo de Amicis (1846–1908) jam estas konata en la esperanta literaturo, dank' al du belaj tradukaĵoj de S-ino Junck. Malfeliĉe tie ĉi ni ne povas diri pri li pli ol kelkajn vortojn, nesufiĉajn por montri la gravecon de tiu ĉi verkisto en la itala literaturo.

Jam de la junaĝo li verkis artikolojn kaj novelojn ŝatindajn pro noblaj sentoj, pro pureco kaj ĉarmeco de arto lia tute natura.

Lia oficira vivo inspiris al li „Bozzetti militari”.

La impresojn pri longaj vojaĝoj li publikigis per famekonataj libroj: „Sull' Oceano”, „Olanda”, „Parigi”, „Londra”, „Spagna”, „Constantinopoli”, „Marocco”, k.t.p. Sed maloftan

*) Kvankam kelkaj okazaĵoj en tiuj rakontoj estas prenitaj el la milita vivo kaj kelkfoje troviĝas religiaj vortoj en la tekstoj, la redakcio sensanceliĝe akceptis tiujn rakontojn; ĉar la sentoj en ili vivantaj ne estas specialaj militaj virtoj nek inspiritaj de religiaj sistemoj, sed pure kaj simple homaj. Gepatroj, legigi tiujn ĉi rakontojn al viaj infanoj!

salonon, kaj ĉiuj la tri ŝajnome donacis al li alian monerojn kriante: — Prenu tiun! — Prenu ankaŭ tion! — resonigante la monerojn sur la tablo. La knabo enpoŝigis ĉion, dankante duonvoĉe, iom malafabla kiel kutime, sed per rigardo unuafoje rideta kaj ama. Poste li suprengrimpis sian kajuton, tiris la antaŭkurtenon kaj ekpensis pri si. Per tiu mono li ja povos gustumi bonajn manĝaĵojn sur la ŝipo — post dujara malsatado; aŭ aĉeti jaketon ĵus elŝipiginta en Genova — post dujara ĉifonvestigado; aŭ, fine, porti ĝin hejmen kaj tiel akcepti ĉe siaj gepatroj iom pli afabla ol kun malplenaj poŝoj. Tiu mono estis por li malgranda trezoro. Tion li pensis malantaŭ la kurteno dum la tri kunvojaĝantoj meze de l' duaklasa salono babiladis ĉirkaŭ la manĝotablo. Ili trinkadis kaj babiladis pri vojaĝoj, pri de ili konataj landoj, kaj okaze ili ekparolis pri Italujo. Unu eklendis la hotelojn, alia la fervojojn, poste ĉiuj varmiĝintaj parolis malbone pri ĉio. Unu estis prefere travojaĝanta Laponujon. Dua diris, ke en Italujo li trovis nur trompistojn kaj rabistojn. Tria, ke la italaj oficistoj ne scias eĉ legi. — Popolo nescianta — rediris la unua. — Malpura, — aldonis la dua. — Ŝte... — ekkriis la tria: li intencis diri ŝtelema, sed la vorton li ne povis fini: hajlado da moneroj grandaj kaj malgrandaj falis sur iliajn kapojn kaj ŝultrojn, saltetante poste sur la tablo kaj sur la planko bruege. Ĉiuj levigis, furioze rigardante supren, kaj ili ricevis alian plenanon da moneroj en la vizaĝo. — Reprenu vian monon, — ekkriis malestime la knabo, sin prezentinte el la kurteno de l' kajuto: — Mi ne akceptas almozon de kiu insultas mian patrujon!

El „La Esenco de la Religio”.

LUDWIG FEUERBACH.

La Kamĉatkanoj havas, kiel rakontas la teistaj verkistoj, unu plej altan dion, kiun ili nomas „Kutka”, kaj kiun ili kredas kreinto de ĉielo kaj tero. Ĝi, ili diras, faris kaj kreis ĉion. Tamen, ili opinias sin mem multe pli prudentaj ol dion, kiun ili konsideras malsaĝa kaj neprudenta. Se ĝi, ili diras, estus estinta saĝa kaj prudenta, ĝi estus kreinta la mondon multe pli racie; ekzemple, ĝi ne estus metinta en ĝin tiom multajn rifojn kaj montojn netranspasigeblajn, tiom multajn riverojn torentajn kaj tiom longedaŭrajn ventegojn. Se ekzemple dum la vintro ili supren- kaj malsuprenveturas altan monton, ili ne povas reteni gravajn riproĉojn kontraŭ „Kutka”.

„Tute prava ni esprimas nian indignon pri tiaj frenezajoj”, tian rimarkon faris racionalista verkisto. Sed mi tute ne sentas indignon pri tio; kontraŭe, mi nur miras, ke la kristanoj ne posedas la kuraĝon por konfesi, ke laŭ la esenco ili tute ne diferencigas de la Kamĉatkanoj. Ili diferencigas nur laŭ tiu flanko, ke ili trankviligas sian koleron kontraŭ la krudaĵoj kaj kruelaĵoj de la naturo ne per insultaj vortoj, sed per agoj. La kristanoj ebenigas montojn aŭ almenaŭ konstruas paŝigeblajn, komfortajn vojojn trans ilin; torentoj estas haltigataj per digoj aŭ estas flankenkondukataj; entute, ili aliformigas la naturon laŭ sia volo, laŭ sia profito, kiam eble plej multe. Sed ĉiu ago tia riprezentas kritikon al la naturo; mi ne ebenigas monton, se ĝia ekzisto ne estus ĝeninta min antaŭe, se mi ne estus malbeninta ĝin; ebenigante ĝin, mi anstataŭas la malbenon per ago. Kontraŭ

longedaŭraj ventegoj, pro kiuj la Kamĉatkanoj insultas sian dion, la kristanoj ja ankoraŭ ne eltrovas rektan kuracilon; sed la kristanoj scias ŝirmi sin per aliaj rimedoj, akiritaj per la kulturo, kontraŭ malagrabra klimato. Kvankam la biblio ordonas: „Restu en via lando kaj honeste perlaboru vian panon”, la kristanoj tamen vojaĝas, kompreneble se la „providenco” donacis al ili la necesan monon, al banejoj kaj en landoj precipe, kie ili trovas pli bonan, pli konvenan al ili klimaton. Sed se mi forlasas lokon, mi fakte malbenas ĝin; do se la kristano forlasas sian patrujon, aŭ nur certe-poke aŭ por ĉiam, li praktike malkonfesas sian kredon je la dia providenco; estis ja ĝi, kiu lin metis en tiun ĉi lokon, ĉar ĝi konsideris kaj destinis la lokon malgraŭ aŭ eble ankaŭ pro la malagraba kaj malsaniga klimato plej konvena por li. La providenco ja etendiĝas ĝis ĉiu specialaĵo kaj detalaĵo; providenco, kiel la racionalistaj teistoj ĝin imagas, kiu koncernu nur la ĝeneralajn naturleĝojn, estas providenco nur laŭnome. Do, se mi forlasas la lokon, kien min metis la providenco, se mi ebenigas la monton, kiun evidente ĝi intence kreis tiom alta, se mi konstruas digon kontraŭ la torento, kiu uzas sian farton nur laŭ dia volo kaj potenco, mi nuligas, mi malkonfesas per mia praktika laboro la imagon de mia kredo kaj mian religian teorion, ke ĉio, kion faris dio, estas senmanka, perfekta, ĉar dio ja ne kreis ĉion amase, sed ĉion speciale. Kiel do mi kuraĝus kaŭzi perfortan ŝanĝon, aŭ subpremi la diajn intencojn per miaj homaj intencoj, aŭ bari la potencon de dio, kiu sin esprimas en la forto de l' torento, en la alteco de l' monto, per la homa potenco? Tion mi ne devas fari, se mi volas konfirmi mian kredon per ago. Kiam la Knidanoj, tiel rakontas Herodoto, intencis trafosi malgrandan teritorion, por doni al sia lando insulan formon, la orakolistino malkonsilis tion al ili per jenaj vortoj:

„Ne fortikigu instmon, ne trafosu ĝin,
Insulon certe farus Zeŭs, se volus li.

Kaj kiam oni proponis al la urbo Romo, elfosi la alfluaĵojn de l' Tevero por eviti ilian elbordigon, la Reatanoj kontraŭstaris, kiel rakontas Tacito en siaj analoj, per la vortoj, ke la naturo, kiu en tiu ĉi rilato estas samsignifa kun dio, kiom eble plej bone prizorgis la homajn interesojn, doninte al la riveroj iliajn finiĝojn, iliajn direktojn kaj iliajn fontojn. Do — ĉiujn kulturakiraĵojn, ĉiujn eltrovaĵojn, per kiuj la homo sin ŝirmas kontraŭ la krudaĵoj de l' naturo, kiel ekzemple la fulmoforigilojn, la konsekvenca, religia kredo estas kondamninta kiel ribelaĵojn kontraŭ la dia regno, eĉ — kiu imagus? — ankoraŭ nuntempe. Kiam estis eltrovata kaj uzata la sulfura etero kiel sendolorigilo, la teologiistoj de la protestanta universitato Erlangen protestis kontraŭ tio, kiel rakontis al mi nepre fidinda persono; precipe ili protestis kontraŭ ĝia uzo je gravaj akuŝoj, ĉar la biblio diras: „Dolorigaj estu viaj naskoj”, sekve la naskado en doloroj estas speciala ordono kaj decido de dio. Tiom malsaĝa kaj samtempe tiom malica fariĝas la homo per la teologia kredo! Sed ni forlasu la protestantajn teologiistojn kaj universitatojn, por okupiĝi denove pri la Kamĉatkanoj. Ili estas tute pravaj konsiderante la kreinton de l' krutaj montoj kontraŭstarantaj la homan kulturon, de l' torentaj riveroj detruantaj la grenkampojn, de l' longedaŭraj ventegoj, kiel estaĵojn sen prudento kaj sen racio, ĉar la naturo estas blinda kaj senintelektaj; ĝi estas tia, kia ĝi estas, kaj faris tion, kion ĝi faras, sen intenco, nekonscie, sed laŭ deviga konsekvenco aŭ — se ni

konsideras la homon kiel parton de la naturo — (cetere tute evidenta konsekvenco) — li ja estas natura estaĵo — tiam la naturo havas racion nur en la intelekto de l' homo. Estis ja precize la homo, kiu per siaj aranĝoj kaj helpiloj donas al la naturo la ŝajnon de konscio kaj racio; nur la homo faris la teron per longdaŭra laboro vera homa loĝejo, kiun li certe estonte ankoraŭ pli perfektigos, pli humanigos ol ĝis nun. Eĉ la klimaton la homa kulturo ŝanĝas. Kia estas Germanujo nuntempe kaj kia ĝi estis ankoraŭ dum la epoko de Cezaro? Sed kiel interpaĉiĝas tiaj aliformigoj perfortaj, kiujn faris la homo, kun la kredo je supernatura dia providenco, pri kiu oni diras: „Dio rigardis ĉion, kion ĝi kreis, kaj ĉio estis tre bona”?

(Daŭrigota.)

Kuriozaĵoj.

CIRKULERO AFIŜITA EN JERUEL.

„Vivu la sanktega Kristo de la Savinto de Teruel!
Fidelaĵo piuloj de Teruel: La sanktega Kristo de la Mirakloj invitas vin akompani lin en solena kaj ĝenerala procesio pluvopreĝa...” k.c. (t.e.: Ni petu de mi, ke mi pluvigu).
Laŭ „El Motin”.

LA PATRONINO DE LA ĜENDARMOJ.

(Ĉefa artikolo de provinca ĵurnalo.)

Ideo inda je ĉia aplaŭdo estis, proponi ke la „Virgulino de la Kolono” estu nomata Patronino de la ĝendarmaro.

La diversaj korpuloj de nia armeo estas sub la patroneco de diversaj sanktuloj, per kiuj estas plenumitaj la deziroj kaj postuloj de la opiniantaro kaj la tradicioj de la patrujo kaj de la militistaro. Per tio oni rekomendas la soldataron al la protekto de potencaj ĉielanoj, efike propentantaj por ili antaŭ la Dio de la bataloj... La graveco akirita de la ĝendarmaro postulis, ke ankaŭ al ĝi oni difinu specialan patronon. Per tio oni faris nur severan justaĵon, ĉar ĝin dankas ĉiuj hispanoj, escepte la malfeliĉuloj kiuj falas sub la agado de la punleĝoj.

La elekto de la patroneco ne povis esti pli trafa.

La ĝendarmaro devis posedi patronon, kiu estus ĉeestinta ĉiujn ĝiajn gloriojn: la sanktega Virgulino, kiu en mortula karno sur la flugiloj de l' anĝeloj venis al la plej heroa el niaj urboj, sur la supron de kolono, postlasis sian portreton, por ke tiu ĉi ĉeestu ĉiujn progresojn kaj venkojn de la nacio, kiun ŝi elektis kiel sian.

La Virgulino devis esti proklamata patronino de la ĝendarmaro, ĉe kiu revivas, brilas kaj floradas ĉiuj glorioj de la malnovaj ordenoj de kavaliroj, kies misio estis fidelaj: subtenoj de senhelpuloj, espero de senrifuguloj, ŝirmilo de senkulpuloj, savgardantoj de la laboristo, teruro de krimuloj.

Multaj estas la alvokoj sub kiuj ni honoras la patronon de la Savinto; tiu de la kolono estas la plej propra por esti speciale honorata de la ĝendarmaro, antaŭgvardio de la civilizacio... Por pliiĝi la kuraĝon ĉe atako, subteni la firmecon ĉe kontraŭstaro, estis konvene doni al la ĝendarmoj, kiel patroninon, la „kapitaninon de la aragona soldataro”; estis konvene, ke ili estu kolegoj kaj fratoj en la patroneco, kiel tiuj Almogavaroj, kiuj iris al oriento por pruvi, ke koroj enamiĝintaj je la „Pilarica” (kolonanino) estas kapablaj

efektivigi heroaĵojn pli mirigajn ol tiujn rakontitajn de Kzenofonto kaj revitajn de Homero.

Pensante pri sia patronino memoro la ĝendarmaro ke, same kiel ŝi neniam havis eĉ ombron de kulpo, li devas... kunhelpi al tio, ke la institucio al kiu li apartenas estu inda pro sia senmakula honesteco havi kiel advokaton en la ĉielo kaj protektantinon sur la tero tiun, kiu estis ĉiam Virgulino kaj ĝuas sin nomante Senmakula.

Krom Virgulino, Mario estis patrino kun duobla patrineco...

Dankojn do meritas plej varmajn la estraro de la reĝo, tial ke ĝi sciis kunigi en tiel konvena kunuleco la du plej grandajn amojn de la hispana patrujo, ĝiajn plej altajn kaj helajn glormotivojn, kaj post Dio, la plej fundamentajn kaŭzojn de ĝia espero: la Virgulinon de la kolono kaj la ĝendarmaron.

Estas necese kompleti tiun patriotan laboron... Urgas doni al la ĝendarmaro flagon, kiu montrus la bildon de la Virgulino de la Hispanoj: ... ĝi havos kiel altaron, la koron de la ĝendarmaro, kiel incenson, la aromojn de... k.c. k.c....

LA EPISKOPO DE JACA SENATANO,
Eksdisciplo de la Kolegio de Ĝendarmidoj.

N.B. Antaŭ 2—3 jaroj, la „Senmakula” estis oficiale nomata ĝenerala kapitano (Marŝalo) de la hispanaj armeoj, kun ĉiuj honoroj kaj rajtoj de tiu alta rango.

Oni ne kritikis la entuziasmon de filo de ĝendarmaro por la ĝendarmaro. La dirita episkopo ne naskiĝis malspritulo kaj ĉe aliaj cirkonstancoj, li estus, kredeble tre liberama viro. Sed li estas frapanta ekzemplo de la ruinoj, kiujn la supersticioj kaj la romana eklezio povas kaŭzi ĉe ne sentalenta spirito.

PAŬ-LI.

1) En Hispanujo, ne estas famaj kiel en Francujo la botoj.

Prometeo.

Kovru vian ĉielon, ho Zeuŝ! per vaporoj de nuboj, kaj simila al infano kiu senkapigas kardojn, ekzercadu vin kontraŭ kverkojn kaj montarojn. Vi tamen devas lasi al mi mian teron kaj mian kabanon, kiun vi ne konstruis, kaj mian fajrujon, kies flamon vi envas al mi. — Mi konas nenion pli mizera sub la suno ol vi dioj! Via majesto penege nutriĝas per oferoj, viktimoj, fumo, preĝoj, kaj pereus, se tie ĉi ne estus infanoj kaj almozuloj, mizeraj malsaĝuloj kiuj sin lulas per esperoj! — Kiam mi estis infano kaj ne sciis, kio fariĝi, mi direktis miajn malkvietajn okulojn al la suno, kvazaŭ post ĝi estus orelo por aŭdi mian plendon, koro kiel mia por kompati la subpremitojn. — Kiu helpis min kontraŭ la aroganteco de la Titanoj? Kiu min savis de la morto, de la sklaveco? Ĉu ne vi mem ĉion plenumis, ho koro sankte flamiĝanta! Kaj, trompita, ĉu vi ne brulis per juna kaj naiva sento de dankemo al la dormulo de ĉi supre? — Mi adori vin, kial do? Ĉu vi iam forviŝis la larmojn de la suferanto? Ĉu ne la ĉiopova eterneco kaj la eterna destino, viaj kaj miaj estroj, forĝis min homo? — Ĉu vi kredas, okaze, ke mi devas malami la vivon kaj forkuri al la dezerto, tial ke ne ĉiuj floroj de miaj revoj fruktiĝis? — Tie ĉi mi restas, formante homojn laŭ mia bildo, genton al mi similan, kiu suferu, ploru, ridu kaj ĝoju, kaj vin malestimu, kiel mi vin malestimas.

Tr. PAŬ-LI.

GOETHE.

Grava atako kontraŭ unu fortikaĵo de la Vatikano.

S-ro Pey Ordein, ekspastro, fama publicisto, ne povante edziĝi en Hispanujo, tial ke la decidoj de la „Koncilo” de Trento estas laŭ la hispana konstitucio leĝoj de la lando, iris al Francujo, edziĝis, enskribigis la dokumentojn ĉe la hispana konsulo de la loko kaj enkondukis ilin en Hispanujon.

Tiaspeca edziĝo estas la unua, de la XIa jarcento, enskribita en la Civila Registro de Hispanujo, malgraŭ la papo kaj malkaŝe.

Instigita de la klerikaloj, la liberala-demokrata estraro de Hispanujo atakis per Reĝa Dekreto la laŭleĝecon de tiu edziĝo, kaj nun la tribunaloj estas okupataj ĝin nuligi, por la plej granda ĝojo de la Vatikano.

Okupiĝis pri la afero le Siècle (Parizo) sub titolo: „Nova skandalo en Hispanujo”, kaj William Heaforth en „The Freethinker.” (Londono), invitante la internacian liberpensularon alpreni rimedojn por malhelpi, aŭ laŭokaze puni, tian atencon. Alvoko estas farita de laboristoj el Huelva al Federacioj kaj al ĉiuj progresemaj homoj.

P. L.

(Ĉiuj Esperantaj gazetoj estas petataj, represi tuj tiun ĉi alvokon.)

Invito al Italujo!

La *Kvara Kongreso de Italaj Esperantistoj* okazos, laŭ aranĝoj de la Milana Rondo Esperantista, en *Milano* de la 31a de aŭgusto ĝis la 2a de septembro 1913, t.e. tuj post la internacia kongreso en Berno.

La proksimeco de Milano, urbo nomata en Italujo la „Cerbo de Italujo”, je Svisujo permesos al multaj partoprenantoj de la „Naŭa”, partopreni ankaŭ la nacian italan kongreson, kie ili estos akceptataj kun kora ĝojo kaj frataj sentoj.

Venante en nian landon, kie nia sankta afero bezonas ankoraŭ fortan apogon, la samideanoj ĉiulandaj faros ankaŭ grandan servon al nia Esperanta movado. Ni faros ĉion eblan, por kontentigi niajn gastojn, kaj estas certaj, ke ankaŭ la itala ĉielo favoros niajn aranĝojn.

La programo de nia nacia kongreso ne estas ankoraŭ definitive fiksita. Intencataj estas jenaj aranĝoj: La 31an je la 15a horo (3a posttagmeze) oficiala malfermo, poste komuna manĝo, prezentaĵoj kaj deklamaĵoj; la sekvantan tagon laboraj kunsidoj kaj samtempe konduko tra la urbo kun ekskurseto al la urbo Monza (Reĝa Parko), la trian tagon ekskurso tuttaga al la Lago Granda (Lago Maggiore). Ni ĝuos ferjojn rabaton.

La kotizaĵo por la kongreso estas Sm. 2.— (L. 5.—), adresotaj al s-ro Oscar Bünemann, Via Saffi 24, Milano, per transpagilo de la Ĉekbanko Esperantista aŭ per poŝtmandato.

Venu Milanon! Koran Bonvenon!

LA ORGANIZA KOMITATO.

Adreso: Via Saffi 24, Milano.

El la libro pri la justeco en la revolucio kaj en la eklezio.

de PROUDHON (1858).

La devenpunkto de l' justeco estas la sento de la persona indeco.

Antaŭ la similito tiu sento ĝeneraliĝas kaj fariĝas la sento de la homa indeco, kiun nepre laŭ sia naturo la prudenta estaĵo sentas ĉe la persono de aliulo, amiko aŭ mal-amiko, kiel ĉe la sia propra.

Per tio la Justeco distingiĝas de la amo kaj de ĉiuj am-sentoj, per tio ĝi estas senprofitema, antitezo de l' egoismo, kaj faras al ni devigon superantan ĉiujn aliajn sentojn.

Pro tio ankaŭ ĉe la prahomo, ĉe kiu la indeco estas kruda kaj la personeco sintruda, la Justeco ricevas la formon de supernatura ordono kaj sin apogas sur la religio.

Sed baldaŭ sub influo de tiu helpanto, la Justeco difektigias; male de sia formulo ĝi fariĝas aristokrata, kaj atingas en la Kristanismo la malnobligon de l' homeco. La laŭdira respekto al Dio forpelas de ĉie la respekton al la homo; kaj ĉar la respekto al la homo neniigias, la Justeco subfalas, kaj kune la socio.

Okazas tiam la Revolucio, kiu malfermas por la homaro novan aĝon. Per ĝi la Justeco, malprecize konita dum la antaŭa periodo, instinkte sekvita, aperas en la pureco kaj la pleneco de sia ideo.

La Justeco estas absoluta, senŝanĝa, ne ricevas pliigon aŭ malpliigon Ĝi estas la neperfortebla mezurilo de ĉiuj homaj agoj.

Supozu socion, kie la Justeco estus superata, kiom ajn malmulte, de alia principo, ekzemple la religio; aŭ en kiu iaj individuoj ĝuas estimon kiom ajn malmulte superan je tiu de aliaj: mi diras, ke, ĉar la Justeco estas virtuale nuligita, estas nepre, ke pli malpli frue la socio pereos. Kiom ajn malgranda estas la supereco de la kredo kaj de la feŭdalnobelaro, la tago alvenos, kiam la superulo trudos la oferon al la subulo, kiam sekve la subulo ribelos: tia estas la historio de l' homaro, tia estas la Revolucio.

Ne maltrankviliĝu pri la parolfervoro de la predikistoj. Kiel la Evangelio, ili deklamos, ili fulmados kontraŭ la riĉuloj, sed konkludante ĉiam, pro la devoforlasemo, pro la pento, pro la graco kaj la ĉiela regno, kontraŭ la mal-riĉuloj.

Dum antikvaj tempoj la laboro estis altrudata de mastro, nuntempe ĝi altrudiĝas nur de l' mizero: jen la sola diferenco.

Trad. R. DESHAYS.

ANONCO.

LONDONO.

PENSIO POR GESINJOROJ.

Ĉiuj hejmaj komfortoj, bano. Moderaj prezoj: de Sm. 10 ĝis 12,50 ĉiusemajne, enkalkulante ĉion. Oni parolas angle, esperante kaj france. D-ro O'CONNOR instruas la anglan lingvon al alilanduloj.

Adreso: Madame O'CONNOR, Esperanto House, 17 St. Square, Bayswater, London W.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 Sm. (Fr. 2.50)

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizojn al S-ro B. F. SCHUBERT, 1505, North Capitol Str., Washington, Usono. Kotizmono kun bulteno: 50 c. = 1 Sm. — En Parizo, kotizojn kaj ailgojn ricevas S-ro GUILLEMIN, kaj S-ro DAUPHIN (Librejo HACHETTE).

POR NIAJ IDOJ.

EDMONDO DE AMICIS.

ITALAJ RAKONTOJ

Esperanten tradukitaj el la itala teksto de P. C. MOUTI.

II. *La malgranda vidstaranto lombarda.*

En 1859, dum la militado por la liberigo de Lombardio, kelke da tagoj post la batalo de Solferino kaj S. Martino gajnita de l' Franco-Italaj kontraŭ la Aŭstroj, je bela mateno de junio eskadrono da Saluzzo-kavalerianoj malrapide rajdadis sur vojeto senhoma kontraŭ la malamikojn, atente esplorante la kamparon. Estrumis oficiro kaj serĝento kaj ĉiuj rigardadis malproksimen antaŭ si per fiksaj okuloj, senparole, atende ekvidi kiam ajn la blankajn uniformojn de l' aŭstraj antaŭpostenuloj. Ili alvenis tiel ĉe kampodomo ĉirkaŭata per fraksenoj, antaŭ kiu staris sole dekdujara knabo, elŝeligante branĉeton per tranĉilo por fari al si bastonon: el fenestro pendis larĝa standardo trikolora; interne estis neniu; la kampuloj, elpendiginte la standardon, forflugis pro timo de l' Aŭstroj. Ekvidante la kavalerianojn, la knabo forjetis la bastonon kaj salutis per sia ĉapo. Li estis bela knabo je kuraĝa vizaĝo, okuloj grandaj kaj bluaj, haroj longaj kaj blondaj, sen jako kaj kun malkovrata brusto.

— Kion vi faras tie ĉi? demandis lin la oficiro, haltante sur sia ĉevalo. — Kial vi ne forkuris kun via familio?

— Mi ne havas familion, respondis la knabo. — Mi estas trovitulo, kiu laboras iom por ĉiuj. Mi restis ĉi tie por vidi la militon.

— Ĉu vi vidis Aŭstrojn trapasi?

— Ne, post tri tagoj.

La oficiro restis pripense kelkajn minutojn; poste elseliĝis kaj, lasinte tie la soldatojn rigardantajn al la malamikaro, eniris la domon kaj supreniris la tegmenton.

La domo estis malalta; el ĝia tegmento nur oni vidis la proksiman parton de l' kamparo. — Estas necese suprengrimpi arbon, li diris kaj malsuprenvenis. Ĝuste antaŭ la draŝejo leviĝis altega kaj maldika frakseno, kiu svingis sian pinton en la bluaĵo. La oficiro staris iom pripensa rigardante jen la arbojn jen la soldatojn; subite li demandis la knabon:

— He, petolulo, ĉu vi vidas malproksime?

— Mi? respondis la knabo. — Mi vidas paseron je unu mejlo.

— Ĉu vi povus suprengrimpi tiun ĉi arbon?

— Tiun ĉi arbon? Mi? Duonminute, jen.

— Kaj ĉu vi sciis diri al mi tion, kion vi vidis el tie: ĉu estas aŭstraj soldatoj tiuflanke aŭ polvonuboĵ aŭ briletaj pafiloj aŭ ĉevaloj?

— Certe mi sciis

— Kion vi postulas pro tio?

Kion? diris la knabo ridetante. — Nenion mi pretendas. Ha! Estas tiel facile. Rigardu Se tio estus por la tedeskoj (germanaŭstroj) neniam, sed por la niaj! Mi estas lombardo.

— Bone. Suprengrimpu, do.

— Unu minuton; mi min sensuigas.

Li sin sensuigis, mallarĝigis sian pantalonrimenon, ĵetis sian ĉapon sur la herbejon kaj ĉirkaŭprenis la fraksentrunkon.

— Sed atentu, diris la oficiro, subite haltigante lin kvazaŭ time.

La knabo turnis al li siajn helajn okulojn blujn demande.

— Nenio, diris la oficiro; suprengrimpu.

La knabo suprengrimpis kiel kato.

— Rigardu antaŭen, kriis la oficiro al la soldatoj.

Baldaŭ la knabo atingis la pinton de l' arbo, kaŝata de l' foliaĵo krom la brusto, sur kiu kaj sur la blonda kapo reflektiĝis orumanta la suno. La oficiro penis lin vidi pro l' alteco de l' frakseno.

— Rigardu rekte malproksimen, li kriis al li.

La knabo por vidi pli bone disigis sian dekstran manon de l' trunko kaj aligis ĝin je l' frunton.

— Kion vi vidas? demandis la oficiro.

La knabo klinis la vizaĝon kaj, metinte je l' buŝo manon kiel paroltubon, respondis:

— Du rajdantojn sur la vojo blanka.

— Kiom malproksime?

— Duonmejle.

— Ĉu ili moviĝas?

— Ili haltis.

— Kion alian vi vidas? demandis la oficiro post iom da silento. — Rigardu dekstren.

La knabo rigardis dekstren.

Poste li diris: Ĉe l' tombejo inter la arboj estas io brileta. Ŝajnas bajonetoj.

— Ĉu ne homoj?

— Ne, eble ili estas kaŝataj en l' tritiko. — Tiumomente

akrega kuglofajfo trapasis alte l' aeron kaj mortis malproksime malantaŭ la domo.

— Malsupren, knabo! kriis la oficiro. — Ili vidis vin. Mi nenion alian bezonas. Venu malsupren.

— Mi ne timas, respondis la knabo.

— Malsupren.... rekriis la oficiro. — Kion vi vidas maldekstre?

— Ĉu vi diris maldekstre?

— Jes, maldekstre.

La knabo turnis sin maldekstren; tiam alia fajfo pli akra kaj pli malalta fendis la aeron. La knabo ekstreĝis. — Pro l' diablo! li ekkriis, min ili celas! — La kuglo traflugis tute proksime.

— Malsupren! kriis la oficiro komande kaj ekscitite.

— Mi tuj venas, respondis la knabo. — Sed la arbo ŝirmas min, ne timu. Maldekstre, ĉu ne?

— Maldekstre, respondis la oficiro, sed venu malsupren.

— Maldekstre, kriis la knabo, elpendigante la tutan bruston tiufanken, kie estas kapelo ŝajnas al mi vidi....

Tria fajfo pli kolera alte traflugis kaj samtempe oni vidis la knabon malsuprenveni, falegante kun la kapo malsupre.

— Malbena! kriis la oficiro, alkurante.

La knabo falis teren dorse kaj restis tiel kun malfermitaj brakoj; sangorivereto elfluis el brusto lia, maldekstre. La serĝento kaj du soldatoj elseliĝis; la oficiro kliniĝis kaj malfermis lian ĉemizon, la kuglo estis trafinta lian maldekstran pulmon.

— Mortinta! ekkriis la oficiro.

— Ne, li vivas! diris la serĝento. — Ha! malfeliĉa knabo. Brava knabo! kriis la oficiro. — Ne timu! Ne timu! — Sed dum li lin kuraĝigis kaj surprenis per poŝtuko lian vundon, la knabo movetis la palpebrojn, lia kapo falis malantaŭen, li estis mortinta. La oficiro paliĝis kaj rigardis lin iomete; poste kuŝigis lin sur la herbejo; levigis, kaj rigardadis lin; ankaŭ la serĝento kaj la du soldatojn rigardis lin senmovaj; la aliaj estis turnitaj kontraŭ la malamikaro.

— Malfeliĉa knabo! ripetis melankolie la oficiro. — Malfeliĉa kaj kuraĝa knabo!

Poste li alproksimiĝis al la domo, deprenis de l' fenestro la standardon trikoloran kaj sternis ĝin kiel funebran drapon sur la mortinteto, lasante lian vizaĝon malkovritan. La serĝento kunigis apude ŝuojn, ĉapon, bastonetan kaj tranĉilon.

Ili staradis ankoraŭ iom silente; poste la oficiro diris al la serĝento: Ni forveturigos lin per la militista ambulanco, li mortis kiel soldato, la soldatoj entombigos lin. — Dirinte tion li ĵetis kison al la mortinto per la mano, kaj komandis: Selen! — Ĉiuj saltis selen kaj la eskadrono forrajdis.

Sed post kelkaj horoj la mortinta knabo ricevis siajn militistajn honorajojn.

Je l' sunsubiro la tuta linio de niaj antaŭpostenoj antaŭeniris kontraŭ la malamikaron, kaj sur l' vojeto, traŝirita matene de l' eskadrono, marŝadis duoble nombriĉa bataliono da bersalieroj, kiu antaŭ kelkaj tagoj estis venkinta ĉe S. Martino. La soldatoj jam sciis pri la morto de l' knabo antaŭ la ekmarŝado. La vojeto flankumanta rivereton pasis apud la domo. Kiam la unuaj oficiroj de l' bataliono vidis la malgrandan kadavron kuŝantan ĉe l' frakseno kaj kovratan per trikolora flago, salutis lin per la sabro; alia oficiro deprenis du florojn ĉe l' bordo de l' rivereto florumata kaj ĵetis ilin al li. Tiam ĉiuj trapasantaj bersalieroj deprenis florojn kaj ilin ĵetadis al la mortinto. Post iom da tempo

la knabo estis tute kovrata per floroj, kaj oficiroj kaj soldatoj ĉiuj faris al li saluton: Brava Lombardeto! Adiaŭ, knabo! Al vi, blondulo! Vivu! Gloron! Adiaŭ! — Oficiro ĵetis al li sian medalon je l' braveco, alia iris kisi lian fruntan. Dume la floroj pluvadis sur la nudajn piedojn, sur la sangan bruston, sur la kapon blondan.

Kaj li dormadis tie sur la herbejo envolvata per sia flago, kun la vizaĝo blanka kvazaŭ rideta, malfeliĉa knabo, kiel li sentus tiajn salutojn kaj ĝojus oferinte vivon sian por sia Lombardio.

El „La Esenco de la Religio”.

LUDWIG FEUERBACH.

II. (Fino).

Nun mi devas klarigi ankoraŭ la sekvantan pretendon, tio estas, ke oni provis pruvi la providencon per tiaj fenomenoj de l' naturo, kiuj malhelpas aŭ eĉ evitas la sekvojn de ekzistanta aŭ laŭnature necesa malbono. Precipe la defendilojn de la bestoj, per kiuj ili kontraŭstaras siajn malamikojn, kaj la ŝirmilojn de la homaj organoj kaj de la besta korpo oni citis kiel pruvojn por la providenco. Ekzemple: „la okuloj estas ŝirmataj per la okulharoj kontraŭ la penetriĝo de ĝenantaj objektoj, per la brovoj kontraŭ la ŝvito fluanta de la frunto, per la okulostoj kontraŭ vundiĝo, kaj per la palpebroj ili povas esti tute kovrataj”. Sed kial la okuloj ne estas ŝirmitaj kontraŭ la danĝeraj sekvoj de pugnobato, de ŝtonĵetado aŭ aliaj influoj detruantaj la okulon aŭ almenaŭ la vidkapablecon? Respondo: Ĉar la forto, kiu formis la okulon, ne estas ĉionpova kaj ĉionscia estaĵo aŭ dio. Se ĉionvidanta estaĵo, ĉionpovanta mano estus kreinta la okulon, ĝi estus ŝirmata kontraŭ ĉiu ajn danĝero. Sed la estaĵo, kiu formis la okulon, ne pensis pri ŝtonĵetado, pri pugnobato kaj sennombraj aliaj detruantaj influoj, ĉar la naturo tute ne pensas, kiel iu dio, do ankaŭ ne antaŭvidas la danĝerojn minacantajn la organojn. Ĉiu estaĵo, ĉiu organo estas ŝirmata nur kontraŭ certaj danĝeroj, certaj influoj, kaj tiu ŝirmo estas identa kun la karaktero de tiu estaĵo, de tiu organo, tial ke ĝi ne povas vivi sen tiu ŝirmo. Ĉiu ekzistaĵo devas havi ankaŭ la necesajn ilojn por la ekzistado. Ĉiu estaĵo devanta kaj volanta vivi devas esti kapabla, defendi sian vivon kontraŭ malamikaj atakoj. La vivo estas batalo, milito; nedisigeblaj estas la vivo kaj la naturaj bataliloj kiel vivprotektiloj. Estas do malsaĝe, se oni speciale aludas la batalilojn, la ŝirmilojn, por pruvi providencon.

Se estas necesa la vivo, ankaŭ vivprotektiloj estas necesaj. Nenia milito sen armiloj. Do, se oni admiras la ŝirmilojn de organo aŭ besto, oni devas admiri la ekziston de tiu organo aŭ besto. Sed ĉiuj tiaj ŝirmiloj estas limigitaj kaj identiĝas kun la kvalitoj de la organo aŭ estaĵo, kaj precize pro tiu kunligiteco kun la karaktero de l' organo, ili ne estas pruvo por supernatura estaĵo intence kaj laŭvole kreanta, kaj precize pro sia limigiteco ili ne pruvas potencon aŭ ĉionscian dion, ĉar dio ŝirmus la estaĵojn kontraŭ ĉiu ajn danĝero. Ĉiu ekzistaĵo disvolviĝis laŭ kondiĉoj, kiuj entenas nenion pli ol la necesajn ecojn por ĝia kreiĝo; ĉiu estaĵo defendas sian vivon laŭ kapablo, laŭ siaj limigitaj kvalitoj; ĉiu estaĵo

posedas la volon al vivkonservo. El tiu volo al vivkonservo, kiu identiĝas kun la individueco de ĉiu estaĵo, rezultas la bataliloj kaj ŝirmiloj de organoj kaj bestoj, kaj tute ne el supera estaĵo potenca kaj ĉionscia.

Fine mi devas citi ankoraŭ kontraŭdiron, kiun faras la teistoj kontraŭ antaŭaj ateistoj aŭ naturalistoj, laŭ kiuj la homoj kaj bestoj elkreskas el la naturo sen dio. Se iam antaŭe la naturo senpere naskis bestojn kaj homojn sen jam ekzistantaj bestoj kaj homoj, kial tio okazas ne plu nun? Mi respondas: ĉar ĉio en la naturo postulas sian specialan epokon; ĉar la naturo povas fari ion nur sub certaj kondiĉoj; do, se nuntempe tio ne okazas plu, kio okazis antaŭe, tiam antaŭe regis kondiĉoj, kiuj mankas nun. Sed eble venos iam epoko, kiam la naturo faros la samon, kiam la nunaj bestspecoj kaj homoj pereos, kaj novaj homoj, novaj gentoj naskiĝos. La demando, kial ne nun okazas io tia, similas al la demando, kial la arbo portas fruktojn nur dum aŭtuno, florojn nur en printempo? Ĉu ĝi ne povus senĉese floradi kaj porti fruktojn? Aŭ kial tiu besto nur je certa tempo sentas la seksan instinkton? Nur la individueco — sit venia verbo! — estas la salo de l' tero, de l' naturo; nur la individueco estas la principo de l' naskiĝo kaj kreiĝo; nur tute individuaj kondiĉoj kaj rilatoj sur la tero, ter-revolucioj naskis la organismajn estaĵojn. Ankaŭ la homo aŭ homa intelekto ne ĉiam produktas originalajn verkojn, ne! estas ĉiam nur certa epoko dum la vivo de l' homo, la plej feliĉa epoko, estas vivokazaĵoj, vivmomentoj, vivkondiĉoj, kiuj pli malfrue ne plu prezentiĝas, kiuj ne ripetiĝas; nur en tiaj momentaj li produktas originalajn verkojn; en ĉiuj ceteraj momentoj li nur ripetiĝas, plimultigas siajn originalajn verkojn nur laŭ ĝenerala maniero de reproduktiĝo.

Per tiu ĉi rimarko mi fermas la ĉapitron pri la naturo. Mi plenumis per tio la unuan parton de mia tasko. Ĝi estis pruvi, ke la homo ne devas devenigi sian originon de la ĉielo, sed de la tero, ne de dio, sed de la naturo; ke la homo devas laŭigi sian vivadon kaj pensadon al la naturo; ke la naturo ne estas efiko de iu estaĵo supera, sed, kiel diras la filozofoj, sia propra kaŭzo; ke la naturo ne estas kreitaĵo, sed memstara, nur el si mem devenanta estaĵo; ke la naskiĝo de l' estaĵoj organaj, la naskiĝo de l' tero, de l' suno mem, se ni supozas ĝin naskiĝinta, devas esti estinta nur natura proceso; ke ni, por klarigi kaj komprenigi al ni ilian naskiĝon, ne devas juĝi laŭ la vidpunkto de l' homo, de l' artisto, de l' metiisto, de l' pensulo, kiu formas la mondon laŭ siaj pensoj, sed rigardi ĉion laŭ la naturo mem.

Kvankam estas tute evidente, ke la konkreta estaĵo de la naturo ne povas esti derivata de abstrakta estaĵo, tamen certa sento en ni ŝajnigas al ni kredinda, natura, eĉ necesa la alian derivon, kiu kontraŭstaras la penson, ke la natura, korphava estaĵo estis la unua, nesuperebla estaĵo; sento, el kiu naskiĝis ankaŭ la kredo, la imago, ke la mondo, la naturo estas produktaĵo de l' intelekto, ke ĝi eĉ kreiĝis el nenio. Sed mi jam neniigis tiun ĉi dubemon, klarigante, ke la homa abstraktigemo kaj, kunligita al ĝi, la fantazio — ĉar nur per la fantazio la homo korpigas la abstraktajn, ĝeneralajn ideojn — igas la homon transpasi la limon de l' konkretaĵo kaj derivi la korphavan, konkretan mondon de abstrakta estaĵo. Sed estas malsaĝe, objektiviĝi tiun ĉi subjektivan homan necesecon pro tio, ke la homo, leviĝinte de l' realaĵo al metafizikaĵo, naskigas la konkretaĵon el abstraktaĵo. La nepraveco de tiu ĉi vidpunkto klariĝas el la

fakto, ke, por naskigi la konkretaĵon, la materialaĵon, el la intelekto, oni devas adapti la sensignifan, fantazian imagon pri la kreado el nenio. Sed dirante: la mondo estas kreita el nenio, mi diras nenion; tiu „nenio“ estas simpla elturniĝo, per kiu mi volas eviti la demandon: de kie la spirito prenis la neabstraktajn, materiajn, korpajn substancojn de la mondo? Kvankam ĝi antaŭe estis same sankta dogmo kiel la ekzisto de dio, tiu „nenio“ estas nenio alia ol unu el la sennombraj teologiaj aŭ pastraj ruzaĵoj, kiuj dum jarcentoj trompis la homaron. Kaj tiun „nenion“ oni kredas eviti anstataŭante ĝin per dio, kiel Jakobo Böhme kaj Hegel dirante: (anstataŭ: „dio kreis la mondon el nenio“) „dio kreis la mondon el si mem“. Per tiu ŝanĝo mi ne progresas eĉ je unu paŝo, kiel mi jam montris antaŭe, ĉar kiel devenas el la spirita materio, el dio la reala materio? Oni do elpensu kiom eble plej multajn teologiajn kaj spekulativajn ruzaĵojn, por povi devenigi la mondon de dio; restas ĉiam same: tio, kio igas la mondon mondo, la konkretaĵon konkretaĵo, la materion materio, estas io, kio ne povas esti simple klarigata kaj detaligata per teologio kaj filozofio — estas io nedivenebla, estas io ekzistanta, nur per si mem komprenebla, nur per si mem klarigebla.

El germana lingvo esperantigis,

ELISABETH BÜNEMANN.

Maja ĝojo.

Pentekosto, la ĉarma festo, venis. Arbaroj,
Kampoj verdas kaj floras. De montetoj, altaĵoj,
Arboj, bariloj la birdoj denove gaje ekkantas.
Ĉiu herbejo burĝonas je floroj bonodorantaj,
Feste serene brilas ĉielo, kolore la tero.

(Komenco de Reineke Fuchs, Bestepo de GOETHE).

La ruĝa flamo.

Nigra, sen atomo da lumarĝento la oceano. Tiam estas subite, kvazaŭ altiĝus de sube aŭtomate smaragdoverda, diverskoloriĝanta nubo el la akvoj. Orsteloj, grandaj kaj malgrandaj, estas enteksitaj. Kaj la tuta oceano vekigas al viva lumo... Marlumado... Miriadoj da etaj estaĵoj, parte unuĉeluloj de plej malalta speco, eligas la verdan briladon el sia vivanta korpamaso mem, kaj pli grandaj bestoj balanciĝas kiel brulantaj pinfruktoj kaj globoj en la ĝenerala tago. La vivo ekposedis la lumon, sur la propra korpo unue. Ĝis en la plej profundajn, plej terurajn faringojn de la oceano ĝi subenportas siajn flamojn. Ĉirkaŭ ruĝaj asterioj fluas sur la marfundo kvazaŭ verda herbejo de lumo, la bestkolonioj de la koraloj ŝajnas elektreblue traardigitaj, la submarfiŝo malakoste elpuŝas verdajn kaj flavajn lumradiojn rekte de sub la ricevanta lumorgano, la okulo. Supre, sur la tero, en nigra senluma praarbaro zumflugas samtempe la kukujo, la lumskrarabo, kies orverdaĵoj hodiaŭ ankoraŭ anstataŭigas lanternon kaj permesas legi librojn. Sed ankoraŭ grandega tempo, kaj tiam la ruĝa fajruflamo de l' homo....

Nigre-flavaj veteruboj amasiĝis. Furiozante kiel apokaliptika rajdisto la uragano bruas antaŭe. Kun elementa pezo ĝi enrompis en la krakantan branĉaron de l' praarbaro, kiun ne atingis jam la kulturo. Putraj trunkoj, velkaj kiel

tindro, kiujn nur la rampajaro de plektiĝvegetaĵoj apogas ankoraŭ, sin movas fantome, ŝanceliĝas. Nun la ventego ĵetas sin en la liberan kampon, ĉion fleksante, en ondoj metante antaŭ ŝi. Sekaj kardoj krakas, ĉe la marĉlago tintas kaj bruas la bruna kanaro kaj jukaro. Nun sulfurŝajne ekfulmas, tondradas, kaj larĝen oni vidas ruĝan lumadon. La granda kverko, la apogiĝantaj putraj arboruinoj brulas, la praarbaro fumas kaj vaporas. Kaj la vento ĵetas la fajron en la sekan stepon. Vaste sur la horizonto grandega sangruĝa fajrgarbo. Grandaj bestoj piedbatante preterrapidas, fortimigitaj birdoj bruflugas kiel nigraj ombroj antaŭ la fajra helo. Sed nun subite disrompiĝas la minacanta nubosako. Senfina pluvado. La flamo sufokiĝas en blanka fumaĵo. Kaj la flava nubaro disiĝas. Blua ĉielo. La lasta fumaĵo malaperas kun la noktonuboj, la brulejo iĝas alirebla. Tiam revenas bestoj ĉiuspecaj, allogitaj per la delikata akiraĵo, ĉie karbigintaj, ekbruletintaj, rostitaj korpoj. Rabobestoj alproksimiĝas. Remaĉantoj lekas la salan cindron kaj sin varmigas sur la agrable hejtita kampo. Sed ankoraŭ speciala estaĵo la fajron spertis kaj uzis.

Nokto venis, nur la kvietaj steloj radias.... En neatingebla arbarprofundo flugas lampiroj... Sed tie ankaŭ ruĝa flamo lumas ĉiam ankoraŭ. Sole, malproksime de l' granda brulado. La homo ĝin savis. Kun senfina zorgado li ĝin gardas. La sovaĝaj lupoj nur hodiaŭ havas senpene rostaĵon, kiu estas pretigita en delikata nigra salkrusto. Li ĝin havos daŭre, kiam la flamo restos ĉe li. Ĉiam ree la ĉasaĵo, kiun lia sago mortigos, estos rostata sammaniere ĉe ĉi tiu mirinda flamo, lia flamo. Kaj la rostita viando, la bakita fiŝo konserviĝos, pli longe ol iam estis ebla. Sankta posedaĵo estas la flamo. La migranto devas ĝin kunporti kiel talismanon kaj li trovas kiel la mistera benanta aĵo devas esti konservata. En kavan bastontubon oni metas subbruletantan lignamelon. Por krei tian amelon ligno estas polvigata, unu peco borata en a alian. Tiam produktiĝas la lignamelo, ekardiĝas, subbruletas kaj karbigas jam de mem, laŭ la leĝoj de l' transformado de movado en varmon — hodiaŭ nur ili kiel tiaj malkaŝiĝis al ni — kaj la homo komprenas, ke oni povas la fajron ne nur konservi, sed ankaŭ ekestigi! Li uzas la fajrstonon por elĵetigi fajrerojn, kiuj kun la tindro ekestigas la flamon.

Kaj nun la ruĝa flamo ardas, ardas, kiam ajn la homo volas kaj kie li volas. Prometeo li estas, kiu portas la ĉiellumigilon en kava bastono, ne plu blinda besto, kiu nur rabajeme atendas, kiam la stepoj brulas, unu fojon ĝuas la benon de la flamo, sed neniam scias ĝin trovi...

(Esperantigis J. L.)

LA SOCIETO.

Sendu senprokraste la proponojn diskutotajn en la ĝenerala kunveno dum la kongreso en Bern. En la tagordo estas jam enskribitaj:

1e. La politiko en Libera Penso: celo kaj agado de nia societo.

2e. Propono de D-ro Uhlmann, societano, kiel direktoro de la gazeto Homaro, pri alprenado de tiu gazeto kiel oficiala organo de L. P. kaj kunfandiĝo en ĝin de nia bulteno.

3e. Estas anoncita propono de la Antverpena sekcio pri rabato de kotizo al la lokaj sekcioj.

Ni atendas respondon de la organiza komitato de la Naŭa pri tempo rezervota al niaj kunvenoj.

La svisaj membroj bonvolu helpi nin por interrilatiĝo kun la Bernaj liberpensaj societoj.

Novaj aliĝoj.

S-ro Camille Chandelliez, 69 rue des Noes, Troyes, Franc.
S-ro H. Shaw, Fernleigh villa, Leabrook (Alfreton, Derbyshire) Anglujo.

S-ro F. W. Shaw, 40 Gresham st., Coventry, Anglujo.
S-ro F. J. Strong, 19 Chester st., Coventry, Anglujo.

Eksiĝoj.

Dons (mortis), Niedzwiedzki (mortis), Chyla, Dietl, Sedmik (sen adreso), Rambousek (s. a.), Morawetz (s. a.), Teltschik (s. a.), Bornstein (s. a.), Meyer (s. a.), Schreyer (s. a.), Aerts, Apers, s-ino Ceuleers, Coremans, Dollez, Joris, Melis, Nabbe, Schellens, Scheveneels, Barend Schoen, Van den Ostende, A. van Dessel, E. van Dessel, Van de Voorde, s-ino Weisz.

Entute 200 membroj.

Ŝanĝoj de adreso.

S-ro N. P. Evstifeieff, Tavriĉeskaja 7, Kv. II, S. Peterburgo.
S-ro J. Mariette, havenestro, Ti-kalon, Hennebont (Morbihan), Francujo.

D-ro F. Uhlmann, Schussenried, Württemberg.

Kaso Marto 1913.

Enspezoj:			
Reportite			Fr. 231 20
Kotizaĵo	1912 kaj 1913 de Cornet	-	5
"	1913 de Ladevèze	-	2,50
	Lorek	-	2,40
	Cros	-	5
	Fasce	-	2,65
	1912 Dauphin	-	2,50
	1913 Mathieu & Renard	-	10
	Vilho Setala	-	2,50
	Bünemann & S-ino,		
	kun reguligo de		
	konto	-	3
	Ivansky & S-ino	-	5
	Shaw H.	-	5
	Sume		Fr. 276,70
Elspezoj:	Al s-ro Fridrich por dissendo		Fr. 5,05
	Al s-ro Nutters preso & afrank. Jan. & Febr.		- 53,50
	Sume		Fr. 58,55
En kaso Fr. 218,15 (Sm. 86,37).			

Aprilo 1913.

Enspezoj:			
Reportite			Fr. 218,15
Kotizaĵo	1913 de Perret	-	5
	Uhlmann	-	2,50
	Collot, Lobbedez, Depardieu	-	7,50
	1912 de Blangarin	-	2,50
	1912 & 1913 de Grosset	-	5
	Sume		Fr. 240,65
Elspezoj:	Poŝtmarkoj		- 3
En kaso Fr. 237,65 (Sm. 94,09).			

ANONCO.

LONDONO.

PENSIO POR GESINJOROJ.

Ĉiuj hejmaj komfortoj, bano. Moderaj prezoj: de Sm. 10 ĝis 12,50 ĉiusemajne, enkalkulante ĉion. Oni parolas angla esperante kaj france. D-ro O'CONNOR instruas la anglan lingvon al alilanduloj

Adreso: Madame O'CONNOR, Esperanto House, 17 Se Square, Bayswater, London W.

CAMILLE CHANDELLIEZ, studento, 23 jara, 69, rue des Noes, Troyes, Franc., deziras en ĉiu lando kleran esperantistan korespondanton aŭ korespondantinon, liberpensulon, por leteroj pri Esperanto, socia vivo, moroj, k.t.p.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 Sm. (Fr. 2.50)

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

En Parizo, kotizojn kaj aliĝojn ricevas S-ro GUILLEMIN, kaj S-ro DAUPHIN (Librejo HACHETTE).

Diderot.

La francaj liberpensuloj kaj la tutmonda liberpensularo baldaŭ festos la centjaran jubileon de Diderot. Tiu glora filozofo, iniciatinto kaj ĉefa aŭtoro de la Enciklopedio, admirinda pro ĉiuspecaj verkoj kaj plej bela karaktero, naskiĝis en Langres la 6-an de Oktobro 1713, kaj mortis en Parizo 1784.

Unuigante nian voĉon al la dankaj aklamoj de la liberaj spiritoj el ĉiu nacio, LIBERA PENSO aperigos tradukon de plej interesaj paĝoj de l' sentima geniulo.

Hodiaŭ ni prezentas nur pecojn el la memorskriboj de S-ino de Vandeul, lia filino, pri sia patro.

Memoroj pri Diderot.

Ĉiuj liaj gustoj estis simplaj: sen lukso, sen ŝuldoj, sen negocoj, sen ambicio, li estis konvinkita, ke la plej granda servo farebla al la homoj estas plivastigi iliajn koniaĵojn; la liaj apartenis al ĉiuj. Li multe laboris; tamen la tri kvaronoj de lia vivo estis uzataj por helpi ĉiujn, kiuj bezonis lian monon, liajn talentojn kaj liajn klopodojn: mi vidis lian skriboĉambron dum tridek jaroj esti nur butikoj, kie la klientoj sin sekvis....

Ian matenon alvenas junulo kun manuskripto; li petas mian patron, ke li bonvolu legi ĝin kaj notu marĝene siajn rimarkojn; ĝi estis akra satiro de lia persono kaj de liaj verkoj. La junulo revenas. „Sinjoro, diras al li mia patro, mi ne konas vin, mi neniam povis malutili al vi; ĉu vi povus sciigi al mi la motivon, pro kiu vi legis al mi satiron unuafoje en mia vivo? Mi kutime ĵetas tiaspecajn verkojn en mian paperkorbon.” — „Mi ne havas panon; mi esperis, ke vi donos al mi kelkajn ormonerojn por ne presigi ĝin.” — „Vi ne estas la unua verkisto, kies silenton oni plezure pagus; sed vi povas tiri plibonon profiton de tiu rapsodio. La frato de lia Moŝto la Duko de Orleans estas rifuĝinta en la monaĥejo de Sanktulino-Genovefo; li estas piulo; li malamas min; dediĉu al li vian satiron, bindigu ĝin kun lia blazon-sildo; portu al li tiun libron ian matenon, kaj vi recivos de li kelkan helpon.” — „Sed mi ne konas tiun princon, kaj la dediĉa letero ĝenas min.” — „Sidu tie, kaj mi tuj ĝin faros al vi”. Mia patro verkas la leteron; la aŭtoro prenas ĝin, iras al la princo, ricevas de li dudekkvin ormonerojn, kaj revenas kelkajn tagojn poste danki mian patron, kiu dolĉe konsilis al li alpreni laborspecon malpli malnobligan.

La 19-an de Februaro 1784, li estis atakata de forta sangakraĉo. „Jen estas finite, li diris al mi, ni devas disiĝi; mi estas forta, tio eble ne okazos post du tagoj, sed du semajnoj, sed du monatoj, unu jaro...” Mi tiel kutimis kredi lin, ke mi ne dubis unu momenton pri tiu veraĵo; kaj dum la tempo de lia malsano, mi alvenis ĉe li nur tremante, kaj mi eliris nur kun la penso, ke mi ne plu revidos lin... La okan tagon, li babilis, lia kapo konfuziĝis; li faris frazon kontraŭsence, li rimarkis tion, rekomencis ĝin kaj ankaŭ eraris; tiam li leviĝis. „Apopleksio” li diris al mi, rigardante sin en spegulo kaj montrante al mi sian buŝon kiu turniĝis iom, kaj unu manon malvarman kaj senmovan. Li transiras en sian ĉambron, sin metas sur sian liton, kisas mian patrinon, diras al ŝi adiaŭ; kisas min, diras al mi adiaŭ; klarigas la lokon, kie oni trovos kelkajn librojn, kiuj ne apartenis al li, kaj ĉesas paroli. Li sola konservis sian pensordon, ĉiuj aliaj estis perdintaj ĝin....

La pastro de l' preĝejo de Sanktulo-Sulpico eksciis lian malsanon kaj vizitis lin. Mia patro akceptis lin bonege, laŭdis lin pri liaj institucioj por la helpado de l' mizeruloj, kaj parolis al li senĉese pri la bonfaroj faritaj de li kaj de tiuj ankoraŭ farataj; li rekomendis al li la malriĉulojn de sia kvartalo kaj la pastro helpis ilin. Li venis viziti mian patron du aŭ trifoje ĉiusemajne, sed ili havis kune nenium apartan konversacion; tiel la teologiaj temoj povis esti traktataj neniel alie ol la ceteraj, kiel decas bonsocietulojn. Mia patro ne serĉis tiun specon de temoj, sed li ne rifuzis ilin. Ian tagon kiam ili akordiĝis pri kelkaj punktoj de moralo rilataj al la humaneco kaj al la bonfarado, la pastro riskis komprenigi, ke, se li presigus tiujn sentencojn kaj malgrandan malkonfeson de siaj verkoj, tio farus belegan sensacion en la mondo. — „Mi same pensas, Sinjoro Pastro, sed konfesu ke mi farus tiel senhontan mensogon”.

Mia patrino estus doninta sian vivon, por ke mia patro kredu; sed ŝi preferis morti, ol inciti lin fari eĉ unu agon, kiun ŝi povus konsideri kiel sakrilegio. Konvinkita, ke mia patro neniam ŝanĝos sian opinion, ŝi volus evitigi al li la persekutojn, kaj neniam ŝi lasis lin unu momenton sola antaŭ la pastro; ni gardis lin ambaŭ....

La korpo ĉiutage plimalfortiĝis; la kapo ne aliĝis; li estis tre konvinkita pri sia proksima fino, sed li ne plu parolis pri tio; li ne volis ĉagreni la personojn, kiujn li vidis dronantaj en la doloro; li okupiĝis pri tio, kio povis ilin distri aŭ trompeti; li volis aranĝi ĉiutage kelkajn novajn objektojn, li ordigis siajn gravuraĵojn. Unu tagon antaŭ lia morto oni al-

portis al li pli oportunan liron; la laboristoj maltrankviligis por loki ĝin. „Miaj amikoj, li diris, vi tre penas ja por meblo, kiu ne utilos kvar tagojn.” Li vespere akceptis siajn amikojn; la konversacio komencis pri la filozofio kaj la diversaj vojoj por atingi tiun scienccon. „La unua paŝo, li diris, estas la nekredo”. Tiu vorto estas la lasta, kiun li estas eldirinta antaŭ mi.

Trad. R. D.

Ne prokrastu la kotizon por 1913.

III. La sekreto de la homa piedo.

La simio, kiel tre unuflanka kaptanta kaj sin svinganta arbobesto bezonas malproportie longajn brakojn apud mallongaj kruroj. Ĉe la homo la brakoj male estas mallongaj dum la trunko bele supren elstreĉiĝas kaj la kruroj kiel plej majesta longajo altenigas la tuton. Kiam la arta ideala tipo ankoraŭ iomete longigas la krurojn, ĝi nur celas igi ĉiam pli puraj ĉi tiujn proporciojn. Ĉu ne estas kvazaŭ la arto volus forigi ĝuste la lastan postlasaĵon de simia karakterizo, samtempe konstatante, ke la simia resto ankoraŭ ĉiam en io ekzistas ĉe ni? En ĉi tiu rilato eĉ multe pli devas pensigi la aranĝo de la homa piedo: ĝi nepre ne estas malbela per si mem. Artistokuloj jam ĉiam ĝin juĝis ĉarma kaj admiris ĝian gracion.

Tamen ĉi tiu nuda homa piedo estas por sia fundamenta destino teknika kuriozaĵo, eĉ rekta malsencaĵo. Ĝi estas eble la plej stranga piedo por iri en la tuta vertebrula regno, kun sia granda piedfingro, sia plandvolbado, sia oblikva metado sur kalkano kaj piedpoleksdikiĝo. Tia piedo teknike havas duoblan destinon. Ĝi estas bazo, portanto de la pezo de l' supre balanciĝanta korpo kaj same depuŝilo, terfrapanto ĉe la formoviĝado. Kie la evolucio povis sekvi konsekvante kaj senmalhelpo ĉi tiun tendencon ĝi iris en la plej supra vertebrula regno preskaŭ senescepte unu firman kaj plej bonan vojon. Ĝi transformis la piedekstremon al perpendikulara malmola apoga kaj frapa kapajo sub la kruroj. Laŭforte ĝi samtempe altenigis la trunkon de l' piedo kaj entiris ĝin kun kalkano kaj plando en la kolono de l' kruro. Inter la komence ĉie ekzistinta piedfingraro ĝi laŭeble lokis la pezakson en la mezon, en la trian aŭ kvaran fingron kiel unuon, aŭ, kiel pleja ekstremo, eĉ tute en la mezan fingron. Kaj tiun ĉi dominantan mezan radion ĝi tiam enmetis en malmolan ŝtipon, la hufon. La ekstrema supro de tiu teknika linio estas la ĉevalo, kurante sole sur la meza fingro, kiu estas ĉirkaŭigita per la hufo kiel frapbulo. En kia grado praktika ĉi tiu metodo fakte estas, oni povas vidi en tio, ke ni kun nia kulturtekniko ĝin imitis poste ankoraŭ por nia piedo per estetike abomena, sed praktike tamen almenaŭ hodiaŭ ĉie venkanta neceshelpilo, la ŝuo. Ĝi liveras ankoraŭ al ni, kvankam terura por l' aspekto, la solidecon kaj unuecigon de la bulo de l' hufo kaj la kalkanumo donas la puŝan kaj apogan ŝtipon perpendikulare je la krurakso. Ĝuste ke ni per helpo de la instrumentkulturo ricevis la ŝuon, pruvas klare ke ĉe nia nuda piedo io ne estas en ordo, ke la naturtekniko tie ĉe ni iel lamis.

Kaj de la tekniko de l' irado efektive nur ekzistas unu sola solvo, ke en tiu okazo la harmonia evoluado de l' homa piedo malnovan heredinfluan, prapatran karakterizon ĝis nun ne kapablis plene subpremi. Kia heredaĵo sole ĝi povis esti ĉi tie estas evidenta. Tio, liberigita, ludetema, spiritigita,

kion la artistoj ĉiam jam admiris ĉe nia granda piedfingro, en specialaj kazoj multe superas la ordinaran mezuron. Deviga ekzercado tiom plialtigas la moveblon de tiu stranga fingro, ke bedaŭrindaj homoj kiuj naskiĝis sen manoj, fine lernis uzi la tranĉilon ĉe la manĝado kaj la pentro ĉe l' pentrado per la granda piedfingro. Kelkaj popoloj, kiel la Japanoj, sekve de malnova tradicio, faras tiajn artaĵojn tute ĝenerale. Sed ankoraŭ la malgranda kulturinfaneto ĝuste en la arto de l' piedfingrokaptado montras naturan talenton, kiu nur poste kutime reperdiĝas. Nerefuteble: la peco de heredaĵo, kiun nia piedo ĝis nun ne tute „digestis”, ne povas esti alia ol ke ankoraŭ ĝia granda piedfingro pli frue en sia funkciado estis polekso, ke ĝi estis parto de vera simia kaptopiedo.

Kiam la piedo entute fariĝis irilo, ĝi restis kiel fosilio, kiel ŝtoniĝo de l' organizado. Kaj ĝia persista ekzistado malhelpis la universalan transformadon de la piedo.

Fine tiu akomodigiĝis ankoraŭ tiel al la irado. La kalkano, la risortanta superkonstruo de l' tuto, la resto de l' antaŭa poleksdikiĝo donis iom post iom taŭgan apogon. Sed nealiigita la malnova suprenramporgano staris intere.

La irpiedo de l' homo de hodiaŭ do nun ankoraŭ estas nenio alia ol pli malpli pene kaj neperfekte por la irado transformita suprenrampiedo, simia piedo!

La aferon nun historie imagi al si: ke simio de pura suprenrampvivo unue malrapide, prove, sed ĉiam pli sukcese kaj persiste estas transirinta al la irado sur ebena tero, ne prezentas iajn malfacilaĵojn, se oni ekzamenas iom pli akurate certajn simiajn kutimojn eĉ en niaj tagoj. Estus ja ankoraŭ tute ne penseble, ke tiel lerta kaj same jam tiel inteligenta suprenrampulo kiel arbosimio sur ebena tero ne povus iel sin movi. Ke simioj ĉiam denove bezonas la teron estas same klare, eĉ se nur kiel ligilon inter pli malproksime starantaj arboj kaj arbaroj.

Tutaj regionoj de la tero estas karakterizitaj per tia maldensa arbetojaro. Ekzistas ankoraŭ simiaj bandoj, kiuj loĝas pli malpli nudan rokajon, kie rampado kaj kurado ĉiam kune estas necesaj, ekzemple la afrikaj pavianoj, kiuj centope malproksime de ĉiu arbo travagas la stepon.

Plej verŝajne tiam estas ke la „kvarmanulo” kuras kvarpiede. Sed jam ĉe la duonsimioj troviĝas okazaj malantaŭmankuruloj. Kaj strange ĝuste ekstremo de l' arbovivado sur la tero ĉiam ree kaŭzis tiun dumanan iradon, la ĉiam kreskanta longo de la grandaj branĉosvingiloj, la brakoj. Estaĵo kun mallongaj kruroj kaj longaj brakoj devas sur la tero tute aŭtomate iom post iom altenigi sian korpon. Se la brakoj estas tiel longaj kiel trunko kaj kruroj kune, la trunko devas sin starigi super la kruroj, por ke la mano atingu la saman ebenon kun la piedo por sin apogi. La kvaropirado fariĝas lamado, ĉe kio la irado estas fakte rekta kaj la brakoj nur servas kiel lambastonoj. Tiel kuras la homsimilaj simioj oranutano kaj ŝimpanso kaj ĝuste la posedanto de la plej longaj svingbrakoj kaj svingmanoj, la tielnomata ĝibono en tropa Azio, sur ebena tero kutime jam kuras tute sen „lambastonoj” kun liberaj brakoj kiel homo. Ĉi tiuj samaj ĝibonoj perfekte korekte kantas la tonskalon. Kiel facile estus, se tio kantanta besto kune-ligus al tute primitiva lingvo la diversajn afektajn, allogajn kaj avertajn sonojn, kiujn la simio sendube posedas! Nur certa spirita progreso estus necesa al tio....

Esperantigis J. L.

La vera patriotismo.

Parolado al la Pacifistoj, de s-ro G. SÉAILLES.

.... Se eŭropa milito ne eksplodis, se por la unua fojo en la historio la popoloj kontraŭmetis sian politikon al tiu de siaj estraroj, kiu kuraĝus diri, ke la agado de la pacifistoj neniel ĉe tio influis?

Sendube, oni sin detenas de milito super ĉio tial, ke oni timas la terurajn malfeliĉojn, kiujn ĝi alportus; sed mi ne vidas, malutilon ĉe tia efiko de la intereso kaj de la timo sur tiujn homojn, kiujn lasas indiferentaj la justeco. La scienco per siaj progresoj laboras kun vi, multobligante la detruilojn....

Oni kontraŭdiras, ke niaj esperoj estas ĥimeraj tial, ke milito estas natura leĝo. Sed kio karakterizas la homon estas precize, ke li ne estas pasiva estaĵo. La naturo, fariĝinte ĉe li konscio kaj volo, sin vidas, juĝas kaj aliformigas. La tuta civilizacio estas nur tiu volo, traduki homan penson en faktojn kvazaŭ en vivantajn lingvaĵojn.

La vakcinero de l' hidrofobio estas homa ideo efektiviĝanta de la naturo, kiun la spirito kaj la volo devigas. Milito estas fakto ĉiam ebla, sed ĝi estas malbonaĵo kiel pesto, kancero, tuberklozo; ĝin akcepti pasive anstataŭ labori por ĝin maloftigi kaj malaperigi estus perfido kontraŭ la spirito kaj vera malkuraĝo de la homo.

Sed kune kun la milito vi malaperigos la virtojn, kiujn ĝi naskos? Ne en humora verko mi legis tiun ĉi frazon: „La milito estas dia, tial ke ĝi elsprucigas ĉe la homa animo du el ĝiaj plej noblaj sentoj, la herocon de la batalantoj kaj la bonfaremon de la aliaj”.

Ni konfesu almenaŭ, ke la diablo partoprenas, kaj ni lasu al ĝi la respondecon pri disenterio, seksperforto, rabado kaj mortigo. Kial ni ne limigas nin al la preĝo por la bona uzo de la malsanoj; malfacile kaj bele estas kuraĝe suferi kaj morti en lito, kio estas nia komuna sorto. Ni ne timas perdi la malsanojn kaj kune kun ili la virtojn, kiujn ili de ni postulas, sed ĉe la alveninta momento, ni estas pretaj ilin praktiki. Ni ne alvokas la militon, sed ni ne estas el tiuj, kiuj ĝin kaŭzinte, konsentas hontigajn pacojn.

Rapidemaj junuloj prikantas sian propran herocon, antaŭ ol ili havis okazon ĝin pruvi; ili ankoraŭ verŝis por la patrujo nur la inkon, per kiu ili klopodis nigrigi pliaĝulojn, kiuj valoris pli multe ol ili. La grandaj heroaĵoj, kiujn ni plenumas en sonĝo, tro ofte liberigas nin el la konkretaj devoj, kies humilecon ni lasas al la aliaj. Oni povas dum kvardek jaroj morti por la patrujo, ne pli malbone fartante. Permesu la junularo al la maljunulo, kiu ĝin ĉiam amis, montri al ĝi tute proksiman de ĝi kaj facile atingeblan, simplan, modestan, ne sin montremantan herocon, kiu ne atendas por ekzerciĝadi, la renversado de la mondo. La grandeco de lando ne estas taksinda po kvadrat-kilometroj; por paco kiel por milito homoj estas bezonataj; la junuloj respektu dum sia junaĝo la morgaŭan generacion; jam antaŭ si mem ili faru promeson fondi familion, voli ĝin multnombra, akcepti la malfacilan, laborigan vivon, la seriozajn ĝojojn, la ĉiutagajn zorgojn, kiujn donas la edukado de la infanoj; pro amo al patrujo, ili konscie elektis la krudan vojon, kiun oni silente supreniras, ne petante la atenton de la amaso per belaj gestoj. La unua venko, kiun de ili postulas la patrujo, estas venko kontraŭ la egoismo, kontraŭ tiu malkuraĝo antaŭ la vivo pro kiu honti oni eĉ ne pensas. Ni ne ankoraŭ

povas decidi, mi ne diras pri ilia sincereco, sed pri la profundeco de iliaj sentoj; oni juĝos ilin morgaŭ laŭ ilia civitana konduto.

Alia tasko, kiu ne toleras prokraston, alvokas ilin: la batalo kontraŭ alkoholismo, nacia danĝero, kiu atakas la vivajn fontojn de la gentoj, plenigas la malliberejojn kaj rifuĝejojn, multobligas la krimojn, kondamnas la virinojn al mizero, la infanojn al idioteco, minacas niajn demokratarojn per nekuraĉebla defaliĝo; tutaj provincojn ni bezonas al-militi — per kiaj penadoj! — kontraŭ tiu malamiko des pli timinda, ke ĝi ekzercadas siajn ruinigojn kun la konsento de ĝiaj viktimoj. Patrioto ne estas tiu, kiu faras el patrujo temon por deklamado; vera patrioto amas la patrujojn kun respekto, kun seriozececo, per sia tuta animo; li ne trenas ĝin al la malbonaj loĝejoj, — oni ne prikantas la virtojn de la patrino sur la scenejo de kantodrinkejo, — li pripensas malpli ĝin flati ol ĝin servi, li volas ĝin ne nur forta, sed justa; voli justecon estas principo de forto, ĉar tio supozas, kun la regado de si mem, la venkon de la nevenkeblaj kontraŭaĵoj; vera patrioto ne estas preta, pro ŝato al la emocioj kaj aventuroj, loti la distigon de la patrujo kvazaŭ kartlude ĉe la sorto de milito aŭ de hazardo.

Mi ne komprenas la atakojn kontraŭ vi, pacifistoj. La principoj, kiujn vi alvokas, kies necesajn konsekvencojn vi nur eltiras, estas komunaj al vi kaj al viaj kontraŭuloj. La devo ne fari al ni mem justecon propramane, anstataŭigi la individuajn pasiojn per senpartia leĝo, submeti la malkonsentojn al arbitracio, estas la unua socia devo. Pacifismo estas nur la volo pligrandigi la juron ĝis la internaciaj rilatoj. Sed oni ne povas enfermi la juron en arbitrajn limojn. Se ĉiu laŭkaprice povas fiksi tiujn limojn, en nomo de kio, en nomo de kiu principo, oni kondamnas la perforton ĉe la ekonomiaj malkonsentoj, malakceptas tiun formon de milito, kiu estas la batalado de sociaj klasoj kaj, por doni al ĝi la veran nomon, la civilan militon? Ni atentu, ke la popolo altiĝas al la pripensado kaj juĝas tiujn, kiuj pretendas ĝin konduki.... Kial tiuj, kiuj senĉese ripetadas, kiel dian ordonon: „Amu vin unuj la aliajn”, ne estas inter vi? Jes aŭ ne, ĉu la homoj estas filoj de sama Dio, infanoj de sama patro? Ne per vanaj paroloj, per faktoj oni pruvas tiajn veraĵojn, aŭ almenaŭ komencas ilin pruvi. La milito glorata, diĝata, estas la reveno al la politeismo sub ĝia plej malaminda formo. Ni ne estas el tiuj, kiuj submetiĝe akceptas, ke la alte moralaj kaj religiaj veroj, proklamitaj de la homaro per buŝo de ĝiaj plej noblaj reprezentantoj, estas nur mensogoj kaj hipokritajoj.

Postulante la pacon per la juro, vi reprezentas la senkaŝecon kaj la sincerecon. Al tiuj, kiuj kulpigas vin, ke vi „ŝafblekas la pacon”, mi respondas, ke la hundoj kiuj bojas neniam estas tre timindaj. La rajto pri justa defendo estas unu el la formoj de Justeco; mi pretendas ĝin praktiki senkondiĉe. Se la tago, kiun ni ne alvokas, alvenus, la homoj silentaj kaj decidaj sciis altrudi, mi tion firme esperas, al tiuj kiuj estas laciĝintaj per parado da paroloj, gestoj kaj krioj, sian volon iri ĝis la lastaj oferoj, nenion cedi, ĉion perdi por ĉion savi.

Tion bone kompreniginte mi aldonas, ke vi, servantoj de la rajto, rigardante al la estonteco, laborante fari ĝin pli bona, vi estas bonaj kaj bravaj Francoj, laŭ la veraj tradicioj de tiu ĉi lando, fidelaj al la spirito de justeco kaj sindonemo, kiun ĝi havas la honoron reprezentanti en la mondo kaj pro kiu sin turnas al ĝi la subpremitoj. La galla koko ne estas nokto-birdo: kiam ĝi ne plu anoncos la sunleviĝon, ĝi ĉesos kanti.

Tr. PAŬ-Li.

GABRIEL SÉAILLES.

La ĉeno de Sankta Petro.

Al miaj pekaj manoj alvenas parfumita koverto. Interne estas preĝo rekomendita de la ĉefpastroj. Ĝin akompanas tre kuriozaj admonoj. Por atingi baldaŭnan feliĉon, sufiĉas parkerdiri la preĝon naŭfoje kaj ĝin sendi anonime sub koverto al aliaj naŭ personoj, kun minaco, ke se oni ĝin ne preĝdiros, povas alveni malfeliĉo (ruino, morto de filo, grava malsano, k.c.). Timemaj sinjorinoj rapidas skribi la naŭ anonimajn, kiu baldaŭ fariĝos naŭoble naŭ ĝis senfine. Tion ĉi oni nomas „la ĉeno de Sankta Petro”.

Tre lerte, ĉu ne? Unue oni incitas ĉe la homoj la mistikan fervoron, tiel konvenaj al tiuj, kiuj per ĝi vivas kaj prosperas Sen ŝafaro ne estas paŝtistoj. Poste oni incitas la prozelitismojn, kiu kreite, povas utili al politikaj aŭ ekonomiaj celoj. Fine oni kutimigas la virinon laboradi en ombro, praktiki la anonimskribon kaj eniri en la ne-siajn hejmojn kun la sugestio kaj la minaco kiel armiloj. Ĉu tian sistemon malŝatus „Tartufo”, „Pantoja” aŭ „Don Bruno” de „Piafekta edzino kaj malfidela edzo?”

Mi nek ridetis nek indignis, sed min turminte al mia edzino, mi demandis ŝin: „Kaj nun, mia kara, kion vi faros?” Kaj ŝi respondis:

„Mi ne donos konsilon, kiun oni de ni ne petas; mi ne eniros en domon, al kiu oni min ne alvokas.

Mi ne skribos leteron, kiun mi ne povas subskribi, nek mi faros rekomendojn, kiujn mi ne povas eldiri laŭte kaj pri kiuj mia konduto ne estas atestanto.

Mi neniam incitos per promesoj nek ekscitos per minacoj tiujn, kiuj meritigas, kiel homoj, sin direkti laŭ propra lumo.

Mi ne faros el la nomo de Dio allogaĵojn, nek el lia hejmo industrion, nek el lia kulto malrespekton.

Mi ne faros min blinda gvidanto de blinduloj, nek mi konservos ĉe mi la ŝlosilojn de la temploj de vero.

Mi ne juĝos, por ne esti juĝata; mi ne kondamnos, por ne esti kondamnata; mi pardonos, por esti pardonata.

La aferoj, kiujn oni diras en mallumo, devas esti praktikataj sub la lumo; kaj tiuj, kiujn oni diras en la orelo, devas esti proklamataj sur la tegmentoj.

Ĉar oni ne metas la lumon sub la mezurilon, sed sur la kandelionon.

Do mi ne laborados en la mallumo nek diros aliajn vortojn ol tiujn, kiuj eliras el la plenegeco de la koro”.

Mi aŭskultis plezurege... Nun, ni atendu la katastrofon...

Sed, kia plej granda malfeliĉo ol ne aŭskulti la propran konsciencon... turni orelo al anonimaj voĉoj kaj ne obei tiujn de la instinkto edukita de la racio?...

Aliaj kopios la preĝon, sed iliaj animoj ne estos de si mem altiĝintaj je unu colo...

Tr. P. L.

(Antonio Zozaya).

LA SOCIETO.

Novaj Aliĝoj.

Sro J. Ludvig, distrikta juĝista, Milevsko, Bohemujo.

Ŝanĝitaj adresoj.

Sro A. Czubrynski, Dietta 88, Krakow.

Sro P. D. Belikov, Fergan, obl. kv. Turnaeva, Skobelev, Azia Ruslando.

Kaso Majo 1913.

Enspezoj:

Por pluaj Nroj de Sro H. Shaw	Fr. 5
Kotizaĵo 1911 & 12 de Gasse kun	
enkasiga elspezo	5,30
" 1912 de Bouvier	2,85
" Crow, Morin, Saunders „	7,70
" 1913 Ludvik	2,40
Reportite	237,65
Sume	Fr. 260,90

Enspezoj: Poŝtmarkoj 5

Restas en kaso Fr. 255,90 Sm. 101,308.

* * *

Loka Grupo de Antwerpen.

Prezidanto, Sro Weisz, Vicprez. Sro Fr. Schoofs.

Novan kurson komencis Sro Schoofs al 25 lernantoj.

Multaj membroj ekŝiĝis pro troa elteco de la kotizaĵo, kaj la Grupo baldaŭ proponos rabaton de la sumo pagota al la centra kaso de LIBERA PENSO de la membroj de loka sekcio.

Kotizis por 1912 Bestermann, Ceuleers, Drion, Engels, Jacobs, Fino Nabbe, Peeters, Prat, Poe, Salomon, Schoofs, Timpermann & Fino, Uyttenbroek, Van As, Van Gansen, Weisz, Willekens.

En arbaro.

Mi ripozas en arbaro,
Malproksime de l' homaro,
Kie kantas la birdetoj,
Kie ĉirpas la griletoj.

Aŭdas mi skarabojn zumi
Kaj la certajn serpentumi.
Gaje saltas kapreolo,
Laŭte vokas la kukolo.

Tie fungoj kaŝe staras,
Vojon la frambujoj baras,
Jen ĉielen kreskas fagoj
Kaj por manĝi logas fragoj.

(Laŭ W. SCHOLZ laŭmemore citita).

ANONCO.

LONDONO.

PENSIO POR GESINJOROJ.

Ĉiuj hejmaj komfortoj, bano. Moderaj prezoj: de Sm. 10 ĝis 12,50 ĉiusemajne, enalkulante ĉion. Oni parolas angla esperante kaj france. D-ro O'CONNOR instruas la anglan lingvon al alilanduloj.

Adreso: Madame O'CONNOR, Esperanto House, 17 Se Square, Bayswater, London W.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 Sm. (Fr. 2.50)

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

En Parizo, kotizojn kaj aliĝojn ricevas S-ro GUILLEMIN, kaj S-ro DAUPHIN (Librejo HACHETTE).

POR NIAJ IDOJ.

En la antikvaj tempoj vivis popolo, kiu pasie amis la belon. Kaj belaj estis tiuj homoj, la grekoj, bela ilia maro kun marmoraj insuloj, bela ilia ĉielo kun eterne pura lumo. Ĉe ili okazas la jena sceneto gracie pentrita de moderna franca poeto:

PANIĤIS.

El ANDRÉ CHÉNIER (1751—1780.)

Kelkaj junulinoj ĉirkaŭas infaneton, karesas lin: — Oni diras, ke ci faris kanteton por Paniĥis, cia kuzino? — Jes, mi amas ŝin, Paniĥis. Ŝi estas bela; ŝi estas kvinjara, kiel mi. Ni rondigis tiun laŭbon el rozarbetoj. Ni promenas sub tiu ombraĵo... Mi donacis al ŝi statuon de Venus, kiun mia patro faris al mi el bukso; ŝi nomas ŝin sia filino, ŝi kuŝigas ŝin sur folioj en granatŝelo... — Nu, kantu al ni cian kanteton, kaj ni donos al ci vinberojn, mielajn figojn.

— Unue donu ĝin, kaj poste mi ekkantos...

Li prezentas siajn ambaŭ manojn... Oni donas... kaj poste...

Per klara dolĉa voĉo, li tuj kantas jen:

„Ho bela Paniĥis, ci devas ja min ami:
Al ni tegmento sama samaj aĝoj estas.
Min vidu, kiel nun mi estas granda, bela!
Hieraŭ venis mi al mia kaprideto:
Je l' nomo de Minervo! li apenaŭ povis
altigi sian kapon ĝis la kapo mia.
El nuksoŝelo mi fabrikis rifuĝejon
Por bela skarabego kun lazuraj briloj;
Sur lano kuŝas ĝi; al ci mi ĝin destinas
Matene ĵus mi trovis inter maraj algoj
Ho! vastan konkon rozan kun ĉielkoloroj;
En ĝi ni metos teron kaj kreskigos florojn.
Mi volas antaŭ ci flosigi tuj ŝiparon.
Ĵetante sur la lagon multajn kverkoŝelojn.
La hejma hundo estas tiel milda! dorse
Ĝi mole portos cin sidantan, je l' vespero;
Kaj mi, paŝante rekte ĝis dometo nia,
Mi gvidos la kurbeston al ci obeeman.”

Trad. R. D.

El „Filozofiaj Pensoj” de Diderot (1746).

Oni senfine deklamas kontraŭ la pasioj; oni aljuĝas al ili ĉiujn dolorojn de la homo, kaj oni forgesas, ke ili estas ankaŭ la fonto de ĉiuj liaj plezuroj. Ili estas en lia konsisto elemento, pri kiu oni ne povas paroli ĉu tro bone, ĉu tro malbone. Sed kio min ĉagrenas, tio estas, ke oni neniam konsideras ilin alie ol je la malbona flanko. Oni pensus insulti la prudenton, se oni dirus unu vorton favore por ĝiaj konkurantoj; tamen estas nur la pasioj, kaj la grandaj pasioj, kiuj povas levi la animon al la granda. Sen ili, nenia plu altego, ĉu en la moroj, ĉu en la verkoj; la belartoj revenas en infanecon, kaj la virto fariĝas malgrandama.

Estus do feliĉo, oni diros, havi pasiojn fortajn. Jes, sendube, se ĉiuj estas akordaj. Starigu inter ili ĝustan harmonion, kaj ne timu de ili malordon. Se la espero estas ekvilibrata per la timo, la honorsentemo per la amo al la vivo, la voluptemo per la zorgo pri la sano, vi vidos nek malĉastulojn, nek sentimegulojn, nek malkuraĝulojn.

Estas plej plena malsaĝo, intenci la ruinigon de l' pasioj. Bela projekto, tiu de piulo, kiu turmentas sin kiel frenezulo por nenion deziri, nenion ami, nenion senti, kaj kiu fine fariĝus vere monstro, se li sukcesus!

Kiuj voĉoj! kiuj krioj! kiuj ĝemoj! Kiu enfermis en tiuj karceroj ĉiujn tiujn plorantajn kadavrojn? Kiujn krimojn faris tiuj mizeruloj? Unuj frapas al si la bruston per ŝtonegoj; aliaj disŝiras al si la korpon per feraj ungoj; ĉiuj havas la bedaŭrojn, la doloron kaj la morton en la okuloj. Kiu kondamnas ilin je tiuj turmentoj?... La Dio, kiun ili ofendis... Kiu do estas tiu Dio? Dio plena je boneco... Ĉu Dio plena je boneco plezuriĝus banante sin en larmoj? Ĉu la teruroj ne estus insulto al lia pardonemo? Se krimuloj devus kvietigi furiozon de tirano, kion plu ili farus?

Pro la portreto de la Superega Estaĵo, kiun oni prezentas al mi, pro lia kolerego, pro la severegego de liaj venĝoj, pro iaj komparoj kiuj esprimas al ni per nombroj la rilaton de tiuj, kiujn li lasas pereji, kun

tiuj, al kiuj li bonvolas etendi la manon, la plej rekta animo inklinus deziri, ke li ne ekzistu.

Iam oni demandis iun, ĉu estas vere ateistoj? Ĉu vi kredas, li respondis, ke estas vere kristanoj?

Duona skeptikismo estas signo de malforta spirito; ĝi vidigas malkuraĝan rezonanton, kiu sin lasas timigi de la konsekvencoj; superstiĉulon, kiu pensas honorisian dion per la bariloj, kiujn li metas al sia racio; iaspecan nekredanton, kiu timas senmaskigi sin mem: ĉar, se la vero povas nenion perdi per ekzameno, kiel estas konvinkita la duonskeptikulo, kion li pensas korfunde pri tiuj privilegiaj ideoj, kiujn li timas esplori, kaj kiuj estas lokitaj en anguleto de lia cerbo, kiel en sanktejo, al kiu li ne kuraĝas alproksimiĝi?

Estu permesata al mi tie prezenti kelkajn fragmentojn de edikto de imperiestro Juliano; ili karakterizos mirinde la spiriton de tiu monarĥo filozofo, kaj la emon de la fervoruloj tiutempaj.

„Mi estis opiniinta, diras Juliano, ke la estroj de l' Galileanoj sentos, kiom mia agmaniero estas diferenca de tiu de mia antaŭulo, kaj ke ili estos iom dankaj al mi: ili suferis sub lia regado ekzilon kaj malliberecon; kaj oni glavmortigis multegon da tiuj, kiujn ili inter si nomas hereziuloj. Sub la mia, oni revokis la ekzilojn, ellasis la malliberulojn, kaj restarigis la elpelitojn en la posedon de iliaj havaĵoj. Sed tia estas la malkvieteco kaj la furiozo de tiu speco de homoj, ke, post kiam ili perdis la privilegion manĝegi unuj la aliajn, turmenti tiujn, kiuj estas ligitaj al iliaj dogmoj, kaj tiujn, kiuj sekvas la religion permesatan de la leĝoj, ili delasas neniun rimedon, forpasigas neniun okazon por instigi ribelojn; homoj sen respekto al la vera pieco, sen obo al niaj konstitucioj... Tamen ni ne ordonas, ke oni trenu ilin al niaj altaroj, kaj ke oni perfortu ilin... Pri la suba popolo, ŝajnas ke estas liaj estroj, kiuj ekscitas en ĉi la ribelemon; furiozante pro la limoj, kiujn ni metis al ilia povo; ĉar ni elpelis ilin de niaj tribunaloj, kaj ili ne plu havas la oportunecon disponi la testamentojn, anstataŭi la laŭleĝajn heredantojn, kaj kapti la heredantojn... Tial ni malpermesas al tiu popolo tumulte kunveni, kaj intrigi ĉe siaj ribelaj pastroj... Tiu edikto sendanĝerigu niajn magistratojn, kiujn la ribeluloj multfoje insultis, kaj riskigis ŝtonbatiĝi... Ili pace iru ĉe siaj estroj, ili tie preĝu, ili tie instruiĝu kaj plenumu la kulton, de ili ricevitan; ni permesas tion al ili: sed ili forlasu ĉiun ribelan projekton... Se tiuj kunvenoj estos al ili okazo por ribelo, ili mem estos riskaj kaj respondaj, mi ilin avertas... Nekredantaj popoloj, pace vivu... Kaj vi, kiuj restis fidelaj al la religio de via lando kaj al la dioj de via patroj, ne persekutu najbarojn, kuncivitanojn, kies nescio estas ja pli kompatinda, ol malboneco mallaŭdinda... Per la rezono, ne per la perforto oni devas rekonduki la homojn al la vero. Ni do ordonas al vi ĉiuj, niaj fidelaj subuloj, lasi trankvilaj la Galileanojn.”

Tuta popolo, vi diros al mi, estas atestanto de tiu fakto: ĉu vi maltimos nei ĝin? Jes, mi maltimos, ĉiam

kiam ĝi ne estos certigata al mi per la aŭtoritato de iu, kiu ne estu el via partio, kaj kiam mi ne scios, ĉu tiu iu estis nekapabla je fanatikeco kaj trompiĝo. Eĉ plie. Aŭtoro konfesite nepartiema rakontu al mi, ke abismo malfermiĝis meze en urbo; ke la dioj, konsultitaj pri tiu okazo respondis, ke ĝi refermiĝos, se oni ĵetos en ĝin tion, kion oni posedas plej multvaloran; ke brava kavaliro sin ĵetis tien, kaj ke la oraklo plenumiĝis: mi kredos lin multe malpli, ol se li estus ĉirinta nur, ke abismo malfermiĝis kaj ke oni uzis tempon kaj laboron grandajn por ĝin plenigi. Ju malpli fakto estas versimila, despli multe la atesto de l' historio perdas da sia pezo. Mi facile kredus unu solan honestulon, kiu anoncus al mi ke „lia Reĝa Moŝto ĵus plene venkbatis la liganojn”; sed eĉ se la tuta Parizanaro asertus al mi, ke mortinto ĵus reviviĝis en Passy, mi tute ne ĝin kredus. Se historiisto nin trompas, aŭ se tuta popolo eraras, tio ne estas mirakloj.

Ĉiuj popoloj havas tiajn faktojn, al kiuj mankas, por esti mirindaj, nur esti veraj; per kiuj oni pruvas ĉion, sed kiujn oni ne pruvas; kiujn oni ne maltimas nei sen malpieco, kaj kiujn oni ne povas kredi sen malspriteco.

Oni ĉiutage diras al nekredantoj: „Kiu vi estas, por ataki religion, kiun la famaj Paŭlo, Tertulliano, Athanazo, Ĥrisostomo, Aŭgusteno, Cipriano kaj tiom da gloraj homoj tiel kuraĝe defendis? Sendube vi ekvidis ian malfacilecon, kiun ne rimarkis tiuj superaj geniuloj? Montru do al ni, ke vi scias plimulte ol ili; aŭ oferu viajn dubojn al iliaj decidoj, se vi konsentas, ke ili scias plimulte ol vi. Nesperioza rezono. La klereco de l' pastroj ne estas pruvo pri la vereco de religio. Kiu kulto pli absurda, ol tiu de l' Egiptanoj, kaj kiuj pastroj pli kleraj?”

Vi prezentas al nekredanto volumon da skribaĵoj, kies diecon vi deklaras pravi al li. Sed antaŭ ol komenci la ekzamenon de viaj pruvoj, li nepre vin demandos pri tiu kolekto. Ĉu ĝi estis ĉiam sama? li demandos. Kial ĝi nun estas malpli ampleksa, ol ĝi estis antaŭ kelkaj jarcentoj? Laŭ kiu rajto oni elpelis de ĝi tiun ĉi aŭ tiun verkon, kiun alia sekto respektas, kaj oni konservis tiun alian, kiun ĝi forĵetis? Laŭ kiu pruvo vi preferis tiun manuskripton? Kio gvidis vin en la elekto, kiun vi faris, inter tiom da diversaj kopioj, kiuj estas evidentaj pruvoj ke tiuj sanktaj aŭtoroj ne estas transdonitaj al vi en sia devena kaj unua pureco? Sed se la nescio de l' kopiistoj, aŭ la malico de l' hereziuloj koruptis ilin, kiel vi necese konfesas, jen vi estas devigataj ilin restarigi en ilian naturan staton, antaŭ ol pravi ilian diecon; ĉar ne pri kolekto de difektitaj skribaĵoj estos farataj viaj pruvoj kaj mi starigos mian kredon. Nu, al kiu vi komisiis tiun reformon? Al la eklezio. Sed mi ne povas konsenti pri la neerareco de l' eklezio antaŭ ol la dieco de la Skribaĵoj estos pruvata al mi. Jen do mi estas en deviga skeptikismo.

Trad. R. D.

El dialogoj de Voltaire.

PASTRO KATOLIKA KAJ PROTESTANTA
PASTRO. (1760).

La katolika pastro. Eniru, eniru, Sinjoro. Vi trovas min tie ĉi tre ekscitita; ne pensu, mi petas, ke pro religiaj disputoj mia galo trovamiĝis; mi ne plu pensas nek pri Calvin nek pri Luther; ne plu estas kontraŭ la reformistoj ke mi volas verki; ne plu estos la vorto hereziulo, kiun mi sonigos en miaj verkoj kaj predikoj. Mi volas persekuti la filozofojn, la Enciklopediistojn; jen vere la skismuloj. Ni devas forgesi ĉiujn niajn malpacojn, reciproke pardonu al ni niajn dogmojn kaj nian doktrinon, kaj nin unuigi kontraŭ tiu pereiga fi-gento, kiu volis nin detrui; ĉar ne eraru pri tio, ili celas egale ĉiujn ekleziulojn, kaj ĉiujn religiojn; ili pretendas starigi la regadon de l' racio: kaj ni restus senmovaj en tiu danĝero!

La protestanta pastro. Sinjoro, mi trege laŭdas la intencan, kiun vi havas, ruinigi tiujn, kiuj volas nin senkreditigi, sed mi mallaŭdas la manieron; oni devas aĝi pli dolĉe, kaj tiel pli certe: preskaŭ ĉiam oni malutilas al si mem, persekutante sian malamikon tro pasie kaj obstine. Mi scias ja ankaŭ, ke oni ne devas tro rezoni, kaj ke tiuj homoj estas sufiĉe subtilaj por erarigi tiujn, kiuj ekzamenas. Sed oni devas malfamigi la aŭtorojn, kaj tiam la verko certe perdas sian kredigon; oni devas lerte venenigi ilian konduton; oni devas ilin prezenti al la publiko kiel malvirtuloj, ŝajnigante priplori iliajn malvirtojn; oni devas vidigi iliajn agojn laŭ malaminda aspekto, ŝajnigante senkulpigi ilin; se la faktoj mankas al ni, ni devas supozi ilin, ŝajnigante silenti pri parto de iliaj kulpoj.

Estas per tiuj rimedoj, ke ni kunhelpas al ia antaŭenigo de la religio kaj de la pieco, kaj ke ni malebligas la malbonojn kaj skandalojn, kiujn la filozofoj kaŭzas en la mondo, se ili ricevas tie kelkan kredon.

Trad. R. D.

El la „Eksperimenta Scienco”

de CLAUDE BERNARD (1813—1878), Francujo.

La eksperimenta metodo celas trovi la determinismon aŭ la proksiman kaŭzon de la fenomenoj de l' naturo. La principo, sur kiu kuŝas tiu metodo estas la certeco, ke ia determinismo ekzistas; ĝia procedo por serĉado estas la filozofa dubo; ĝia kriterio estas la eksperimente. Alivorte, la scienculo absolute kredas la ekziston de l' determinismo, kiun li serĉas, sed li ĉiam dubas esti trovinta ĝin. Tial li senĉese estas devigata sin turni al la eksperimento. La eksperimenta metodo estas nur la esprimo de la natura irado de la homa spirito ekserĉanta sciencajn veraĵojn, kiuj estas ekster ni. Ĉiu homo imagas unuavide ideojn pri tio, kion li vidas, kaj li estas inklina interpreti la fenomenojn de l' naturo per antaŭvido, antaŭ ol ilin koni per sperto. Tiu emo estas memmova; antaŭjuĝita ideo ĉiam estis kaj ĉiam estos la unua eksalto de explorema spirito. La eksperimenta metodo celas ŝanĝi tiun koncepton a priori, fonditan sur intuicio aŭ malpreciza sento de l' aferoj, je

interpreto a posteriori, starigita sur la eksperimenta studo de l' fenomenoj. Tial oni ankaŭ nomis la eksperimentan metodon metodo a posteriori.

La homa spirito pasis tra tri necesaj periodoj en sia evoluado. Unue la sento, sin trudante al la racio, kreis la veraĵojn de la kredo, t. e. la teologion. La racio aŭ la filozofio, poste estrigante, naskis la sistemojn aŭ la skolastikon. Fine la eksperimento, t. e. la studo de l' naturaj fenomenoj, instruis la homon, ke la veraĵojn de la ekstera mondo ne troviĝas formulitaj unuavide, nek en la sento, nek en la racio. Ili estas nur niaj necesegaj gvidantoj; sed por atingi tiujn veraĵojn, ni devas necese desalti en la objektivan realecon de la faktoj, kie ili troviĝas sub la formo de fenomenaj rilatoj.

Tiel aperas, per la natura progreso, la eksperimenta metodo, kiu resumas ĉion, sin apogante laŭvice sur la tri branĉoj de tiu sensancela tripiedo: la sento, la racio, la eksperimento. En la serĉado de la vero per tiu metodo, la sento ĉiam havas la iniciaton, ĝi naskas la ideon a priori: tio estas la intuicio. La racio aŭ la rezono malvolvas poste la ideon kaj eltiras ĝiajn logikajn konsekvencojn; sed se la sento devas esti lumigata per la helo de l' racio, la racio siavice devas esti gvidata per la eksperimento, kiu sola ebligas al ĝi konkludi.

La homa spirito estas malsimpla tuto, kiu iras kaj funkcias nur per la harmonia konsento de siaj diversaj kapabloj.

Oni devis do eviti, en la socio, kiun mi ĉisupre montris, doni troan superecon ĉu al la sento, ĉu al la racio, ĉu al la eksperimento. Se la sento silentigas la racion, ni estas ekster la scienco kaj ni alvenas en la neraciajn veraĵojn de kredo aŭ tradicio. Se la racio ne alvokas senĉese la eksperimenton, ni falas en la skolastikon kaj sub la regadon de l' sistemoj; se la eksperimento delasas la rezonon, ni ne povas eliri de la faktoj, kaj ni enŝlimiĝas ĉe la empirismo.

La eksperimenta metodo estas la metodo, kiu serĉas la veron per la ĝustekvilibra uzado de l' sento, de l' racio kaj de l' eksperimento. Ĝi proklamas la liberecon de l' spirito kaj de la penso. Ĝia karaktero estas dependi nur de si mem, tial ke ĝi ricevas de sia kriterio, la eksperimento, nepersonan aŭtoritaton, kiu estras la tutan sciencon. Ĝi ne akceptas personan aŭtoritaton; ĝi forpuŝas absolute la sistemojn kaj la doktrinojn. Tio ne estas fiereco kaj vanteco. Kontraŭe, la eksperimentulo humile agas, neante la individuan aŭtoritaton, ĉar li dubas pri siaj propraj konoj, kaj li tiel submetas la aŭtoritaton de la homoj al tiu de l' eksperimento kaj de la naturaj leĝoj.

La unua kondiĉo plenumota de scienculo, kiu eksperimente esploras la naturajn fenomenojn, estas do okupiĝi pri nenia sistemo kaj konservi plenan spiritliberecon kuŝantan sur la filozofa dubo. Efektive, unuavide ni havas la certecon de l' ekzisto de l' determinismo de la fenomenoj, ĉar tiu certeco estas donata al ni per necesa kaŭzrilato, kĵun nia spirito konscias; sed ni havas aliparte nenan certecon pri la formulo de tiu determinismo, ĉar ĝi realiĝas en fenomenoj, kiuj estas ekster ni. Nur la eksperimento devas nin direkti; ĝi estas nia unika kriterio, kaj ĝi fariĝas, laŭ la esprimo

de Goethe, la sola peranto, kiu ekzistas inter la scienculo kaj la fenomenoj lin ĉirkaŭantaj.

Tuj kiam la serĉado de l' determinismo estas akceptata kiel sola celo de la eksperimenta metodo, ne plu estas nek materialismo, nek spiritualismo, nek kruda materio, nek viva materio, estas nur naturaj fenomenoj, kies kondiĉoj estas determinitaj, tio estas, ni devas koni la cirkonstancojn kiuj ludas pri tiuj fenomenoj la rolon de proksima kaŭzo.

Trad. R. D.

Homeco.

DAVIDO FREDERIKO STRAUSS.

La plej grava ĝenerala rezultato, kiun malkovras al ni geologio, paleontologio kaj ĉiuj naturaj sciencoj, estas la granda leĝo de progreso. De la plej malproksimaj tempoj, kiuj lasis postsignojn de organa vivo ĝis la nuna epoko, tiu konsistanta progreso ĉe apero de novaj specoj pli perfektaj ol la antikvaj, estas fakto potence starigita de la sperto, kaj tiu fakto estas la plej konsola el ĉiuj veroj, kiujn iam malkovris la scienco.

Ankaŭ la homo partoprenas tiun grandan supreniradon de la vivo. Nun la naturo atinginte plej altan punkton, sin sentinte ĉe la animalo, volas sin koni ĉe la homo.

Ĉe la homo, la naturo ne nur volis fari paŝon antaŭen, ĝi volis altiĝi super sin mem. Li do ne devas nur esti animalo, li devas esti krom tio io alia kaj io pli bona. Kaj la pruvo, ke tion li devas, estas, ke tion li povas. La sentaj inklinoj kaj ĝuoj estas tute elvolvitaj kaj elĉerpitaj ĉe la animala mondo: do, ne por tio estas tie ĉi la homo... Tial la homo devas sorbigi kaj estri sian animalan naturon per tio, kion en li estas pli alta, per la kapabloj, kiuj diferencigas lin de la besto. La kruda kaj kruela batalo por la vivo estas, ĝi ankaŭ, sufiĉe senlima ĉe la animala regno. La homo ne povas ĝin tute eviti tial, ke ĝi estas natura estaĵo; sed li devas ĝin nobligi laŭmezure de siaj superaj kapabloj kaj scii ĝin dolĉigi, precipe rilate al siaj similuloj, per la konscio pri la solidareco kaj la reciprokaj devoj de speco. La estaĵo de la sovaĝa kaj perfortema naturo devas malaperi ĉe la homaro, kiu ankaŭ devas esti la „placidum caput”, kiun la Neptuno de Virgilio altigas super la ondoj por ilin kvietigi.

Estas necese, ke la homo ne nur konu la naturon, sed ankaŭ ke li estru ĝin, tiel ekster si mem kiel interne. Kaj tie ĉi ankaŭ vasta kaj grava kampo por la homa agemeco retrovas la lokon kaj indecon, kiujn rifuzis al ĝi la kristanismo. Ne sole la elpensinto de la presarto, kiu favoris interalie la disvastiĝadon de la Biblio; sed ankaŭ la homoj, kiuj flugigis la penson tra la metafadenoj — ĉiuj verkoj de la demono, laŭ la logiko de niaj bigotuloj — estis de nia vidpunkto, kunlaborantoj al la regno de Dio. Scienco kan Industrio favoras verdire la lukton, kio estas ja relativa ideo; sed ili ankaŭ favoras la homaron.

La homo devas superregi la naturon ĉirkaŭ si, ne kiel furiozulo, kiel tirano, sed kiel homo. Parto el la naturo, kies fortojn li utiligas, konsistas el sentantaj estaĵoj. La animalo estas kruela kontraŭ la animalo

tial, ke ĝi forte sentas malsaton kaj koleron kaj havas ne tre netan ideon pri la doloro, kiun per siaj agoj ĝi naskas ĉe la aliaj. De alia flanko la homo estas konviktita, kaj miaopinie li estas prava, ke por konservi sian lokon en la mondo, li ne povas eviti suferigi multajn animalojn. Li devas celi la detruadon de unuj, ĉar li estas danĝeraj aŭ ĝenantaj; la mortigadon de aliaj, ĉar li bezonas ilian karnon por sia nutrado, ilian felon por siaj vestoj, k.c.; la submetadon ankaŭ de aliaj, kaj ofte ilian lacigon, ĉar li ne povas sin senigi de ilia helpo por sia komerco aŭ siaj laboroj. Sed ĉar li povas kaj devas, per la kompato, reprezenti al si la doloron, kiun suferas la animalo, li devas klopodi agi tiel, ke tiu doloro estu kiel eble plej malgrandigita. Do, li mortigos unujn tiel rapide, kiel eble; li faros, ke la servo de la aliaj, estu kiel eble plej elportebla. La malrespekto de tiuj devoj estas venĝita ĉe la homo per la malgrandiĝo de la sentemo.

La historio de krimuloj instruas al ni, kiom multaj estis turmentistoj kaj mortigistoj de la bestoj antaŭ ol fariĝi turmentistoj de homoj. La konduto, kiun nacio ĝenerale uzas kontraŭ la bestoj, estas grava elemento por taksii ĝian humanecon. Oni scias, ke la romanaj popoloj elportas malbone tiun provon, kaj la germanoj ĝin dum longe ne sufiĉe bone elportis. Tie ankaŭ, la Boudhismo faris pli multe ol la Kristanismo, kaj Schopenhauer pli multe ol ĉiuj antikvaj kaj modernaj filozofoj. La varma simpatio kaj sentemeco, kiu trafluas ĉiujn liajn verkojn, estas unu el la plej refortigitaj flankoj de la filozofio de Schopenhauer, ĉiam spritplena, sed tre ofte danĝera aŭ malmulte utiligebla.

* * *

La homo, ni diris, devas superregi la naturon ĉe si mem kaj ekstere. La naturo, ĉe la homo, estas la sentemo. Li devas ĝin superregi sed ne senfortigi; ĉar per li la naturo levigis super si mem, sed restante ĉiam ĝi mem.

Ni nomas sentemo tiun inklinton, kiu faras estajon sentema je eksteraj incitoj, kaj ĝin puŝas al la agado. Ju pli animalo estas alta, des malpli unu el tiaj incitoj, aparte konsiderite, komandas ĉe ĝi tujan agadon. La supera animalo laŭ memoro kaj sperto disponas sian konduton. Ĉe tio kuŝas la eblecon doni al ĝi edukon. Sed la animalo ne scias eltiri ĝeneralan leĝon, veran penson.

Tiun povon la homo akiris al si per sia parolo. Li altigas ĝis homeco nur, kiam li elĉerpis el sperto ĝeneralan leĝon, konsistigis al si penson, laŭ kiu li difinas sian konduton. Juna kaj kruda kamparano, kiu pro malgravaĵo tuj enmanigas sian tranĉilon, ne estas pli bona ol besto kaj eĉ ol tre malsupera besto.

Alia memoras, ke ĉe simila okazo, la tranĉilbatoj kondukis tiun kaj tiun ĉi en malliberejon; tiam li tion evitas kaj estas tiel bona, almenaŭ kiel bone dresita hundo aŭ lerta vulpo. Tria pripensadis pri tiu fakto, el ĝi altiris tiun leĝon, aŭ la lernejo ĝin liveris al li, ke la homa vivo devas esti sankta por la homo: nur tiu ĉi kondutas kiel membro de l' homaro, kaj neniam venos al li ideo ekpreni tranĉilon. Estas la kapablo pensi, kiu estas tiu potenca gardanto kontraŭ la perforto de la sentemo.

La ideo pri speco agadas kiel sento ĉe la besto same kiel ĉe la homo; sed tiu ĉi ĝin posedas en sia konscio kiel penson. La kompato al la speco ne malhelpas rabobeston disŝiri sian similulon, eĉ ne malhelpas la katon manĝegi siajn idojn, same kiel ĝi ne malhelpas la homojn sin reciproke detrui, eĉ la konscio pri la speco ne haltigas ilin; ĉio estus plej bona, se ni estus certaj pri respekto al nia vivo apud ĉiu homo kapabla kompreni tiun ideon „homo”, kaj ĉirkaŭpreni nin en tiun ideon same kiel sin mem.

Sed ekzistas diversaj manieroj laŭ kiu oni ĝin reprezentas al si. Tial estas grave, alkonduki la homon reprezentadi ĝin al si laŭ la vera maniero. Unue, ĝi estas nur vorto, malplena sono, kiu povas havi nenian efikon; la plena efiko estos ebla nur, se la vorto akiris sian plenan signifon. La ideo pri homa speco konsideras la homon, kiel oni jam scias, altigitan al la plej alta stato de la naturo, kaj lian kapablon kontraŭstari la sentajn incitojn per la pripensado. Krom tio, la solidareco de la homa speco prenas sian originon ne nur, kiel ĉe la animalaj specoj, ĉe komuna deveno kaj komuna organa konsisto, sed ĉe tio ĉi: la homo fariĝis tia nur per la komuna agado de la homoj, kaj la homaro formas solidaran komunularon unuigitan de samaj ligiloj, laŭ tute alia senco ol kiu ajn animala speco. Nur per la helpo de l' homo, la homo povis altiĝi super la naturo; nur juĝante la aliajn estaĵojn egalaj al li mem kaj kondukante laŭ tio kontraŭ ili, respektante la institucion de la familio, de la ŝtato, li sin tenadas sur tiaj altaĵoj kaj daŭras grandigante. Estas, krom tio, plej ekstreme grave, ke tiuj sentoj enkorpiĝu al la tuta ekzisto, kaj ke tiu morala situacio fariĝu por la homo kvazaŭ dua naturo. Estas necese, ke rilate al li la homa indeco, ke rilate al la aliaj la simpatio ĉe ĝiaj diversaj gradoj, fariĝu por li konstanta „habitus” (kutimo); estas necese, ke ĉiu atenco kontraŭ la unua aŭ la alia resonu kiel krimo en lia konscienco.

Tr. P. L.

D. F. STRAUSS.

Patriotismo kaj Ŝovinismo.

De MAURICE ALLARD kaj RUBANOVIĈ.

Same kiel la stultaj kaj vantaj burĝoj, la direktantaj klasoj volas, ke Francujo havu rolon en la mondo, ke ĝi sin elmontradu, ke ĝi paradu en la „Europa kunvivado”. Kvazaŭ la unua devo de nacio ne konsistus, antaŭ ĉio, malgrandigi siajn impostojn ĝis grado nepre neevitebla, elvolvigi la publikan riĉaĵon, organizi la produktadon tiamaniere, ke ĉiu el ĝiaj civitanoj povu vivi malstreĉe! Niaj direktantoj estas altgrade priokupataj por scii ĉu Francujo okupas la sesan, kvaran aŭ trian lokon inter la grandaj ŝtatoj. Kvazaŭ la kategorio de lando havus ian gravecon por la feliĉo de ĝiaj loĝantoj! Al mi estas indiferece, ke Francujo okupu la dudek kvinan vicon, se mi trovas ĉe ĝi pli da justeco, da libereco, da bonstato ol en alia loko. Ĉu Belgo aŭ Sviso estas civitanoj malpli respektindaj, tial ke iliaj respondaj landoj estas laŭsurface pli malgrandaj ol Francujo kaj ludas en la mondo rolon malpli brilan

kaj malpli bruon? La valoro de nacio ne estas mezurinda laŭ la bruoj, kiuj ĝi faras, nek laŭ la fiereco, kiun ĝi elmontras, nek laŭ la rolo, kiun ĝi ludas en la eŭropa aŭ monda kunvivado, sed laŭ la sumo da riĉeco, da intelekto kaj da feliĉeco, kiun ĝi povscias disdoni inter siaj loĝantoj. Kvankam tio ne plaĉu al nia amiko kaj kunligano Rusujo, kiu havas tiel gravan rolon ĉe la eŭropa kunvivado, mi pli ŝatus esti naskiĝinta en Genevo ol en Moskvo, kaj se mi estus Svisa civitano, malgraŭ la malgrava rolo de Svislando en la mondo, mi ne kredus min malsupera pro kiu ajn kaŭzo antaŭ mujiko aŭ kozako, kiujn iu kronita bruto povas laŭplaĉe vipadi. Mi eĉ aldonas, ke kiam mi vidas Francujon, kiun mi estus volinta granda per la modereco kaj la saĝo, fali en la naciistan, militaristan kaj kontraŭfremdulan stultecon, mi sentas en mi, kvazaŭ mi bedaŭras ne esti naskiĝinta en lando, kiu pro sia malgrandeco estas ŝirmata kontraŭ la milita gloro kaj la fiereco por rolo en la mondo.

Ni estas laŭnome en respubliko, sed ni havas direktantojn ankoraŭ grasigitajn per malnovaj antaŭjuĝoj kaj malnovaj kredoj, kiuj pensas kaj agadas kiel la direktantoj de personeca povo, kiu povas sin subteni nur surdigante la popolon per la bruoj de la armiloj kaj la laŭsonantaj vortoj. Tiaj direktoroj, kiel ĉiuj grimptaltiĝintoj, ne sentas sin malpli feliĉaj „ludante rolon”, sin frotante kontraŭ principojn kaj reĝojn de grandaj ŝtatoj, intrigante ĉe la kortegoj kaj paradante ĉe la konferencoj. Sed ilia vanta stulteco estas tiel granda, ke ne nur ili ne certigas la pacon kaj la trankvilon de Francujo, ili ĝin ruinigas, ĝin implikas en la plej malbonajn aventurojn kaj ĝin aliformigas en humilan sateliton, kiu ruliĝas perditaj kaj senkonscie en la orbito de la Rusa suno.

MAURICE ALLARD.

Antaŭ mi, Francujo estis ĉiam kaj ankoraŭ estas „la plej granda morala persono”, tiu kies ekzisto kaj prosperado estas profunde amata de tiu Rusujo, kiu batalas kaj pensas, de la demokrata, socialista, revoluciona Rusujo. Sed Francujo estis ĉiam kaj ankoraŭ estas por la caro la granda procentegisto kaj ankaŭ la malbenita lando de la libereco, kiun li malamas per sia tuta koro, ĉar al la propagando de la granda Franca Revolucio li alskribas ĉiujn malbonojn, kiuj minacas lin kaj ankaŭ lian unuenaskiton.

Tr. PAŬ LI.

RUBANOVIĈ.

La moralo kaj la nudeco.

Ĉu kutimo, ĉu vidpunkto, Moralo estas io tre konfuzaj; rimarku kiel diferencas, esti morala aŭ esti moralisto.

Rilate al la nudeco de la karno, kie estas la moralo aŭ virto kaj malvirto? Respondas malnova formulo: virto estas en la mezo, ni diru en la ĉirkaŭo. Tiu karna ĉirkaŭo estas la akso ĉirkaŭ kiu turniĝas moralo, religio kaj politiko. Pri tiu lasta respondu s-ino Maintenon, Lola Montes kaj aliaj similulinoj; pri religio diru Garin, Sankta Antono kaj Sankta Mario Egipta, Pri moralo . . . parolu niaj ligoj kun, de, en, por, sen, pri la pornografio.

Kion ni faros el, por, pri tiu ĉirkaŭo? Laŭ unu, ĝin kovri per vinb folio kaj ĝin fermi por pendseruro de ĉasteco. Laŭ tiu maniero estas la simioj de ĝardeno de plantoj en Parizo, ĉar ne sufiĉas la kradoj de la kaĝoj. Kontraŭ la defendantoj de tiu sistemo ŝajnas sufiĉa respondo:

„Tre domaĝe, ke via patrino ne estis tiel ĉasta, kiel vi deziras. De bona hipokritulo ŝi estus nin liberiginta!

Tiu demando pri nudeco kaj vestiteco fariĝis polemika.

Ĉu la vesto estas ĉasta? Ne. Faru la provon.

Virino entute vestita, elirigante nur la pinton de la piedo kaj de la orelo, sin envolvas en bantuko — kaj aperas sur granda publika placo. Apud ŝi iradas montaranino kun malkovritaj tibikarnegoj kaj subgorĝo... kio okazos? Jen: Neniu vidas la tibikarnegojn kaj subgorĝon ekspoziciitajn de la montaranino, kaj ĉiuj vidas tra la bantuko la plenan nudecon kiu ne ekzistas. Tiun fenomenon oni povas sperti dum la karnavaloj. Ekscitas pli multe la rigardantan erotismon tibio aperanta sub la bordo de jupo, ol multaj el la maskitinoj montrante ĉion montreblan dum tiuj tagoj.

La pornografio estas simpla fenomeno, en rilato kun la ekscita forto de la objekto kaj la ekscitebleco de la subjekto.

Psikiatrio plene pruvis, ke ĉe la erotika funkcio, la subjekto, apartigite de la natura „ĉirkaŭo”, trakuras la tutan ŝtuparon de la malvirto, trenite de la fatala leĝo „defectu melioris”, tio estas: ĉe manko de pano, bonaj estas kukoj.

Jen do nova problemo: Tiuj ligoj, nomitaj kontraŭ-pornografiaj, ĉu ili mem estas pornografiaj?

Mi kredas, ke ekzistas nenio pli pornografia ol ili mem. Unue, ili estas propaganda fokuso de manio komunikebla kaj erara.

Ilia filozofia principo estas falsa. Ili supozas la erotismon propra de la objektoj, dum ĝi estas, kontraŭe, ago ĉefe subjektiva kaj halucinacia. Kaj komunikebla estas la manio, ĉar unu moralisto faras cent kaj pri la kontraŭpornografiano ni povus diri: li portas la ĉastecon ekstere; lia cerbo estas eterna diboĉado de maldecaĵoj.

Ĉu la nudeco ĉasta estas la nudeco mortinta? Mi ne scias, ĉu tiu demando egalvaloras tiun ĉi: Ĉu la mortinta nudeco estas ĉasta? Respondo absoluta: Se ia subjekto havas je sia dispono la vivantan nudecon... tiam la mortinta nudeco estas ĉasta por li, se li nur ne estas anormalulo kiel Vacher kaj kiel tiom da profanantoj de kadavroj. Se li ne havas je sia dispono la vivantaĵon, li estos fortrenata de la fatala leĝo: „defectu meliores” (ĉe manko de io pli bona). Diru ĝin la monaĥinoj, kiuj ne povas rigardi la nudecon de krucifikso, duoble mortinta, kiel senviva objekto kaj bildo de mortinto.

La morto estas ĉasta. Tie ne estas dubo. La mortintoj ne sentas erotismojn. Tial oni konsideras kiel mortinton pri la speco la sensentulon. La vivo estas erotika en si mem, inter la limoj de la perspecaj celoj, kun pezo kaj mezuro. Se ne estus erotismo ĉe iliaj patroj kaj avoj, kie estus la kontraŭpornografiaj sinjoroj?

De kie devenas tiu kontraŭpornografia manio?

Ĉe ĝia nuna formo, tiu profesio devenas de la konkretiĝo de multaj socaj malvirtoj, interalie tri ĉefaj:

Unue, pensas la ŝtelisto k.c., pro kio ili pensas, ke ĉiu objekto ekscitas la malvirtojn de la aliaj, kiel ilian propran.

Alia malvirto: la diablo sategita de karno, fariĝas monaĥo. Ĝi estas maljunula malvirto simila al tiu de viduloj, kiuj iras al prostituejoj vidi, kiam ili fariĝis senpovaj por agi.

La tria socia malvirto estas tiu, pri kiu Sankta Jeromo kulpigis certajn ĉastulojn de sia tempo, dirante: „Ili faras promeson pri ĉasteco por ke patroj kaj edzoj konfidu al ili la ŝlosilojn de l' ĉambroj de la edzinoj kaj filinoj.”

Kion estas atingontaj tiuj maniuloj?

Persekuti la nudecon, ĝis ili nin envolvas en mortotukon.

Kaj post tiu enĉerkigo, venos la virino en bantuko. Per tio ili frenezigos la mondon kaj ĝin alkondukas al la simia stato, kie estas necesa la ĉasteca zono, kiel por la simioj de ĝardeno de plantoj, inter kiuj devus envicigi tiuj maniuloj, kreantoj de erotismoj.

Sed krom la zono, ili bezonos okulvitrojn kaj kotonpecojn en la naztruo, kie ili havas la manion.

(El „Motin’.)

RICARDO MAYOR.

Tr. PAU LI.

KURIOZAĴOJ.

PROTESTO DE LA EPISKOPO DE KORDOVO (HISPANUJO) KONTRAŬ LA LAŬVOLA LERNADO DE KATEKISMO.

Al la Prezidanto de la Ministra Konsilantaro.

La malmultaj kaj malfeliĉaj framasonoj, kiuj malhonorigas nian katolikan Hispanujon, helpate de siaj fremdaj fratoj, de longe havas la projekton forigi la katolikan kulton kaj la lastajn kristanajn elementojn, kiuj tiel grandaj kaj gloraj faris nin dum la pasintaj generacioj.

... Nun ili elektis... forigi la instruadon de la katolika doktrino ĉe la unuagrada lernejoj de la reĝlando, senigante ĝin de la deviga karaktero, kiun ĝis nun de tiom da jarcentoj ĝi havis inter ni.

La laboroj, kiujn ili efektivas por tiel malĵustaj pretendoj meritis krion de indigno kaj malaprobado de ĉiuj honestaj kaj kleraj personoj de la nacio...

La framasonoj kaj framasonemaj hispanoj, kiuj skribas kaj agadas por la profito de aliaj nacioj kaj kontraŭ la veraj intereso de la nia, havas kiel rimedon trompi kaj brutigi la popolon, specialan zorgon kaŝi la veran celon, kiujn ili proponas al si, kiu estas, forigi pli malpli frue nian sanktegan religion el Hispanujo, kaj alvokas malseriozajn kaj neakcepteblajn pretekstojn por pravigi ilian nunan projekton, konsistantan forigi la devigan instruadon de la kristana doktrino ĉe la unuagrada lernejoj.

Sin montrante respektplenaj kaj toleremaj kontraŭ la konscienca libereco de kelkaj regnantoj, ili malaprobis la agon instrui la kristanan doktrinon al la sektanoj, kvazaŭ per tiu nura instruado oni perfortus ilian liberecon. Ĉe tio ili sin montras tre skrupulemaj, sed neniun skrupulon ili sentas, kiam ili atakas la liber-

econ de monaĥoj kaj monaĥinoj ĉe ilia elektado de stato. Ili ankaŭ ne atentis, ke la ĝeneralaj leĝoj ne fariĝas por malplimulto malgranda kaj sensignifa, sed por la ĝenerala'eco.

Por havi pruvon de la malkonveno kaj malico, kiun enhavas la intenco forigi la devigan instruadon de la katekismo en la lernejoj, sufiĉas observi, kiaj personoj ĝojas pro tiu forigo; ili estas homoj plej malnobligitaj kaj malaltigitaj pro iliaj ideoj kaj pro la malŝatindeco de iliaj moroj, kiuj faras ilin malestimindaj eĉ por la malplej skrupulema parto de la nuna socio.

La anarkia socialismo, malamiko de la aŭtoritato kaj de la posedrajto lastatempe rifuĝiĝis en la senreligiecon kaj en la apartigon de la katolika eklezio, kelkafoje nomante sin mem, pro hipokriteco, antiklerikalismo.

La defendantoj de la forigo de l' kristana doktrino el la unuagradaj lernejoj intencas, kaj tiel ĝin komprenas la plimulto el la hispanoj, favori kaj pligrandigi la revolucion kaj kontraŭsocian anarĥion, kaj ĉu estas eble ke la bienhavantoj povas vidi sen antipatio tian pligrandigon kaj protekton?

... Kvazaŭ estus indiferente ke la infanoj, homoj de morgaŭ, profesu la veran religion aŭ la falsajn religiojn aŭ neniun; kaj kvazaŭ estus same, esti honesta aŭ malvirta, ateo aŭ materialisto, timanta antaŭ Dio aŭ penetrata de la pereiga principo, ke ne ekzistas esenca diferenco inter la bono kaj la malbono, la virto kaj la malvirto.

Tiuj, kiuj tiel parolas, estas malamikoj de la pastraro, defendante ĉion, kio malriĉigas kaj malnobligas la administrantojn de la religio. Ĉiutage ili estas voĉkriegantaj kaj trompantaj la popolaĉon pri la grandaj rentoj kaj la salajroj de la pastroj, kiam estas publike sciite, ke granda plimulto de la individuoj de tiu klaso en Hispanujo hodiaŭ estas sen la necesaj monrimedoj, ne nur por ilia konvena subteno laŭ ilia stato kaj klaso, sed eĉ por ilia materiala subteno.

Tion scias la malpiuloj kaj framasonoj, kaj ili scias ke pro tiu kaŭzo kaj pro la ĉiamaj persekutoj kontraŭ eklezio la nombro de pastroj iras ĉiam en malprogreso en mia eparĥio. Post ne multe, se ne ĉesiĝas la persekutoj kaj se oni ne pagos pli bone la pastraron, mi ne povos provizi la ekleziajn oficojn pro manko de personaro; kaj tiam, kiel la pastroj, se ili ne ekzistas, estas instruontaj la doktrinon?

La lernejestroj ĝin ne instruos, laŭ la reguloj de la estraro; pastroj ankaŭ ne, se ili ne ekzistas....

Post kelkaj jaroj ni trovos nin ĉe vera stato de apostateco, ĉar ne estos, kiu profesas la religion....

JOSEFO, episkopo.

Kordovo, 18an Marton 1913a.

(Ĉefartikolo de „Divizio de Córdoba, 17an de Marto 1913.)

Tr. P. L.

N.B. La dekreto apartenas al la iniciato de la ĉefministro mem, kiu enpoŝigis silente la ĉi suprajn insultojn.

P. L.

ĈU PREĜOJ, ĈU PETARDOJ?

Antaŭ nelonge, ĥino plendis pro artikolo de angla ĵurnalo, kiu ridindigis la ĥinojn de Hong-Kong kaj ĉirkaŭaĵoj, tial ke ili obstiniĝas timigi per raketoj la demonon de la pesto. Li demandis, ĉu la preĝoj de la kristanoj estas pli efikaj ol la raketoj de la idolanoj por haltigi la epidemion.

La vero estas, ke la raketoj enhavas sulfuron kaj aliajn stofojn, kies fumo estas puriga, kaj pereiga por la mikroboj, dum la preĝoj enhavas nek sulfuron nek ion similan. Sekve, la ĥinoj daŭros fidante al la efiko de siaj petardoj.

(Times of India).

P. L.

AMUZA FAKO.

AL LA PARADIZO PER FROMAĜO.

Cirkulero en ĵurnalo:

„Ni havas la honoron prezenti al vi nian fromaĝon, preparitan en nia hejmo de K. per la lavitaj manoj de purigitaj fraŭlinoj. Tial ke la salajro de tiuj ĉi estas malaltigita ĝis ekstrema „minimumo“, ni povas liveri la fromaĝon por la plej malkaraj prezoj.

Ĉiu aĉetinto de dudek kilogramoj havas rajton al unu meso de „rekviemo“ (t.e. por anima ripozo de mortinto), kiu soleniĝos en la kapelo de la Institucio. La aĉetantoj pomalgrande ricevos kun ĉiu fromaĝo unu „asignon por preĝo“. Tuj kiam oni estos kolektinta kvin el tiuj asignoj, sufiĉas adresi ilin per afrankita letero al nia Ekonomo, por havi rajton al unu meso.

Tial ke niaj fromaĝoj estas fabrikataj interne de nia hejmo, de virinoj kutimintaj la lastajn rafinadojn de la purigado, ilia kvalito vetas ĉian konkuradon.

Adresu la mendojn kun poŝta ĝiro al Abato B...., direktoro de la Hejmo por la puraj fraŭlinoj.”

Ĉu vi volas gajni la Paradizon? Manĝu multe da fromaĝo.

Laŭ „Tierra Gallega.”

P. L.

* * *

PERFEKTA IMITADO.

Pastro estis donace ricevinta de amiko, misiisto en Ameriko, simion mirinde inteligentan, kiu ĉion imitadis. La tagon de la patrona festo de la loko, la episkopo honoris per sia vizito la loĝejon de la pastro, kiu rapidis montri al Lia Moŝto la lertan simion.

— Via Moŝto vidos, kiel ĝi ĉe ĉio imitas min. Vidu, kiel ĝi surmetas mian surplison kaj mian ĉapon. Poste ĝi surgenuiĝos kaj murmuris preĝojn.

— Vere tre interesa. Kia penetremo! Kia trafeco en ĝiaj moviĝoj. Absolute same kiel vi mem, s-ro Pastro.

— Vidu nun kiel ĝi sidas ĉe tablo, kaj kiel antaŭ ol manĝi, ĝi faras krucosignon.

— Tio ŝajnas nekredbla!

— Ĉion, ĉion ĝi faras same kiel mi. Antaŭ ol manĝi suppon, ĝi prenas trinketon da vino. Vidu!

— Oni tenus ĝin kiel homan estajon.

— Guste diris via Moŝto, ĝi mirinde imitas min.

Ĉe tio eniras la servistino de la pastro kun la

supujo. La simio ŝin kaptas per la ambaŭ oreloj kaj stampas sur ŝian kolon laŭtsonan kison.

La episkopo estas ŝtonigita; rekonsciiginte, li rigardas la pastron kaj demandas:

— Kaj tion... de kiu ĝi lernis?

La pastro balbutas, la episkopo ridetas, ambaŭ emprofundiĝas en la supteleron...

Sed baldaŭ la pastro, kun humila mieno kaj malica koro:

— Mi estus tre feliĉa, li diras, se Via Moŝto farus al mi la honoron akcepti la simion...

La episkopo, kvazaŭ antaŭ subita apero de Satano, per voĉo kaverna pro ne finita engluto, siavice balbutas:

— Neniam!

Laŭ „*El Motin*.”

P. L.

NUNAĴOJ.

CIVILA ENTERIGO DE PASTRO.

Mortis en Barcelono Pastro Segismundo Prat Orri, beneficano de „La Merced”, eksvikario de Monistrol de Montserrat, fondinto de diversaj katolikaj institucioj kaj familiano de la Episkopo de Astorga.

Pro la persekutado de la ekleziaj estranoj, la lastaj jaroj de lia vivo estis grande tragediaj. Li mortis flegite de la bonfaremo de la liberala popolo de Barcelono, kiu savis lin de malsato, dum la episkopo detenas la rentojn de la benefico dum kelkaj jaroj, per proceso, kiu laŭ la ekleziaj leĝoj memfinaĝis en profiton de la viktimo, kaj kiun la tribunalo de la „Rotas” depost du jaroj konservas en apelacio, kun superega mokego al la „Regalioj”, Disciplino kaj Mizero.

Li mortis interne de la eklezia moralo kaj ekster ĝia disciplina malmoraleco. En liaj lastaj jaroj lia vivo estis eksterordinare asketa, dediĉite entute al la mal-sanuloj kaj malliberuloj, viktimoj de la jezuita reakcio. La figuro de Mosén Prat akiris eksterordinaran reliefon post la okazintaĵoj de Julio 1909a. Ne estis milita aŭ civila juĝisto, kiu ne ricevis lian viziton; ne estas mal-liberigita respublikano nek vundito en politika batalo, kiu ne ricevis liajn malavarajn konsolojn. Tiu amo al la subpremitaj klasoj, kiu estis vivanta kulpigo kontraŭ la manko de fido kaj kristaneco de la ceteraj pastroj, estis kaŭzo de la malamo, kiu plenis per skandalo la grafan urbon dum multaj jaroj.

Li mortis forrifuzante la sakramentojn de la oficiala pastraro, kiun li konsideris kiel la enkarniĝon de la antikristo, malakceptante la eklezian enterigon kaj sin liverante al la bonfaremo de la popolo.

Lia enterigo estis civila malgraŭ la provoj de la episkopo, kiu ne povis malhelpi la spektaklon de pastro, kiu en la horo de la morto proklamas kurage la maljustecon kaj la malbonecon de la ekspluatantoj de la religio.

... Multan laboron kaŭzis al la monarĥiaj kaj ekleziaj tribunaloj la persekutoj kontraŭ Prat. Ankoraŭ pli multe sin okupis pri li en siaj kavernoj la sakristanoj. „Fine li mortis!” diros liaj malamikoj.

La „granda presaro” honoros per la silento tiun eklezian kruelegecon. La presaro vere liberala ne permesos, ke la historio de Prat restu kaŝita; ĝi estas la teruro de la klerikalaro.

El „*El Motin*”, 30-1-1913.

Tr. P. L.

LA SOCIETO.

ĜENERALA KUNVENO 1913.

Estas rezervitaj por la societo Libera Penso tri kunsidoj dum la Kongreso en Bern. La ĉeestontaj anoj vidos sur la oficiala programo la tagojn kaj horojn. La tagordo, kiel ni jam anoncis, entenos la tri jenajn demandojn:

1. La politiko en Libera Penso: celo kaj agado de nia societo.

2. Propono de D-ro Uhlmann, societano, kiel direktoro de la gazeto „Homaro”, pri alprenado de tiu gazeto kiel oficiala organo de L. P. kaj kunfandiĝo en ĝin de nia bulteno.

3. Propono de la Antverpena sekcio pri rabato de kotizo al la lokaj sekcioj.

Laŭstatute okazos la voĉdono por elekto de du Komitatanoj.

Ĉiuj societanoj, espereble multaj, kiuj partoprenos la kongreson, nepre ĉeestos niajn kunsidojn. Dum la unua ili estos avertataj pri la lokaj aranĝoj, ankoraŭ ne deciditaj (akcepto de la Bernaj liberpensuloj, kunmango, k.t.p.)

* * *

Abono: S-ro Emilio Saviotti, Bagnolo Mella (Brescia) Italujo.

Eksigas: Laborista Grupo, Hamburg; Jezic kaj Jakeŝ netroveblaj.

Entute 195 membroj.

KASO JUNIO 1913.

Enspezoj:

Reportite	Fr. 255.90
Kotizajo 1913 de Libal	2.90
„ 1912 & 1913 de Matuzsewski	6.25
„ „ „ „ F-ino Herrman	5.40
„ „ „ „ de Michelerne	2.50
Abono de Saviotti	2.15
Sume	Fr. 275.10

Elspezoj:

Poŝtelspezoj	Fr. 7.75
Restas en kaso	Fr. 267.45
	(Sm. 108.515)

Ŝanĝitaj adresoj: S-ro Bohumil Libal, ĉe Zinovstenka Banka, Lemberg, Galicio; s-ro T. Matuszewski, Nowo Stalowa II, Varsovio-Praga; s-ro Fritz Ransohoff, Hampden Hse, Phoenix st., N. W. London.

ANONCO.

LONDONO.

PENSIO POR GESINJOROJ.

Ĉiuj hejmaj komfortoj, bano. Moderaj prezoj: de Sm. 10 ĝis 12,50 ĉiusemajne, enkalkulante ĉion. Oni parolas angla esperante kaj france. D-ro O'CONNOR instruas la anglan lingvon al alilanduloj.

Adreso: Madame O'CONNOR, Esperanto House, 17 Se Square, Bayswater, London W.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO : 1 Sm. (Fr. 2.50). — EKSTER FRANCUJO, fr. 2.60

Sekretario-Kasisto : RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

En Parizo, kotizojn kaj aliĝojn ricevas S-ro GUILLEMIN,
kaj S-ro DAUPHIN (Librejo HACHETTE).

FUNEBROJ

Krue'e frapita estas dum tiu ĉi jaro la Esperantistaro. Ni liberpensuloj aparte sentas la doloran perdon de du societanoj, Carlo Bourlet, fondinto de nia societo, unu el tiaj eminentaj homoj, pri kiuj respekta silento pli taŭgas ol nesufiĉa laŭdo, kaj De Ladevèze, kiu en la esperantistaj aferoj kaj en Libera Penso estis akirinta famon de plej energia kaj lojala batalanto. Oni vidos en la sekvantaj paĝoj, ke dum nia kunveno ni ĉiuj akre sentis kaj bedaŭris la foreston de tiuj kuraĝaj amikoj. Honoru ni ilin per memorado kaj imito.

El la Aldono al la filozofiaj pensoj de Diderot (1770)

Kiam Dio, de kiu ni ricevis la racion, postulas ĝian oferon, li estas ĉarlatano malaperiganta tion, kion li donis.

Se la racio estas dono de la ĉielo, kaj se la samo povas esti dirata pri la kredo, la ĉielo faris al ni du donacojn nekunigeblajn kaj kontraŭdirajn.

Por forigi tiun malfacilecon, oni devas diri, ke la kredo estas ĥimera principo, kaj ne ekzistanta en la naturo.

Eraranta en vastega arbaro nokte, mi havas nur lumeton por gvidi min. Alvenas nekonatulo, kiu diras al mi : Mia amiko, estingu vian kandelon por trovi pli bone vian vojon. Tiu nekonatulo estas teologiisto.

La merito kaj la malmerito ne povas aplikigi al la uzo de l'racio, ĉar la plej plena bonvolo ne povas utili al blindulo por distingi la kolorojn. Mi estas devigata ekvidi la evidenton, kie ĝi estas, kaj la neevidentecon, kie evidenteco ne estas, se nur mi ne estas malinteligentulo ; nu, la malinteligenteco estas malfeliĉo, kaj ne malvirto.

La aŭtoro de l'naturu, kiu ne rekompencos min ĉar mi estis inteligentulo, ne kondamnos min, ĉar mi estis malspiritulo.

Kaj li ne kondamnos vin eĉ tial, ke vi estis malbonulo. Kio do ! ĉu vi jam ne estis sufiĉe malfeliĉa, ĉar vi estis malbonulo ?

Se ankoraŭ necesa estas graco por bone agi, al kio utilis la morto de Jesuo Kristo ?

Se estas cent mil kondamnataj kontraŭ unu savata, la diablo havas ĉiam la superecon, ne fordoninte sian filon al la morto.

La Dio de l'kristanoj estas patro, kiu tremulte ŝatas siajn pomojn, tre malmulte siajn idojn.

Forprenu la timon al la infero de kristano, kaj vi forprenos de li lian kredon.

(Daurigota)

Trad. R. D.

La ĝenerala kunveno de Libera Penso en Bern

1-a KUNSIDO

Laŭ la programo de l'kongreso, nia 1-a kunsido okazis mardon 26-an de Aŭg. je 5 h. 1/2. Preskaŭ ĉiuj societancj venintaj en Bern estis alkurintaj tra la tuta urbo, sub la arkajaj galerioj de la granda strato kun mezepokaj statuoj sur fontanoj florumamitaj, de la luksa kas'no, kie okazis la kongresa kunsido, ĝis la Universitato, kiu alte staras super la stacidomo en monta verda ĝardeno ; 40 personoj ĉeestis, membroj de L. P. aŭ aliĝontaj ; al kelkaj, se necese, ni rememorigos ilian promeson.

Elektigas kiel prezidanto la plej maljuna societano, S-ro Soriano, hispano. La sekretario kasisto laŭstatute komunikas raporton jenan :

Raporto de la Sekretario-Kasisto

Karaj Societanoj,

La sola grava ago de nia societo de post la kunveno en Krakow estas nia partopreno finaŭguste en la Univerŝala liberpensa kongreso en München. Vi sciis per la bulteno, ke nia propono por alpreno de Esperanto ĉe la Liberpensa Federacio ne estis akceptata, pro idistaj

kontraŭstaroj, sed ke Esperanto estis nur permesata en la kongreso, kaj ke niaj delegitoj sukcesis multe pligrandigi la intereson al nia lingvo kaj al nia societo; kaj S-ro Iwanski konkludis en sia raporto, ke nia tasko estas fervore propagandi inter la lokaj liberpensuloj, por ke fine la plimulto konsideru nian postulon tiel grava, kiel ĝi efektive estas.

Cu tiu individua agado estas farita, kaj kiel ĝi sukcesis, ni scios espereble tuj per societanoj tie ĉeestantaj kaj poste per la rezulto en la portugala kongreso de la Liberpensularo. Dume ni penis konigi nian societon per interŝanĝo de la bulteno kun liberpensaj gazetoj; ni sukcesis ne sen klopodoj malgraŭ idistaj diskutoj ricevi amikan akcepton kaj gastigon en « La Libre Pensée Internationale » de S-ro Peytrequin en Lausanne (Svisujo). Sendo de detalaj cirkuleroj en Franclando ne alportis videblan profiton.

Alia parto, malfacilega, de nia tasko, estas propagandi Liberan Penson aparte inter Esperantistoj. Nun ni devas preskaŭ kontentigi, se malgraŭ la eterna silenta konspirado de l'komuna opinio kontraŭ ĉia antaŭenira ideo nia societo estas senskandale akceptata ĉe la Esperantistaro; ho, ne favore! neniam oni citas ĝin: sed pri tio estas kulpaj ni liberpensuloj, kiuj ne ebligas per varbado kaj laboro kreskon de la societo kaj subtenon de grava organo.

Laŭ konsilo de l'lasta kunveno (tuj ree klarigota), ni evitis fortimigi la indiferentulojn. Tamen la aliĝoj ne venis. Sed plezure mi konstatis, ke la malmultaj novaj membroj estas agemaj kunlaborantoj: unu zorgis en Holando la presigon de l'bulteno; alia, franca, tradukis multvaloran verkon de Forel: alia el Anglujo sendis fervorajn leterojn kaj interesajn artikolojn; alia esperantigis por ni belegajn paĝojn de germana filozofo Bölsche. Kontraŭe multaj membroj ne nur malfruiĝis sed ne respondis al rekomendita karto pri kotizo. Estas necese anstataŭi la sekajn foliojn de nia vivobstina arboteto.

La stato de l'kaso estas rilate kontentiga. Ni posedas nun, libere de ĉiu ŝuldo, proksimume 200 frankojn. La detalo aperas sur la bulteno. Kaj bonvolu nun almenaŭ kelkaj ĉeestantoj esplori la kaskajeron.

Sukcesu la nuna kunveno direkti nin sur ĝusta vojo al utila laboro kaj fruktodona prospero!

R. DESHAYS.

Ĝi estas unuvoĉe akceptata.

La sekretario rememorigas, ke laŭ nia kutimo la rolo de l'kunveno estas ekzameni la demandojn anoncitajn sur la tagordo, kaj prezenti solvon por la skriba voĉdonado, kiu sekvas; plie studi ĉiun novan proponon kaj preni, se utile, laŭcirkonstancajn decidojn.

La tagordo prezentas unue la demandon pri politiko en la Societo. La sekretario alportas leterajn deklaraĵojn de societanoj O. Bünemann, Linarès kaj Garcia,

insistantajn pri la senlima amplekso de l'agado de nia societo. Jene skribis S-ro Linarès:

La celo de la Societo « Libera Penso », tre ampleksa kaj pli ĝenerala ol tiu de aliaj pli specialaj Asocioj, — kiuj povas trovi ĉe ni amikan najbarecon, — jam estas perfekte difinita de ĝia Regularo.

« Libera Penso » ne havas politikan celon, sed ankaŭ ĝi nek akceptas dogmojn nek sin enfermas en ekskluzivajn formulojn: por ĝi ne ekzistas limoj ĉe la esprimo de la homa penso.

La Bulteno povas enhavi diversajn rubrikojn, pri edukado (Por niaj idoj), homa kulturo, filozofio, liberpensula movado, liberpensulaj organizaĵoj en ĉiuj landoj, kontraŭklerikala agado, okazintaĵoj en rilato kun la konscienca stato de la socio, kuriozaĵoj, amuza fako, &. Unuj estas ĉefaj, aliaj duavicaj, sed ĉiuj kunhelpas al nia supera celo homama kaj libereca, por ke ĉiu aŭdu la veron kaj ricevu konsolon kaj kuraĝon per la lingvaĵo, kiun li pli kompleze aŭskultas aŭ pli laŭkutime komprenas.

Tial ke estas preskaŭ nenio senrilata al la politiko, ke liberpensulo ne enuas antaŭ la esprimo de opinioj kontraŭaj al siaj, sed ne povas per sia silento sufoki la kriojn de sincera konscienco, fariĝante kunkulpo de mallumeco:

La Bulteno de Libera Penso povas senbare pritrakti kiun ajn demandon.

La sekretario legas ankaŭ la 1-an artikolon de la regularo: « La internacia societo L. P. celas 1^o helpi la liberan esprimon kaj komunikadon de l'ideoj pri ĉiu teoria kaj praktika temo, defendi tiun liberecon kontraŭ ĉiu ajn premado kaj malrespekto... »

S-ro Chandelliez, franco, diras, ke la politiko povas nur konfuzi kaj malutili nian laboron.

S-ro Rajci, hungaro, deklaras, ke teorie ekzistas nenio baro al nia agado, sed li juĝas, ke praktike ni devas eviti enmiksiĝon en politikajn aferojn, ĉar jam aliaj organizaĵoj batalas pri ili, ekzemple Socia Revuo, ankaŭ ĉar oni povus nin silentigi kaj malpermesi la eniron de l'bulteno en iajn landojn, se ni traktus temojn ŝajne pli dangecajn ol filozofion kaj religion.

S-ro Deshays, sekretario, samopinias, sed insistas pri eblaj esceptoj, kiam politiko sin enmiksas mem en liberpensajn aferojn, kiel okazis pri Ferrer.

S-ro Rajci tute konsentas, kaj tiasence lia propono estas unuanime akceptata. Do ni evitu politikon, sed kiam ĝi nin atakus, ĝi trovus nin kontraŭstarantaj: tian rezolucion proponas la kunveno por la skriba voĉdono.

La dua punkto de l'tagordo temas pri la bulteno. D-ro Uhlmann, societano, redaktoro de la gazeto « Homaro », letere proponis ĝin kunfandi en la diritan gazeton. Ne ĉeestis D-ro Uhlmann, sed alia fondinto de tiu gazeto, ĵus aliĝinta al L. P., S-ro Mangada Rosenörn, hispano. La sekretario ne legas sed resumas leterojn, kelkfoje

iom pikajn, de S-roj Linarès, Garcia, O. Bünemann, Wolf, de F-inoj Rouff kaj Beynard, kiuj deziras ne alpreni la gazeton « Homaro » precipe pro ĝia nekorekto, sed konservi la bultenon.

S-ro Rajci rimarkigas, ke ni ne estas devigataj de defcito kaj ke la bulteno kontentigas ĉiun ; ke « Homaro » volas esti organo de tro multaj societoj kaj ne povas sekvi bone difinitan direkton.

S-ro Rosenörn klarigas kiel li, infanteria kapitano, penis por fondi tiun noblacelan entreprenon, kies nunajn malbonaĵojn li mem kritikis. Li estas forte aplaŭdata pro sia braveco, kaj D-ro Stromboli proponas ke, forlasante filologan severecon, sed konservante nian propran bultenon, ni danku kaj gratulu la kuraĝajn fondintojn de « Homaro ». Tiel estas decidate unuvoĉe.

Prokrastante ĝis la dua kunveno la sekvon de la tagordo, la kunvenintoj ricevas de la sekretario informojn pri esperita akceptado ĉe loka liberpenso societo : li skribis al diversaj personoj, el kiuj unu estis ĵus mortinta, aliaj forvojaĝis, kaj fine li sciis, ke ne ekzistas l. p. grupo en Bern. Pri komuna tagmanĝo oni nenion povis oportune aranĝi, kio en tiaj aferoj estas eble pli bone ol tro modeste sukcesi.

Poste D-ro Stromboli proponas, ke ni faru la kunvenon de L. P. ne ĉiam ĉe la kongreso de Esperanto, sed ankaŭ en urboj eĉ malgrandaj, kie ni estas certaj trovi multajn sampensulojn. S-ro Rosenörn konsilas por la venonta jaro, Madrid, kie estos kontraŭklerikala kongreso. S-ro Hermant atentigas pri la demokrata vidpunkto, de kiu oni devas konsideri la monrimedojn kaj templiberecon de ĉiu.

La sekretario rememorigas, ke laŭ la regularo nia kunveno devas koincidi ĉu kun kongreso de Esperanto, ĉu kun kongreso de la internacia Federacio de la Liberpensuloj ; li rimarkigas, ke tiu lasta eblo jam efektiviĝis en Bruselo 1910 kun serioza sukceso. Li pensas, ke la kongreso de Esperanto en Parizo 1914 estas bonega okazo de agado kaj propagando por nia l. p. societo, kaj promesas brilan sukceson.

Tiam F-ino Janalikova, moravino, alportas al la societo L. P. fratan inviton de la liberpenso asocio en Praha (Bohemlando) por la tutmonda liberpenso kongreso, kiu okazos en tiu urbo en 1915 okaze de la festoj pri Jan Hus. La propono estas akceptata kun unuanimaj aplaŭdoj.

Fine S-ro Mahn, germano, proponas, ke nia societo sendu salutleteron, atentigantan pri la fakta graveco de Esperanto, al la kongreso de la germana monista Ligo en Düsseldorf, ĉe kiu sukcese klopodas idistoj (Ostwald, Paeus). Li mem estas komisiata de l'kunvenintoj por zorgi kun la sekretario la redakton kaj sendon de tia letero.

La kunveno estas fermita je la 7-a.

2-a KUNSIDO

Ĝi okazis vendredon 29-an de Aŭg. je la 9-a matene,

sub prezido de nia eksprezidanto S-ro Wolf, sviso.

La prezidanto esprimas la dolorajn sentojn de ĉiuj anoj pro la morto de S-ro Carlo Bourlet, kies agemecon kaj sindonecon speciale por L. P. li laŭdas emocie, kaj de S-ro Ladevèze, ankaŭ fidela kaj laborema societano. La ĉeestantoj levigas por honori la du perditajn amikojn.

Poste la sekretario legas resuman protokolon de la lasta kunsido.

Pri la 3-a punkto de la tagordo, rabato de kotizaĵo por la lokaj grupoj, parolas S-ro Jacobs, el la Antverpena loka grupo. Li klarigas, ke tiu grupo, konsistanta precipe el laboristoj, disiĝis pro manko de tempo, de mono, kaj de profesoroj : li mem kaj S-ro Schoofs jam faris kursojn en tro diversaj lokoj ; li esperas, ke ĝi sukcesos restariĝi kaj proponas rabaton de la kotizo al 2 fr.

La sekretario, opiniante ke la societo devas tutforte favori la kreon de lokaj grupoj, precipe populaj, konsentas rabaton eĉ de la duono, t. e. kotizaĵo da fr. 1,25. La regularo ebligas tiajn ŝanĝojn per skriba voĉdono post konsiliĝo en la ĝenerala kunveno. Li donas laŭ peto de S-ro Giraud, franco, precizajn informojn pri la ĉiamaj (dumvivaj) membroj, nemultaj ĝis nun, sed fervoraj ; li kontraŭbatalas proponon de ĉeestanto pri starigo de duaklasaj kotizoj por neriĉuloj ; kaj post aprobo de S-roj Chandelliez kaj Stromboli, la kotizo de fr. 1,25 por lokaj grupoj da minimume 10 membroj estas akceptata.

Restas el la tagordo la anstataŭo de 2 komitatanoj. La sekretario sciigas, ke en Ameriko S-ro Schubert eksciĝis pro malsano, kaj ke ne alvenis respondo pri eventuala anstataŭanto ; ke aliparte, pro interpersona malpaco pri esperantistaj kaj liberpensaj aferoj kun alia itala societano, D-ro Stromboli eksciĝis el la komitato, kaj eĉ el la societo ; ke dokumentaro pri tiu tre bedaŭrinda afero malrapide rondiras inter la aliaj komitatanoj. Tiam post amikaj insistoj de la prezidanto kaj de la tuta ĉeestantaro, D-ro Stromboli konsentas simple repreni siajn du eksciĝojn.

Kiel komitatanon, S-ro Deshays proponas Sr-on Linarès, hispanon, kies ageman helpon por la bulteno li konigas. Ĉiuj konsentas, ke la sekretario serĉos la plej malnovan kiel kutime, por proklami lin eliranta, sed ke ĉiuokaze estos bone ke S-ro Guillemin, parizano, restu komitatano en 1914 por helpi la preparon de l'kunveno dum la Pariza kongreso.

S-ro Mahn proponas por la propagando sisteman planon, laŭ kiu ĉiuj l. p. naciaj gazetoj kaj societoj estus cirkulere petataj enpresii artikolojn pri kaj en Esperanto, kondiĉe ke aliaj en diversaj nacioj same faros. S-ro Wolf samopinias, sed preferas, laŭ freŝaj spertoj, senperan agadon per samnaciuloj. S-ro Stromboli rimarkas, ke komence sufiĉos enpresii artikolojn ne en Esperanto sed pri Esperanto. Kun tiuj rezervoj la kunvenintaro aprobas la planon de S-ro Mahn.

Laŭ letera konsilo de kelkaj anoj kaj propono de ĉeestantoj, oni decidas aperigi en la bulteno liston de la liber-

pensulaj organizaĵoj en la tuta mondo, kaj forlasi ĉion, kio ne havas klare liberpenseman karakteron, nome en la rubriko « Por niaj idoj ».

Tiam D-ro Uhlmann dankas pro la sentoj esprimitaj dum la unua kunveno pri la gazeto « Homaro » kaj petas la societon subteni la deklaron de D-ro Zamenhof pri Homaranismo publikigitan de « Homaro » en broŝuro. S-ro Gottgetreu, germano, montras ke ni devas labori laŭ la senco de tiu deklaro, kaj por ekzemplo legas frazon, en kiu Zamenhof belege difinas la liberecon kaj la sincerecon de la penso. S-ro Wolf proponas, 1° sendi la broŝuron aldone kun nia bulteno al ĉiu membro ; 2° sendi al la majstro leteron por danki lin je la nomo de la Societo pro la kuraĝo kaj nobleco kun kiuj li asertis la principon de vere libera penso, farante al la homoj por morala progreso, per tia parolo kaj ekzemplo, duan servon egale netakseblan.

Post varme aprobaj aplaŭdadoj, la ĉeestantaro danke akceptas proponon de S-ro Chandelliez, kiu veturus de Francujo al Lisbono oktobre por reprezenti nian societon en la Universala kongreso de la liberpensuloj. La sekretario ankaŭ konsiliĝos kun niaj hispanaj anoĵ.

La kunsido estas fermita je la 11-a, kaj plu interparolinte pri niaj komunaj laboroj kaj esperoj, ni disiras adiaŭante ĝis Parizo.

La sekretario,
R. DESHAYS.

NIA SKRIBA VOĈDONO

Ni kunsendas al ĉiu membro voĉdonilon, kiun li bonvolos plenigi post legado de la protokolo de niaj preparaj Kunvenoj en Bern, kaj resendi antaŭ la fino de novembro. La signifo de la voĉdono kaj la vivo mem de nia societo postulas ke plej multaj respondu kaj komuniku almenaŭ je tiu okazo siajn ideojn kaj dezirojn.

ORATORA KONKURSO

EN LA BERNA KONGRESO

Ce la oratora konkurso en la Berna kongreso, ni plezure rimarkis (kaj rimarkigu ĉiuj al aliaj Esperantistoj), ke la « reĝino » disdonanta la kronojn, S-ino Hankel, kaj tri el la premiitoj, S-roj Jacobs, Mahn kaj Rajci, estas membroj de Libera Penso.

Propagandu vi por ni, ho niaj oratoroj !

NIA NOVA PRESISTO

Oni tro scias, ke nia bulteno ankoraŭ ne ĝustatempe aperis, malgraŭ la sindona penado de nia dankinda amiko W. Nutters, kiu de Amsterdam, direktis kaj instigis la presistojn en Haag. Feliĉe en Bern la kongreso renkontigis nin kun esperantista presisto, membro mem de L. P., eĉ edzo de agema Esperantistino, S-ro Hallet en Charleroi (Belg.). Li akceptis la prezon rilate malgrandan, kiun ni pagis ĝis nun, kaj promesas akuratan ĝustatempecon. Regule vivu la Bulteno !

ALIĜOJ

F-ino J. Flourens, villa Roksano, Béziers, Franc.

S-ro Attilio Clavenna, 8, via Varese, Sampierdarena, Ital.

S-ro Arthur Von Arx, Nord, 47, La Chaux de Fonds, Svis.

S-ro Julio Mangada Rosenörn, infant. kapitano, S. Bernardo, 96, Madrid.

S-ro A. Giraud, instruisto, 2, rue du Nil, Marseille, Franc.

S-ro Otto Tesch, 64, Hanaüerlandstrasse, Frankfurt A. M., German.

S-ro J. Dillen, 10, rue des Aulnes, Antwerpen, Belg.

S-ro W. Kaweck, komercisto, Varsovio, Pol.

Abonas : S-ro Goodliffe, Letchworth, Angl.

Eksiĝas : Gasse, Kluge, Machiela, Kuhe, Rosensbock, Beer, Devčić, Pesič, Jahns, Tavener.

Mortis : Bourlet, Ladevèze.

Entute 187 membroj.

KASO

Enspezoj :

Reportite	Fr. 295,80
Kotizaĵo de Olshausen 1912-13	6,00
» Chandelliez 1913	2,50
» Mahn 1911-12-13	7,50
» Hermant 1911-12-13	7,50
» Stroele 1911-12-13	7,50
» F-ino Flourens 1914	2,50
» Clavenna 1914	2,50
» Von Arx 1914	2,50
» Rosenörn 1914	2,50
» Arabeno 1912-13	5,00
» Giraud 1913-14	5,00
» Tesch 1914	2,50
» Dillen 1914	2,50
» Soriano 1914	2,50
Abono de Goodliffe 1914	2,50
Vendo de broŝuroj Ferrer	1,20

Sume Fr. 358,00

Elspezoj :

Al S-ro Nutters ni ŝuldis :	
Prezon de 4 n-roj	37,60 guldenoj
Afrankojn	13,66 »
Diversajn	1 »
	<hr/>
	52,26 »

Aliparte S-ro Nutters senpere ricevis de S-ro Schoofs fr. 50 (sumon de l'kotizaĵoj en Antwerpen) = 23,69 g. Restis 28,57 g. = fr. 60.

Dq sendo al S-ro Nutters	Fr. 60,50
Poŝtaj elspezoj	3,50

Sume Fr. 64,00

Restas en kaso Fr. 294,00

Ŝanĝita adreso : S-ro R. Rajci, 11, Oszlop-u. 28, IV-4 Budapeŝt, Hungar.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO : 1 Sm. (Fr. 2.50). — EKSTER FRANCUJO, fr. 2.60

Sekretario-Kasisto : RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

EnParizo, kotizojn kaj aliĝojn ricevas S-ro GUILLEMIN,
kaj S-ro DAUPHIN (Librejo HACHETTE).

Deklaracio pri Homaranismo

de D-ro. L. L. ZAMENHOF

Mi estas Homarano ; tiq signifas, ke mi gvidas min en la vivo per la sekvantaj principoj :

I

Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion ; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

II

Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

III

Mi konscias, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj, kian ajn supozatan devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas ; la identigadon de la intereso de lando kun la intereso de tiu aŭ alia gento aŭ religio kaj la pretekstadon de iaj historiaj rajtoj, kiuj permesas al unu gento en la lando regi super la aliaj gentoj kaj forrifuzi al ili la plej elementan kaj naturan rajton je la patrujo, mi rigardas kiel restaĵon el la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

IV

Mi konscias, ke ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti nomon neŭtrale-geografian, sed ne la nomon de ia gento, lingvo aŭ religio, ĉar la gentaj nomoj, kiujn portas ankoraŭ multaj landoj de la malnova mondo, estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia deveno. Ĝis la tempo, kiam tiuj landoj ricevos nomojn

neŭtralajn, mi devas almenaŭ en interparolado kun miaj samprincipanoj nomi tiujn landojn laŭ iliaj ĉefurboj kun aldono de la vortoj « regno », « provinco » k. t. p.

V

Mi konscias, ke en sia privata vivo ĉiu homo havas plenan kaj nedisputeblan rajton paroli tiun lingvon aŭ dialekton, kiu estas al li plej agrabla, kaj konfesi tiun religion, kiu plej multe lin kontentigas, sed en komunkigado kun homoj de aliaj lingvoj aŭ religioj li devas peni uzi lingvon neŭtralan kaj vivi laŭ etiko kaj moroj neŭtralaj. Mi konscias, ke por samregnanoj kaj samurbanoj la rolon de lingvo neŭtrala povas ludi la lingvo regna aŭ tiu kultura lingvo, kiun parolas la plimulto de la lokaj loĝantoj, sed ke tio devas esti rigardata nur kiel prooportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto, sed ne kiel ia humiliga tributo, kiu ŝuldas gentoj mastrataj al gentoj mastrantaj. Mi konscias, ke en tiaj lokoj, kie batalas inter si diversaj gentoj, estas dezirinde, ke en la publikaj institucioj estu uzata lingvo neŭtrale homa, aŭ ke almenaŭ krom la gentlingvaj kulturejoj tie ekzistu ankaŭ specialaj lernejoj kaj kulturaj institucioj kun lingvo neŭtrale-homa, por ke ĉiuj dezirantoj povu ĉerpi kulturon kaj eduki siajn infanojn en senŝovinisma spirito neŭtrale-homa.

VI

Ĉar mi konscias, ke la reciproka malpaco inter la homoj neniam ĉesos, ĝis la homoj alkiutimiĝos starigi la nomon « homo » pli alte, ol la nomon de gento, kaj ĉar la tro nepreciza vorto « popolo » ofte donas kaŭzon al genta ŝovinismo, disputoj kaj malbonuzoj kaj ofte malame dividas inter si la filojn de la sama lando aŭ eĉ de la sama gento, tial je la demando, al kiu popolo mi alkalkulas min, mi respondas : mi estas Homarano ; nur tiam, kiam oni demandas min speciale pri mia regno, provinco, lingvo, deveno aŭ religio, mi donas pri tio precizajn respondojn.

VII

Mia patrolando mi nomas tiun landon, en kiu mi naskiĝis ; mia hejmolando mi nomas tiun landon, en kiu mi

estas konstanta, fikshejma loĝanto. Sed ĉar pro la nedi-finiteco de la vorto « lando » la vortoj « patrolando » kaj « hejmolando » estas tre neprecizaj kaj ofte kaŭzas disputojn kaj malpacon kaj malamike disigas inter si la filojn de la sama terpeco, tial en ĉiuj dubaj okazoj mi evitas tiujn neprecizajn vortojn kaj uzas anstataŭ ili la pli precizajn vortojn « patruja regno », « patruja regiono », « patruja urbo », « hejma regno », « hejma regiono », « hejma urbo ».

VIII

Patriotismo mi nomas la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kiam ajn devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas. La servadon speciale al la intereso de unu gento, aŭ la malamoni kontraŭ alihejmuoj mi neniam devas nomi patriotismo. Mi konscias, ke profunda amo al sia patrujo kaj al sia hejmo estas afero tute natura kaj komuna al ĉiuj homoj, kaj nur nenormalaj eksteraj cirkonstancoj povas paralizi tiun tute naturan senton. Tial se en mia hejmo ĉiuj laboroj estas ekspluatataj por la oportuneco aŭ gloro de unu speciala gento kaj tio paralizas mian entuziasmon por socia laborado aŭ eĉ devigas min reveni pri alia hejmolando, mi ne devas malesperi, sed mi devas min konsoli per la kredo, ke la nenormala stato en mia hejmo pli aŭ malpli frue pasos kaj miaj filoj aŭ nepoj plene ĝuos tiun fortigan entuziasmon, kiun en mi paralizis la maljusteco de miaj samhejmanoj.

IX

Konsciante, ke lingvo devas esti por la homo ne celo, sed nur rimedo, ne disigilo, sed unuigilo kaj ke la lingva ŝovinismo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de malamo inter la homoj, mi neniam gentan lingvon aŭ dialekton devas rigardi kiel mian sanktaĵon, kiel ajn mi ĝin amas, nek fari el ĝi mian batalan standardon. Kiam oni min demandas speciale pri mia lingvo gepatra, mi nomas senŝovinisme tiun lingvon aŭ dialekton, en kiu mi en mia infaneco parolis kun miaj gepatroj ; kiam oni min demandas speciale pri mia lingvo persona, mi — gvidante min per neniam ŝovinismaj konsideroj — nomas tiun lingvon, kiun mi persone plej bone posedas aŭ plej volonte uzas ; sed kia ajn estas mia lingvo gepatra aŭ persona, mi devas posedi ankaŭ tiun neŭtrale-homan lingvon, kiun miaj samtempuloj uzas por rilatoj intergentaj, por ke mi ne bezonu miakulpe altrudi al aliuloj mian lingvon kaj por ke mi havu moralan rajton deziri, ke aliuloj ne altrudu al mi sian, kaj por ke mi povu sur senŝovinisma bazo servi al la kulturo neŭtrale-homa.

X

Konsciante, ke religio devas esti nur afero de sincera kredo, sed ne ludi la rolon de hereda genta disigilo, mi nomas mia religio nur tiun religion aŭ religianstataŭntan sistemon, je kiu mi efektive kredas. Sed kia ajn estas mia religio, mi konfesas ĝin laŭ la neŭtrale-

homaj principoj, « homaranaj », kiuj konsistas en jeno:

a) La plej altan por mi ne kompreneblan Forton, kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala, mi povas nomi per la nomo « Dio » aŭ per alia nomo, sed mi konscias, ke la esencon de tiu Forto ĉiu havas la rajton prezenti al si tiel, kiel diktas al li lia prudento kaj koro aŭ la instruoj de lia eklezio. Neniam mi devas malami, moki aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo pri Dio estas alia ol mia.

b) Mi konscias, ke la esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo de konscienco kaj ke la ĉefa, por ĉiuj homoj deviga principo de tiuj ordonoj estas : agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi ; ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn, kiujn ĉiu homo, konforme al sia kredo, havas la rajton rigardi aŭ kiel devigajn por li dirojn de Dio, aŭ kiel komentariojn, kiujn miksite kun legendoj donis al ni diversgentaj grandaj instruantoj de la homaro, kaj kiel morojn, kiuj estas starigitaj de homoj kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de mia volo.

c) Se mi kredas je neniu el la ekzistantaj revelaciaj religioj, mi ne devas resti en iu el ili sole pro motivoj gentaj kaj per mia restado erarigi la homojn pri miaj konvinkoj kaj herede nutri por senfinaj generacioj intergentan disecon, sed mi devas — se la leĝoj de mia lando tion permesas — malkaŝe kaj oficiale nomi min « liber-kreda », ne identigante tamen la liber-kredon speciale kun ateismo, sed rezervante al mia kredado plenan liberecon. Kiam en mia loĝloko ekzistos komuninterkonsente aranĝita, plenforme organizita sengenta kaj sendoktrina komunumo de liber-kredanoj, al kiu mi povos aliĝi kun plena kontenteco por mia konscienco kaj por la bezonoj de mia koro, tiam — por fiksi fortike kaj precize mian religion neŭtralecon kaj savi mian postularon kontraŭ senprogrameco kaj konsekvence kontraŭ refalo en gente-religian ŝovinismon — mi devas aliĝi al tiu liber-kreda komunumo tute oficiale kaj heredigeble kaj akcepti por mi ĝian neŭtralan nomon, ĝiajn komunumajn aranĝojn, ĝiajn nedevigajn neŭtrale-homajn festojn kaj morojn, ĝian neŭtrale-homan kalendaron k. t. p. ; ĝis tiu tempo mi povas resti oficiale alskribita al tiu religio, en kiu mi naskiĝis, sed mi devas ĉiam aldoni al ĝia nomo la vorton « liber-kreda », por montri, ke mi alkalkulas min al ĝi nur provizore, laŭmore kaj administre.

ANTI-KLERIKALAJ HUMORAĴOJ

de José Nakens

Antaŭparolo de la aŭtoro

Dum al kiu ajn religio oni dediĉas kultron kun vera fido, ĝi inspiras grandan respekton eĉ al tiuj, kiuj ĝin ne kredas ; kiam tiu ĉi fido malaperas, nenio prezentas pli da motivoj por ridindeco kaj satiro. Kio antaŭe estis tenata kiel vera, rezultas absurda ; kio majesta, vulgara ; kio ideala, karikaturo. Vane la homo fermas siajn

okulojn por ne vidi kaj ŝtopas siajn orelojn por ne aŭdi ; la moko spionas tra liaj lipoj la okazon sin elmontri, kaj la satiro glitas nerimarkite ĝis la pintoj de lia plumo, avidante disversiĝi sur la paperon.

Se homo estas simplanima, li senkaŝe konfesas sian animstaton ; se li ne estas tia, li kaŝas siajn impresojn kaj penas trograndigi sian respekton antaŭ la kredoj, kiujn li jam ne havas, estigante per tio kun sia konscienco vivmanieron, kiu permesas al li moki interne tion, kion publike li respektas. Ne mankas, kiu enfermiĝas en malŝateman indiferecon. La unua sistemo estas lojala, la dua konvena, la tria havas ĉiujn malutilojn de la unua sen neniu el la utiloj de la dua.

Mi tie ĉi analizos kaj kritikos neniun el ili, ĉar tio ne estas mia celo, sed mi diros, ke mi uzadis neniun el ili tial, ĉar mi neniam sentis ian bezonon pri religia kredo.

Cu spirita malsupereco ? ĉu supereco ? feliĉo ? malfeliĉo ? manko ? privilegio ? mi ne scias. Mi simple citas la fakton. Nur tion mi certigas, kun la tuta respekto ŝuldata al tiuj, kiuj profesas religion : ĝin mi neniam bezonis. Ke estus al mi utilinte ĝin havi, mi sciigis je mia kosto. « La ateismo, diris al Henriko Heine lia patro, profesia bankisto, estas kambio senvalora en Borso ».

Jes, mi senigis min el multaj kontentiĝoj, kiujn ĝuas la popolamaso, tial ke mi ne sekvis la komunan opinionon pri religiaj aferoj ŝajnigante kredi tion, kion mi ne kredas, eĉ tion mi ne faris ; mi eĉ ne kontraŭstaris la malbenitan tenton ridi kaj laŭte ridegi pri tio, pri kio tiom da aliaj sinkaŝe ridas.

Kial, pensante tiel, mi kelkafoje batalis kontraŭ la pastroj de ĉiuj religioj ? Tial, kiel mi diversfoje diris, ĉar ekzistas personoj por kiuj satiro kaj humoreco estas nealireblaj, kaj mi bezonas kompreniĝi de ĉiuj, por alporti al ĉiuj la konvinkon, ke la pastro estas la malamiko de la libereco kaj de la homa indeco, kaj sekve la kaŭzo de ĉiu morala, intelekta kaj materiala malprogreso. Kaj ke, koncerne Hispanujon, li estas krom tio la instiganto kaj defendanto de la du civilaj militoj, kiuj kaŭzis nian ruinon kaj per larmoj kaj sango enmarĉigis nian landon. Al tio, kaj al la timo, ke li okazigu trian militon, kiun li estas prilaboranta, estas ĉefe ŝuldataj miaj antiklerikalaj laboradoj. Sen tiu timo mi certe estus imitinta tiujn, kiuj ridetas, kiam oni parolas al ili pri religio.

La antaŭajn liniojn mi skribis nur por antaŭebati la argumenton, ke mi kontraŭdiras min memmokante en tiu ĉi libro kredon, kiun ĉe aliaj mi konsideras serioze. Kaj se mi sukcesus, ke sur la lipoj de miaj legantoj ofte ekaperos rideto, mi kredus min rajtigita peti ilin pri dankemo : ĝin ja meritas homo, kiu ĉe tiuj ĉi tempoj, kiam tiel multe da aliaj nin plorigas jen de ĉagreno, jen de kolerego, penas meti inter tiujn ambaŭ sentojn parentezon da gajeco.

Trad. P. L.

J. NAKENS.

LIBERECO DE KULTOJ

En Milano kaj junio de 313a, antaŭ 1,600 jaroj, estis proklamata la libereco de kultoj. La romana Eklezio festas nun tiun datrevenon, sed ĝi zorge kaŝas al la fide-luloj la konstantenan dekreton, almenaŭ en la landoj, kie ĝi havas privilegion. Jen la teksto :

« Ni, Konstanteno kaj Lucinio aŭgustaj, kunveninte en la urbo Milano en la celo studadi ĉiujn aferojn rilatajn al la ordo kaj intereso de l'Imperio kredis, ke neniu el ili estos tiel utila al niaj popoloj, kiel iu konsistanta reguligi antaŭ ĉio la manieron honori la Diecon. Ni decidis cedi al la kristanoj, same kiel al ĉiuj aliaj, la liberecon praktiki la religion kiun ili preferas, en la celo ke la Dieco kiu loĝas en la ĉielo estu favora al ni kaj al ĉiuj, kiuj okupas niajn regnojn.

Sajnis al ni, ke estas la plej bona kaj prava sistemo rifuzi al neniu el niaj subuloj, jen kristano, jen partiano de alia kulto, la rajton praktiki la religion kiun li opinias pli konvena. Tiamaniere, la superega Dieco, kiun ĉiu de nun honoros libere, povos laŭkutime doni al ni sian favoron kaj bonvolon. Konvenas do, ke via (provincestra) Moŝto sci, ke per tio ĉi ni forigas ĉiajn limigojn de la Dekreto, kiun ni antaŭe sendis al vi pri la kristanoj, kiuj de nun povos sen kiu ajn malhelpo praktiki sian religion. Tion ni komunikas al vi en la plej firma maniero, por ke vi sci ke ni lasas al la kristanoj la plej plenan liberecon en la praktikado de ilia kulto. Kaj tial ke tion ni cedas al la kristanoj, vi komprenos ke ĉiuj aliaj devas ĝui la saman rajton. Jen kio estas inda je la jarcento en kiu ni vivas, kio konvenas al la paco de la Imperio : ke por ĉiuj regnantoj estu absoluta la libereco adori la Dion, kiun ili elektis kaj, neniu kulto estu senigita je la honoroj, kiujn ĝi meritas... »

Tr. P. L.

Esploristoj (bojskotoj)

Devo ŝajnas al mi kaj al kelkaj amikoj deklari, ke sub pedagogia vidpunkto, la ideo krei Societon de naciaj Esploristoj (bojskotoj) estas bedaŭrinda eraro.

Antaŭ ĉio por eniri en la Societon, oni postulas de la knaboj religian fidon kaj deklaron pri fideleco al la reĝo. Do, la Asocio estas nova sektana grupiĝo. Vane estas enmeti en la regularon, ke polemikoj pri politikaj kaj religiaj aferoj estas malpermesitaj. Des pli malbone. Al junulo oni devas neniam rifuzi la justan rajton elmeti sian honestan opinionon pri ĉio dia kaj homa, des malpli kiam de antaŭe oni altrudas al li religiajn kaj politikajn devojn. Sekve de tio okazos ĉe tiu Asocio, kiel ĉe vulgarmodaj kunvenoj, kie oni konsideras malbonmaniera elmontri ideojn, kiuj ne estas tiuj de la mastrino kaj kie la fanatikuloj povas diskrevigi laŭplaĉe, ĉar la malpermeso dogmoprediki ne atingas ilin.

Eble ĉiu infano bezonas filozofion, komprenon pri la mondo kaj la tuta vivo, por pravigi ian Etikon. Tia es-

tas la opinio de A. Costa kaj de Angiulli, Vacherot, Pelletan, k. c. Sed tiuj pedagogoj, same kiel Hippeau kaj Galton avertas, ke filozofio ne estas dogmo. Tiu ĉi povas kontraŭdiri la progresojn de la moderna pensado kaj esti maljuniĝinta produkto de la homa spirito. La filozofio kiun bezonas la infano konsistus simple en tio, ke la elementaj konoj pri Fiziko kaj naturaj sciencoj unuigu en elementan komprenon pri Kosmologio (plej simpla formo de Filozofio), kaj ke ĉe la instruado de Historio kaj Etiko oni montru, kiel la leĝo de la socia progreso kunligiĝas kun la leĝoj de la vivo kaj de la Naturo. Tiamaniere, el la instruoj pri naturaj kaj moralaj leĝoj propramove elspruĉos kompreno pri la mondo kaj la celo de la vivo ; tro ĝuste estas la filozofia instruado, konsiderata kiel supera kondutregulo.

Ne tion volas la instruantoj de la Esploristoj kaj oni povas kun granda verkisto diri al ili : kiel do ? esti religiano, kaj ne povi paroli pri religio ! Lerni katekismon kaj ne pensi pri filozofio ! Sed estas ja la samaj problemoj ! Diru pli vere, ke vi pretendas kun sektanaj celoj aliformigi la infanojn en maŝinojn.

* * *

La tabelo de konoj postulitaj de la Esploristoj pravas, ke same kiel ĉe la infanaj aŭ lerneaj bataljonoj, oni pretendas ne eduki homojn, sed formi soldatojn. Trakuri piede du kilometrojn dum dekmin minutoj, ekbruligi fajron kaj senfeliĝi kapridojn, fari ligotuberojn per ŝnuroj, transdoni depeŝojn per flagoj, bandaĝi vunditon, haltigi ĉevalon, fari demandojn al kamparanoj kaj kuiri manĝon, estas sendube tre utilaj konoj, sed kiuj ne rajtigas la instruantojn diri, ke ili estas kreontaj novan junularon, kiu plenumos siajn devojn kaj estos kapabla efektiviĝi sian fincelon en la vivo. En la mondo estas pli multe, ho Lisardo ! Interalie, la ĉefa afero estas posedi sendependan juĝpovon, ĉiam malamika de antaŭtempaj disciplinoj ; senti por la homoj amon kaj por la bestoj kompaton, kio estas rekte kontraŭa al la arto senfeliĝi kapridojn ; koni la principojn de la scienco, kiujn oni ne lernas grimpane sur la arbojn, sed antaŭ la libroj kaj la nigra tabulo ; legi kaj skribi multe, anstataŭ ludi je la regimentoj kaj la plifortigitaj brigadoj per kio oni senigas la infanon el lia sendependeco kaj gajeco.

Kaj kio pri fizika edukado ? oni demandas. Sajnas, ke jam fariĝas tempo deklari, ke Amoros, Linck, Marcelo Sanz, Dekret, Fraguas, Fernandez Zabala kaj Kindelan puŝis nin tro pretercelen. La publiko ne bone komprenis la konsilojn de tiuj meritplenaj personoj, kiuj rekomendas la fizikan kulturon « kiel helpantan de la intelekta kaj morala », kaj neniam kiel ĉefan por la civitanoj. Laŭ la maniero kiel ni iradas, baldaŭ oni nur sin dediĉos, en la lernejo, fabriki ludilojn el ligno kaj papero ; ekster ĝi, transsalti fosajojn, trakuradi mejlojn, pedali, sin glitlasi, doni pugnobatojn kaj friti ovojn. Kaj tio ne estas precize la edukado. Ankaŭ ĉe la « Libera Institucio de

Instruado » la infanoj kutimas marŝi per stangokruroj, sed post kiam ili preparoladis libere pri ĉio, kion inspiras al ili ilia propramoveco, tra legis librojn kaj manuzis aparatojn. Da homoj kapablaj trakuri kvindek kilometrojn, rompi pardonon per la kapo, sin loki antaŭ virbovon, kaj implikiĝi pugno aŭ ponard-bate kun la plej kuraĝa, estas tro multe en tiu ĉi patrujo. Fari la infanojn militemaj en la lando de la ŝtonbataloj ! Kion ni bezonas, estas havi civitanojn instruitajn, saĝajn, « lertajn laŭ spirito » kaj « fortikajn ĉe konduto ».

Homojn ni volas, ne antropopitekojn. Tion pli, ke la militoj nun ne estas faritaj per lancbatoj kaj katapultskuoj, sed per scipovo, indeco, mono, aferoj kiujn oni ne akiras farante laŭmaristajn ligotuberojn, nek vidigante nudajn tibikarnoĵojn en kontraŭeco al ĉiuj reguloj de la higieno, kiuj diferencas de la postuloj de la « snobismo » (afekta elegantamo). Homo ne estas pli forta, kiam li povas suprenlevi la akson de ĉaro aŭ treni tiun ĉi, sed kiam li estas kapabla elpensi maŝinon, kiu tion faras pli senpene ; ne kiam li batalas, sed kiam li scias kial li batalas ; li ne estas pli potenca, kiam li povas ataki tranĉeon (militan terŝirmilon), sed kiam li scipovis antaŭe krei post ĝi interesojn kaj korsentojn, kiuj faciligas al li la venkon.

Nun ni ne pensas tiel ; ni kredas, ke nia gento fizike degeneris, opinio kontraŭdirita de la kirasoj kaj kaskoj de l'muzeoj, vestiloj hodiaŭ malgrandaj por kiu ajn knabego ; ni volas je ĉia kosto nin eduki kiel brutservistojn ; ni forlasas la studojn kaj nin faras cirkanoj. (Ankaŭ min mi kulpigas, mi ankaŭ estis probatalanto de mi ne scias kio). Ni malŝatas niajn patrojn, kiuj ne konis la « bojskotojn », sed havis « liberpafistojn » ; ni sekvas la konsilojn de tiuj, kiuj ne havis vorton por antaŭvidi la katastrofon de 98, kiel ni la ceteraj ĝin havis, sed kiuj lernis *a-posteriori*, amasegon da maksimumoj, interalie, ke estas necese esti fortika. Malfeliĉa fundamentita sur la imitado kaj ekzercado de la muskolo fortikeco ! kiu malbone direktite povas esti kontraŭcela ! Maltrafa entrepreno, krei aventuremajn legiojn en la lando de la civilaj militoj !

Pardonu la entuziasmojn de la ŝovinistaj sportoj. Eble ni eraras. Eble estas necese por altigi la patrujon eduki ĉiajn idojn same, kiel en la tempo de Asdrubalo. Sed laŭ mia opinio, anstataŭ Indivilo kaj Viriato mi nuntempe preferas Cajal, Galdos kaj Torres Kevedo kaj cent aliajn eminentulojn, pri kiuj oni ne scias, ke ili iam faris aerturnigojn aŭ senfeliĝis leporojn. Mi deziras, ke Hispanujo ne estu kunmetita el marŝadistoj maske vestitaj nek el recitadantoj je katekismo, sed el puraj homoj, kiel Don Kihoto ; malfortikaj, sed kuraĝegaj ; malriĉaj, sed entuziasmaj por la idealo ; malgrasaj laŭ karno, sed kapablaj en lasta okazo doni kvarcent bastonbatojn al ega la nombro da trupanoj de la Sankta Fratara.

(El Motin).

17-4-1913.

Antonio ZOZAJA.

Tr. P. L.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 SM (FR. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretario-Kasisto : RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALIĜOJN KAJ KOTIZAĴOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. P. MORTON, 62, Vesey st. New-York.

En Belgujo S-ro FRANS SCHOFS, 45 Kleene Beerstrat Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio, Cordoba.

En Italujo S-ro O. BÜNEMANN, prezidanto, 24, via A. Saffi. Milano.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 57, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

LA EDUKADO DE LA VIRINOJ

France verkita de P. P.

Esperanta Traduko de FRANCISKO DELGARBO

La antaŭparolo, per kiu oni komencigas la klarigon de iu temo, ofte ŝajnas, unuavide, sen grava rilato kun la temo mem. Tio estas iomete vera en la nuna okazo.

Oni povas tamen konstati la intimajn rilatojn de la enkondukaj vortoj kun la subjekto mem; ĉar tiu introduko koncernas la riproĉojn faritajn, *samtempe de kontraŭuloj kaj amikoj*, al iuj el niaj propraj sampensanoj, pro la maniero laŭ kiu ili edukas siajn infanojn, riproĉoj kiuj konstatas ke ne ekzistas en ili homogeneco kaj logikeco inter la pensmaniero kaj la agmaniero.

Unue ni parolos pri la riproĉo de la kontraŭulo. Antaŭ ne longe, konservativa gazeto kritikis liberpensulojn, montrante la profundan mallogikecon du tiuj « kiuj klopodas per siaj jurnalaj porforpreni de la infanoj de l'aliaj la kristanajn kredojn » kaj la religian edukadon, sed kiuj, sialflanke, « prizorgas ke iliaj propraj infanoj ricevu tiun » religian edukadon, kaj tiacele forlasas siajn « idojn dum iu tempo al la zorgoj de pastroj aŭ de bonaj fratinoj. »

Aliparte, — nun la riproĉo devenas el amiko — S-ro L. Van der Kindere, gratulante antaŭ 11 jaroj la bruselajn studentojn pro tio ke ili vekigis la senton de alligiteco al la libera ekzameno, deklaris ke ĉi tiu estis minacata ne nur de hereda mal-amiko. (1)

« La alta burĝaro estas kulpa — li diris — ĉar ĝi

(1) Paroloj laŭ la raporto de la gazeto *L'Indépendance*,

« estas malkonfesanta la principon de la libera ekzameno: la aristokratoj, de antaŭ kelkaj jaroj, estas anstataŭitaj de la liberalaj burĝoj, kaj decas konstati ke por multaj inter ili, la profitamo regas ĉiujn aliajn demandojn. Jen kial ni vidas inter ili kelkajn, kiuj donigas al siaj infanoj religian instruadon, kontraŭ al siaj propraj konvinkoj, kaj iuj kiuj sendas ilin en religiajn lernejojn. »

Kiam iu fakto estas tiel preparolata de du tiom kontraŭaj voĉoj, ĝi devas esti sufiĉe ofta; kaj se ĝi estas tiel ofta, ĝi meritas ke oni serĉesploru pri ĝia kaŭzo.

Sendube, ni tro bone scias ke, se nuntempe en nia lando, oni batalas kontraŭ la reganta opinio, kaj se oni ne iamezure oferas al ĝi, oni povas en ĉiu okazo esti malutiligita en siaj interesoj materiaj; — ke en neniu administracio estas esperebla, nek ofico, nek rangaltigo, nek honoroj, kia ajn estas la merito, — ke oni estas malhelpita en siaj aferoj, en sia industrio aŭ komerco kaj submetita al ĉikanegoj de la administracioj potencaj, kun kiuj la rilatoj pli kaj pli multiĝas kaj oftigas, kaj kiuj estas kunmetitaj pli kaj pli ekskluzive de servantoj de la Eklezio.

Estas verŝajne pro tio ke kelkaj, tion sciante, foroferas sian opinion al la malfeliĉo de la tempo; kaj — decas ke ni tion diru, — ne ĉiam ili estas la malpli sendependaj.

La batalo por la principoj tiele emas ŝanĝiĝi iom post iom en disrabado de profitoj. Kaj ni ne plu vidos, kiel antaŭ trideko da jaroj, la tutan inteligentan landanaron, unuanime jaluze pri siaj rajtoj, decidema pour uzi ĉiujn siajn liberecojn.

Ĉar oni forgesas ke por ĉi tiuj liberecoj ekzistas garantio pli potenca ol tiuj enskribitaj en la

leĝon : estas la neprofitemo kaj sendependeco de karaktero de la landanoj.

Sed tio estas specialaĵo ne nur en Belgando, oni ja konstatas la fakton ankaŭ aliloke, de sufiĉe longa tempo.

Kaj la evoluado de la Eŭropa civilizacio, en tio helpita de multaj bone konataj regnestroj, havigis al si spiriton esence komercan, vulgaran, emantan preferi la frivolajn plezurojn pli ol la grandajn ideojn kaj noblajn pasiojn, incitantan al celo de ia tuto de ĝuoj, fakte tuj efektiveblaj, por kiuj oni oferas la aferoj de konscienco kaj de prudento; tiamaniere, la militema kontraŭstaro de la principoj, kies graveco estis iam tiel granda, inklinas cedi la lokon al maldelikataj bataloj de apetitoj, deziregoj kaj ambicioj.

Konstatante tiun situacion, unu el la plej famaj pensuloj niatempaj, Ernest Renan, diris (kaj tio ĉi nin fine kondukas al nia temo): « Mi kuraĝos montri la kulpulojn; ESTAS LA VIRINOJ ».

Tiun virinan influon en la intelektaj medioj, en la familioj de liberpensuloj, ni devas precizigi, por ke ni povu ĝuste serĉi kiel la virina edukado devas esti aliigita.

Renan pri tio klarigis:

« Estas nekontraŭdireble, diris li, ke la virinaj instinktoj okupas nuntempe pli da loko en la ĝenerala aspekto de l'mondo ol antaŭe, laŭ tiu senco ke la mondo estas pli ekskluzive okupata pri aĵoj, kiujn oni kutimas konsideri kiel la proprajn de l'virinoj ».

« Anstataŭ ol demandi de la viroj grandajn farojn, kuraĝajn entreprenojn, heroajn laborojn, la virinoj postulas de ili riĉecon, por kontentigi vulgaran luksemon ».

La ĝenerala vivo sin dungigis de la instinktoj de l'virino, kaj de la instinktoj *malsaperaj*, kiuj formas la malpli noblan parton de ŝia vivcelo ».

Kaj se ni nun serĉas la kaŭzon de tio kion Renan riproĉas al la virinoj, ni ĝin trovas en la edukado al ili donita...

Inter la burĝaro, kie varbiĝas la liberpensulo kaj kie ofte la malgrandaj imitas la grandajn, la edukado ricevita de la juna virino faras *ĝenerale* de ĉi tiu personeton, kiu vestiĝas ege bone, kiu multege habilas, kiu pensas nur pri dancado kaj kiu nenion seriozan scias.

El tio devenas ke, tiel ofte, la viro timas ke, per siaj solaj fortoj kaj rimedoj, li ne povos krei « feliĉan » familion, t. e. familion en kiu la virino povos libere ekzerci ĉiujn vanajojn enradikigitajn

en si per la formado de sia spirito, tial ke ŝi kredigas al li ke la personoj de ŝia rango aŭ edukado ne povas simple vivi, kaj ke ŝi mem ne povas dece, malpli multe elspezi ol siaj antaŭaj lernejamikinoj aŭ nunaj mondumkunulinoj.

Pro tiuj ŝanceliĝoj de la junaj viroj kaj ilia malgranda fervoreco naskiĝis tiu kurado, tiel plena je ruzoj kaj insidoj kiel je festoj kaj akceptoj, en kiu tiom da patrinoj kaj filinoj kunigas sian intelekton kaj agadon: *la kurado al edzo!*

Kaj eĉ se oni ne konsideras la laste nomitan vidpunkton, pli malgajan ol ridindan, la nuna virina edukado estas ankoraŭ malfeliĉiga laŭ multaj koncernoj.

Unu el la unuaj estas la tro granda diferenco, kiun ĝi en la fundo mem kaj en la ĝenerala spirito prezentas kun tiu de la knaboj.

Kaj okaze de tio, oni povas fari malgrandan komparon inter la edukado de knaboj de diversaj naciecoj kaj la edukado de infanoj de la du seksoj en unu sama nacio.

Inter viroj de diversaj naciecoj civilizitaj, identa klasika kulturo kreas ja iun spiritan fratecon, iun internacian intelekton, konforman al la principoj de libera penso, kiun malaperigus la forigo de tiu klasika kulturo, t. e. la kompleta forigo de la malnovaj humanismaj studoj.

Tutsame, estas nekontraŭdireble, ke la bona harmonio kaj spirita intimeco en la geedza vivo estas treege favorigita per tio kion la edzo kaj edzino, estantaj junaj, ambaŭ lernis, kaj per tio kion ili ambaŭ scias. Nu:

La edukado de la knaboj kaj tiu de la knabinoj, malsame ellaboritaj kiel ili nun estas, povos eble iufoje kombiniĝi, pli ofte sin kontraŭi, sed neniam sin interanstataŭi en la edukado de la infanoj.

Kaj tamen la vidveco ofte ekŝanĝas la familiajn interrilatojn kaj, kiel la statistikoj *konstante* montras al ni, ekzistas pli da vidvinoj ol da viroj. Estas do la virino, kiu konservas pli ofte, en tiu okazo, la respondecon *sola* influu sur la sorton de la idaro.

Tiamaniere ke, konservante la kutimon certigi ke la patrino cerbo devas esti la multe malpli supera kaj la malpli klerigita, oni suferigas la plej malgajan kaj la plej bebaŭrindan estingon de spiritlumo al tiuj kiuj estas patrorfaj.

Aliflanke, se la virino ne volas aŭ ne povas edziniĝi, okazas, pro ŝia edukado kiu ne faris el ŝi individuon fortan kaj kapablan, ke ŝi ne posedas la sendependecon kaj la viran helpon, nek laŭ materia, nek laŭ morala vidpunkto, kaj se ŝi ne povas, krom en tre maloftaj ekceptoj, havi la fierecon sin sola helpi en la vivo.

Decus do ke tiurilate ekzistus malpli da mal-
sameco inter la knaba edukado kaj tiu de la
knabinoj; kaj al ĉi tiuj oni devus doni la edukadon
de la knaboj sufiĉe malplisargitan, kompreneble,
por ke ĝi ne estu malloga al ili.

Per la sistemo de la duseksa lernejo, tiu rezulto
estus verŝajne atingita; kaj, krom tio, oni trovos
en ĝi aliajn profitojn; ĉar ĝi helpas perfektigi la
moralecon de la junuloj, enradikigante en ili la
respekton al siaj kunulinoj; kaj ĝi liberigos tiujn
ĉi de la timemo, kiu tiel ofte estas konsekvenco de
la edukado aparte de l'alia sekso.

Kaj, se la kompleta kunedukado de geknaboj
ne jam estas alkutimiginta al niaj komprenoj, por
ke ĝi estu ĝenerale enkondukita, oni ne devus
almenaŭ tiel obstine disigi la du seksojn dum la
junaĝo. Tiuj kiuj kelkan tempon vivis la anglan
aŭ germanan vivon scias kial supera estas tiu
metodo, kiu samtenpe ne prezentas danĝeron iun.

* * *

Tio ĉi kondukas nin al la atentigo pri dua
vidpunkto, al kiu la nuna edukado de l'virino
estas malutila, kaj al la rimarko ke flanke de la
propredirita kulturo, ekzistas ankoraŭ la formado
de la karaktero kaj la difino de la spirita inklino.

La zorgo instrui nur la pozitivan veron kelkafoje
tremigas pro respondeco tiujn, kiuj havas, je ia
ajn grado, la taskon eduki parton de la nacio.

Ĉar tio kion oni devas eviti, estas la enigo de
imagitaj kaj eksterrealaj tendencoj en la junajn
intelektajn; kaj, nome, oni devas ŝirmi ilin
kontraŭ la mistika spirita influo, propra al religia
edukado, tial ke ĝi kondukas al akcepto de ĉiuj
eraroj kaj de ĉiuj superstiĉoj; kaj estos fermitaj
por ĉiu logiko tiuj intelektaj al kiuj oni estus
lerninta *kredi* anstataŭ ol lernigi al ili *prudente*
rezoni.

Tio kion oni devas eviti ĉe knabinoj estas la
danĝero pro la supernaturajo, ĉio kio povas
vekigi, nutri kaj eksciti la imagokapablan parton
de ilia intelekto.

Nu, la knabinoj neniel estas edukitaj en la nescio
de la supernatureco, de l'imageco, de la ekster-
realeco, sed en la nescio de preskaŭ ĉiuj realaĵoj!
La rutino kaj la mondumaj aŭ religiaj antaŭjuĝoj
volas que ili ne sciu, aŭ ke, se ili scias, ili ŝajnigu
ignori tion, kion ili kaŝe lernis per nerektaj vojoj,
kiuj es'as tiel danĝerplenaj, kiel ne estas tia la
klarigo sincera kaj natura.

Ĉiurilate, la scio armas kaj plifortigas. Decus do
ke la moderna junulino estu pli armata per kono
de la realaĵoj, ne nur por ke ŝi povu sengene kaj
sentime sin sola trovi antaŭ la viroj, sed ankaŭ
por que ŝi ne imagu al si, ke senigita de gepatroj
aŭ edzo por ŝin gvidi kaj defendi, estas danĝere

por ŝi, riski unu solan paŝon en la vivon, kaj
ankoraŭ por fari el ŝi spiriton larĝan kaj mal-
fermitan, anstataŭ spiriton mallarĝan, kie regas
nur malgrandaj ideoj kaj malgrandanimaj sentoj.

(Daŭrigota).

Kongreso de la Libera Penso en Lisbono

Ni estis reprezentataj de nia amerika societano
S-ro J. P. MORTON, delegito de l'usona l. p.
societo. Li publike kaj private propagandis
sukcese, lerte profitante la permeson jam donitan
dum la lasta kongreso en München kaj ree
konsentitan dum ĉi tiu, uzĵ la helpajn lingvojn
Esperanto kaj Ido. La kongreso ne volis sekvi
idistan ĉeestanton, S-ron Peus, en lingva diskutado.

Jen traduko de la protokolo presita en la belga
l. p. ĵurnalo « La Pensée »:

MORTON (Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj) esperas
ke la malpaciga demando pri lingvoj malaperos el
la kongresoj, kiam oni bonvolos renkontiĝi sur la
neŭtrala kampo de la universala helplingvo
Esperanto. Dume li estas feliĉa reprezenti la
grandan amerikan respublikon. Tulkore la
amerikaj respublikanoj sendas sian saluton al
siaj portugalaj fratoj.

Li alportas ankaŭ la saluton de la Esperantistaj
liberpensuloj, kiuj kredas, ke la uzado de
internacia lingvo estos granda paŝo farita al la
frateco de l'popoloj kaj la disvastigo de la raciistaj
ideoj.

Libera Penso kaj Politiko

La Kongreso de Liberpensuloj en Lisbono, diris
ĝia prezidanto S-ro Magalhaes Lima, estas neniel
politika sed nur scienca, filozofia, kiel pruvas mul-
taj el raportoj prezentitaj. Ni pretendas fari scien-
can laboron, de moderna penso, de enciklopedia
toleremeco, de mondamikiga mentaleco. Por atingi
tiun celon estas necese evoluigi la liberan penson,
farante ĝin pli pozitiva kaj malpli negativa, pli
sinteza kaj malpli analiza. Estas neceso krei
ligilon ĉiufoje pli streĉan inter ĉiuj grupoj kiuj
batalas sur la sama kampo, etnikaj societoj,
racianistoj, tiuj de la libera penso kiuj kunfandiĝas
en unu komunan deziron.

La afero estas starigi ne doktrinon sed metodon.

Prudenta estas, komentarias *El Pays*, tiu filozofa
sintendado de Magalhaes Lima, sed ŝajnas tre
malfacile eviti la intervenon de la alta politiko ĉe
la diskutoj pri la rolo de la ŝtato en rilato kun la

religiaj dogmoj kaj la batalantaj eklezioj. La laika lernejo, la tombejo, la civila edziĝo, la forigo de la ĵuro, la libereco de kultoj, la kristana kaj musulmana fanatikeco kontraŭ la hebreoj, la apartigo de la eklezioj kaj la ŝtatoj, estas demandoj esence politikaj.

Pravaj estas la ĉi supraj ambaŭ opinioj. Ni nur rimarku, ke la oficiala subteno donita al la Kongreso de la portugala estraro, kiu devas atenti pri siaj internaciaj rilatoj kun la aliaj ŝtatoj, sufiĉas por klarigi la sintenadon de la eminenta kaj simpatia Kongresprezidanto.

P LINARÈS.

Laikaj Esploristoj

La plendoj de S-ro A. Zazaja trovis eĥon. La « Instrua Hejmo de la Radikalaj Respublikanoj » de la Madrida distrikto « La Latina » iniciatas la formadon de korpuso da esploristoj, konsistigota et la infanoj de la madridaj laikaj lernejoj kaj ceteraj junuloj kiuj petas pri aliĝo.

Tiu organizaĵo estos inspirita de la Moderna Pedagogio, amo al la Naturo, Libereco kaj Progreso. En la regularo ne estas parolite pri Dio nek pri Ŝtatestro.

P. L.

EL BELGUJO

Dimanĉon la 19an de oktobro en Bruselo granda manifestacio organizita de la Nacia Federacio de Liberpensaj Societoj kontraŭ la nekonstitucia projekto de Instruada Leĝo, kiu nuntempe estas diskutata en la belga parlamento. Multaj socialistaj kaj liberalaj grupoj de la lando ankaŭ partoprenis la manifestacion. Laŭ la plej moderaj gazetoj de Belgujo, la nombro de manifestantoj estis dudek mil, venintaj el ĉiuj flankoj de la lando. La manifestacio laŭiris la ĉefajn stratojn de Bruselo kaj alvenis sur la Granda Placo. Sur la perono de la historia urbdomo parolis S-roj Bayot kaj Georges Lorand, kaj oni akceptis energian tagordon esprimantan la volon de la popolo ke la jezuita leĝprojekto de ministro Pouillet estu malkceptata de la deputitaro.

Poste la liberpensaj societoj iris ĝis la monumento Francisko Ferrer, antaŭ kiu S-roj Hins kaj Pepin ree instigis la ĉeestantaron persiste daŭrigi la batalon kontraŭ la multcentjara premado de la Eklezio, kiu sin denove manifestas per la prezento de la leĝprojekto. La belgoj montru al la registaro ke ili ne volas ke oni mortigu la neŭtran oficialan instruadon, kiu, ekster la grandaj urboj estas jam sufiĉe ruinigita : tiun volon ili montru ĉiamaniere, eĉ kontraŭ la Parlamento.

En la tuta lando la kontraŭregistaraj partioj sin tre okupas pri la temo, kaj oni antaŭvidas, ke post kelkaj tagoj la protestmanifestacioj pli kaj pli multiĝos kaj graviĝos.

FR. DELGARRO.

Aliĝoj en Septembro 1913

S-ro M. Gasquet, 18, rue Casimir-Périer, Béziers, Franc.

S-ro O. Sklenčka, oficisto de Zivnostenka banka, Hradec Králové, Bohem.

Entute 189 membroj

Kaso en Septembro 1913

Enspezoj :

Reportite	Fr. 294,00
Kotizaĵo de Belikov 1913-14.....	4,90
— Sklenčka	2,50
— Gasquet.....	2,50
Sume.....	303,90

Elspezoj :

Poŝtmarkoj.....	3,00
Restas en kazo.....	300,90

Aliĝoj en Oktobro 1913

F-ino Violet Crossley, Savile st. Hebden Bridge Angl.

S-ro J. W. Shaw, I. Lancaster avenue Didsbury, Manchester.

S-ro H. O. Schofield, 54 Caledon Rd, Nottingham Angl.

S-ino Annie Greenwood, The Gablès, Alfreton, Derbyshire, Angl.

Entute 192 membroj.

Kaso en Oktobro 1913

Enspezoj :

Reportite	Fr. 300,90
Kotizaĵo de Czubrynski 1913.....	2,40
— F-ino Fryer 1913.....	5
— Forestier 1913.....	2,60
— Padfield 1913.....	5,50
— F-ino Crossley, F. W. Shaw et Schofield 1914.....	7,50
— Fridrich 1913-14.....	5,55
Sume.....	329,45

Elspezoj :

Sendo al S ^o Nutters (Bulteno Junio- Aŭg : preso, 18,55 guld. ; afranko, 4,90 ; 2 pakoj, 1,50 = 25 guld.)....	53,55
Poŝtmarkoj.....	2
Al S ^o Fridrich (afranko).....	5,55
Sume.....	61,10
Restas en kaso	Fr. 268,35

ŜANGITAJ ADRESOJ :

S-ro James F. MORTON, 62, Vesey street, New-York.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 SM (FR. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretario-Kasisto : RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALIĜOJN KAJ KOTIZAĴOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. P. MORTON, 62, Vesey st. New-York.

En Belgujo, S-ro FRANS SCHOOF, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio, Cordoba.

En Italujo, S-ro O. BÜNEMANN, prezidanto, 24, via A. Saffi, Milano.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 53, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

SENDU al la Sekretario ADRESOJN DE PERSONOJ INTERESEBLAJ al nia Societo per propaganda numero de l' bulteno.

LA EDUKADO DE LA VIRINOJ

France verkita de P. P.

Esperanta Traduko de FRANCISKO DELGARBO

(Fino)

Estas tre versaĵne ke, ŝanĝante la virinan edukadon laŭ la duobla montrita direkto, oni sukcesus aliformigi ilian moralan influon en la mondo, kaj ke tiel, oni havus malpli da virinoj kiel tiuj kiujn Renan kulpigis pri la mankoj de nia civilizacio, kaj pli da virinoj kiel tiu de François Laurent: « Kiam ĉi tiu publikigis siajn unuajn volumojn pri la kristanismo, en siaj " Studoj pri la historio de l'Homaro ", li endanĝerigis sian estontecon, li havigis al si mallaŭdon ministran kaj li riskigis sian situacion. Tiam lia edzino sciopovis subteni lian kuraĝon kaj estas ŝi kiu diris al li: « Se tiaj estas viaj konvinkoj, vi povas ŝanceliĝi antaŭ nenia malhelpaĵo » (1).

Sed, se oni volas atingi tian rezulton kaj se oni volas eduki la knabinojn laŭ sana kaj racia maniero oni fatale revenas al la komence farita rimarko, tiel turnante en ia neelirebla rezonrondo.

Oni devas ja unue kontraŭbatali la malhelpon komence montritan: tio estas kontraŭagi en la familio la konservativan influon de la nungeneraciaj virinoj, la « kulpuloj » pri kiuj parolas Renan; kaj oni devas ĝin kontraŭbatali kaj ĝin venki, por ne plu senfine rekomenci surlokan

(1) Lameere. — Notice sur François Laurent (1905).

marŝadon, konservante de patrino al filino la antaŭjuĝojn kaj la rutinojn, kaj akceptante foroferi al ili, sub la trompa preteksto de reciprokaj cedoĵoj (1).

Ĉar la unuaj cedoĵoj sur tiu vojo estos, kiel aliloke okazas, kuraĝigo por pli da grandaj postuloj; kaj tio kion oni estos farinta por la paco ne donos la pacon. Tie ĉi, kiel en la medicina praktiko, oni pli facile kontraŭagas la komencon de malsano ol oni povas kuraci ĝiajn ekscesojn. Kaj oni alvenas al la eksceso de la malbono, kiam oni en la komenco donas pruvon de karaktera malforto.

La karaktera malforto kaj la manko de energio morala aperas ja ĉe la nekredantoj kiel ĉe la kreduloj.

Kaj tiu malforto tiom pli grandigas la forton de niaj kontraŭuloj. Ĉar la prestiĝon de politika ekleziularo kaŭzas la fakto ke tiuj kiuj ĝin ĉiutage kontraŭbatalas, pasas tamen inter ĝiaj manoj je la plej gravaj okazaĵoj en la vivo.

Inter tiuj kiuj batalas kontraŭ la religia instruado kaj la religiaj kredoĵoj, ekzistas malfeliĉe kelkaj, kiuj en sia familio ne agas kontraŭ la religiaj antaŭjuĝoj de sia edzino, akceptas por sia idaro doktrinojn, kiujn ili malaprobas, kaj tiel estas kaŭzo de tio, ke iliaj infanoj poste perdos la plej bonan parton de siaj fortoj por sin kuraci de la bedaŭrinda veneno inokulita en ili dum ilia juneco.

Kaj plie, ĉiuj ne povos sin kuraci, ĉar kelkfoje okazas — la fakto estas memorinda — ke post duo da generacioj, familio de liberpensuloj liveras

(1) Kelkfoje oni aŭdas rememorigi kiel senkulpigon la ekzemplon de Jaurès, kiu edukigis sian filinon laŭ religie, pro interkonsento kun sia edzino. Sed la ekzemplo de Jaurès senkulpigas nenium, eĉ ne lin mem. Estas permesate bedaŭri ke tiu rimarkinda oratoro, kun sia alloga kaj konvinkiga elokventeco, ne provis konverti sian edzinon al liaj propraj filozofiaj ideoj.

kondukantojn por la reakcia anaro, kiel okazis en tiu de la fama fondinto de la Libera Universitato de Bruselo.

* * *

La manko de karaktero donas tiajn fruktojn; anstataŭ tio, firmaj konvinkoj donas la rimedon por varbi tiujn kun kiuj oni vivas, kaj ili malhelpas ŝanceliĝi inter la devo kaj la profito, kiam la okazo sin prezentas.

Ĉar preskaŭ ĉiam oni havas la ŝultrojn pli fortikajn ol la koron, tio signifas, ke oni ĉiam havas pli da fervorego ol da vera forto, aŭ, kiel diris La Rochefoucault: « Ni havus ĉiam sufiĉe da forto, se ni havus sufiĉe da volo (1) ».

Decas do ke, speciale insistante pri ĝi, oni montru la eraron en kiu vivas tiuj kiuj kredas ke ili povas kunigi la lojalan serĉadon de la vero kun la iel ajn malgrava oboe al la Eklezio kaj ĝiaj reguloj; oni ne povas samtempe servi du mastrojn tiel absolute malsamajn.

Sendube, ni ne intencas (kaj ni aliparte ne rajtas) ekskomuniki tiujn ŝancelulojn; ni tamen juĝas ke estas senprudente fidi je ili en ĉiaj cirkonstancoj; — ĉar ni ne povas esti certaj pri tio ke ili scipovos defendi kontraŭ ĉiaj kritikoj la ideojn kaj principojn, kiujn ni tiel kore ŝatas triumfi.

Nu ni ne povas forgesi ke en la politikaj bataloj, la partio kiu fine venkos, estos tiu, kiu havos malplej da malenergio kaj malplej da senfortiĝoj — tiu kiu estos forminta energi — kaj konvinkplena homojn, homojn ne alireblajn al la timo, neniel perfide interkonsentantaj kun la supertiĉoj kaj la fanatismo, kies detruo estas unu el la ĉefaj celoj de ilia agado.

Tiumaniere ni alvenas, kiel oni vidas, por fini, al la konkludo ŝajne paradoksa: ke la edukadon de la virino devas necesege anstataŭi la edukado de la viro.

P. P.

Esperanta Traduko de Fr. Delgarbo.

NOVA KATEKISMO

TRADUKITA DE HARRY SHAW (ANGLUJO)

La aŭtoro de ĉi-tiu katekismo, S-ro M.-M. Mangasariar, kies antaŭuloj estis Armenoj, estas la Lekciisto de la Sendependa Religia Asocio en Chicago (Ĉikago), Usono. Ĉiudimanche li paroladas pri raciismaj temoj al pli ol 2.000 aŭskultantoj. En la antaŭparolo de sia verko, li diras: « La malnovaj katekismoj, kiujn oni trudis al ni en nia infaneco, kiam nia inteligento ne povis sin defendi

(1) Varianto de la maksimumo 30: « Ni havas pli da forto ol da volo; kaj estas ofte por senkulpigi nin mem ke ni imagas ke la aĵoj estas neeblaj ».

kontraŭ ili, ne plu gajnas nian respekton. Ili farigis ŝimhavoĵoj pro malatento! La tempo en kiu ili estis elpensataj kaj verkataj estas mortinta, tute mortinta! Nova katekismo por esprimi la pensojn de homoj kaj infanoj nuntempe vivantaj estas bezonata. Jen modesta pruvo en tiu direkto. »

LA UNUA ĈAPITRO

La Racio kaj la « Malkaŝo » (religia rivelado)

1. DEMANDO. — Kio estas la religio?
RESPONDO. — Fido en la vero.
2. D. — Difinu la veron.
R. — La vero estas la plej perfekta scio atingebla pri ia demando.
3. D. — Kion signifas tio « fido en la vero »?
R. — Certeco ke oni povas sin apogi sur tia scio en la plej gravaj aferoj de la vivo.
4. D. — Kiel oni povas elmontri sian fidon en la vero?
R. — Vivante laŭ sia plej klara vidkapablo aŭ scio.
5. D. — Kiamaniere oni povas akiri la veron aŭ la « plej perfektan scion »?
R. — Per spertado kaj studado.
6. D. — Ĉu ne estas alia metodo?
R. — Ne.
7. D. — Ĉu vi donis al mi kutime konsentitan difinon de la religio?
R. — Ne. Laŭ la populara opinio, la religio estas tio, kion oni kredas pri supernaturaj estaĵoj kaj pri tio, kion oni faras por havigi al si ilian favoron.
8. D. — Kio estas la supernatureco?
R. — Kio ajn, je la nuna tempo, estas neklarigebla per la konataj leĝoj de la naturo.
9. D. — Kian opinionon oni devas havi pri ĉiuj tiaj demandoj?
R. — Oni ne devus malpacigi pri ili sed permesi ke oni pridiskutu ilin libere.
10. D. — Ĉu la « Malkaŝo » aŭ la « Vorto de Dio » ne instruas nin pri multaj aferoj ne scieblaj alimaniere?
R. — Ĉar troviĝas multaj « Malkaŝoj » oni devas unue decidi tiun kiun vi preparolas.
11. D. — Nomu kelkajn el ili.
R. — La Zoroastra, la Bramana, la Budda, la Juda, la Kristana, la Mahometana, la Mormona...
12. D. — Ĉu ĉiuj ĉi-tiuj « Malkaŝoj » aŭ Bibliojoj pretendas havi dian devenon.
R. — Jes.
13. D. — Ĉu ili respektas sin reciproke?
R. — Kontraŭe, ĉiu malaprobas la alian kiel nefidinda aŭ nekompleta.
14. D. — Kiel ekzemple?
R. — Laŭ siaj sekvantoj, Budda diris ke trov-

- iĝas sur la tero aŭ en la ĉielo neniu kiu egalas lin. « Ni sola estas la perfekta Budda ».
15. D. — Donu alian ekzemplon.
R. — Laŭ la Kristanoj, Jesuo Kristo diris : « Mi estas la pordo por la ŝafoj..... Ĉiuj, kiuj venis antaŭ ol mi venis, estas ŝtelistoj kaj rabistoj..... Neniu alvenas al la Patro escepte per mi ».
16. D. — Kiu estus konsiderata pli granda pruvo ol ĉi-tiuj ?
R. — La fakto ke la disĉipuloj de ĉiu religio provas konverti la kredantojn de la aliaj.
17. D. — Kion signifas « konverti » ?
R. — Igi aliulojn pensi kaj kredi precize same kiel vi mem.
18. D. — Kial oni tion faras ?
R. — Interalie, ĉar oni kredas ke se iu ne kredas same kiel si, tiu estos kondamnata por eterne.
19. D. — Kiu inter ĉi-tiuj malsamaj « Malkaŝoj » estas la prava ?
R. — Neniu el ili estas aŭ tute prava, aŭ tute malprava.
20. D. — Kiel oni povas scii tion kio estas prava, kaj tion kio estas malprava koncerne ilin ?
R. — Uzante sian plej bonan juĝkapablon.
21. D. — Ĉu tio ne sugestas ke la racio superas laŭaŭtoritate la « Malkaŝon ».
R. — Sendube.
22. D. — Se ni havas interne de ni la plej altan aŭtoritaton, ĉu ni ankoraŭ bezonas « Malkaŝon » ?
23. D. — Se vi kredus ke iu libro enhavus la « Vorton de Dio », ĉu vi absolute obeus al ĝi, ĉu via racio aprobus aŭ ne.
R. — Ne.
24. D. — Kial ?
R. — Se mi obeus al ĝi blinde mia obeo ne estus meritinda ; se devige mia obeo ne estus memvola. Sed se mi obeus al ĝi inteligente kaj kun la aprobo de mia racio, tiam mi obeus ne al la libro, sed al mia racio.
25. D. — Donu ekzemplon.
R. — Se iu el la mondaj sanktaj Bibliojoj instruas ekzemple, ke la tero estas nesfera, mi ne povus kredi tiun libron, ĉar mia sperto kaj esploro instruas al mi la malon.
26. D. — Se, tamen, la Malkaŝo ordonas al vi fari tion kion via racio kondamnas kiel erara, ĉu vi ne obeus al la « Vorto de Dio » prefere ol al via racio ?
R. — Se mi agas kontraŭ mia plej bona konsultato mi ne estas morala estajo.
27. D. — Ĉu ne estas eble konsideri kiel prava tion kion la racio pravas esti malprava ?
R. — Estas neeble. La racio estas la absoluta suvereno. *Nenia potenco povas igi la racion*

konsideri kiel prava tion kion ĝi deklaras esti malprava.

28. D. — Sed ĉu la « Bibliojoj » efektive instruas tion kio estas kontraŭracia ?
R. — Efektive, jes.
29. D. — Kiel ekzemple ?
R. — La rakonto pri la « kreado ».
30. D. — Kaj plue ?
R. — La « superakvego ».
31. D. — Ankoraŭ plua ekzemplo ?
R. — La homa « defalo ».
32. D. — Kion vi scias en la nuna tempo pri ĉi-tiuj demandoj ?
R. — Mi scias, certege, ke tiaj sensencaĵoj, kiaj la homa « defalo », la « tutmonda superakvego », la « kreado », priskribitaj de la antikvaj Bibliojoj, ne okazis.
33. D. — Kiujn pluajn erarojn faras ĉi-tiuj « Bibliojoj » ?
R. — Ili ofte eraras pri historio kaj scienco ; ili multfoje sin kontraŭdiras kaj pli ol unufoje ili instruas tion, kio laŭ nia scio estas malvirta.
34. D. — Kiel vi prirespondas ĉi-tiujn erarojn en la Bibliojoj ?
R. — Erari estas home.
35. D. — Ĉu ili ĉiuj estas verkitaj de homoj ?
R. — Ili estas nur la enskribaĵoj de la saĝo kaj la malsaĝo, la virto kaj la malvirto de homoj.
36. D. — Pro tio, kiel do vi devus agi ?
R. — Ni devus sekvi la plej bonan lumon kiun ni havas.
37. D. — Kio estas tio ?
R. — Nia racio.
38. D. — Sed, ĉu via racio ne povas vin konduki en eraron ?
R. — Jes.
39. D. — Kial do ĝin sekvi ?
R. — Ĉar vi havas nenion pli bonan kaj estas via devo sekvi la plej bonan lumon kiun ni posedas.
40. D. — Kial la religiuloj konsideras tiel grava la religian « Malkaŝon » ?
R. — Ĉar ili trovas ke sen tia « Malkaŝo » ne troviĝus moraleco.
41. D. — Ĉu tia timo estas subtenebla ?
R. — En la nomo de la « Malkaŝo » aŭ la « Vorto de Dio » multaj el la plej malnoblaj krimoj estas elfaritaj : dum aliflanke ne multaj el la plej noblaj homoj sciis nenion pri la « Malkaŝo ».
42. D. — Ĉu ĉiam troviĝis « Malkaŝo » en la mondo ?
R. — Ne, oni kredas ke nur antaŭ kelk-kvinmil jaroj estis donata la « Malkaŝo ».
43. D. — Ĉu la moraleco ne troviĝis antaŭ tiu tempo ?

- R. — Sendube jes, ĉar homoj, komunumoj kaj nacioj ekzistis jam de longe antaŭ tiu tempo.
44. D. — Ĉu ĉiu nacio ricevis « Malkaŝon » ?
R. — Ne, ĝenerale oni kredas ke nur la Judoj favore ricevis « Malkaŝon ».
45. — Ĉu la Judoj do estis la sola morala popolo en la mondo ?
R. — Tute ne. La Grekoj kiuj havis nenian « Malkaŝon » estis la plej kulturita popolo de la antikva tempo.
46. D. — Kion signifas tio ?
R. — Ke la moraleco estas sendependa de la « Malkaŝo ».
47. D. — Ĉu estas bone instrui ke la moraleco estas neebila sen « Malkaŝo » ?
R. — Ne, ĉar unue tio ne estas vera kaj due, ĉar tiuj kiuj kredas kaj poste perdas tiun kredon en « Malkaŝo » samtempe perdis la fidon en la justo.
48. D. — Kiamaniere la fido en la justo povas konstantiĝi ?
R. — Amante kaj bonfarante pro la amo kaj la bono mem.
49. D. — Nomu aliajn motivajn por la laŭjusta konduto.
R. — La plej gravaj estas tiuj kiuj devenas de la amego por la memestimo; la altruisma impulso kaj la sento de devo.
50. D. — Kiu estas la signifo de devseento ?
R. — La sento ke ni devas fari tion kio *plimultigas* la vivon kaj ĝin beligas kaj la evito de tiuj agoj kiuj post-trovas post si la mizeron kaj la maljuston.
51. D. — Ĉu estas ĉiam agrable fari nian devon ?
R. — La antikvaj religioj instruas ke la devo estas « kruco » (ŝarĝego) kaj ke esti bona signifas abnegacion.
52. D. — Kio rezultas el tia instruo ?
R. — Tia instruo timigas la homojn pri la bona vivo kaj kunigas kun tio en ilia penso la mal-kuraĝon.
53. D. — Kaj krom tio ?
R. — Ĝi supozigas al la homoj ke nur la mal-virtuloj povas esti feliĉaj en ĉi-tiu mondo.
54. D. — Kio estas la prava koncepto de la devo ?
R. — Ke ĝi ne estas ŝarĝego, nek abnegacio, sed harmonio, belo kaj ĝojo. Ni nin oferas kaj suferigas nin kiam ni malobeas al la leĝoj de la korpo kaj de la penso.
- Fino de la unua ĉapitro.*

ŜANĜITAJ ADRESOJ :

S-ro Max WIENER, Dresden, 21, Germanujo.
S-ro OTTO TESCH, 57, Bühlstrass, Bern, Svisujo.

S-ro P. D. BELIKOV, Tergansk, obl. kv. Turnaeva, Skobelev, Azia Rusujo, deziras interŝanĝi opiniojn por konstrui ligon de oficialaj senreligiuloj-ateistoj.

La laboro de Libera Penso en Bohemujo malpermesita

Neniam oni havas bonan opinion pri justeco kaj rajta certeco en Aŭstrio, sed tamen oni ne atendis, ke povas en la dudeka jarcento okazi tio kio okazis.

La 18/XI venis en domon, kie havas *Libera Penso* en Praha siajn oficejojn multe da policistoj kun du komandantoj kaj laŭ ordono de polica direktoro konfiskis kaj forveturigis ĉion, kio sin tie ĉi trovis. Poste estis la oficejoj sigelitaj. En oficaj lokejoj sin trovis ne nur proprajoj de *Libera Penso*, sed ankaŭ de societo por bruligo de kadavroj (krematorium), la societo Demosthenes, kaj societo por reformo de geedza rajto. Ĉiuj tiuj tri societoj estis tute memstaraj, ne dependantaj de *Libera Penso*. Sed ankaŭ ilia propraĵo estis konfiskata. Kiel argumento por sia ago sciigas la policana direktoro, ke en la jaro 1911 estis kelkaj membroj de *Libera Penso* juĝe kondamnitaj. Sekve la tuta societo laŭ lia opinio estas kontraŭleĝa.

Oni opinias, ke ĉio okazis laŭ deziro de klerikala partio, al kiu estas la laboro de *Libera Penso* tre maloportuna. Precipe ili timas la preparajn laborojn de *Libera Penso* al la jaro 1915, kiam la bohema nacio solene rememoros la martiran morton de majstro Jan Hus, kiu estis en la jaro 1415 bruligita de la katolika eklezio.

Ĉar la ago de la policana direktoro tute ne povas esti motivita per leĝo, oni opinias, ke baldaŭ povos *Libera Penso* denove labori.

Ant. Janalikova.

Aliĝoj en Novembro 1913

S-ro VON WITZLEBEN, Buschstrasse, 6, Bonn a/bh, Germanujo.

S-ro LHOSTE, eksinstruisto, 29, rue Cassin, Sens, Francujo.

Ekŝiĝas :

Santamarina, Konstanti, Muinos, Cooperativa Luz, Ferencowicz, Poradowski, Vogel.
Entute 187 membroj.

Kase en Novembro 1913

Enspezoj :

Reportite	Fr. 268,35
Por pluaj numeroj, de H. Shaw.....	5,»
Kotizaĵo 1914 de S-ino Greenwood.....	2,50
— 1913 de Zajchowski	2,90
— — Ligo de l' Rajtoj de l' Homo en Sens	2,50
— — de Sigel.....	10,30
— — S-ino Hankel.....	2,50
— 1912-13 de Wiener.....	4,90
— 1913 de Mathieu kaj Renard	5,»
— — de Von Witzleben.....	3,55
Sume.....	307,50

Elspezoj :

Poŝtmarkoj, sendo de l'bulteno.....	6,»
Restas en kaso	Fr. 301,50

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 SM (FR. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALĜOJN KAJ KOTIZAĴOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. P. MORTON, 62, Vesey st. New-York.

En Belgujo, S-ro FRANS SCHOofs, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio, Cordoba.

En Italujo, S-ro O. BÜNEMANN, prezidanto, 24, via A. Saffi, Milano.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 53, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

BONAN JARON AL LIBERA PENSO!

KORPAN SANON, PENSAN FORTON, KORAN ĜOJON
AL ĜIAJ DEFENDANTOJ!

NOVA KATEKISMO

TRADUKITA DE HARRY SHAW (ANGLUJO)

ĈAPITRO DUA

La Kristana « Malkaŝo »

1. DEMANDO. — Kiu el la diversaj « Malkaŝoj » pri kiuj vi parolis, la plej multe influis sur la mondon?
RESPONDO. — Sendube la Kristana.
2. D. — Kiel?
R. — Ĝi helpis formi la historion de la ĉefaj nacioj de la mondo.
3. D. — Ĉu tiu influo estis bona aŭ malbona?
R. — La influo estis kaj bona kaj malbona.
4. D. — Kie troviĝas la kristana « Malkaŝo »?
R. — En libro nomata la « Sankta Biblio », kiu konsistas el la Nova kaj la Malnova Testamentoj.
5. D. — Donu al mi la plej akuratan informon pri la « Sankta Biblio ».
R. — Tiu Biblio estas aro de sesdek-ses libroj verkita de diversaj aŭtoroj, ĉe diversaj epokoj, en diversaj lingvoj kaj en diversaj landoj.
6. D. — Kial do ili troviĝas en unu volumo?
R. — La religiaj konsilantaroj kaj sinodoj ilin laŭgrade kolektis en unu volumon.
7. D. — Kiuj estas la plej antikvaj libroj en la Biblio?
R. — Tiuj en la Malnova Testamento.
8. D. — Kion priskribas tiuj-ĉi libroj?

R. — La devenon kaj la progreson de la Judoj: iliajn leĝojn kaj morojn; iliajn militojn kaj persekutadojn.

9. D. — Ĉu tiu historio malsimilas tiun de aliaj primitivaj popoloj?
R. — Laŭsence, ne.
10. D. — Ĉu tiu historio prezentas al ni originalajn verojn, aŭ intelektajn, aŭ moralajn?
R. — Ne. La vero aŭ la scio estas venko, ne « Malkaŝo ».
11. D. — Kial do estas konsiderata kiel la « Vorto de Dio » la historio de la Judoj?
R. — Estas absolute senrajte konsideri la historion de ia antikva aŭ moderna popolo, kiel la « Vorto de Dio ».
12. D. — Kiom da libroj enhavas la Nova Testamento?
R. — Dudek-sep. — Kvin Evangeliojn, unu « Agoj de la Apostoloj »; dudek-unu epistolojn; unu sonĝon aŭ apokalipson.
13. D. — Ĉu la Nova Testamento ĉiam enhavis la saman nombron da libroj?
R. — Ne. Nur ĉirkaŭ cent kvindek jarojn post la supozita morto de Jesuo, oni akceptis, kiel la novan « kontrakton », aron da skribajoj. (La vorto « Testamento » estas kredeble malprava traduko).
14. D. — La « Malkaŝo » do ne estis skribita tiam kiam ĝi estis dirita?
R. — Ne.
15. D. — Nek de la homoj al kiuj ĝi estis dirita?
R. — Ne. Escepte rilate al la kvar Epistoloj de Paŭlo kaj unu de Jakobo, ni posedas absolute nenian konon pri la aŭtoreco de la aliaj libroj de la Nova Testamento.
16. D. — Kial do vi prirespondas la titolojn « La Evangelio laŭ Sankta Mateo, Luko, k. c. »?
R. — Tiuj titoloj nur reprezentas la opiniojn

- de la redaktoroj aŭ tradukantoj. Estas tre kredinde ke ia redaktoro kolektis el amaso de notoj — memorindaĵoj — la sciigojn pri Jesuo kaj publikigis ilin sub la nomo de apostolo, por havigi al la verko pli grandan aŭtoritaton. La vorto « laŭ » en la titolo de ĉiu evangelio ŝajnigas ĉi-tiun opinion.
17. D. — Kiel la apostoloj mem ne verkis siajn sciigojn ?
R. — Kredeble ili ne konsideris peninde, ĉar ili atendis la finiĝon de la mondo dum sia vivdaŭro.
18. D. — Kiatepe okazis la unua provo rakonti skribe la Jesuajn diraĵojn ?
R. — Ĉirkaŭe samtempe kun la detruo de Jeruzalemo de la Romanoj en la jaro 70a post Kristo.
19. D. — Kial la detruo de Jeruzalemo efikis sur sekvantojn de Jesuo ?
R. — Ilia espero pri la tuja reveno de la savonto malaperis.
20. D. — Ĉu la kvar Evangelioj estas la solaj pri Jesuo biografioj kiuj iam publikigis ?
R. — Ne, estis multaj aliaj, kiel ekzemple « la Evangelio de la Infaneco », « Evangelioj de Nikodemo, de Hermoso, de Jakobo la malpli granda, de Tomaso la Izraelido », « La Evangelio pri la naskiĝo de Mario kaj la infaneco de Jesuo »; ankaŭ la Evangelioj aljuĝitaj al Jesuo Kristo, la Virgulino kaj al la Apostoloj.
21. D. — Kial ĉiuj el ili ne estas en la Biblio ?
R. — Ili estas forlasitaj kial apokrifaj (senaŭtoritataj).
22. D. — Kia estas apokrifa Evangelio ?
R. — Tia Evangelio kia en ekleziaj konsiliĝoj ne ricevis sufiĉajn voĉojn por esti konsiderata kiel « inspirita ».
23. D. — Ĉu estas ĉiam formetitaj el la nova Testamento tiuj-ĉi « aprokrifaj » Evangelioj.
R. — Ne. Iam la « Ŝafisto de Hermoso » kaj kredeble aliaj estis enhavitaj.
24. D. — En kiu lingvo estis skribitaj la Bibliaj libroj ?
R. — En Hebrea, Greka kaj eble ankaŭ en Aramaa.
25. D. — Ĉu ankoraŭ ekzistas la originalaj manuskriptoj de kiuj laŭdire oni tradukis nian Anglan Biblion ?
R. — Ne.
26. D. — Kiel do ni scias ke la traduko estas ĝusta ?
R. — Neniel ni povas scii, ĉar ni ne povas kompari la tradukon kun la originalo.
27. D. — Se estis perditaj la originalaj manuskriptoj, kion do oni tradukis anglan ?
R. — La supozitajn kopiojn de la perditaj originaloj.

28. D. — Ĉu ni scias ĉu tiuj-ci kopioj estas fidindaj ?
R. — Ne.
29. D. — Kiam estis faritaj tiuj-ĉi kopioj ?
R. — Eble centojn da jaroj post la perdo de la originaloj.
30. D. — Kiom da tiuj-ĉi « kopioj » nun ekzistas ?
R. — Granda nombro.
31. D. — Ĉu ili akordiĝas ?
R. — Ni scias ke ili ne akordiĝas.
32. D. — Kiel la tradukantoj venkis la malfacilaĵojn prezentitan de tiom da kontraŭdiraj variaĵoj ?
R. — Balote ili decidis pri la akceptotaj kaj pri la malakceptotaj.
33. D. — Se la originalaj manuskriptoj estas perditaj kiel vi prirespondas la vortojn sur la titola paĝo de la Nova Testamento : « tradukita el la originala Greklingvo ?
R. — La revizistoj fine forlasis la vorton « originala » el la titola paĝo, kredante ke ne plu estas honeste ĝin uzi

Fino de la dua ĉapitro

Rimarko de la tradukanto. — La angla libro, kiun mi tradukas, estas mendebla ĉe « The Rationalist Press Association », 17, Johnson's Court, Tleet St., London, Anglujo. La Asocio plezure sendos senpage, afrankite, liston de malmultekostaj libroj sciencaj, liberpensaj, k.c.

La Familipatroj kaj la Katekismo

Turniradas sur la scenejo de la katolika komedio kelke da « bonklasaj » Sinjoroj, kiuj similas ludkartaron. Ili intermiksiĝas kaj translokiĝas reciproke por formi, tie la Katolikan Bankon, tie ĉi la Noktan Gvardion, jen la Socian Defendon aŭ la Konfrataron de Sankta Marko, jen la Kontraŭpornografian Ligon, k. c., k. c.

Per tiaj kombinaĵoj aŭ « Fregoliaj » aliformiĝoj ili havas pli multe da societoj ol da membroj kaj lasas neniun en paco.

Nun ili vestas sin kiel « Familipatroj ». Ne maldistingu : la « Patroj de la Sanktega Familio » estas alia afero, ankaŭ de la ludkartaro kaj certe tre interesa, ĉar kiel patroj de la gepatroj de Jesuo kaj de li mem, ili estas avoj de tiu ĉi filo de gefratoj kaj fratoj de si mem kaj de la Patro Eterna kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito, kiu mem sin donas al la diablo kun tuta lia parenkaro antaŭ tia kaprompilo.

Ne pri ili ni parolas, sed pri la Familipatroj, inter kiuj povas esti kelkaj, al kies piaĵ edzinoj diras la poetoj de la katolika Hispanujo (kiam ĝi estis katolika, kaj estis Hispanujo, kaj ne estis ŝlimejo de la Vatikano) :

Circe: Kun tiom da fervoro
Al pieco vi vin dediças,
Ke vi nur komunikigas
Kun la pastro-konfesanto.
Liaj estas viaj ĝojoj,
Viaj estas liaj penoj;
Mi timas, ke se vi akuŝos,
Viaj idoj liaj estos.

Tiujn timojn sentis la katolikaj poetoj de la bonaj tempoj de la pieco.

Do, tiuj Patroj, kvankam minacite fariĝi duon-patroj, aŭdinte ke la estraro okupas sin pri la instruado ĉe la lernejoj, turnis atakon kontraŭ la Ĉefministro, surdigante lin per siaj plendoj:

— « Ne, oni ne forigos Kriston el la lernejoj! »

Lin monaĥoj kaj pastroj forigis el la preĝejoj, invaditaj de armeo da sanktuloj, kiuj kondutis kontraŭ li kiel kontraŭ gasto la jezuito: li eniras kiel almozulo de la mastroj kaj tiuj ĉi eliras kiel almozuloj de la jezuito.

Sekve Kristo, konservate en la preĝejo nur en miniaturo apud gigantaj sanktuloj, rifuĝis en la publikajn lernejojn.

Kian intereson havas pri tio la Familipatroj? Kion povas instrui al la infanoj la krucifikso? Ĉu katekismon?

Sed la katekismo ja ne estas de Kristo nek rilatas al li. Pli vere ĝi estas falsigo de la Evangelio.

La episkopa gazeto « Universo » tion ĉi diras: « La katekismo devas esti katolika kaj monarĥia; » jen Evangelio kontraŭa al tiu de Kristo, kiu estis nek katolika nek monarĥista.

Kristo diras:

Kial temploj? Ne estas aliaj temploj ol la Universo. Ĉiuj vi estas vivantaj temploj.

Kial bildoj de Dio? Ĉiuj vi estas bildoj de Dio, kaj ne mortintaj sed vivantaj.

Preĝoj? Kial? Patro konas la bezonojn de liaj filoj.

Ministroj de Dio? Pli ol ministro de reĝo. Ĉiuj vi estas filoj de Dio kaj vi ne bezonas apud li ministrojn au ambasadorojn.

Preĝejoj kaj sinagogoj? Mia preĝejo ne estas el katuno nek el fajroj kaj fumo, sed el spirito kaj vero.

Fastoj? Pro kio? Animon malbonigas ne la manĝoj, kiu eniras tra la buŝo, sed la malamoj, vantajoj, fierecoj kaj mensogoj.

Katekismoj? La tuta katekismo okupas papereton de cigaredo: « Amu Dion kaj vian proksimumon. »

Kaj la tuta cetero estas farso.

Ĉu tio estas, kion oni devigos Kriston paroli en la lernejoj? Ne, tute male.

Se tiel li parolus, malfeliĉulo! eĉ ne du monaĥojn li restus en la lernejoj; pastroj kaj monaĥoj ĵetus lin tra la fenestro dirante al la infanoj:

« Ne fidu al tiu Kristo, li nomas nin hipokrituloj! »

Li ne scias nian katekismon, ne konas la ordonojn de l'Eklezio, li neniam ĉeestis meson, nek konfesis, nek portis skapulariojn, nek manĝis porkon, nek preĝis rozarion, nek estis kunfrato de la sanktega Koro, nek donis monon al la monaĥoj.

Pro tio lin mortigis la hebreaj pastroj, de kiuj ni devenas.

Li diru, kion ni volas ke li diru, aŭ ni forpuŝos lin denove de sur la tero. »

« El Domine Cabra » de (El Motin).

3/1913.

Tr. P. L.

El la Aldono al la filozofiaj pensoj de Diderot (1770)

Religio vera, interesanta ĉiujn homojn en ĉiuj tempoj kaj ĉiuj lokoj, devis esti eterna, universala kaj evidenta: neniuj havas tiujn tri karakterojn. Ĉiuj do estas trifoje pruvataj malveraj.

La faktoj, pri kiuj nur kelkaj homoj povas esti atestantaj, estas nesufiĉaj por pruvi religion, kiu devas esti egale kredata de ĉiuj.

La faktoj per kiuj oni subtenas la religiojn, estas antikvaj kaj mirindaj, tio estas kiel eble plej suspektindaj, por pruvi la aferon plej nekredindan.

Pruvi la Evangelion per miraklo, tio estas pruvi absurdajn per kontraŭnaturajn.

Sed ĉiuj hebreoj, kiuj estis en Jerusalemo, verŝajne estis konvertataj vidante la miraklojn de Jesuo Kristo? Neniuj. Ne nur ili ne kredis je li, sed ili kruĉumis lin. Oni devas konfesi, ke tiuj hebreoj estas homoj, kiaj ne ekzistas iuj: ĉie oni vidis la popolojn altiratajn per unu sola malvera miraklo, kaj Jesuo Kristo povis fari nenion kun la hebrea popolo per multego da mirakloj veraj.

La religio de Jesuo Kristo, anoncata de malkleruloj, faris la unuajn kristanojn. La sama religio, predikata de scienculoj kaj doktoroj, faras nune nur nekredantojn.

Estas la eduko de l'infaneco, kiu malebligas al mohamedano baptigi sin; estas la eduko de l'infaneco, kiu malebligas al kristano ĉirkaŭtranciĝi sin: estas la racio de l'plenaĝulo, kiu malŝatas egale la bapton kaj la ĉirkaŭtrancĉon.

Vi naskos en doloro, diris Dio al la pekinta virino. Kaj kion faris al li la inoj de la bestoj, kiuj ankaŭ naskas en doloro?

Estas dirite, ke li foriris sur la olivarban monton, kaj ke li preĝis. Kaj kiun li preĝis? li preĝis sin mem.

Tiu Dio, kiu mortigas Dion por paciĝi Dion, estas bonega diro de l'barono de la Hontan. Rezultas malpli da evidenteco el cent volumoj in-folio

verkitaj por aŭ kontraŭ la kristanismo, ol el la ridindo de tiuj du linioj.

Estas senekzempla senhonteco ĉiti la konformecon de l'Evangeliiistoj, dum estas ĉe unuj tre gravaj faktoj, pri kiuj estas dirita neniu vorto ĉe la aliaj,

Dio patro juĝas la homojn indaj je sia eterna venĝo; Dio filo juĝas ilin indaj je sia senlima kompato; la Sankta-Spirito restas neŭtrala. Kiel akordigi tiun katolikan babilajon kun la unueco de la dia volo?

Kaj kial puni kulpulon, kiam nenia bono estas plu tirebla de lia puno?

Se oni punas por si sola, oni estas ja malbonega kaj kruelega.

Estas neniu bona patro, kiu volus simili nian ĉielan patron.

Kiu proporcio inter la ofendinto kaj la ofendito? kiu proporcio inter la ofendo kaj la puno? Amaso da malspritaĵoj kaj da sovaĝaĵoj.

Pascal diris: « Se via religio estas malvera, vi riskas nenion kredante ĝin vera; se ĝi estas vera, vi riskas ĉion kredante ĝin malvera ». Imano povas paroli tute same kiel Pascal.

Ke Jesuo Kristo, kiu estas Dio, estus tentita de la Diabolo, tio estas fabelo inda je la Mil kaj unu Noktoj.

Junulino vivis tre sola; iam ŝi ricevis viziton de junulo, kiu portis birdon; ŝi gravediĝis: kaj oni demandas, kiu faris la infanon? Bela demando! estas la birdo.

(Daŭrigota)

Trad. R. D.

LA SOCIETO

KOMITATO POR 1914

Prezidanto: S-ro: Paul LINARÈS, Hto S. Basilio, Cordoba, Hispanujo.

Sekretario-kasisto: S-ro René DESHAYS, Sens, Francujo.

Komitatanoj: S-ro Oscar BÜNEMANN, 24, via A. Saffi, Milano, Italujo.

S-ro Rudolf FRIDRICH, 10, Rejskova, Prostejov, Aŭstrio-Moravio.

S-ro Atanazo GUILLEMIN, 53, rue Damesme, Paris.

S-ro Frans SCHOofs, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen, Belgujo.

S-ro Alfredo STROMBOLI, 3, via Gropallo, Milano, Italujo.

Rezervaj komitatanoj: F-no FRYER, 72, Thurleigh rd, Balham, London.

D-ro BATEK, Plzen, Bohemujo.

REZULTATO DE LA SKIBA VOĈDONO 1913

Riceviĝis 34 balotiloj:

1° *La politiko en Libera Penso*. — 4 volas tute forigi politikon. 25 voĉdonas por la propono alprenita en Bern, t. e. laŭbla forigo de la politika agado, sed interveno kiam la penslibereco estos atakata. 4 klare postulas politikan agadon, 2 senlime, 1 esceptante la eko-

nomian vidpunkton, 1 kontraŭe insistante por favori la laborantan klason.

Sekve ni zorgos resti sur la filozofian kampon.

2° Ĉiuj krom unu deziras konservi la bultenon sendependan.

3° Unu ne voĉdonas. Unu rifuzas malaltigon de kotizajo por lokaj grupoj. Unu ĝin aprobas nur se ne estos sendata bulteno al ĉiu membro. La ceteraj akceptas la proponon.

Aliparte societano postulis, ke sufiĉu pagi por 10 membroj eĉ se la loka grupo ne posedas ilin. La sekretario rimarkigis al li, ke estos facile enskribigi senpage bonvolajn personojn, kiuj komence ludos la rolon de kvazaŭmembroj, sed poste interesiĝos pri la societo, kaj pagos la malgrandan kotizajon.

4° Elektiĝis komitatanoj S-ro Linarès per 27 voĉoj; reelektiĝis S-ro Deshays per 31. Reelektiĝis rezervaj komitatanoj F-no Fryer per 20, D-ro Batek per 19.

5° Estas postulita plena adresaro de l'societanoj. Jam de longe ni estis intencintaj ĝin eldoni, sed ni sciiis, ke povus rezulti gravaj konsekvencoj por iuj. Tamen, se neniu protestos, ni efektivigos tiun deziron post kelkaj monatoj.

Aliĝoj en Decembro 1913

S-ro SANDRIN, 20, rue Beaunier, Paris.

S-ro COUTABLE, profesoro, rue de Paris, Avallon, Francujo.

Eksiĝas: BIKUPRAVOL.

Entute 188 membroj.

Kaso en Decembro 1913

Reportite Fr. 301,50

Enspezoj:

Kotizajo 1914 de Coutable.....	2,50
— 1912-13 de Habert.....	5,»
— aldona de H. Shaw.....	5,»
— 1913 de Pafomov.....	2,60
— 1913 de P. J. Richard.....	2,50
— 1914 de Calvo et Redondo.....	5,50

Sume..... 324,60

Elspezoj:

Poŝtmarkoj.....	5,50
Koverttoj.....	1,75

Sume..... 7,25

Restas en kaso Fr. 317,35

ŜANĜITAJ ADRESOJ:

S-ro P. BELIKOV, O-vo, Malcevikh zavodov Ura. Tubinskaja, J. Taškend, Azia Ruslando.

S-ro Eugenio CALVO, Tte Coronel, Sto Alfonso XIII, n° 24, Mellilla, Hispan-Maroko.

S-ro P. J. RICHARD, Maison Jaunette, Chemin Roger, Cannes (A.-M.), Francujo.

S-ro A. DAUPHIN, 22, rue Ledion, Paris.

S-ro Von WITZLEBEN, Buschstrasse, 6, Bonn, Germanlando, deziras korespondi kun samideanoj *monistoj*.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 SM (FR. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretarió-Kasisto : RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALIGOJN KAJ KOTIZAĴOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. P. MORTON, 62, Vesey st. New-York.

En Belgujo, S-ro FRANS SCHOOF, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio, Cordoba.

En Italujo, S-ro O. BÜNEMANN, prezidanto, 24, via A. Saffi, Milano.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 53, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

NOVA KATEKISMO

TRADUKITA DE HARRY SHAW (ANGLUJO)

ĈAPITRO TRIA

La Biblia « Kanono »

1. DEMANDO. — Kion signifas la « Kanono » de la Biblio?

RESPONDO. — « Kanono » kies signifo estas « regulo » estas greka vorto uzata por priskribi la kolekton aŭ katalogon de libroj kiuj, laŭ la ekleziaj konsilantaroj havas Dian aŭtoritaton pri la fido kaj la praktikado.

2. D. — Ĉu la Biblia Kanono estis ĉiam la sama?

R. — Ne. La unuaj Kristanoj, pleje Hebreoj, kredis que nur la Malnova Testamento estas la aŭtoritata Vorto de Dio. (Post la Malnova Testamento, la tradicio estis la ĉefa fonto de kono en la unua Eklezio).

3. D. — Kion pri ĉi-tiu temo diris la apostola patraro?

R. — Laŭ iliaj skriboj, ni konkludas ke ili ne konsideris ke la Nova Testamento estis same aŭtoritata kiel la Malnova.

4. D. — Kiam, en tiu rilato, la nova ekegaliĝis kun la Malnova Testamento?

R. — La skismo aŭ disiĝo, inter la hebreaj kaj nehebreaj Kristanoj, naskigis la ideon pri Katolika Eklezio kun aŭtoritato decidi pri ĉio rilate la dogmaron kaj praktikadon. Por efektiviĝi ĉi-tiun ideon necese estis posedi ĝenerale akceptitan « Vorton de Dio ». Post kelka tempo tiu neceso kreis alprovizon kaj « Kanono » de la Nova Testamento rezultis.

5. D. — Kiatempa estas la unua aludo al tia Kanono?

R. — En la dua duono de la dua jarcento. —

La formiĝo de Katolika Eklezio kaj de Kanono estis samtempa.

6. D. — Kiujn librojn enhavis la unuaj Kanonoj?
R. — El la kristanaj Patroj Justin, Tertullian, Irenaeus, Origen kaj multaj aliaj, ĉiu donas malsaman liston.

7. D. — Kia estis la Kanono de Muratori?
R. — Ĝi aperis ĉirkaŭ la jaro 170 post Kristo, kaj ĝi ne enhavis la Paŭlan Epistolon al la Hebreoj, nek tiujn de Petro, de Johano (la unua) kaj de Jakobo.

8. D. — Kia estis la Kanono de la Imperiestro Konstantino?
R. — Ĝi prezentigis en la jaro 352 p. K. kaj enhavis ĉiujn librojn de la nuna Nova Testamento krom la Apokalipso.

9. D. — Kia estis la Siria Kanono?
R. — Mankis el tiu Kanono la dua Petra Epistolo, la tria Johana, la Juda, kaj la Apokalipso.

10. D. — Kiuj aliaj Bibliaj libroj estas pridubitaj?
R. — La Epistoloj de Paŭlo, tiu de Jakobo, la libro de la Agoj de la Apostoloj; ankaŭ la libroj de Jobo, de Estero kaj de aliaj en la Malnova Testamento.

11. D. — Kia estis la Biblio de Lutero?
R. — Lutero ne konsideris la Apokalipson kaj la Jakoban Epistolon kiel parto de la « Dia Vorto » kaj li malakceptis la Libron de Jobo, ĝin konsiderante ne pli ol nura « argumentum fabulae ».

12. D. — Kie staras la modernaj kredoj rilate la afero de la Kanono?

R. — Regulo VI de la 39 reguloj de la Angla Eklezio legiĝas : « La Sanktajn Skribojn ni konsideras tiujn de la Nova kaj Malnova Testamentoj, laŭkanonajn librojn, pri kies aŭtoritato la Eklezio neniam dubis. » Sed tio-ĉi estas kaj malklara kaj erariga ĉar troviĝas en

- la Nova Testamento preskaŭ neniu libro kies aŭtoritatecon la Eklezio mem ne disputis.
13. D. — Ĉu la Katolika Biblio ĉiel akordiĝas kun la Protestanta ?
R. — Ne. La Katolika Biblio enhavas sepdek du « inspiritajn » librojn ; la Protestanta nur sesdek ses.
14. R. — Kia estas la kialo de tiu diferenco ?
D. — La Katolikaj akceptas kiel inspiritaj multajn librojn malakceptitajn, kiel apokrifaj, de la Protestantoj.
15. D. — Kiel kondutas la Katolika Eklezio kontraŭ tiuj kiuj neas la inspiradon de tiuj apokrifaj libroj ?
R. — La Konsiliĝo de Trent (unu el la tiel diritaj neerareblaj Konsiliĝoj) dekretis malbenon kontraŭ ili.
16. D. — Kiam tradukiĝis la Katolika Biblio ?
R. — Oni pretendas ke sankta Jerome ĝin tradukis en la kvara jarcento.
17. D. — Kiel nomiĝas ĉi-tiu traduko ?
R. — La Latina Vulgato.
18. D. — Ĉu iam la Katolika Biblio estas reviziita ?
R. — Jes, de la papoj Sixtus V kaj Klement VIII.
19. D. — Kiam oni faris la nunan tradukon de la Protestanta Biblio ?
R. — En la jaro 1611 ; laŭ la ordono de la angla reĝo Jakobo.
20. D. — Ĉu oni reviziis ĝin de tiu tempo ?
R. — Jes, en la jaro 1884, nova traduko eldoniĝis.
21. D. — Ĉu ĝi iel diferencas de la Jakoba traduko ?
R. — Jes.
22. D. — Ĉu estas gravaj la diferencoj ?
R. — Kelkaj el ili estas tre gravaj.
23. D. — Nomu ilin.
R. — La sepan versaron en la unua Johana Epistolo « Ĉar estas tri kiuj faras konstaton en la ĉielo — la Patro, la Filo kaj la Sankta-Spirito ; kaj ĉi-tiuj tri estas unu ». Ĉi-tiu versaro, kiun oni citas por pruvi la dogmaron pri la Triunuo, ne troviĝas en la uova traduko.
24. D. — Kaj plue ?
R. — La margenaj notoj de la nova traduko dubigas multajn tekstojn antaŭe akceptitaj kiel nepre aŭtoritataj.
25. D. — Donu ekzemplon ?
R. — En la lasta ĉapitro de la Marka Evangelio troviĝas margena noto kiu sekvas : « La plej antikvaj grekaj manuskriptoj kaj aliaj ne enhavas la vortojn de la naŭa versaro ĝis la fino de la ĉapitro ». Alia noto legiĝas : « Laŭ aliaj aŭtoritatoj la ĉapitro tute malsame finiĝas.
26. D. — Ĉu ĉi-tiuj forestantaj versaroj estas gravaj ?
R. — Jes, ili aludas al la « reviviĝo » kaj ĉieliro de Jesuo kaj ankaŭ al la doktrino de « eterna kondamno ».
27. D. — Kion oni devas konkludi de la laŭkelkaj aŭtoritataj margenaj vortoj : « La Evangelio malsame finiĝas » ?
R. — Ke la tradukantoj posedis multajn manuskriptojn el kiuj ili elektis la « Vorton de Dio ».
28. D. — Ĉu ĉi-tiuj estas la solaj troveblaj ?
R. — Ne. Multaj kleruloj faris sendependajn tradukojn, kredante malpravaj la aŭtoritatajn tradukojn.
29. D. — Ĉu la Katolikoj havas la saman opinion pri la Biblio kiel la Protestantoj ?
R. — Ne.
30. D. — Klarigu la diferencon.
R. — La Katolikoj kredas ke la Eklezio aŭtoritatigas la « Vorton de Dio ».
31. D. — Kiel ili rezonas ?
R. — Ili citas sanktan Aŭgustinon kiu konfesis ke troviĝis en la Biblio pli da aferoj nekomprenitaj de li ol komprenitaj. Kaj la Katolikoj diras ke se tiel klera doktoro de la Eklezio ne povis kompreni la « Vorton de Dio » sen nepra interpretisto, des malpli povas kompreni ordinaraj homoj.
32. D. — Ĉu la Katolikoj permesas privatan interpretadon de la Biblio ?
R. — Ne.
33. D. — Ĉu ili permesas la legadon de la Biblio ?
R. — Nur aprobo de la episkopo.
34. D. — Kia estas la Protestanta dogmaro pri la Biblio ?
R. — Ke ĝi estas la neerara « Vorto de Dio » kiun ĉiu devas mem legi kaj mem interpreti.
35. D. — Kiel povas erarema homo interpreti neerare la Bibliion ?
R. — Oni pretendas ke la Sankta-Spirito malkaŝas al ĉiu la veran signifon de la Sanktaj Skriboj.
36. D. — Ĉu la Sankta-Spirito malkaŝas la saman signifon al ĉiu leganto ?
R. — Memvideble ne, ĉar troviĝas multaj kontraŭdiraj tradukoj.
37. D. — Ĉu ĉiuj Protestantoj interkonsentas pri la Baptismo ?
R. — Ne.
38. D. — Aŭ pri la dogmaro pri « antaŭdestino » ?
R. — Ne.
39. D. — Aŭ pri eterna kondamno ?
R. — Ne.
40. D. — Aŭ pri la dogmaro de « elpago » ?
R. — Ne.

41. D. — Aŭ pri la dieco de Jesuo?
R. — Ili tute ne interkonsentas pri tiuj dogm-aroj kvankam ili pretendas posedi neeraran « malkaŝon » pri ĉiuj ĉi-tiuj disputataj aferoj.
42. D. — Se ne estus okazinta neerara malkaŝo pri tiuj-ĉi demandoj ĉu la Eklezioj pli malpaĉiĝus pri ili?
R. — Ne estas verŝajne.
43. D. — Kio helpus reinterkonsentigi la disput-antajn sektojn?
R. — Nova malkaŝo por klarigi la signifon de la malnova.
44. D. — Kio estas la precipa argumento kontraŭ « inspirita » libro?
R. — La ideo pri « inspiro » limigas al unu popolo aŭ gento la posedon de la vero kaj ĝin malantaŭenpuŝas en la pasintecon.
45. D. — Kaj krom tio?
R. — Ĝi igas nenecesaj ĉiujn pluajn esplorojn kaj enketojn; ĝi potencigas sekton aŭ Eklezion subpremi nove malkovritajn verojn kaj persekutas ĉiujn kiuj helpas pliampleksigi la mensan horizonton.
46. D. — Kion diras la historio rilate tion?
R. — (1) Estas dirita ke Omar, kredante ke la Korano enhavas ĉion konindan, ordonis la detruon de la Aleksandria Biblioteko.
(2) Samtiale la Katolika Eklezio, kredante ke la Biblio sufiĉas por ĉiuj homaj bezonoj militis kontraŭ la Roma kaj Greka kulturo ĝis nenia postsigno restis en Eŭropo dum preskaŭ miljaro.
(3) Nuntempe ĉiuj sciencistoj kaj esploristoj estas riproĉitaj kiel malfideluloj, se eĉ ne kondamnitaj al la morto (ni ne forgesu la Hispanan martiron Franciskon Ferrer! — rimarko de la tradukanto) ĉar ili anoncas kontraŭajn konkludojn ol tiuj de la « Vorto de Dio ».
47. D. — Kion oni devas konkludi el tiuj ekzem-
ploj?
R. — Ke « neerarema » libro malhelpas la homaran progreson.
48. D. — Kiel oni nuntempe opinias en Eŭropo kaj Ameriko pri la Biblio?
R. — Ke ĝi estas pleje nur la literaturo de primitivaj kaj malkleraj popoloj.
49. D. — Ĉu ĝi ie estas adorata kiel neerarema aŭtoritato?
R. — Nur de la plej malkleraj homoj.
50. D. — Kiel oni devas agi rilate la Biblion?
R. — Akcepti la bonon enhavitan kaj eljeti la ceteron.

Fino de la tria ĉapitro.

LA MIRAKLAJ JUVELOJ

Estis malsato en Hispanujo.

Fremdaj reĝoj kaj Eklezio, per eksteraj militoj kaj internaj persekutoj, suĉadis la sangon de la popoloj; centoj kaj centoj da monaĥejoj kovris la tutan landon, kies grason ili manĝegis.

Ian vesperon, antaŭ la malfermita pordo de monaĥeja preĝejo, dika kaj fortika monaĥo, plenumante pli ol la dian ordonon doni manĝon al la malsatuloj — tial ke ankaŭ estis buljono, — disdonis la « boban » (1) supon al amaso da almozuloj.

Iom aparte staradis paro da gesinjoroj, rigardante kun envio la mizeran festenon: hejme restis nek peco da pano nek unu maravediso kaj la infanoj ploradis. La gepatroj, decidinte iri por supo, nun sin detenis de hontemo.

— Nu, diris la virino, mi iros.

Ŝia edzo, S-ro Bernardo, ŝanceliĝis kaj iom pri-
pensinte:

— Ne! li diris; mi havas ideon; iru hejmen kaj atendu min, baldaŭ mi revenas.

Kiam la sinjorino, malrapide foririnte, estis malaperinta, S-ro Bernardo diskrete alpaŝinte post la monaĥo al la pordo, enŝteliĝis nevidate en la preĝejon.

Tie li iris rekte al flanka kapelo, en kies ombro staris riĉe vestita kaj ornamita per multaj kaj kostaj juveloj idolo de Sankta Virgulino, antaŭ kiu surgenuiĝinte, li preĝis momente kaj, pli kaj pli proksimiĝinte, altrenite de pia fervoro, li rapide kolektis kaj enpoŝigis la juvelojn, efikajn amuletojn kontraŭ multaj malfacilaĵoj de la vivo. Poste li sin kaŝis post kolono proksima de la pordo.

Jam eknoktiĝas, la tuta supo estas elĉerpita kaj la monaĥo eniras por fermi. Tiam S-ro Bernardo rapide sin tiras al la elirejo, sed la monaĥo, aŭdante paŝojn, returniĝas kaj baras la vojon, kriegante: Helpon! ŝtelisto! La du viroj kunpuŝiĝas; malgraŭ pugnobato de lia kontraŭulo, la monaĥo algluiĝas al li kaj ambaŭ terfalinte baraktas kiel anĝelo kaj demono. Je la krioj kaj bruego oni alkuras kaj baldaŭ S-ro Bernardo estas ĉirkaŭita de neelirebla rondo da malamikoj. Oni esploras la vestojn kaj aperas la juveloj: la afero estas do tute klarigita; la kaptito, bone ŝnurligita estas trenita en karceron.

Malbona afero, S-ro Bernardo! Kiel rapide sin difinis via sorto. Ŝtelisto de preĝejo, profananto de sanktaĵoj, sakrilegiulo! La Eklezio ne pardonas. Ĝi ne verŝas sangon, sed ĝi bruligas la korpojn por savi la animojn. Malfeliĉulo!

La abato postulis kaj ricevis de la estraro sian rajton juĝi mem kaj plenumigi sian sentencon en sia juĝorajta teritorio. Dum kelkaj tagoj la bonaj

(1) « Sopa boba » tiel oni nomis ĝin.

pastroj pripensadis kompleze pri la puno meritita de tiel granda krimo. Ĉe festo, tri kvaronoj de la ĝuo apartenas al la preparoj.

Venis la tago de la juĝo. Kunsidis la tuta monaĥaro sub prezido de la abato. La kulpulo estas alkondukita. La abato lekas al si la lipojn pro plezuro, frandante sian venĝon, kiel kato ludante kun kaptita muso; li forĝis ponardvortojn kaj akriĝis sagrigardojn.

(Daŭrigota).

(Laŭmemore aranĝis el *Heraldo*) Paŭ-Li.

Cirkulero de la Internacia Federacio de L. P.

Al la raciistaj grupoj,
Al la liberamaj spiritoj en ĉiuj landoj.

La Ĝenerala Konsilantaro de la Internacia Federacio petas vian kunhelpon por la defendo de la libereco de konscienco, ĉiumomente perfortata en plej multaj landoj. Serio de ĵusaj faktoj metis tiun demandon en la unuan rangon.

Antaŭ du monatoj, ni denunciis al vi la persekutojn faritajn kontraŭ la bohemiaj liberpensuloj en Aŭstrio, dum en Rusujo la afero pri Beilis, revivigante la antikvan kalumnion pri la ritaj krimoj, rememorigis la plej malhelajn tagojn de l' Mezepoko. En Prusujo kaj en parto de cetera Germanujo, la religia instruado plu estas deviga por la gefiloj de l' disigintoj. En Hispanujo, ĉu ne kondamniĝis je sesmonata aresto — la interveninta pardonon ŝanĝas nenion en la farita maljustaĵo — kolonelo Protestant, pro rifuzo ĉeesti Sanktspiritan meson? En Belgujo, soldato kondamniĝis je oktaga mallibereco, pro rifuzo salutprezenti la pafilon al la « Sankta Sakramento ». Kaj eĉ en liberala Anglujo, oni kondamnas pro « blasfemo » je kvarmonata « hard labour ».

Sed precipe en Hungarujo la fanatismo montriĝas en sia tuta sovaĝeco.

La lastan jaron, la loĝantoj de pluraj vilaĝoj rutenaj el la distrikto Marmarosch-Cziget forlasis la grekunuigitan religion por reveni al la ortodokseco, kiun praktikis iliaj prapatroj, antaŭ ol la jezuitoj sukcesis per siaj kutimaj rimedoj — ruzo kaj perforto — ilin pere religi al la katolikismo.

La klerikala fanatismo ne povis toleri tiun forlason, kaj oni vidis — nezupozeblan aferon — meze en la XXa jarcento, ripetigi la dragonaĵojn de la XVIIIa. Oni loĝigis, en la vilaĝoj eksigintaj el la grekunuigita eklezio, soldatarojn, kiuj suferigis al ili ĉiuspecajn turmentojn kaj ilin jetis en mizeron, tiel ke, en lasta monato majo, naŭmil el ili, laŭ raporto de gazeto Pesti Hirlap, ne plu vidante alian esperon al savo, revenis al la grekunuigita eklezio. Kontraŭ la plej obstinaj oni direktis persekutojn pro « krimo de ŝtatperfido » kaj oni jetis en malliberejon ducent el tiuj malfeliĉuloj, virojn kaj virinojn, akuzitajn komploti anekson de ilia lando al Rusujo. La akuzo alportas pri tio nenian pruvon sed por konservi belaspekton kontraŭ la ali-

landaro, la hungara registaro maltemis sendigi al la tuta eŭropa gazetaro mensogajn informojn, prezentantajn falsajn citaĵojn de l' organo de l' disigintoj, « Russkaja Pravda ».

La akuzo konserviĝis kontraŭ centoj da malliberuloj. Dume unu virino mortis kaj kvar viroj frapiĝis de frenezeco. La proceso de l' pluvivantoj plediĝas nunmomente.

Tiuj faktoj kaj multaj aliaj pli malpli gravaj, montras kiel necese estas, ke ĉiuj grandkoraj homoj, ĉiuj spiritoj progresamaj, unuigu por fari ke, en la moroj tiel kiel en la leĝoj, sendiskute regu la principo de la libereco de penso, de parolo kaj de konscienco, la plej bela konkero de la moderna spirito, bedaŭrinde nun ankoraŭ nefinita.

En Bruselo, la 28-an de Januaro 1914.

La Konstanta Komitato.

LA SOCIETO

S-ro Ferdinand Buisson, pariza deputato, honor-membro de nia societo, ĵus elektiĝis kiel prezidanto de la *Franca Ligo por la defendo de l'Rajtoj de l'Homo*, anstataŭ S-ro F. de Pressensé, kies subitan morton priploris ĉiuj altaj konsciencoj en la mondo.

Aliĝoj en Januaro 1914

S-ro Giuseppe CARAZZOLO, inĝeniero, 6, piazzetta Prefettura, PADOVA, Italujo.

S-ro TOM SCOTT, RIDDINGS ap. ALFRETON, Derbyshire, Anglujo.

S-ro J. SELLARS, Mansfield rd, SELSTON, Nottinghamsh. F-ino D. BRALEY, 133, Middle Turlong rd MEADOWS, Wilford rd NOTTINGHAM.

Eksiĝas : GHINESCU.

Entute 191 membroj.

Kaso en Januaro 1914

Reportite	Fr. 317,35
<i>Enspezaj :</i>	
Kotizaĵo 1913 de Perros	2,50
— — Sebert	3,»»
— 1913-14 de Newcomb	5,15
— 1914 de Felser	2,50
— — Drudin	2,50
— — Hedler	2,50
— — Ludwik	2,40
— — Guillemin et Klomijski...	5,»»
— — Vilho Setala	2,50
— — Cornet	2,50
— — Carazzolo	2,40
Sume	350,30
<i>Elspezaj :</i>	
Preso de Nroj 11 kaj 12 1913	Fr. 50,»»
Afrankoj, markoj	5,»»
Sume	58,»»
Restas en kaso	Fr. 292,30

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 SM (FR. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALIGOJN KAJ KOTIZAĴOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. F. MORTON, Jr. 62, Vesey st. New-York.

En Belgujo, S-ro FRANS SCHOOF, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio Cordoba.

En Italujo, S-ro O. BÜNEMANN, prezidanto, 24, via A. Saffi, Milano.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 53, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

Ni kunsendas al ĉiu societano antaŭan numeron de l' bulteno: li bonvolu ĝin transdoni al varbebla persono, kiel specimenon.

NOVA KATEKISMO

TRADUKITA DE HARRY SHAW (ANGLUJO)

ĈAPITRO KVARA

DIO

1. DEMANDO. — Diru al mi iom pri la populara koncepto de Dio.
RESPONDO. — La plejmulto da homoj pensas pri Dio kiel Persono, kiu kreis la ĉielon, la teron, kaj ĉion ceteran.
2. D. — Kaj krom tio?
R. — Ke tiu dio ĉionscias, ĉionvidas, ĉionposedas kaj ĉie troviĝas.
3. D. — Kion ili kredas pri lia ecaro?
R. — Ke li estas justa kaj sankta.
4. D. — Kaj kion alian?
R. — Ke li estas dio de amo.
5. D. — Ĉu ili ĉiam pensis pri li kiel dio de amo?
R. — Ne. Ili dio pliboniĝas proporcie al la homa kreskado laŭ inteligento kaj ecaro.
6. D. — Klarigu.
R. — La dio de la sovaĝulo estis sovaĝulo kaj rabisto; la dio de Jobo, la araba estro, estis orienta despoto; la dio de la Hebreoj estis homo batala kaj vengema; kaj la dio de multaj Kristanoj estas estajo kiu la homon punas per eternaj turmentegoj pro la eraroj de ĉi-tiu mallongdaŭra vivo.
7. D. — Kiaj aliaj konceptoj pri dio troviĝas?
R. — Ke li treege interesiĝas pri tio kion ni kredas, diras kaj faras.

8. D. — Kial?
R. — Por nin rekompenci pro tio kio plaĉas al li kaj nin puni pro tio kio lin ofendas.
9. D. — Kia estas la nomo de Dio?
R. — Li estas konata laŭ diversaj nomoj en diversaj landoj. La Grekoj lin nomas Zeus; la Romanoj, Jove; la Persoj, Ormuzd; la Hindoj, Brahm; la Hebreoj kaj la Kristanoj, Jehovah kaj Elohim; la Mahometanoj, Allah.
10. D. — Kiajn pluajn nomojn la homoj donis al Dio?
R. — « La Superegulo »; « La Senlima »; « La unua Kaŭzo »; « La Super Animo »; « La Eterna Energio »; « La Universo »; « La Naturo »; « Menso »; « Ordo », k. c., k. c.
11. D. — Sed, ĉu la vorto « dio » ne havas la saman signifon al ĉiuj homoj?
R. — Ne, ĉar al unuj ĝi signifas personon; al aliaj, ideon aŭ naturlegon, aŭ la nekonatan, nekoneblan potencon kiu sin esprimas en la fenomeno mondo. Por aliaj, dio estas la « tutajo » aŭ la « kunfluiĝejo de la materiaj kaj mensaj potencoj ».
12. D. — Ĉu la homoj ĉiam kredis en dio, aŭ en dioj?
R. — Iel la plejmulto ĉiam kredis en dio aŭ en dioj.
13. D. — Ĉu pli ol unu dio ekzistas?
R. — Laŭ populara kredo, jes.
14. D. — Kion oni nomas tiuj kiuj kredas en pli ol unu dio?
R. — Politeistoj (multdiistoj) kaj la kredantoj en unu dio oni nomas monoteistoj (unudiistoj).
15. D. — Nomu kelkajn el la politeistaj popoloj.
R. — La Egiptoj, la Hindoj, la Grekoj kaj la Romanoj.
16. D. — Kiaj estas la monoteistoj?
R. — La Hebreoj, la Kristanoj, la Mahometanoj.

17. D. — Ĉu ĉi-tiuj ĉiam kredis en unu dio?
R. — Ne. La politeismo estis la unua kredo de ĉiuj popoloj.
18. D. — Kiaj estis la dioj de la politeistoj?
R. — La suno, la luno, la nevideblaj spiritoj, la fantomoj kaj gigantoj, la feoj kaj feinoj, la bestoj, la arboj, la montegoj, la rokoj, la riveroj — preskaŭ ĉio.
19. D. — Kiel vi scias ke la homoj opiniis ke ĉi-tiuj objektoj estas dioj?
R. — Ĉar oni preĝis al ili; por ili konstruis preĝejojn aŭ templojn; fabrikis figuraĵojn kaj idolojn por ilin prezenti kaj al ili oferis.
20. D. — Ĉu ili opiniis ke ĉiuj ĉi-tiuj dioj estis egalvaloraj?
R. — Ne. La malmultaj kleruloj rigardis la multajn diojn kiel la servistojn aŭ la simbolon de unu dio kiu superregis la ceterajn.
21. D. — Kaj la malkleruloj?
R. — Ili kredis ke unuj estis pli fortaj, pli amikemaj, pli belaj kaj pli saĝaj ol la aliaj.
22. D. — Kiel la kredo en dioj komenciĝis?
R. — Tiu demando sekvigas multajn teoriojn.
23. R. — Citu kelkajn el ili.
R. — Unue. — Troviĝas la teorio ke nescio igis la unuajn popolojn, kiuj estis pleje infancaj, timi ĉion de ili nekomprenitan kaj alskribi tiun « timitaĵon » al la pereco de nevideblaj estaĵoj — estaĵoj homsimilaj sed pli ampleksaj. Due. — La teorio ke pro la sento de homa senhelpeco aŭ dependeco, la homoj kredis en estaĵoj pli potencaj ol si mem.
Trie. — Ĉar la homo estas laŭnature societemulo li sentas sin devigata kuniĝi kun la nevideblaj potencoj sin ĉirkaŭantaj kaj pro tio li ilin personigas.
Kvare. — La teorio ke la morto estas la ĉefa kialo de la homa kredo en dioj.
24. D. — Kiel?
R. — Estas dirite ke se ni povus eterne vivi sur la tero, ni neniam imagus ke ekzistas supernaturaj estaĵoj. Sed ĉar ni scias ke ni devas morti, ni pensas pri plua vivo kaj pri estaĵoj kiuj regas la vivon kaj la morton. La bestoj ne posedas diojn ĉar ili ne scias ke ili estas mortemaj.
25. D. — Ĉu la nombro de dioj plimultiĝas?
R. — Kontraŭe ĝi malplimultiĝas.
26. D. — Kial?
R. — Ju pli la homoj fariĝas inteligentaj kaj potencaj des pli ili sin sentas kapablaj sin zorgi.
27. D. — Ĉu la kleruloj havas malpli da dioj ol la malkleruloj?
R. — Jes. La kredo en multaj dioj troviĝas nur en la malplej civilizaj landoj.
28. D. — Kaj la kredo en unu dio?
R. — Multaj ankoraŭ tiele kredas.
29. D. — Ĉu troviĝas homoj kiuj kredas en nenia dio?
R. — Jes.
30. D. — Kial ili ne kredas?
R. — Ĉar ili diras ke tia estaĵo imagita de la populara menso estas ekster nia scipovo.
31. D. — Ĉu la dia ekzistado ne estas konstatebla?
R. — Laŭ unuj, jes, laŭ aliaj, ne.
32. D. — Citu kelkajn el la plej gravaj argumentoj por la ekzistado de dio.
R. — La unua estas tiu bazita sur la leĝo pri kaŭzeco.
33. D. — Kio estas tio?
R. — Ke ĉiu efiko aŭ ekzistaĵo nepre havas kaŭzon. Ke la Universo estas ekzistaĵo, tial ĝi havas kaŭzon, kiu estas Dio.
34. D. — Ĉu tiu ne estas forta argumento?
R. — Tre forta sed ne konvinka.
35. D. — Kial ne?
R. — Se ĉiu ekzistaĵo devas havi kaŭzon, Dio estante ekzistaĵo ankaŭ devas havi kaŭzon.
36. D. — Sed ĉu Dio ne povus ekzisti de eterneco?
R. — Se li povus ial ekzisti senkaŭza, la argumento ke troviĝas nenia ekzistaĵo senkaŭza malaperas.
37. D. — Kaj plue?
R. — Se dio povus ekzisti senkaŭze de eterneco, ankaŭ la universo povas sammaniere ekzisti.
38. D. — Kio sekvus se ni konsentus ke Dio ankaŭ havis kaŭzon?
R. — Ni dezirus scii tion kio estis la kaŭzo de tiu kaŭzo kaj tiel plu, tiele fabrikante ĉenon senfinan kaj senkomencan.
39. D. — Kia estas la dua argumento?
R. — Tiu de perfekteco.
40. D. — Klarigu tion.
R. — Estas dirate ke kvankam ni mem estas neperfektaj estaĵoj, ni tamen portas mense, kiel spegule, la ideon aŭ rebrilon de perfekta estaĵo.
41. D. — Kia estas la konkludo?
R. — Ke ĉi-tiu reflektajo de perfekta estaĵo en la spegulo de la menso, pravas la ekzistadon de tia estaĵo kia estas dio.
42. D. — Daŭre klarigu.
R. — Se ni imagas perfektan estaĵon tiu estaĵo devas ekzisti, ĉar se ne, li ne estus perfekta.
43. D. — Kio sekvus?
R. — Sekvus ke nia ideo pri dio pravas ke dio ekzistas, ĉar se tia estaĵo ne ekzistas, ni ne estus povinta imagi lin kiel ekzistanta.
44. D. — Kiom valoras ĉi-tiu argumento?
R. — Ĝi ne estas konsiderata tiel forta kiel la unua.
45. D. — Kial?
R. — La perfekteco estas *eco*, la ekzistado estas *stato* kaj la argumento konfuzas unu kun la

alia. Ekzemple oni povas imagi perfektan urbon kaŝitan sur la fundo de la maro aŭ naĝantan sur la nuboj sen ia tia urbo efektive ekzistanta por alrespondi la mensbildon.

46. D. — Citu pluan ekzemplon.
R. — Dum multaj jarcentoj la homoj opiniis ke la tero estas plata, tamen tiu ideo en la menso ne povas esti la reflektajo de la tero ĉar tia tero neniam ekzistis.
47. D. — Ĉu ĉi-tiuj perfekte bonaj aŭ malbonaj estajoj ekzistas nur en niaj mensoj?
R. — Jes.
48. D. — Kia estas la tria argumento?
R. — Oni nomas ĝin la argumento laŭ intenco.
49. D. — Kio estas tio?
R. — Same kiel horloĝeto, kies internaĵo estas taŭge konstruita por bati la horojn, sendube postulas fabrikiston tiel la terglobo, pro ĝia pli mirinda meĥanismo postulas terfabrikiston.
50. D. — Kiom valoras ĉi-tiu argumento?
R. — Estas nenia simileco inter horloĝeto kaj terglobo. Ne estas tiel facile kompreni por kio la tero estas fabrikita, kiel diri kial oni fabrikas horloĝeton.
51. D. — Ĉu la montroj de intenco en la Naturo ne estas tiel neerarigaj kiel en horloĝeto?
R. — Se estus tiele, neniam misteroj troviĝus. Tiaokaze ni ĉion sciis.
52. D. — Ĉu vi intencas diri ke ni ne tiel plene komprenas la terglobon kiel horloĝeton?
R. — Jes, kaj tial ni ne povas tiel konvinke preparoli ĝin kiel ni povas preparoli horloĝeton.
53. D. — Kion ceteran oni povas diri kontraŭ tiu argumento?
R. — Horloĝeto evidencigas nur horloĝiston ne ankaŭ kreinton de la materio uzata en ĝia konstruo.
54. D. — Kaj tial?
R. — Eĉ konsentinte pri *konstruisto* de la terglobo ni ankoraŭ estas devigataj prui *kreinton* de la terglobo.
55. D. — Pro ĉi-tiuj malfacilaĵoj kion ni devus opinii pri ĉi-tiu demando?
R. — Ni devus serioze esplori; ni devus esti nek dogmemaj, nek malrespektemaj sed ni devas daŭre serĉadi la lumon.
56. D. — Kiasence la vorto « dio » povas esti prave uzata?
R. — Kiel reprezentanta la plej altajn idealojn homarajn. Kion ajn ni kredas tutkore kaj serĉas posedi je ĉiuj niaj fortoj — tio estas nia « dio ».
57. D. — Ĉu ne sekvus de tio ke la dioj de unuj estas pli bonaj kaj pli noblaj ol tiuj de aliaj?
R. — Sendube, ĉiu homo estas konforma al sia idealo aŭ dio.
58. D. — Klarigu plue.

R. — Ĉar ni nur vidas tiom kaj tiel distance kiel la strukturo de niaj okuloj al ni permesas, tial ni povas pensi kaj deziri nur laŭ la limoj de nia menso.

59. D. — Kiu do kreis Dion?

R. — Ĉiu homo kreas sian propran Dion.

Fino de la kvara ĉapitro.

LA MIRAKLAJ JUVELOJ

Fino

— Sinjoro Bernardo, li komencis, via sakrilegia ŝtelado...

— Sinjoro abato... interrompis la juĝoto.

— Silentul komandis la severa juĝisto, poste vi respondos. Via sakrilegia ŝtelado, via teruriga profanado estas publika kaj pruvita. Juĝado estas ja superflua; sed al niaj kristanaj sentoj vi ŝuldas la favoron, ke al vi estas permesita publika memkonfeso kaj pardonpeto, per kiuj vi povas esperi, ke post konvena pento kaj puno, la supera juĝanto iam pardonos al via animo, ĉe la alia mondo, unu el la plej teruraj krimoj, kiun inspirete de la demono povas imagi la homa malboneco.

S-ro Bernardo, tute trankvila, staris kun altlevita frunto kaj paca vizaĝo.

— Kian krimon kaj ŝteladon vi diras, sinjoro abato? Nenio simila...

Ĉe tiu vortoj levigis el ĉiuj lokoj minaca murmurado; indignite sin klinis al la blasfemanto la ruĝkoleraj vizaĝoj.

— Sinjoro abato, firmavoĉe daŭrigis S-ro Bernardo, mi rajtas, mi devas paroli.

— Silenton! tondris la abato, ni aŭskultas la kulpigiton.

— Sinjoro abato, kiel mi ĵus estis diranta, ne ekzistas tia krimo, tia ŝtelado, tia sakrilegio, kiujn viaj pastraj moŝtoj imagas. Jen la afero: Mi trovis min en la plej terura mizero, mia familio malsatis; elĉerpinte ĉiajn monrimedojn, mi decidis turni min rekte al la dia kompato per la pero de la Sankta Dipatrino, al kiu sekve de tiu intenco mi venis preĝi. Mi tion faris kun tia fervoro kaj fido kaj tiel granda estas la dia bonkoreco, ke tiu plej alta Sinjorino aŭdis mian voĉon. Dum mia preĝado — imagu al vi, respektindaj pastroj, mian miron! — jen mi vidas la sanktan bildon kliniĝi al mi, kaj doni al mi siajn juvelojn. Tiun miraklon la Sankta Virgulino ordonas al mi laŭte proklami antaŭ vi kaj antaŭ la tuta mondo, por la gloro de Dio kaj de la gracoplena Sinjorino, kiun oni honoras en via sankta domo.

Ĉe tiuj vortoj la monaĥoj ŝtoniĝis de surprizo, La abato kaj la lertuloj, tuŝate de miksitaj sentoj, interŝanĝis komprenemajn rigardojn; la idiotoj, kun falintaj mentonoj kaj larĝe malfermitaj buŝoj,

rigardadis admirplenaj tiun feliĉan mortulon, vere ĉestaran sanktulon.

Dume la abato enpensigis.

— Amataj filoj, li diris, la afero postulas novan interkonsiliĝon. Forkonduku la arestiton.

S-ro Bernardo revenis al la karcero, sed kiel malsame ol antaŭe!

— Amataj filoj, sin turnis la abato al sia subularo, oni devas serioze konsideri tiun novan flankon de la afero. Tiu viro povas ja esti lerta fripono, sed la famo de miraklo bone pruvita, laŭte proklamita, atestita de tuta kongregacio, larĝe disvastigita, rekompencos sufiĉege la perdon de kelkaj juveloj. Krom tio, li aldonis por la idiotoj, ĝi povas esti vera. — Realkonduku la arestiton.

— Sinjoro Bernardo, diris al li la abato, ni volas kredi viajn deklarojn. Pri la juveloj, tio estas afero interkonsentita, ili estas viaj. Sed aŭskultu kaj ne forgesu mian admonon: mi malpermesas al vi, ke vi iam faru tiajn petojn al kiu ajn Sinjorino aŭ alia sankta bildo; se tio okazos, estu certa ke mi bruligos vin vivanta.

Miraklo! Miraklo!...

La Sankta sinjorino rekompencis miloble la fidon de la bonaj monaĥoj pluvigante sur ilin la donacojn de la ĉielo kaj de la tero, dank' al kies graso ili daŭrigis disdonante la « boban supon ».

Malsato estis en Hispanujo... Ĝi ankoraŭ ne tute resaniĝis.

(Laŭmemore aranĝis el *Heraldo*) Paŭ-Li.

El la Aldono al la filozofiaj pensoj de Diderot (1770)

Estis, dum la unuaj jarcentoj, sesdek Evangelioj preskaŭ egale kredataj. Oni forjetis kvindek ses pro motivo de infanaĵo kaj de absurdeco. Ĉu restas nenio de tio en tiuj, kiujn oni konservis?

Jen kion mi pensas pri la kristana dogmo: mi diros nur unu vorton pri ĝia moralo. Tio estas ke, por katoliko familipatro, konvinkita ke oni devas laŭvorte praktiki la maksimumojn de l'Evangelio, se ne, puniĝi per la tiel nomita infero, konsiderinte la malfacilegecon atingi tiun gradon de perfekteco, kiun la homa malforteco ne ricevas, mi ne vidas alian decidon, ol kapti sian infanon ĉe unu piedo, kaj ĝin dispremi al la tero, aŭ ĝin sufoki naskiĝantan. Per tiu ago li savas ĝin de l'dangero de l'kondamno, kaj certigas al ĝi eternan feliĉecon; kaj mi asertas, ke tiu faro, ne nur ne estas krima, sed devas konsideriĝi kiel treege laŭdebla, ĉar ĝi estas apogata sur la motivo de la patra amo, kiu postulas, ke ĉiu patro faru por siaj idoj ĉiun bonon eblan.

Iu viro estis perfidita de siaj idoj, de sia edzino kaj de siaj amikoj; malfidelaj kunsocietanoj estis renversintaj lian riĉecon kaj dronigintaj lin en la

mizeron. Penetrata de malamo kaj de profunda malestimo al la homa speco, li forlasis la socion kaj rifuĝis sola en kavernon. Tie, kun la pugnoj apogataj sur la okuloj, kaj meditante venĝon proporcion je sia kolero, li diris: « La malvirtuloj! Kion mi faros por ilin puni pro iliaj maljustaĵoj, kaj ilin ĉiujn tiel malfeliĉigi, kiel ili meritas? Ho! se estus ebla imagi... ilin obstinigi al ia granda ĥimero, kiun ili konsiderus pli gravan, ol sia vivo, kaj pri kiu ili neniam povus konsenti!... » Tuj li sin jetas el la kaverno kriante: « Dio! Dio! » Sennombraj eĥoj ripetas ĉirkaŭ li: « Dio! Dio! » Tiu timinda nomo portiĝas de unu poluso al la alia kaj ĉie aŭdiĝas kun miro. Unue la homoj genufleksas, poste ili releviĝas, sin reciproke demandas, diskutas, maldolĉiĝas, sin anatemas, sin malamas, sin interbuĉas, kaj la fatala deziro de l' mizantropo estas plenumita. Ĉar tia estis en la pasinta tempo, kaj tia estos en la venonta tempo la historio de estaĵo ĉiam egale grava kaj nekomprenebla.

Trad. R. D.

Dum la kongreso en Bern, mi havis en mano kartonkuponon, tian, kiaj estas la fervojaj; ĝi estis religia propagandilo. Jen la vortoj surskribitaj, kvazaŭ por vojaĝo de l' animo:

Valora hodiaŭ
Netransdonebla (700)

De urbo X.

Al la Ĉielo

Per la Kalvario

1a klaso

Prezo: la sango de Kristo

07705

R. D.

Aliĝoj en Februaro 1914

S-ro Karl FRÖDING, 417, 7 th St., NEW-YORK.

S-ro John F. HECTOR, Box 4, Station P., BROOKLYN (New-York).

Sume 193 membroj.

Kaso en Februaro 1914

Reportite	Fr. 292,30
<i>Enspezoj:</i>	
Kotizaĵo de Ges. O. Bünemann, ĉiamaj m. . .	100,»»
Por propagandaj kartoj	1,»»
Kotizaĵo 1914 de Richard	2,50
— 1914 de Skleněka	2,40
— 1913-14 de Coppenet	5,»»
— 1914 de Uitterdyk	5,40
— 1913 Morton, 1914 Fröding kaj Hector	7,70
— 1013 de Rajczi	2,50
Abono por Arct 1914 (Per Lamm)	2,50
Por antaŭaj numeroj	2,»»
Sume	433,30
<i>Elspezoj:</i>	
Bankimposto	0,20
Restas en kaso	Fr. 433,10

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 SM (FR. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALIĜOJN KAJ KOTIZAĜOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. F. MORTON, Jr. 62, Vesey st. New-York.

En Belgujo, S-ro FRANS SCHOofs, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio, Cordoba, Prezidanto.

En Aŭstrio kaj Germanujo, S-ro TYL, 57, Olomoucka, Prostejov, Aŭstrio-Moravio.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 53, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

NOVA KATEKISMO

TRADUKITA DE HARRY SHAW (ANGLUJO)

ĈAPITRO KVINA

LA TERO

1. DEMANDO. — Kian aĝon la tero havas?
RESPONDO. — La jaroj de la tero etendiĝas ĝis la milionoj.
2. D. — Ĉu ĝi estis ĉiam loĝata?
R. — Dum longa tempo la tero estis tro varmega por vivaĵoj.
3. D. — Kia estas la deveno de la tero?
R. — La scienculoj nin informas ke la tero iam estis moviĝanta nubo de fajro, kies molekuloj aŭ eroj ne povis unuiĝi pro la troa varmego.
4. D. — Kio tiam okazis?
R. — En la daŭro de longaj tempaĝoj la varmego malgrandiĝis tiel permesanta la unuiĝon de la atomoj.
5. D. — Kio rezultis de ĉi-tiu amasiĝo de la atomoj?
R. — La suno formiĝis — vasta fajrbulo, kiu dum ĝi turniĝis kaj rondiris forjetis pecojn, kiuj fariĝis sferoj. La tero estas unu el ili.
6. D. — Kiel la vivo komenciĝis sur la tero?
R. — Kiam la tero, kiu similas akvoglobeton en Niagaro de sferoj, plimalvarmiĝis, ĝi plimalvastiĝis kaj kuntiriĝis kaj dispartiĝis en teron kaj akvon.
7. D. — Kaj kio post tio?
R. — Kun ĉi-tiu malvarmetiĝanta procedo, la densa, fumplena atmosfero, kiu antaŭe envolvis ĝin, malaperis, permesanta al la sunradioj penetri ĝis la tero.
8. D. — Kio sekvis?
R. — « La tero gravediĝis. »

9. D. — En kia formo unue aperis la vivo?
R. — En la formo de « eroj » kiuj surnagiĝis sur la supraĵon de la akvaro kaj multiĝis.
10. D. — Kiel oni nomas ĉi-tiujn « erojn »?
R. — Scienclingve ili nomiĝas embriaj vegetaĵoj.
11. D. — Kia estis la sekvanta vivajformo?
R. — Aperis aliaj eroj kiuj sin nutris je la unuaj. La novaj eroj estis pli malsimplaj organismoj kiuj nomiĝas embriaj bestoj.
12. D. — Ĉu ĉi-tiuj vivaj eroj estis la prauloj de la homo?
R. — La historio de nia raso komenciĝas kun ili.
13. D. — Ĉu vi estas certa ke vi donis al mi la veran historion de la tero?
R. — Ne. Ĝi estas nur hipotezo (supozo) aŭ diveno.
14. D. — Ĉu ĝi iel utilas?
R. — Ĝi multe utilas ĉar ĝi ne estas hazarda diveno, sed la rezultato de la paciencaj laboradoj de la plej eminentaj scienculoj de la mondo.
15. D. — Kiel nomiĝas ĉi-tiu hipotezo?
R. — La evolucia teorio.
16. D. — Ĉu troviĝas aliaj teorioj pri la tero?
R. — Jes, ekzemple la teorio de kreado.
17. D. — Kiu estas la plej malnova?
R. — La kreada historio.
18. D. — Kio estas tio?
R. — Laŭ ĉi-tiu teorio la ĉielo, la tero kaj ĉio enhavata estas kreitaj de la « Vorto de Dio » en la tempospaco de ses tagoj.
19. D. — Ĉu iu ĉeestis kiam Dio kreis la ĉielon kaj la teron?
R. — Ne estas eble.
20. D. — Sur kies aŭtoritato do estas bazita la diraĵo?
R. — Sur la aŭtoritato de viroj kiuj ne estis okulvidintoj.

21. D. — Kial estas akceptata ilia vorto?
R. — Oni pretendas ke Dio informis ilin kiel li kreis la mondon.
22. D. — Kiel ni scias tion?
R. — La rakontistoj mem diras tion.
23. D. — Ĉu ni devas akcepti ilian vorton sur ilia propra aŭtoritato?
R. — Tio estas la sola pruvo kiun ili proponas.
24. D. — La kreada teorio do estas ankaŭ diveno?
R. — Jes.
25. D. — El la du teorioj kiun ni devus preferi?
R. — Tiu kiu sin montras pli valora al la plej intelektaj homoj kaj la pli bone klarigas la konatajn faktojn.
26. D. — Akceptante iun aŭ alian teorion ĉu, pro tio, ni nin alligas al ĝi por ĉiam?
R. — Ne, ni konservas al ni la liberecon anstataŭi ĝin per pli bona kiam ajn ni povos.
27. D. — Kiu estas la aŭtoro de la Evolucia teorio?
R. — Charles Darwin estas la viro kun kies nomo pli ol kun ies alia la dogmaro pri Evolucio estas kunigata.
28. D. — Kiu estas la aŭtoro de la kreda rakonto?
R. — Kredeble, oni plej ofte citas la nomon de Moseo kiel aŭtoritato pri tiu temo.
29. D. — Komparu la du virojn.
R. — Darwin estis studento kaj scienculo kiu pasigis la tutan vivon esplorante la Naturon, Moseo ne estis scienculo; li faris neniajn sendependajn esplorojn sed akceptis la pri la diveno de la tero ideojn, komune kreditajn en tiu antikva tempo.
30. D. — Kiel oni diferencigas inter la ideoj de Darwin kaj tiuj de Moseo?
R. — La Darwinajn ideojn oni nomas Scienco; la Moseajn Teologio. (Noto de la aŭtoro: Eĉ Moseo, provante klarigi la teron, obeis al scienca impulso. La kreada historio estis lia plej bone elpensita solvo. Sed, la scienco de Moseo fariĝis la Teologio de la Eklezioj).
31. D. — Inter la modernaj scienculoj kie staras Moseo?
R. — Nenie.
32. D. — Ĉu oni rajtas elmontri la erarojn de viro estimata kiel neerarema?
R. — Se li faras erarojn, jes.
33. D. — Ĉu en la disvastigo de la ideoj de Darwin estas uzita la perforto?
R. — Ne.
34. D. — Kaj por antaŭenpuŝi tiujn de Moseo?
R. — Jes. — Oni mortigis la homojn per la fajro kaj per la glavo.
35. D. — Kies ideoj nuntempe superregas?
R. — Tiuj de Darwin.
36. D. — Kion tio signifas?
R. — Ke la eraro ne povas esti perforte sub-

tenata kaj ke neniaj mirakloj en la kalendaroj aŭ biblioj de la mondo povas egali la venkon de la vero.

Noto de la aŭtoro. — La Mahometanismo estas nuntempe la religio de preskaŭ ducent milionoj da homoj; sed ni pensu pri la sangverŝo, pri la longdaŭraj epokoj de persekutado kaj pri la grandaj monsumoj elverŝitaj por propagandi Islamon. La sama povas esti dirita pri Kristanismo kiu kostis du mil jarojn de militoj, persekutadon, inkvizicion kaj oceanojn de homaj vivoj kaj de mono. Sed, ni rigardu ĉi-tiun alian bildon: antaŭ mallonga tempo, kelkaj scienculoj, la plej fama inter ili Charles Darwin, anoncis novan dogmaron, kiu estis tiel same nova, radikala kaj revolucia kiel aŭ Mahometanismo aŭ Kristanismo, tamen ĝi venkis la plej fortan kaj fanatikan kontraŭstaron kaj nuntempe estas akceptata kaj instruata tra la tuta mondo. Tamen por havigi ĉi-tiun grandegan triumfon ĝi postulis nur duoncentjaron kaj ĝi efektiviĝis tute sen la plej malgranda sugestio de persekutado, sen la bruleto de la haroj eĉ de unu viro. Ĉu io povus esti pli granda komplimento al la potenco de la vero? En la daŭro de malmultaj jaroj, la scienco starigis imperion pli impresan ol la mondaj biblioj spite la sangecajn marojn tra kiuj la bibliaj kredantoj naĝis dum la lastaj miljaroj.

Fino de la kvina ĉapitro.

LIBERA PENSO KAJ LAIKISMO

AŬ

LA ŜTATO KONTRAŬ LA MORALO

Treble la sekvaj konsideroj ekofendos multajn legantojn, se ne ĉiujn, ĉar la diritaj progresemluloj ĝenerale havas kiel idealo transdoni al la ŝtato aŭ al la komunumo la moraligan rolon per la morala edukado. Estas sekvo de la okcidenta mentaleco kiu celas al la monopolismo en ĉiuj kampoj, mentaleco ricevita el niaj prapatroj romanaj kaj arjanaj. Neniu ŝajnas nun eĉ imagi la disigon de la ŝtato kaj de la moraligo.

La jakobinistoj, daŭrigantoj de la inkvizitoroj, intencas firme anstataŭigi la religion de la ŝtato en tiu kampo per la ŝtataj institutoj de instruado.

Estas tiu malpravo kaj danĝera antaŭjuĝo kiun mi dezirus batali kiam estas ankoraŭ la tempo malfermi la okulojn de la Liberpensuloj, kiuj nekonscie helpantaj la laikisman starigon preparas novan ŝtatan religion, ne komprenantaj ke tiu-ĉi agos kiel la aliaj tuj kiam ĝi estos sufiĉe forta.

* * *

Por kiu rigardas sen observi kaj juĝas sen alprofundi, la Libera penso, t. e. la stato de sendependeco morala medie la gehomoj, ŝajnas progresi kaj eĉ esti pli kaj pli la komuna regulo.

Tamen, tio ne estas.

Mi ne volas tropezigi tiun tezon per eniro en detaloj por pruvi la aserton, tiom pli ke ŝajnas al mi ke tio eksaltas antaŭ la okuloj.

La diritaj liberpensuloj estas malmultega nombro de la geviroj, eĉ en Francujo konsiderata kiel la promesita lando de la senreligio. Kiom da familioj estas plene liberigataj de ĉiu rilato kun iu ajn eklezio?

Je titolo de ekzemplo mi povas sciigi ke en mia urbo (30.000 loĝantoj) mi vane dufoje vokis en publikaj ĵurnaloj por renkonti eĉ unu tian familion. Mi vane esploris la kelkajn grupojn diritajn antaŭenajn al sama celo.

La nombro de la veraj Liberpensuloj t. e. havantaj filozofian kaj moralan teorion, propagandantaj ĝin kaj aligintaj al societoj de Liberpenso, ŝajnas ankoraŭ pli malgranda se oni eljetas la senopiniulojn, ŝafojn de Panurgo, malprave konfuzatajn kun la Liberpensuloj sinceraj.

Efektive, mi ne konsideras kiel Liberpensulojn ĉu la simplajn antiklerikanojn, la skeptikulojn kaj la libertinulojn.

La unuaj ofte kredantoj aŭ dubantoj kaj partoprenantoj en religiaj ritoj celas nur laikigi, t. e. redoni al la civilaj aŭtoritatoj la zorgon fabriki regnanojn.

La duaj estas pli ĝenerale egoistuloj, ne kuriozaj pri konoj ne rilataj al fizikaj ĝuoj, morale sensentemaj kaj ne kompatemaj al la aliula sufero.

La lastaj estas ĝuademuloj kiuj serĉas en la liberigo de la dogmoj kaj de la reguloj moralaj pretekston por senkulpigi en ilia propra konscio iliajn pasiojn kaj apetitojn.

La unuaj restas ligataj al la ritualaj formoj de la estintecaj kultoj, pretaj cetere akcepti pro obeemeca naturo la estontajn formojn de nova kulto kiel nun tiu de Moloch kunigata al tiu de Mammon.

La aliaj pro interesemo aŭ timo atendas nur profitan okazon por vole refali en la brustmezo de iu ajn eklezio.

Eble tiu severa priskribo ŝajnos troigita laŭ unua vido, sed ne al observanto plilongige kaj pripense. Nu, estas nur sur la malgranda legio de la veraj Liberpensuloj, malmulte ĉiam izole vivantaj ke oni povas konfidi por daŭrigi la batalon por la vero, la justeco, la bono.

Necesas do antaŭ ĉio provi ilin kunigi kaj organizi taŭge, kontraŭ la antaŭvidotaj kontraŭaĵoj por ilia misio.

Estos mia konkludo pravigota de la sekvo.

* * *

Ni estas en fazo de religia malintereso, de morala atonio kiel periode elmontriĝas en la vivo de la popoloj. Tiaj fazoj estas pli dangeregaj por la Libera Penso kiu petas senĉesan penon kaj ili estas ofte sekvataj de pliigeo de mistikismo, eĉ de okult-

ismo (1), ĉar la viro, precipe la virinoj, ĉiam laciĝas je momento ia daŭrigi vivon nur materialan kaj donantan nenian kontentigon al iliaj malhelaj kaj instinktaj emoj al la Idealo. Rezultas fatala repreno de la influo de la estantaj religioj se aliu religio pli taŭga por la meza mentaleco ne venas stariĝi kontraŭ ili kaj ilin forpeli kaj anstataŭi.

Tiel okazis post la granda franca revolucio.

La skeptikismo, kiu estas ĉu nescio pri kio oni kontentiĝas, ĉu volema al si malpermeso alprofundstudi la aĵojn, ne povas anstataŭi por la granda nombro deziremegon al sentadoj eĉ rekonitaj kiel malprava certigo.

Ekskluzive neema, ĝi povas kontentigi nur absolutajn egoismojn, okazoj patologikaj ĉiam maloftaj kaj esceptaj en normala socio. Tiu-ĉi ne povas daŭri sur la fundamento de la Egoismo kaj de la « struggleforlife ». Tuj kiam la uzado de tiuj prabarbaraj kaj kontraŭsociaj principoj atingas ian potencon, la socio iĝas la kaptaĵo de la interna aŭ ekstera milito.

Nu, tio estas la sorto de la Francujo se la darwinaj teorioj malbone esprimitaj kaj komprenitaj daŭras propagandi la kulton ekskluzivan de MI, la maleston de skrupuloj en la serĉado ne de la justeco, sed de la sociala supereco kun siaj sekvoj: la « *væ victis* ».

Tial la ŝtatestroj kaj la politikaj grupoj antaŭe indiferentaj komprenis fine la neceson de unu morala regularo por normala socio.

Ĉu estas rilato inter tio, kion mi nomos la haltetemo en la liberigo de la spiritoj vidpunte metafizika, la malantaŭirado de la moraleco (tiu-ĉi konsiderata kiel la praktiko de la moralaj principoj komunaj al ĉiuj popoloj), kaj la falado videbla de la societoj de Liberpensuloj?

Mi tion kredas.

Sendube, la Libera Penso estas religio en kiu ĉiu devas esti sia propra pastro.

Sed, eĉ en la okazo kie tio estus ebla, oni ne devas forgesi ke la scienco naskiĝis el la socio, ke la homo sola lasas rapide sian pensadon glaciigatan en mallarĝa rondo de konceptoj preferegaj.

La interdiskutado estas konstante necesa al li por korekti siajn erarojn kaj malfermi al li aliajn horizontojn.

Inter tiu malmulto, malmultega nombro estas kapabla trudi ilin al si.

Estas necese kontraŭbatali kontraŭ siaj propraj emoj kaj la medio kiu superas nin se ni ne sukcesas modifi ĝin.

La ideoj estas naskantaj agojn, sed preskaŭ ĉiuj niaj agoj estas imitemaj aŭ serĉas provoki la imitadon. La protagonisto, kiu ne sekcesas trudi nov-

(1) Tio estis verkita antaŭ dek jaroj; la hodiaŭa stato certigas la antaŭvidon.

ajon kiun li predikas, forlasas siajn projektojn, reeniras en la amaso kaj en ĝi fandigās aŭ iĝas forkutimulo, kandidato al la frenezulo, al la memmortigo, aŭ al la krimo.

La interkuraĝigo reciproke estas necesa por la apliko tiel de la reguloj de la individua vivo kiel de tiuj de la morala kaj socia vivo.

La dezertulismo kiel la stoikismo povas naski imitemulojn : ili ne faras prozelitojn.

Organizajo estas do necesa eĉ por la liberigintaj cerboj, precipe por ili, mi devas diri; ĉar ili povas esti nur altruistoj, dezirantaj helpi aliajn homajn gefratojn malpli favoritajn ol ili pro cirkonstancoj el devenoj naturaj aŭ sociaj. Oni do ne povas disigi la aferon de la Libera Penso el tiu de la societoj de Liberpensuloj necesaj pro ĝia progreso teoria kaj praktika.

Komprenoble, kion mi nomas Libera Penso ne estas tiu abstraktaĵo kiun la nubaperaĵo de la vortoj ekvidigas al la spiritoj nur spekulativaj. Estas simple la unuiĝo de la gehomoj liberigintaj kontraŭ ĉiu morala zorgateco, ĉu tiu elvenas el libro, ĉu el la aŭtoro, ĉu el la aktoro.

Ne estas societoj de Libera Penso sed societoj de Liberpensuloj. Tial la studo de la kaŭzoj de la falado de la societoj de Liberpensuloj ŝajnas al mi kapabla klarigi la demandon de la Libera Penso ĝeneralavidpunte kaj determini grandparte la kaŭzojn de ĝia halto de grandigo eĉ de ĝia malantaŭirado.

Mi trovas tri ĉefajn kaŭzojn de la falado de la societoj de Libera Penso :

- 1° La influo en ili de la politikuloj;
- 2° La pensistoj liberaj;
- 3° La laikismo.

1° Antaŭtempe, la publika opinio estis antiklerikala. Ĝi estis subtenata en tiu stato per nelac-eblaj propagandadoj ĵurnalaj. Le balotadoj estis farataj sur tiu temo. La politikuloj montregis neŝanceleblajn kaj sendube sincerajn konvinkojn pri tiu punkto. Sed de post iĝis dece en la politikaj rondoj ne plu manĝi pastrajon. La teorio de la alkunigo (ralliement) aranĝas la aferojn de la elektitoj kiuj per tio gajnas ian nombron de elektantoj.

Neniu, eĉ inter tiuj kiuj daŭrigas la batalon antiklerikalan, kuraĝas sin meti sur la sola terajo logika kaj favora de la batalo antidogma (anti-religia).

Tiel la klerikuloj, post esti science flankiriginte la grupojn politikajn, socialistajn kaj sindikalistajn ekster la antireligia agado, kronis ilian verkon ĵetante la teorion de la Pensisto libera.

Kia estas pensisto libera?

Ofte egoistulo, ĉiam malagemulo, kiu kontentigās per la ŝajnaĵoj, kiu pretendas ekzemple ke sia devo estas ne trudi siajn ideojn al siaj infanoj sed

lasas sian edzinon kaj la pastron aŭ la pedagogon trudi la iliajn; komprenante la neŭtralecon laŭ la katolika modo, kun tiu jezuita klarigo : Kiam ili estos plenaĝaj, ili sin liberigos kiel mi.

Tio ne estas ĉiam, ne estas ofte vera. Estas sendube pensistoj liberaj, kiuj vivigas ilian familion en la religia indiferenteco, eĉ en la senreligieco, sed tio estas ĉiam provizora.

Izolataj, ili estos venkataj antaŭe, je la unua socia kontraŭajo.

La penso libera atingis la intelektulojn pro la timo de la ridindeco. Iĝis ridinde elmontri sian antiklerikalismen kaj precipe sian antireligiecon. La militantoj, estontaj kandidatoj, karaktere ankoraŭ pli malfortaj ol la intelektuloj, viroj de ĉiufoje unu sola ideo kaj de unu sola rimedo, panaceistoj, alvenis eĉ ĝis kontraŭbatali la societojn de Libera Penso kaj precipe iliajn direktantojn, en kiuj la balotada lorno montras al ili konkurantojn.

La Penso libera stariĝis do kontraŭa, kaŝe aŭ malkaŝe, kontraŭ la Libera Penso, tiu-ĉi restinta la specialajo de la samnomaj societoj.

La sofismo de la Penso libera paralizis la unujn, blindigis la aliajn, allogis eĉ kelkajn intelektulojn, momente nepripensantajn.

Forlasataj de la politikuloj al kiuj ili malutilas, kontraŭbatalataj de la militantoj kiujn ili ĝenas, malestimataj de la fablaj astrologoj, monopoligitaj iafoje, tro ofte, de mallarĝaj sprituloj, Dikaj-Johanoj vilaĝaj aŭ urbataj, ili povas nur malfortiĝi kaj fatale falas kiam ili ne estas subtenataj de loka intereso aŭ de kelka energio konvinkita. Rezultas du specoj de societoj stare restantaj : tiuj kiuj sekvas la politikon antiklerikalan en la landoj kie la klerikalismo ŝajnas ankoraŭ danĝera al la militantoj, tiuj kiuj sin dediĉas al bruega kaj malefika propagando. Nek unuj nek aliaj povas plu prosperi. Kial? Ĉar ili ne evoluis : ĉar ili restis en la teoria kiel en la praktika ordo simple malpozitivaj aŭ kritikkemaj limigantaj ilian agadon laŭ elmontradoj senkarakteraj, neallogemaj, iafoje maldecaj, supere konkurencaj en tiu kampo de aliu danĝero pri kiu mi tuj parolos : la laikismo.

Kio estas la laikismo? Simple nova ŝtata Religio, kiu eltiras sian devenon el la antiklerikalismo alveninta al la publika Potenco. Ĝia karakterizo estas la fiksado de unu filozofia kaj morala teorio, kun ĝiaj politikaj kaj socialaj postsekvoj, teorio densigata en unu kateĥismo : la oficiala moralo.

Cetere ĝis nun, tiu-ĉi estas nur elsignado scienca valoro de la ĉefaj katolikaj moralordonoj, kies oni forigis la spekulativajn fundamentojn, tiamaniere ke ĝi estas nur senanima skeleto, senliga memorigilo kiu ne subtenis la ekzamenon de la plej simpleca kredulo de la ŝtatismo se la kredulo rezonadus.

La diverseco de la moralaj libroj akceptataj estas nur ŝajnama, ĉar ĉiu dekliniĝo grava estas submetata antaŭ sankta ofico kaj forpelata el la lernejoj. Tio koncernas do nur ŝtatan kateĥismon kiu estas en la palpetoj sed kiu baldaŭ fiksiĝos.

Nature ĝi kompletiĝos kaj jam kompletiĝas per simboloj, per kultaj ceremonioj en kiuj « pontifas » la papoj kaj la episkopoj de la R. F., renaskiĝo de la naciema kaj imperiema religio de la bandista popolo : la Romanoj.

La laikismo estas la vera danĝero por la Libera Penso, unue ĉar multaj personoj konfuzas la du aferojn kaj atribuas al la Libera Penso la oficialan karakteron de la laikismo; poste, ĉar legarigita, la laikismo ne jam plu povas akcepti la interdiskutadon kaj la kritikon de ĝiaj dogmoj kiuj jam petas blindan kredecon kaj la misteron.

La laikismo celas anstataŭi la klerikalismojn kaj flankigi la Liberan Penson, tiu-ĉi jam lasata de ŝtatoficistoj ne plu estante kampo kie estas rikoltataj ordenaĵoj kaj aliaj favoraĵoj.

La Libera Penso estos kontraŭ la laikismo kiel la Protestantismo kontraŭ la Katolikismo. Ĝi reprezentas kaj reprezentos la liberan ekzamenon kontraŭ nova kredo, apogata sur nova silabuso.

La laikismo eble mortigos la katolikan eklezion; sed ĉar tiu lasta enhavas ankoraŭ la plimulton, la laikistaro estas momente devigata lasi ĝin vivi, al ĝi doni la allogon de la persekutado, kaj lasi ĝin uzadi ĉiujn la potencajn rimedojn kiujn alportas la financistaro, la militista kaj administracia aristokrataro kiuj pli kaj pli revenas al ĝi. Sed kredinde kiel en malnova Ĥinuĵo, kies mi sekvas la prahistoriajn fazojn, la laikismo kaj la eklezio denove fandiĝos.

Kiel la mohamedismo, la laikismo havas nur unu kredan elparolon : la tutpotenca ŝtato.

Tiu senteco estas la kriterio de la nova ortodoksio.

Kontraŭ tiuj kaj tiaj danĝeroj, elŝajne nia spirito povus kredi la pensliberon tre malsana kaj la societojn ĝin riprezentantajn nekuraĉeblaj. Tamen oni ne devas forgesi ke ĉiu bezono kreas la organon. Nu, la libero por pensi, la rajto por diskuti, por fari al si propran opinion estas akiritaj bienaĵoj.

Nek la forlasoj de unuj, nek la malamikaĵoj de aliaj, nek la kreo de konkurencaj institutoj superas kontraŭ organismo necesega al grava nombro de homoj, escepte per perfortego. Tiuj-ĉi protagonistoj, ne devas senkuragiĝi. Male ili devas senlacege sin okupi por realigi iliajn konceptojn.

Ili ne devas perdi tempon por allogi la indifrentulojn, la nekonsciulojn, nek por kritiki la

malperfektaĵojn de la organaroj paralelaj, sed nur ataki la malamikon : la Religiojn bazatajn sur la morala aŭtoritato de iu ajn perulo, kiu estus privilegiata por ricevi la malkaŝon de la Vero, kaj kies la posteuloj pretendus heredi la saman privilegion.

Estas la principo ĉi supre difinita kiun oni devas kontraŭbatali pli ol la pontifojn mem en la Libera Pensa kampo.

Sed por kontraŭbatali malamikon kun ŝanco al sukceso, estas necese bone lin koni.

La Religio respondas al bezono, al kelkaj bezonoj, kiujn sciis uzadi la diversaj pastraroj kaj al kiuj ili liveris pli malpli taŭgajn kontentigojn.

La rimedoj uzataj de la Religioj por kontentigi la alidealajn bezonojn de la homo estas iliaj propraj karakterizoj, kiujn mi plej rapide kiel eble tuj skizas. La unua ideala kaj la plej potenca bezono de la homo estas la mistika : kuriozemeco, timemeco kaj allogemeco al la nekonato.

Ĉiu religio al ĝi respondas unue spekulative per speciala filozofia teorio, bazita sur la iutaga scienco kaj kutimigavidepunkte per praktikadoj individuaj kaj opaj (preĝo, komunio, kosmosofiaj ceremonioj, k. t. p.) celantaj starigi rilatojn inter la homo kaj la mistera nekonato aŭ nekonatulo.

La dua ideala bezono estas la estetika kaj mistika, kiu ĉe la prauloj fandiĝis kun la antaŭa.

La Religio al ĝi respondas spekulative per teorio estetikomorala, eltirata el la akceptita filozofio kaj kutimige per belartaj kaj plezurigaj elvokadoj en la religiaj ceremonioj kiujn ili festigas.

La tria bezono estas la sociemeco.

La Religio al ĝi respondas per morala teorio kaj leĝaro, starigitaj laŭ la sama filozofia sistemo kaj per agoj kaj institutoj por helpado kaj solidarado, kiujn neniu ŝtata organismo neniam povas egali kaj plenumi kun la sama karakterizo de fratemeco kaj de reciproka simpatio. Ĉio ĉi necesas literaturan monumenton kolektantan la komunan dogmaron kaj ĝiajn fundamentojn, kunigan taktikon kaj organizaĵon.

La literatura kolekto enhavas ĝenerale : 1° unu historian aŭ legendan fundamenton (Biblio, acta sanctorum); 2° unu rezonsajnjan dogmaron (teologio); 3° unu liturgion; 4° unu moralan leĝaron. La tuto estas entenigata en la ortodoksio per regulaj kontraktoj (koncilioj) kaj propagandata per lernolibroj (kateĥismo, meslibro).

La kuniga taktiko povas esti por la oportuneco de la parolado dividata en tri partoj : varbado, konservado, disciplino.

Por la varbado, la Religio uzas diversajn rimedojn propagandemajn inter kiuj la prediko, la

libro, la imitemo, ankaŭ kiam ĝi povas la aĉeto, la perforto.

La varbado havas diversajn fazojn aŭ gradojn : adopto (baptado), readopto (konfirmacio), akcepto (komunio).

La kunigitaj inter si rekonigās per simbolaj gestoj (kruca gesto) kaj signaĵoj (kruco).

La konservado de la kunigeco de la fideluloj estas farata per memorigaj agoj, memorigante periode la devojn kaj rajtojn, per oftaj kunvenoj kaj partoprenigante la opon de la asocioj en ĉefaj cirkonstancoj de la vivo individua kaj familia (naskiĝo, edziĝo, morto).

La disciplina metodo estas antaŭzorga aŭ puna, individua (ekzameno de konscio) aŭ opa (konfeso, ekskomuniko).

Fine la administrado kaj direktado necesas funkciistarojn (pastraroj) kiujn oni povas dividi po du grupoj aŭ serioj reciproke interpenetrantaj : videbla organizaĵo — monda pastraro — meza organizaĵo — regulara pastraro — mi ne volas etendi tiun longan artikolon per konsideroj pri la postsekvaj moralaj, sociaj kaj politikaj de la religioj kaj de iliaj pastraroj. Tio necesas specialan kaj longan studon.

Do, tiaj estas la karakterizoj de iu Religio.

Mi diris ke tiu-ĉi respondas al bezono. Kio ne volas diri ke la estantaj religioj ĉiam estos. Ili anstataŭis aliajn. Laŭ ilia vico, ili estos anstataŭataj.

Nu, por povi fine detruigi organon necesas sed iĝintan nesufiĉa, necesas apud ĝin almeti ĉu per burĝoniĝo, ĉu per anstataŭo, superan organon kiu altiras la sukcon je malprofito de la unua. Tiu-ĉi sekigās kaj mortas iom post iom, tiel kontraŭ la religioj.

Ili estos detruataj nur per religio aŭ religioj.

La Libera Penso devas do iĝi religio en ĝiaj ĝeneralaj karakterizoj, akordiĝeblaj kun la akiritaj veraĵoj, se ĝi grave volas alterĵeti ĝiajn malamikojn kaj la malamikojn de la vero, ĉiam nova, ĉiam ŝanĝa.

Ĉu tio volas diri ke la Libera Penso devas havi similajn bazojn kaj principojn kiel faras la laikismo ?

Neniel.

La materialismo estas tiom deca kiom la deismo por edifi moralon. La morala disciplino de la protestantoj bazata sur la perlibra meminspirado valoras la orelan konfeson de la katolikoj. La gastamo de la prauloj valoras parte la kristanan bonfaradon.

La ĵurnalo valoras la libron kaj la predikon.

Sed se ni ne povas kaj ne devas tuton preni el la religioj kaj precipe de la katolika, ni devas preni multon. Tio estas konvinko kiun mi akiris dum multjaraj funkcioj de direktanto en societoj de

Libera Penso kaj tiu konvinko fortigās ĉiutage per la observo de la aĵoj kaj de la personoj.

Evidentas ke ne estas demando starigi iun ajn dogmaron kontraŭ la dogmaroj de la estinteco kaj de la estanteco.

Lasu ni tion al la sektanoj de ĉiu ordo.

La Libera Penso estas metodo. Ĝi neniam povos, restante ĝi mem, adopti kiel aksiomo opinion eĉ elveninta el la nuntaga scienco; ĉar ĝi estus puŝata ĝin prediki, do ĝin trudi morale (radaro).

Ĝi glaciĝus sur dogmo kaj jam estus ne pli ol la aliaj sektoj.

Mi parenteze kredas utile respondi al kontraŭparolo, kiam mi sentas en la leganto kaj kiun mi pensas antaŭjuĝo. Multaj eĉ inter la plej kleraj estas konvinkataj ke oni alvenos trovi filozofian kaj moralan dogmaron bazatan sur reguloj havantaj karakterizon de vero preskaŭ absoluta kiel okazas en la sciencoj pozitivaj, precipe matematikaj.

Estas hodiaŭe la filozofiala ŝtono de la laikistoj.

Estas dika iluzio.

Estas en la sciencoj du tre malaj metodoj kiuj ne povas fandiĝi, kaj kiuj ĉiam estos paralelaj, kio estos treege feliĉa, ĉar ili sin reciproke kontrolas kaj plenigas.

Estas la eksperimenta metodo, kiu estas en la bieno de la scienco, kaj estas uzebla nur al la konkretaj formoj de la aĵoj, al la fenomenoj kaj al la faktoj percepteblaj senpere de niaj sentiloj; kaj la spekulativa metodo, kiu estas eco de nia spirito (nomu ĝin kiel vi volas : cerbecoj, animo, imago, ne estas grave) kaj kiu ludigas abstraktajn ecojn necesajn por abstrakti kaj juĝi abstraktajn aĵojn kaj fenomenojn. Tiu metodo estas en la kompetenco de la filozofio kiu ĉiam estos flanke, kelkafoje kun, ofte kontraŭ la scienco.

La demandoj de la forsendejo (au-delà) kaj de ĝiaj rilatoj kun la sentejo (en deçà) estos ĉiam en la spekulativo. La ideo mem de senfino, kiun ni povas kompreni, kvankam neniam povos ĝin senti, komprenigas ankaŭ ke tiom potencaj kiom ni povas imagi niajn estontajn teleskopojn, ili ne forigos la misteron ĉiam malantaŭ irantan antaŭ niaj okuloj.

Tamen neniu homo respektama de sia indeco povas vole fermi la okulojn aŭ rigardi nur la kotan teraĵon.

Male, la moralo ne estas necese laŭ spekulativa naturo. Vane, oni serĉas ĝin bazi sur abstrakta principo, kiel sur scienca leĝo.

Sendube, oni povos determini la naturajn leĝojn de la etologio, priskriba scienco, la filozofiajn leĝojn de la etiko mem, teorio de la rilatoj inter la aĵoj, inter ni kaj la aĵoj, inter ni mem; sed la praktika moralo estas kaj estos eble ĉiam en la praktika kampo kaj dependa el la homa elekto.

Efektive ne estas praktike moralo kun granda M : estas moraloj, t. e. nesribataj interkonsentoj, kontraktoj inter la gehomoj, kontraktoj ĉiufarmaj, ĉiukondiĉaj laŭ la kaprico de la partoprenantoj.

Sed tamen estas aliparte tre utile ke oni penas rilatigi la moralon teoriant al la filozofiaj sistemoj.

Do, kontraŭ tiu vidpunkto, ĉiam utilos apud kaj antaŭ la scienco kiu atakas la pozitivon kaj tendencas nur ĝin vidi, ĉiam necesos, mi diras, abstraktojn de kvintesenca.

El la duelo de tiuj du eroj : Eksperimento kaj imago, kiuj sin senĉese interpuŝegas en ni mem kaj inter ni, depost kiam la homa cerbo havas la eon abstrakti, forpreni, diveni, rezultas la tuta progreso.

Nu, tiu duelo necesega devigas la eblecon elmeti la ideojn, la teoriojn la plej heterodoksajn kaj eĉ la plej heteroklitajn, kaj siavice tiu libera diskutado necesas organizajon kiu liberon trudas aŭ eltiregas el la potencoj malantaŭemaj kiel el la potencoj konservemaj, t. e. ĉiuj la religioj kun pretendita malkaŝo, t. e. ĉiuj la registaroj kun perforta pravo kaj ŝtata superrajto.

Mi ne elvolvigos ĉi tie la fundamentojn kiujn mi ekvidas post pripensoj por organizaĵo racia de la Libera Penso. Jam mi trouzis la paciencon de la leganto.

Cetere, ĝi naskiĝas el la konsiderado de la ĉi supre detalata temo.

Mia intenco estis fari kialan kaj laŭtan alvokon al la unuigo *helpema* kaj *agema*.

La izolstato estas mortiga al la individuo. Ĝi senfortigas la fortulojn mem. Ĝi estas ofte aŭ iĝas signo de senkuraĝiĝo, do malforteco.

Estas konfesote ke multaj liberpensuloj renkontas barilojn en ilia interna moraligema misio kaj ke multaj komprenis la neceson de la interhelpe. Sed malmultaj iniciatis.

Ĉiu scias la malfacilecon propagandi en privata rondo. « Neniu estas profeto en sia lando », sed precipe neniu estas aŭdata profesoro ĉe si.

Necesas la allogo de la nekonito aŭ de la malmulte konito por la simpluloj kaj eĉ por aliu. Necesas precipe la opiĝo, la amaso, por uzadi la potencon de la imitemo.

Mi revenas, kiel katon, al mia « maroto » : imitu ni la Eklezion.

Ne bezonas krei sed nur fortigi, rektigi, renaski. Sufiĉas doni al la taŭgaj societoj la vivon intelektan kaj moralan kiu tro ofte al ili mankas.

La tempoj estas alvenantaj.

Ĉie la plej kleraj inter la Liberpensuloj sentegas la bezonon restarigi la liberajn filozofiajn skolojn de Grekujo kaj Romo.

Ĉie provoj estas eksperimentataj por unuigi la homojn vere sendependajn kontraŭ la morala aŭtoritato.

Ĉu mi devas citi : la I. L. P., la I. O. E. K., la Instituto I. I. de progresaj spertoj, k. t. p.

Sed ĉiu societo ŝajnas voli limigi al iu ajn vidpunkto sian agadon aŭ miksiĝi kun flankaj, paralelaj organoj sociaj, kaj neniu ŝajnas eniri malkaŝe en solidareca kaj interdukada kampoj.

Ĉu unuigi? Ĉu novigi?

Respondos la anaroj. Sed mi rimarkigas ke ĉiuj naskiĝis el sama bezono : bezono al studo de la filozofiaj, moralaj kaj sekve sociaj problemoj en ilia fundamenta kampo. Do, se ne fandiĝo, ebla unuigo.

* * *

Mi estis skuinta mian plumon kaj intencanta ĝin ripozigi, kiam venis al mi la penso ke utilus eble doni ankoraŭ aliu pinglan pikon kontraŭ aliu saglobeto, la komuna opinio pri la sorto tuja de la Libera Penso.

Ni songe imagadas ĝenerale al socia stato en kiu ĉiuj estus samgrandaj, saminteligentaj, sammoralecaj, k. t. p. : t. e. al la unuformeco, kiun oni ornamas per la vorto abstrakta : unueco.

Sen etendiĝi sur la bela vivo kiun ni vivus, se tio estus ebla, vivo en kiu ĉiuj la gehomoj estus miljarda ripetaĵo de unu tipo kaj sendube ankaŭ la bestoj, la kreskaĵoj kaj la cetero, mi nur volas atentigi pri la neebleco natura de tia koncepto.

En la naturo, ni vidas ke en ĉiu ordo viva aŭ senviva troviĝas dum tempo konsiderata ĉiuj aŭ preskaŭ la formajoj antaŭaj, depost la plej simpla, era, ĝis la atinginta superan tipon taŭgan al la kosma momento.

Nu, ĉiu analizemulo povas kontroli ĉiutage tiun leĝon en la socianaro.

Mi renkontas sur la terglobo, ne nur ĝenerale disataj, sed eĉ en ĉiu lando, en ĉiu urbo, en ĉiu socia (familia, profesia) grupo, preskaŭ ĉiujn la ia antaŭtempajn homajn tipojn.

Sub la similaj vestaroj spite ŝajnante similaj esprimoj, batas koroj kanibalaj, ŝtonajaj, heroo-tempaj, mezepokaj, deksep, dekok, neknaŭ kaj hodiaŭa jarcentaj; remaĉadas kaŝfrenezaj, best-apetitaj, egoistaj, ankaŭ plej pure sindonemaj pripensoj.

Ĉiu ero kaj organaro viva estas mikrokosmo de la evoluado, ĉiu socio de la historio. Sendube, oni songas kaj songadas unuigi, similigi, samigi. Kial igi?

Ĉar oni ĉiam estas sub la influo de la premema malsanveneno de la teokratia kaj de ĝia kuzo la perforta ŝtato.

Ĉu oni penas por samigi niajn kreskaĵojn, niajn dombestojn? Ne, en kulturo kaj bestedukado oni ĝenerale havas saĝajn kaj praktikajn ideojn.

Oni kontentiĝas elektante la plej taŭgajn tipojn por niaj celoj kaj oni tiel « selektas ». Oni certe

povas naski artfarite nigrajn rozajn per aldono de ĥemiaj eroj, sed oni scias ke tiel oni ne kreas daŭran specon : ĉar senĉese la individuoj ŝanĝitaj revenemas al la speco tipo.

Nu, tion kion ni ne povas fari kontraŭ pli malpli simplaj organaroj, kial ni provas ĝin fari kontraŭ tiom malsimpla organaro kiel estas la homo?

Same kiel Jesuo diris : estos ĉiam malriĉuloj inter vi, mi diras : estos ĉiam malsamuloj inter vi, ĉiam malsanuloj kaj mortemuloj malgraŭ la plej severa higieno kaj la plej scienca kuracarto, ĉiam nesciuloj malgraŭ la plej kvanta instruada trudo, ĉiam maljustuloj malgraŭ la plej belaj ideoj kaj intencoj esprimataj. Tial oni ne devas kredi ke la L. P. tuje estos la ĝenerala stato kaj ke la liberpensulaj societoj baldaŭ kunigos la plimulton de la gehomoj.

Necesos longatempe ankoraŭ institutoj taŭgaj al la diversaj mentalecoj. Iuj inter la nunaj religioj daŭros medie la plej alta nova civilizacio, kiel medie la antaŭaj kaj nunaj restis kaj preskaŭ senŝanĝaj vivis la kultrestaĵoj parsiaj, judeaj, k. t. p.

Nur la poo ŝanĝos.

Ni devas antaŭvidi por dum kelkaj jarcentoj (mi volas esti esperiga) krom la konservado de la malnovaj religiaj formoj, kiel kristismo, la ekziston de civila religio, la laikismo, kaj la naskiĝo de fatala kavsonĝaĉo nova kiu allogos la amason vole malkleran, vole nesciantan, sed aliparte neniel malinteresiĝantan pri la mirindaĵoj.

La mondo atendas novan mesion; ĉar la mondo sonĝas kaj ĉiam atendas plenan abstraktan feliĉon tergloban aŭ eksterteran de iu savanto, per ia miraklo.

R. PHLUYD.

LEV NIKOLAJEVIĈ TOLSTOJ

La ĉiutagaj gazetoj raportas :

La rusa ministro por internaj aferoj rifuzis al ĉiuj societoj la permeson por kolektoj favore de monumento pri Tolstoj, deklarante, ke la rusa registaro ne povas permesi tiajn kolektojn pro la kontraŭstata kaj kontraŭeklezia sintenado de Tolstoj.

Ni, liberpensuloj, vidas do denove la neceseg-econ de nia propagando.

O. B.

LIBERA PENSO ĈE LA PARIZA KONGRESO

FESTO. — La Dimanĉon 2-an de Aŭgusto, nia societo *Libera Penso* donos grandan kulturifeston, sub prezido de S-ro Ferdinand Buisson, pariza deputato. Ĝi kunigos francajn kaj alilandajn liberpensulojn por frata manifestacio, kun paroladoj en Esperanto kaj en

franca lingvo, kantoj kaj muziko. Estos invitataj ĉiuj kongresanoj, kies kredoj renkontos tie indan respékton; persone promesis ĉeesti nia Majstro. La festo estos anoncata sur la kongresaj programoj sammaniere kiel la diversaj religiaj diservoj.

KUNVENOJ. — Ili okazos en ĉambro de unu el la francaj liberpensaj societoj, kiuj volas fari al la esperantistaj sampensuloj fervoran akcepton.

LOĜADO. — La membroj de *Libera Penso* kaj iliaj familioj povos loĝi najbare, mendante ĉambrojn per ni. La ĉambro kun lito unupersona aŭ dupersona kostos minimume 2 frankojn por unu tago. Por viroj solaj ankaŭ ekzistas en Parizo Popola Hotelo perfekte higiena, kie la loĝado kostas 5 frankojn por unu semajno.

MANĜOJ. — La unuan tagon estos organizata kumango en bona kaj malkara restoracio, kie poste ĉiu povos laŭvole retrovi oportunan nutradon kaj fratan societon.

— Ni donos poste plenajn informojn. Sed de nun decidu veni ĉiuj societanoj, kiuj povos : nia Pariza kunveno estos por ili kaj por *Libera Penso* bela, neforgesebla dato.

Aligoj en Marto 1914

S-ro Frant. X. KUĈERA, KNEZÈVES ap. Rakovnik, Bohem.
S-ro Th. CART, 12, rue Soufflot, PARIS.
S-ro Fr. RIEMAN, 113, rue Damrémont, PARIS.
S-ro F. DUVAL, 38, rue Monier, PARIS.
S-ro J. FINKELSTEIN, 26, rue Chabrol, PARIS.
S-ro J. PENELAUD, 32, rue de la Colonie, PARIS.
S-ro René DUBOIS, 24, rue Berthollet, PARIS.
S-ro COUTEAUX, 40, rue Bichat, PARIS.

Eksiĝas :

Ivanskiy, Per Lamm, Antiklerikala Grupo en Genova, Soare, Hristoskoff, Kawecki, Curchod.
Entute 194 membroj.

Kaso en Marto 1914

Reportite	Fr. 433,10
<i>Enspezoj :</i>	
Kotizaĵo 1913-1914 de Dauphin.....	5,»»
— 1914 Buisson, Sandrin.....	5,»»
— 1913 Batek	2,60
— 1914 Loncota	2,50
— 1913 Maranhao.....	2,90
— 1913-1914 F-ino Adam.....	4,90
— 1913-1914 Gottgetreu.....	5,55
— 1913-1914 Grimm	5,10
— 1914 Collot, Lobbedez, Depardieu..	7,50
— 1913 Liberiga Stelo Sens.....	2,50
— 1914 Cros.....	5,»»
— 1913-1914 Blangarin.....	5,»»
— 1913-1914 Staniŝiĉ, 1914 Lorek.....	8,»»
— 1913-1914 Engst.....	5,10
Sume.....	499,75
<i>Elspezoj :</i>	
Poŝtmarkoj	10,»»
Restas en kaso	Fr. 489,75

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 SM (FR. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALIĜOJN KAJ KOTIZAĴOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. F. MORTON, Jr. 62, Vesey st. New-York.

En Belgujo, S-ro FRANS SCHOofs, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio, Cordoba, Prezidanto.

En Aŭstrio kaj Germanujo, S-ro TYL, 57, Olomoucka, Prostejov, Aŭstrio-Moravio.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 53, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

NOVA KATEKISMO

TRADUKITA DE HARRY SHAW (ANGLUJO)

ĈAPITRO SESA

LA HOMO

1. DEMANDO. — Kio estas la homo?

RESPONDO. — Racia besto.

2. D. — Kian aĝon la homo havas?

R. — Centojn da miloj da jaroj.

3. D. — Kiuj estis liaj antaŭuloj?

R. — La mambestaro — la plej alta speco de vertebruloj, t. e. ĉiuj bestoj kiuj mamnutras la idaron.

4. D. — Kiel vi scias tion?

R. — Laŭ kunmeteco, strukturo kaj la funkciado de siaj organoj, la homo tute similas beston.

5. D. — Montru kelkajn el la similaĵoj inter la homo kaj la bestaro.

R. — La homo havas nenian muskolon, oston aŭ organon malsimilajn al tiuj de la bestaro.

6. D. — Plue?

R. — Ambaŭ estas kunmetitaj el la samspecaj materialoj; posedas similajn korperojn kaj submetiĝas al la samaj leĝoj pri la vivo kaj la morto.

7. D. — Ĉu la homo iel diferencas de la bestoj?

R. — Intelekte kaj morale la homo superas ĉiujn aliajn bestojn.

8. D. — Kiel alie ili diferencas?

R. — La besto serĉas nure la satigon de la apetito; la homo la realigon de siaj ideoj.

9. D. — Kaj krom tio?

R. — La homo vivas kaj laboras por la postuloj, por siaj naskotaj samuloj; la besto ne montras senton de la estonteco.

10. D. — Kia estas la parenceco inter la homo kaj la besto?

R. — Li aŭ malsuprenvenas aŭ suprenvenas de la besto.

11. D. — Kia estas la plej forta pruvo ke la homo venas *supren* de la besto?

R. — La fakto ke la homa embrio, antaŭ la naskiĝo de la infano, travivas gradojn de disvolviĝo en kiuj ĝi havas, jen brankojn kiel fiŝo, jen voŝton, jen piedfingregojn, jen korpon kovritan de haroj kaj cerbon kiel tiu de simio.

12. D. — Kion tio signifas?

R. — Ke la homo dum sia longa ekzistado volverampis tra ĉiuj tiuj vivformoj ĝis sia nuna stato.

13. D. — Ĉu vi intencas diri ke estis iam tempo kiam la homo estis besto similanta kelkajn el tiuj de ni konataj nuntempe?

R. — Dum multego da jaroj li similis simion, gorilon, ŝimpanzon aŭ orangutangon.

14. D. — Antaŭ kiom longa tempo tio estis?

R. — Ne estas facile diri, sed kredeble estis antaŭ centoj da miloj da jaroj.

15. D. — La homo do ne estas speciale kreita?

R. — Ne, li malrapide kreskadis supren de pli malaltaj vivformoj.

16. D. — Ĉu iam iu vidis la evoluon de homo el besto?

R. — Ne, la Naturo laboras sekrete; la plimaltspecaj bestoj sanĝiĝis en homon per malrapidaj, nerimarkeblaj gradoj same kiel unu vidaĵo malaperas en alian.

17. D. — Ĉu ĉi-tiu kreskado aŭ disvolviĝo estas limigita al lia korpo.

R. — Lia menso aŭ intelekto estas tiom same evoluado kiom lia korpo.

18. D. — Kial ĉiuj bestoj ne disvolviĝas en homojn?

- R. — Por la sama kialo ke ĉiuj sovaĝuloj ne estas evoluintaj en civilizajn popolojn.
19. D. — Kio estas tio?
R. — Malfavoraj vivkondiĉoj.
20. D. — Klarigu.
R. — La progreso rezultas el la neceseco. La bestoj kaj la sovaĝuloj restas senmove tiel longe kiel ili povas sin konservi komforte. Ili elpensas kaj disvolvas novajn rimedojn nur kiam ili estas devigataj aŭ minacataj de danĝero kaj morto.
21. D. — Daŭre klarigu.
R. — La homoj kaj la bestoj estas la esprimo de la kondiĉoj sub kiuj ili vivas. Kiam la kondiĉoj ŝanĝiĝas la homoj kaj la bestoj ŝanĝiĝas samtempe.
22. D. — Kio super ĉio alia kontribuis al la homa evoluado?
R. — La batalo por ekzistado.
23. D. — Ĉu troviĝas aliaj opinioj pri la homa deveno?
R. — Jes. Multaj homoj ankoraŭ kredas ke la homo estas kreita de Dio, tute subite kaj en perfekta stato, antaŭ kelkses mil jaroj.
24. D. — Kion signifas « kreita perfekta »?
R. — Farita en la simileco de Dio.
25. D. — Ĉu estas pretendite ke la homo estis iam tiel perfekta kiel Dio?
R. — Mi pensas ke ne.
26. D. — Tial li estis neperfekta kompare kun Dio?
R. — Jes.
27. D. — Kial do oni diras ke la homo estas kreita perfekta?
R. — Mi opinias ke oni intencas diri ke li estis tiel perfekta kiel homo iam povus esperi esti.
28. D. — Kial li ne estas perfekta nun?
R. — Estas dirata ke li falis el perfekteco per ago de malobeo kontraŭ sia kreinto.
29. D. — Kiel « perfekta » homo povas krimi?
R. — Estas dirata ke, pro sia propra gloro, la kreinto permesis la krimon.
30. D. — Tial li ne malobeis, sed obeis Dion?
R. — Jes, se li helpis efektiviĝi la eternajn intencojn de Dio.
31. D. — Kiaj estis la konsekvencoj de la homa defalo?
R. — La pekeco, la suferado kaj la tuthomara morto.
32. D. — Ĉu nenia malbono estis en la mondo antaŭ la homafalo?
R. — Laŭ scienco, jes; ankaŭ laŭ la Biblio, ĉar en tiu libro estas skribita ke Satano tentis Adamon. (Ĉar la diablo kaj la infero ekzistis antaŭ ol Adamo ekzistis, la homo ne povas esti tenata responde pri la enkonduko de malbono en la mondon.)
33. D. — Kia estas la populara kredo pri Satano?
R. — Ke li estas la malamikego kontraŭ Dio kaj la homo.
34. D. — Kaj krom tio?
R. — Ke li estas tiel potenca por malbono kiel Dio estas por bono.
35. D. — Kiomaĝa estas la Diablo?
R. — Preskaŭ tiomaĝa kiom Dio laŭ populara kredo.
36. D. — Kiel la kredo en Diablo povas esti klarigata?
R. — La homaro, en sia junaĝo, penante klarigi pri la ekzistado de lumo kaj mallumo, de vivo kaj morto, de amo kaj malamo, akceptis la plej simplan solvon, t. e. ili supozis ke du malsamaj estaĵoj — unu bona kaj la alia malbona — ekzistis kaj regis la mondon.
37. D. — Ĉu oni kredas ke la Diablo estas tiel saĝa kiel Dio?
R. — Ne, sed oni opinias ke li estas tre ruza.
38. D. — Kia estas la laŭdira celo de lia ekzistado?
R. — Por tenti kaj ruinigi la homojn kaj la Diajn farojn.
39. D. — Kiu estas priresponda pri lia ekzistado?
R. — Laŭ populara kredo, li estis same kiel la unua viro, perfekta estaĵo — ĉefanĝelo kiu deziris fariĝi dio kaj pro tio estis forpelita el la ĉielo.
40. D. — Kial Dio ne detruas la Diablon?
R. — Por tia sama kialo kia, laŭdire, influis lin permesi la homan defalon.
41. D. — Kio estas tio?
R. — La Dia gloro.
42. D. — Ĉu por ĉiam Diablo kaj infero ekzistos?
R. — Laŭ la opinioj de multaj personoj, jes.
43. D. — Kial oni kredas tiajn fabelojn pri la Diablo k. c.?
R. — Ĉar iliaj gepatroj kredis.
44. D. — Kion vi pensas pri tiaj kredoj?
R. — La opinioj kaj kredoj de homoj, pri temoj kiujn ili ne diligente studis estas malmulte valoraj.
45. D. — Kiel efikas kredo en la Diablo?
R. — Ĝi igas la homojn superstiĉaj, malgajaj, malkuraĝaj kaj kruelaj.
46. D. — Kiel oni povas senigi sin je kredo en Diablo?
R. — Per kleriĝado.
47. D. — Kio estas la plej granda timotaĵo?
R. — La timo.
48. D. — Kial?
R. — Ĉar, paralizante la menson kaj la korpon, la timo senigas nin je la kapableco nin defendi; kaj kiam ni ne povas nin defendi ni fariĝas la ludajo de politikaj kaj religiaj timigiloj.

Fino de la sesa ĉapitro.

EL "LA SIMPLA SAĜO DE PASTRO MESLIER" (1)

« Estas vasta imperio regata de monaĥo, kies konduto konvenas por konfuzi la spiriton de siaj regatoj. Li volas esti konata, karamata, respektata, obeata; sed li neniam sin montras, kaj ĉio konspiras por malfirmigi la ekkonojn, kiujn oni ekhavas eble koncerne lin. La popoloj subigitaj al lia potenco havas, pri la karaktero kaj leĝoj de tiu nevidebla suvereno, nur la ideojn al ili sugestitajn de liaj ministroj; ĉi-tiuj tamen konsentas, ke nenian imagaĵon ili havas pri sia estro, ke liaj planvojoj estas nepenetreblaj, ke liaj vidceloj kaj ecoj estas tute nekompreniblaj; cetere tiuj ministroj neniel akordiĝas inter si pri la ordonoj, kiujn ili pretendas elvenintaj el la suvereno, kies organoj ili sin diras; tiujn ordonojn ili anoncas malsame al ĉiu provinco de l' imperio. Ili senfamigas unuj la aliajn, kaj ili sin alnomas reciproke trompeguloj kaj falsistoj; la ediktoj kaj ordonaĵoj, kiujn ili komisiis al si leĝproklami estas malklaraj... La leĝoj de l' monaĥo kaŝita bezonas interpretantojn; sed kiuj ili klarigas, tiuj inter si ĉiam disputas pri la vera maniero ilin kompreni. Plie, ili ne akordas kun si mem; ĉio, kion ili rakontas pri sia prieco kaŝita, estas nur implikajaro de memkontraŭdiroj; ili ne diras pri li unu vorton, kiu tuje ne malkonfirmiĝas. Oni diras lin superege bona; tamen iu ne estas, kiu ne plendas pri liaj dekretoj. Oni supozas lin treege saĝa, kaj en lia administrado ĉio ŝajnas kontraŭi la racion kaj la natursaĝon. Oni gloras lian justecon, kaj la plej bonaj el liaj subuloj estas komune malplej favoritaj. Oni certigas, ke li ĉion vidas, kaj lia ĉeesto nenion rebonigas. Li estas, oni diras, amiko de l' ordo, kaj ĉio en liaj ŝtatoj estas en konfuzo kaj malordo. Li meme ĉion faras, kaj la okazaĵoj malofte respondas al liaj projektoj. Li ĉion antaŭvidas, sed nenion li kapablas antaŭzorgi. Li senpacience suferas, ke oni lin ofendas; kaj tamen li trafe povigas ĉiun por lin ofendi. Oni admiras lian scion, liajn perfektaĵojn en liaj verkoj; tamen tiuj verkoj, plenaj je malperfektaĵoj, estas mallonge daŭraj. Li estas konstante okupata fari kaj malfari, poste ripari, kion li faris, neniam havante kaŭzon por esti kontenta pri sia laboro. En ĉiuj liaj entreprenoj li nur celas sian propran gloron, kaj li ne sukcesas esti glorata. Li laboras nur al la komforto de siaj regatoj, kaj al liaj regatoj plej multe mankas necesajo. Kiujn li ŝajnas favori, tiuj estas ordinare la malplej kontentaj pri sia sorto; oni vidas ilin preskaŭ ĉiujn, ribelantaj eterne kontraŭ estro, kies grandecon ili ne ĉesas admiri, laŭdi saĝon, respektigi ordonojn, kiujn

(1) Verketo aperinta, kiam ateistoj nur kelkaj estis.

ili neniam obeas. *Tiu imperio, ĝi estas la mondo; la monaĥo, li estas Dio; liaj ministroj estas la pastroj; liaj regatoj estas la homoj.* »

Trad. M. BOUBOU.

Dio estas Malbono!

La unua devo de la saĝa kaj libera homo estas forpeli la ideon pri Dio el ĝia spirito kaj el ĝia konscienco; ĉar Dio, se ĝi ekzistas, estas esence malfavora al nia naturinklino, kaj ni neniel dependas de ĝia estreco. Ni atingas la sciencan malgraŭ ĝi, la komforton malgraŭ ĝi, la socion malgraŭ ĝi; ĉiu el niaj progresoj estas venko, en kiu ni subpremeas la Diaĵon.

Oni ne plu diru: « La vojoj al Dio estas nepenetreblaj! » Ni tiujn vojojn penetris, kaj sur ili ni legis, per signoj el sango skribitajn, la pruvojn de la senpotenco, se ne, de la malvolonto de Dio.

Mia saĝo, longe humiligita, altiĝas iom post iom al la nivelo de la senlimo; dum la kreskado de l' tempo mi fariĝos ĉiam malplie malfeliĉa laboristo, kaj per la konoj, kiujn mi estos akirinta, per la perfektigo de mia libereco, mi idealigos mian memecon, kaj fariĝos la estro de la kreitaro, la samrangulo de Dio. Nura momento de malordo, kiun la Ĉionpovanto estus povinta malebligi, kaj kiun ĝi ne malebligis, kulpigas ĝian Providencon, kaj vanigas ĝian saĝon. La plej malgranda progreso, kiun la homo malklera, forlasita, perfidita, elfaras al Bono, ĝin honorigas senmezure. Laŭ kiu rajto Dio al mi dirus ankoraŭ: « Estu sankta, ĉar sankta mi estas! » — « Spirito mensogema, mi al ĝi respondus, Dio stulta, via reĝado finiĝis. Mi scias ke mi ne estas, nek povos iam fariĝi sankta; kaj kiel tia vi estus, vi, se mi vin similas? Serĉu ĉe la bestoj aliajn viktimojn. Patro Eternulo, Jupiter aŭ Jehovah, ni lernis vin koni; vi estas, vi estis, vi estos por ĉiam la ĵaluzulo de Adam, la tirano de Prometeo. »

Do mi ne falas en la sofismon refutitan de Sankta Petro, kiam li malpermesas ke la vazo diru al la potisto: « Kial vi fabrikis min tia? » Mi ne riproĉas la Aŭtoron de l' ekzistaĵoj, ke ĝi faris el mi kreaĵon senharmonian, seninterligan kunmetaĵon: nur tiukondiĉe mi estis ekzistebla. Mi nur simple al ĝi krias: « Kial vi trompas min? Kial, per via silento, vi incitegis en mi egoismon? Kial vi subigis min al la torturo de l' universa dubo, per la maldolĉa iluzio de l' antagonistaj ideoj, kiujn vi lokis en mian intelekton? Dubo pri la vero, dubo pri la justeco, dubo pri mia konscienco kaj mia libereco, dubo pri vi-mem, ho Dio! kaj konsekvence de tiu dubo, necesigo de la batalado kontraŭ vi-mem kaj kontraŭ mia samulo. Jen, superega Patro, kion vi

faris por nia feliĉo kaj por via gloro; jen kiaj estis, laŭprincipe, via volo kaj via regado; jen la pano, el sango kaj larmoj knedita, per kiu vi nin nutris. La kulpojn, kies pardonon ni petas de vi, vi, ilin pekigis al ni; la insidojn, el kiuj ni petegas ke vi nin liberigu, vi, ilin preparis; kaj la Satano, kiu persekutas nin, tiu Satano, ĝi estas vi!

Vi triumfadis kaj neniuj aŭdacis vin kontraŭdiri, kiam, turmentinte korpe kaj anime la justan Job'on, figuro de nia homaro, vi insultis al lia naiva pieco, al lia diskreta kaj respektema malklereco. Ni estadis kvazaŭ neniaĵoj antaŭ via majesto nevidebla, al kiu ni difinis la Ĉielon kiel baldakenon kaj la Teron kiel skabelon. Kaj nun jen vi estas eltronigita! Via nomo, tiel longe la lasta konkludvorto de la scienculo, la sankcio de l' juĝisto, la potenco de l' princo, la espero de l' malfeliĉulo, la rifuĝo de l' kulpulo pentanta, nu, tiu nomo nedirinda, de nun dediĉata al la malestimo kaj al la anatemo, estos mokata ĉe la homoj. Ĉar Dio estas *malsaĝo* kaj *malkuraĝo*, Dio estas *hipokriteco* kaj *mensogo*, Dio estas *tiraneco* kaj *mizero*; Dio estas *malbono*! Tiom longe, kiom la homaro kliniĝos antaŭ altaro, la homaro, sklava al reĝoj kaj pastroj, estos malaprobata; kiom longe homo, je la nomo de Dio, ricevos ĵuron de alia homo, tiom longe la socio estos bazita sur la ĵurrompo; paco kaj amo estos forpelitaj el la mortemuloj. Dio! iru for! ĉar de hodiaŭ, liberigate el la timo kaj saĝiĝinte, mi ĵuras, kun mano etendata al la ĉielo, ke vi nur estas la turmentanto de mia saĝo, la fantomo de mia konscienco... »

Dio ja sciis, laŭ la deistoj mem, de la tuta eterneco, ĉar, post ses miljaroj de doloriga spertado, ni, mortemuloj, tion eltrovis, ke la ordo en la socio, tio estas libereco, riĉeco, scienco, efektivigas per la interkonsentigo de kontraŭaj ideoj, kiuj, konsiderataj aparte kiel absolutaj, estis nin faligontaj en abismon de mizero. Kial ĝi ne nin autau-avertis? Kial ĝi nin allasis al nia neperfekta logiko? Ĝi ja sciis ke, fordonante nin al la hazardaĵoj de la spertado, ni nur tre malfrue trovus tiun senriskecon de l' vivo, kiu instigas nian feliĉon; kial ĝi ne mallongigis tiun longan lernadon? Dio, kiun la kredo prezentigas kiel molkoran patron kaj prudentan mastron, fordonas nin al la fataleco de niaj nekompletaj komprenoj; ĝi fosas la kavon sub niaj piedoj, ĝi kondukas nin kiel blindulojn, kaj poste, ĉe ĉiu falo, punas nin kiel krimulaĉojn. Kion mi diras? Ŝajne estas ke, fine tute kontuzitaj de l' vojaĝo, ni rekonas nian vojon.

Trad. M. BOUBOU.

PROUDHON.

Por la Pariza Kunveno

Sendu proponojn kaj temojn por la tagordo de la laboraj kunsidoj.

PENSOJ KAJ MAKSIMOJ

kolektitaj kaj tradukitaj de la ESPERANTA KLUBO de MELILLA (Hispanujo)
por la gazeto *Libera Penso*

La saĝulo estas mastro de siaj pasioj; la malsaĝulo estas ilia sklavo.

Semu faron, kaj vi rikoltos kutimon; semu kutimon kaj vi rikoltos karakteron; semu karakteron, kaj vi rikoltos sukceson.

La feliĉeco konsistas nur en ĝia trankvila esperado.

BRAHAMA.

La virto afabla, simpla, modesta, venkas ĉion.

FÉNELON.

La homo estas tia, kian li faras sin mem.

MAHOMET.

Aligoj en Aprilo 1914

S-ro HIACINTO FIGUERAS Y ROSIÑOL, 30, Carrer nau, Terrassa, Hispanujo.

S-ro V. CIMR, Echenoz près Vesoul, Francujo.

S-ro Prof. ESTANISLAV BORECKI, Caixa postal, 83, Ponta Grossa (Parana), Brazilujo.

S-ro MARCEL BOUBOU, Beaugency (Loiret), Francujo.

S-ino TURNEAVA BELIKOVA, Oficerskaja ul. Efremovoj, Smolensk, Rusujo.

S-ro POWADOWSKI, Proszowice, gub. Kielce, Polujo-Rusujo.

Eksigaj (nekotizadis): Orsatti, Vich, Kerr, Crow, Davis, Colson, Hamand, Klajin, Grotte, Safar, Zednik, Eisner, Toldt, Meulen, Nuidant, Hamburger, Bruyn, Sandecki.

Nun 175 membroj.

Kaso en Aprilo 1914

Reportite	Fr. 489,75
<i>Enspezoj</i> :	
Kotizaĵo 1914 de Cimr	2,»»
— — Boubou	2,50
— — Powadowski per Presa Soc.	2,»»
— — Stromboli	2,50
— — S-ino Tournaeva Belikova ..	2,40
— 1913-14 Lecat, kun poŝtelspezoj ...	5,30
— — L. Beuve kaj E. Beuve — ...	10,65
— — Bouvier — ...	5,30
— — Fromageot — ...	5,30
— 1912-14 Laisant — ...	7,80
— 1912-13 Bergmann	5,15
— 1913 Doyle	2,55
— — F-ino Saunders	2,55
— 1914 Sigel	5,15
Sume	548,40
<i>Elspezoj</i> :	
Poŝtmarkoj	11,50
Kotizaĵo al la Internacia Federacio Bruselo.	10,25
Broŝuro de la Federacio	0,25
Preso de bultenoj marta kaj aprila (duobla).	75,»»
Sume	97,»»
Restas en kaso	Fr. 451,40

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 SM (FR. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALIĜOJN KAJ KOTIZAĜOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. F. MORTON, Jr. 62, Vesey st. New-York.

En Anglujo, S-ro HARRY SHAW, Fernleigh villa, Leabrooks, Alfreton (Derbyshire).

En Belgujo, S-ro FRANS SCHOofs, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio, Cordoba, Prezidanto.

En Aŭstrio kaj Germanujo, S-ro TYL, 57, Olomoucka, Prostejov, Aŭstrio-Moravio.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 53, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

NOVA KATEKISMO

TRADUKITA DE HARRY SHAW (ANGLUJO)

ĈAPITRO SEPA

JESUO

1. DEMANDO. — Kion precipe oni kredas pri Jesuo?
RESPONDO. — Ke li estis Dio kaj filo de Dio.
2. D. — Kaj plue?
R. — Ke li estis homo same kiel ni.
3. D. — Ĉu li estis kaj dio kaj homo?
R. — Tia estas la populara kredo.
4. D. — Kiaj estas la pruvoj de lia dieco?
R. — Estas dirata ke la Sankta Spirito naskigis lin; ke li estis senpeka; ke li faris miraklojn kaj ke li sin proklamis egalulo kun dio.
5. D. — Kiom valoras tiuj pretendoj?
R. — Kiel pruvoj, neniom.
6. D. — Kial ne?
R. — Rilate al la « Senmakula Gravediĝo » ni povas diri ke, pri Jesuo kiel « miraklo » ni povas havi nenian ajn opinion.
7. D. — Sed, ĉu oni povis malhelpi ke la homoj kredu en lia mirakla naskiĝo?
R. — Ne, ĉar la homoj kutime kredas sen ia rilato al la pruvoj.
8. D. — Kiel oni nomas tian kredon?
R. — Kredemo.
9. D. — Kiel la kleruloj diferencas de la malkleruloj rilate tion?
R. — La kleruloj kredas laŭ la pruvoj.
10. D. — Kion pri la mirakloj de Jesuo?
R. — Ĉar ni mem ne vidis liajn miraklojn, ili ne povas esti tiel gravaj por ni, kiel por tiuj kiuj laŭdire estis okulvidintoj.

11. D. — Daŭrigu la argumenton.
R. — Pro tio ke el tiuj, kiuj, laŭdire, vidis la miraklojn, nur malmultaj opiniis ke ili estis konvinkaj — ĉar multaj ŝanceliĝis kaj postulis pli da signoj — ni, kiuj tute ne ilin vidis, pravigu opinionante tiel same pri la mirakloj en la vivo de Jesuo, kiel pri tiuj en la vivo de Buddha, de Moseo kaj de Mahometo.
12. D. — Daŭre klarigu.
R. — Ne diskutante pri mirakloj, laŭgenerale, oni povus diri ke ĉar ili estas alvoko al la sentoj de la ĉeestantoj, estas necese montri unue, ke iliaj sentoj ilin ne trompis, kaj due ke ilia atesto estas neerarema, antaŭ ol ni povas ilin akcepti kiel konstatitaj.
13. D. — Ni havas, do, nur la dirojn de homoj ke Jesuo faris miraklojn?
R. — Jes.
14. D. — Se homo pretendante esti dio levus la mortintojn antaŭ *niaj* okuloj, ĉu tio ne pruvus lian pretendon?
R. — Certe ne.
15. D. — Kial?
R. — Ĉar, eĉ se li kreus en nia kunesto novan mondon, li farus nur malmultajn aferojn kiujn ni mem ne povas fari. Pro tio ke viro povas levi la mortintojn k. c. tio ne montras ke li kapablas ĉion fari.
16. D. — Kion li devus fari por pruvi ke li estas dio?
R. — *Ĉion!* Sed sendispute neniu homo povas doni pruvon ke li ĉion kapablas.
17. D. — Tial?
R. — Neniu homo povas pruvi ke li estas dio.
18. D. — Kia estas la plej forta argumento kontraŭ mirakloj kiel pruvoj de dieco?

- R. — La fakto ke, laŭkredo, mirakloj estis faritaj de la diablo kaj liaj agentoj.
(En ĉiuj religiaj skriboj troviĝas rakontoj atribuantaj supernaturajn fortojn al la diablo kaj liaj agentoj; la Egiptaj Magiistoj konkuris kontraŭ Moseo kaj Simon Magus kontraŭ la Apostoloj en la farado de mirakloj).
19. D. — Ĉu Jesuo konsentis ke aliaj krom li kapablis fari miraklojn?
R. — Jes. Ĉar li diris: « Se per Beelzebubo mi forpelas diablojn, per kiu *viaj filoj ilin forpelas?* »
20. D. — Ĉu iam estis religio kiu ne pretendis esti ebla fari miraklojn?
R. — Ni ne konas tian.
21. D. — Kion pri la pretendo, ke Jesuo estis « senpeka »?
R. — « Kaj la infano kreskis kaj spirite plifortikiĝis », diras la Evangeliisto. Se Jesuo pliboniĝis dum li plimaljuniĝis, li ne povis esti perfekta de sia naskiĝo.
22. D. — Parolu al mi pri la viro Jesuo — kiam li naskiĝis kaj kie?
R. — Li naskiĝis en Palestino antaŭ ĉirkaŭ du mil jaroj.
23. D. — Ĉu la tiamaj verkistoj skribis pri Jesuo kaj liaj faroj?
R. — Nenia grava aludo al Jesuo troviĝas ekster la Nova Testamento, kvankam Seneca, Ovidius, Epictetus, Josephus, Philo, Plinius, Tacitus, Juvenalis kaj Quintilianus estis tiamuloj de la tiel dirita savonto kaj liaj apostoloj.
24. D. — Kion tio signifas?
R. — Aŭ li estis rigardita kiel persono tro sensignifa por priskribo, aŭ li estis tute ne konita de tiuj verkistoj.
25. D. — Kia estas la historio pri li en Nova Testamento?
R. — Ke li faris multajn bonajn kaj mirindajn agojn: ke oni arestis kaj juĝis lin pro tio ke li sin nomis « Reĝo de la Judoj » kaj « Filo de Dio »; ke li estis kondamnita kaj krucumita kaj ke li releviĝis el la mortintoj.
26. D. — Kaj plue?
R. — Ke li sin montris post la releviĝo al siaj disĉiploj kaj poste li supreniris sur la nuboj en la ĉielon.
27. D. — Kiom longe Jesuo vivis sur la tero?
R. — Dum tridek tri ĝis kvindek jaroj laŭ la tradicio aŭ laŭ la Evangelioj.
(En la unua Eklezio, estis tradicio ke Jesuo atingis la aĝon de kvindek jaroj).
28. D. — Ĉu lia publika kariero estis longdaŭra?
R. — Ne, kredeble lia publika irado daŭris dum iom pli ol unu jaro, kvankam laŭ la Apostolo Johano ĝi ŝajne daŭris tri kaj duono jarojn.

29. D. — Ĉu Jesuo havis infanojn?
R. — Li ne estis edzo.
30. D. — Ĉu li havis gefratojn?
R. — Jes, li estis unu el granda familio de infanoj.
31. D. — Ĉu ĉiuj anoj de lia familio kredis en li?
R. — Ne ĉiuj.
32. D. — Ĉu antaŭ aŭ post Jesuo troviĝas aliaj diecaj pretendantoj kaj mirakloj-farantoj?
R. — Jes, multaj. Centoj da jaroj antaŭ la naskiĝo de Jesuo, oni adoris Gaŭtama'n, la Buddha, kiel la « senpekulo ». Oni kredis ke li naskiĝis sen patro kaj ke li faris miraklojn. Ankaŭ la sama estis dirata pri Serafis Apolonias kaj pri multaj aliaj.
33. D. — Ĉu ĉi-tiuj ankaŭ havas sekvantaron?
R. — Jes: ankaŭ templojn kaj altarojn ĝis ĉi-tiu tago.
34. D. — Ĉu ili ĉiuj estis trompuloj?
R. — Ne, preskaŭ ĉiuj sin kredis difavore elektitaj por instrui aŭ por regi la homojn.
35. D. — Ĉu ilia sincereco pravigas ĉion de ili instruitan?
R. — Ne. La sincereco ne povas ŝanĝi la grenventumilajon en grenon.
36. D. — Kiel ni devas konduki rilate ĉi-tiujn malnovajn instruistojn?
R. — Ni devas esti dankaj pro iliaj servoj kaj honeste kritiki iliajn erarojn.

Fino de la sepa ĉapitro.

El verko de E. M. Meunier

Ni tradukas tie-ĉi parton de la verko pri la aviado de nia mortinta societano E. M. Meunier; ĝin komunikis al ni manuskripte lia fidela kaj sindona frato, Fino Marie Meunier, ĉiama membro de *Libera Penso*. Ni elektis paĝojn plej ĝenerale filozofiajn.

TRADICIO KAJ VORTOJ

Se oni efektive dezirus doni en ĉiuj studoj al la metodoj uzitaj de Lamark kaj Darwin en iliaj natursciencaj esploroj la lokon konvenan, tio estas ĉefhonoran lokon, oni devus unue en la kutima lingvo, starigita de niaj antaŭuloj sub tradiciaj, plej ofte mistikaj influoj, anstataŭi ĉiujn malklarajn terminojn kaj ĉiujn memkontraŭajn kaj ambaŭ-sencajn esprimojn, kiuj daŭrigas de generacio al generacio per sia senĉesa ripetado en la spirito de la homoj la regnon de la malveraj kaj de la antaŭpensitaj ideoj kun ĝia akompano de antaŭjuĝoj teologiaj, sciencaj, politikaj, klasaj, k. t. p.; ĉiuj bazitaj preskaŭ ĉiam sur la imago kaj la mal-realo, kaj ĉiuj ĉiam defenditaj kun ĵaluza zorgo

de la amantoj de l' tradicio, kaj pluekzistantaj nuntempe en la spirito de kelkaj inter ili nur per la potenco de la vortoj.

Tiel la kutima lingvo fariĝas la plej bona ilo por reakcio; tiel per vortoj oni pludaŭrigas ĉiujn erarojn malgraŭ la scienco kaj ĝiaj eltrovoj; tiel naskiĝas kaj renaskiĝas ĉiuj spekulativaj teorioj, ĉiuj antaŭpensitaj ideoj, ĉiuj superstiĉoj, ĉiuj antaŭjuĝoj, kiuj embarasas eĉ la plej naturriĉajn inteligentojn; tiel kreskas ĉiuj ideoj falsaj, supernaturaj, nekomprenblaj, nepruveblaj, kiuj siavice nepre naskas, kun la persisto de la nuna socio, la superemon, kastemon, regemon; kiu ĉiam malakcelos en ĉiuj aferoj, ekonomiaj, politikaj, sciencaj, la supreniradon de l' progreso.

Tiel, se ni rigardas en meĥaniko *sub la vesto*, ni ekvidas seriegon da vortoj aŭ vortligoj, kiuj odoras memkontraŭdiron kaj metafizikan devenon, kiel ekzemple: forto, inertforto aŭ inerto, centraj fortoj, la principo pri egaleco de ago kaj reago, maso...

Generale, en meĥaniko, kaj en iaj traktatoj, oni konsideras la forton kiel kaŭzon de movo. Sed efektive oni povas difini la forton nur kiam oni konas la rapidecon de l' movo, tiel ke estas eble koni la forton nur si oni konas la movon! Sed ĉar la fortoj reale estas, laŭ la esprimo de d'Alembert, « malklaraj kaj metafizikaj estajoj » tio estas estajoj imagaj kaj malrealaj, restas nur, se oni volas vidi la aferojn tiaj, kiaj ili estas, kaj logike rezoni trompante nenium, konsideri movojn, ne fortojn: ĉar la fortoj ekzistas nur en la fantazio de la metafizikistoj kaj skolastikistoj, kiuj por sia persona kontentigo aŭ por la bezonoj de teologiaj doktrinoj preferas malrealon ol veron.

De tio naskiĝis, sub influo de la prapatra tradicio, la kredo al la unueco de l' naturo kaj al la ekzisto de naturaj fortoj, mondregaj fortoj, kiuj ĉiam estos sinonimaj kun naturaj leĝoj por tiuj, kiuj ebriiĝas per grandaj vortoj, kaj penas subteni la konstruaĵon de la antikvaj kredoj, starigitaj de la homo je la tempo, kiam li bezonis doni al si mastron...

Cetere ni tuj vidos, ke la forto estas ja malreala estajo, elpensita de personoj kiuj penas kaj plu longatempe penos igi nin multe kredi neniam ion sciante, pro utilo al ilia afero, kiu bezonas kompreneble esti ĉiam kaj senĉese defendata. Efektive oni povas almeti al sistemo de fortoj, ekzemple moviĝantaj, alian ekvivalentan sistemon ne ŝanĝante la movon. Tiel oni povos ne modifante la movon, duobligi, triobligi, k. t. p. ĉiujn fortojn, aŭ ilin duonigi, trionigi, k. t. p. ne difektante la rapidecon. Ĉiuj tiuj sistemoj estas ekvivalentaj. Ili do estas ja fantaziaj sistemoj, kiel ĉiuj sistemoj, kio ebligas al ni jongli kun la fortoj. Vi ĵus vidis ĝin, tio ne estas malfacila. Tio senpene fariĝas. Iom da fantazio sufiĉas.

KURAGIGO

Por fari grandajn agojn, por plibonigi kaj pliperfektigi la homojn, por atingi plimulte da justeco, da frateco, da solidareco, la socioj devas do unuavice per ĉiuj eblaj rimedoj, atenti por malhelpi la servuton de l' inteligentoj, kiu produktas nur malkapablulojn, kaj por instrui la homojn ami nur la veron, sin ligi al la scienco kaj la naturo, por sciigi al ili, ke oni povas fari nenion utilan ne sin apogante sur la naturaj leĝoj, kaj ke ĉio, kion la homo faris aŭ faros, povis aŭ povos esti akirita nur per peno kaj laboro, havante kiel bazon kaj gvidilon la naturleĝojn.

Kial iluziigi per ideoj, kiuj eble neniam realiĝos, diros iuj! Kial sin okupi je aferoj, kiujn certe ne vidos la nunaj generacioj? Kaj kial prediki la fratecon de l' popoloj, kiam estas tiel malfacile akordigi du homojn?

Kial? Simple ja tial ke ni devas fidi nur nin mem, kaj ke en ĉiuj aferoj necese estas persisti, memorante ke nenio riceviĝas sen peno.

Tial ke oni devas rigardi la estonton, ne la estinton. Tial ke tio faras unu voĉon plie, kaj esprimante tiujn pensojn, ni volas simple fari nian devon de pacifistoj, ne kontentigi la tro potencajn kaj tro famajn partianojn de l' estinto.

Tial oni devas direkti al la bona vojo tiujn, kiuj ne estas sur ĝi, tial ke oni devas ami kaj subteni la ideojn ĝustajn kaj noblajn, kiuj solaj estas defendindaj, kaj precipe tial ke oni devas komprenigi al ĉiuj, ke la estonto ne apartenas al fantaziaj estajoj, sed nur al la homo.

Kiaj tial oni devas ekvidigi al la popoloj, ke la ĉies utilo ne estas sin lasi dividi aŭ sin lasi aljeti unuj kontraŭ aliaj, sed ilin unuigi en neatakeblan grupon; ke la celo ne estas malgrandigi, sed pligrandigi.

Kaj tial ke oni ne devas revu buĉigi je centmiloj homojn faritajn por sin interkompreni kaj interami, ne malami. La milito disigas la homojn: la Scienco kaj la Racio alproksimigas ilin.

PENSOJ KAJ MAKSIMOJ

kollektitaj kaj tradukitaj de la ESPERANTA KLUBO de MELILLA (Hispanujo)
por la gazeto *Libera Penso*

La ŝparemo estas la gajno plej certa. (SYRUS.)

Esti malhumila estas la pleneco de la nescio. (FONTENELLE.)

Malklerulo estas sklavo. (CONDORCET.)

La riĉulo, kiu ne rigardas la malriĉulojn kiel kreditorojn, estas krimulo. (BUDA.)

La vero estas torĉo, kiu bruligas ofte la manon, kiu ĝin subtenas. (ROUSSEAU.)

Unu gramo da malmodesteco perdigas unu kilogramon da merito. (SEGUR.)

Serĉu vian bonon en la ĉies bono.

La biblioteko estas la sanktejo de la estonto. (BAYON.)

Manĝi kaj trinki estas vegeti; vivi estas pensi kaj ami. (PLATONO.)

Se vi havas dolĉan voĉon kaj manon kareseman, per unu fadeneto vi kondukos elefanton. (*Proverbo hinda.*)

La nacioj, kiuj havas malmulte da klereco, ĉiam havas sufiĉe da religio por malami unu la alian, sed ne sufiĉe da boneco por ami sin reciproke.

Pano tranĉita ne havas mastron. (MAHOMET.)

Estas hontige tuŝfaleti dufoje kontraŭ la sama ŝtono.

Se vi ne kunportas la gajecon, vi ĝin ne trovos eĉ en la ĉielo.

Ĉiu fanatikeco dividas la homojn, nur la vero povas ilin kunigi. (ANNIE BESANT.)

Se vi trompas min unufoje, vi estas kulpa; dufoje, estas kulpaj ambaŭ ni; se trifoje, estas kulpa mi sola.

Kiu trouzas ĉion, baldaŭ povos uzi nenion. (ROUSSEAU.)

La indulgo estas filo de la scio; tial la plej mal-kleruloj estas la malplej indulgemaj. (D'HOLBACH.)

Se vi dubas, silentu. (ZOROASTRO.)

Kiu timas ion suferi, jam suferas tion, kion li timas. (MONTAIGNE.)

Se la malbonuloj konus la ĝuojn de la bonuloj, ili estus bonaj pro egoismo. (FRANKLIN.)

La penso iru ĉiam antaŭ la faro. (PITAGORO.)

Ne ekzistas ŝarĝo pli peza ol virino de malpeza kapo. (PALACIO.)

Apud bona virino la suferoj duoniĝas, kaj la plezuroj duobliĝas. (SEVERO CATALINA.)

Talenta homo serĉas la sciadon; la pedanto kredas posedi ĝin. (NAPOLEONO.)

Se prave oni diras malbonaĵon pri vi, korektiĝu; se malprave, ridu. (EPIKTETO.)

Feliĉa estas la homo kiu scias trovi la feliĉon en sia propra virto. (FÉNELON.)

La virino bona estas la dimanĉo de la bona laboristo. (PABLO IGLESIAS.)

La sciado estas moderigilo por la junuloj, konsolo por la maljuneco, ornamo por la riĉuloj, mono por la malriĉuloj, kaj fonto de feliĉo kaj bono por ĉiuj. (DIOGENES.)

Ĉio kion vi havas manĝinte, apartenas al alia. (BUDA.)

La feliĉo estas maskito, kiun ni konas nur kiam ĝi estas pasinta. (VICTOR HUGO.)

Kiam oni studas geografion, kiom granda ŝajnas la mondo! Kaj kiam oni studas astronomion, kiom malgranda ĝi ŝajnas! (LAPLACE.)

LA LIBERPENSAJ ORGANIZAJĴOJ en la Mondo

LA INTERNACIA FEDERACIO

Tutmonda raciista Federacio, fondita en Bruselo, 29-an de aŭgusto 1880. — Prezidanto de la Ĝenerala Konsilantaro: Sro G. Degreef, rektoro de la Nova Universitato, Bruselo, Belg. Ĝenerala Sekretario de la Konstanta Komitato: Sro Eŭg. Hins, 350, Chaussée de Boendael, Bruselo.

Ĉiu nacia federacio havas delegiton en la Ĝenerala Konsilantaro. Kongreso okazas almenaŭ dujare.

NACIAJ ORGANIZAJĴOJ

ANGLUJO

The British Secular League. — Prez., R. Johnson; Sek., J. W. Gott. Organo: *Truth Seeker* (61, Dorset Street, Bradford).

The International Union of Ethical Societies. — Sek., G. Spiller (South Hill Park, Hampstead, London).

The National Secular Society. — Prez., G. W. Foote; Sek., Miss E. Vance. Organo: *The Freethinker* (Newcastle Street, 2, Farringdon Street, London E. C.)

The Rationalist Peace Society. — Hon. prez., Mrs Bradlaugh-Bonner; Sek., Edward G. Smith (38, Cursitor street, London E. C.)

The Rationalist Press Association. — Sek., Charles Gorham. Organo: *The Literary Guide* (17, Johnson court, Fleet Street, London E. C.)

The Secular Education League. — Prez., Halley Stewart; Sek., Harry Snell.

ARGENTINA RESPUBLIKO

Nacia Ligo de la Libera Penso. — Prez., Dro Ed. Holmberg; Sek., Francisko Gicca. Organo: *El Progreso* (Lacarra, 69, Buenos Aires). Gazeto de la Feminista Societo: *La Mujer* (Dona Maria Arabella Ramirez, La Plata).

AŬSTRIO

Ĝenerala sek. le Aŭstria Germanlingva Liberpensularo, Josef Bernhard (Wimbergergasse, 44, Wien VII), redaktoro de l' organo *Der Freidenker*.

Federacio de la Liberpensuloj en Suba Aŭstrio. — Prez., Ludwig Wutschel (Niederhof strasse, 19, Wien XII).

Germana Federacio en Bohemujo. — Prez., Wenzel Gierschik (Mozart Gasse, 37, Gablonz).

Germana Federacio en Moravio. — Prez., Alois Skuhrawy (Neustadterstrasse, 27, Sternberg).

Germana Liberpensularo en Prag. — Prez., Ludwig Riess (Meiselgasse, 4, Prag I).

Itala Liberpensularo en Triest. — Sek., Umberto Cosetti (Via Barriera Vecchia, 14, I).

Societo por la Bruligo de Mortintoj, *Die Flamme*. — Sek., Paul Klauwnen (Siebensterngasse, 16 a, Wien 2).

Komitato Konfessionslos. — Sek., Josef Bern.

BELGUJO

Nacia Federacio. — Ĝenerala sek., Lucien Vertongen (125, Avenue de Solbosch, Ixelles).

Raciista Orfejo. — Direktorino, Sino Mulle (346, Chaussée d'Alsemberg, Forest-lès-Bruxelles).

GAZETOJ :

La Pensée. Red. Eug. Hins (350, Chaussée de Boendael, Bruxelles).

De Rede, organo de la Flandra Federacio. Red., A. Bogaerts (14, Smisstraat, Gand).

De Tribuun, organo de l' Solidaruloj en Antwerpen. Red., Jan Uijtenbroek, 20, Van Immerseelstraat.

Voorwaerts. Red., Van Brussel (50, rue du Canal, Louvain).

Minerva, monata revuo. Red., Léod Legavre (77, Avenue Alberd Girauld, Schaerbeek).

TEATRAJ SOCIETOJ :

La Popolaj Raciistaj Vesperoj. — Sek. J.-B. Robson (1, Montagne des Géants),

Les X de Schaerbeek. — Prez., J. Fraikin, 60, rue Rubens).

BOHEMUJO

Bohema Federacio. — Prez., Julius Myslik. Sek., Dro Bartosek (Kral Vinohbrady, Palaskeho trida, 35, Praha).

Organoj : *Nerbuda*; *Havlicek*; *Volna Myslenka* (Myslikova ul. 15, Praha II).

BRAZILUJO

Antiklerikala Brazila Ligo. — Sek., Carlos Aüg. de Lacerda (Avenida Maréchal Floriano Peixoto, 118, Rio de Janeiro). Organo : *A Lanterna*; Red., Edgard Leuenroth (Largo da Sé, n. 5, Sobrado, San Paulo).

ĈILIO

Organo : *El Radical*. Red., Aüg. Venturino (Casilla 934, Santiago).

FILIPINAJ INSULOJ

Los Hijos de la Verdad. — Organo : *Luz* (Apartado 145, Manila).

FRANCUJO

Federacia Unuiĝo de la Franca Liberpensularo. — Generala sek., Edmond Bazire (9, rue des Capucins, Rouen).

En ĝi : Asocio de l' Francaj Liberpensuloj. — Prez., A. Schleicher (8, rue Monsieur le Prince, Paris).

Unuiĝo de la Civitaj Rondoĵoj (Cercles Civiques). — Prez., A. Berthelot. Sek., Victor Charbonel (69, boulevard Saint-Michel, Paris). Organo : *La Raison* (49, boulevard Saint-Michel, Paris).

Œuvre des Patronages Laïques de France (37, rue Radziwill, Paris).

GAZETOJ :

Le Flambeau. Red., Ch. Beauquier (42, rue Battant, Bezançon).

Le Libre-Penseur de France. Dir., E. Noel (1, rue Blanc Léger, Limoges).

Annales des Fêtes et Cérémonies civiles. Dir., E. Bernard Leroy (15, rue Miromesnil, Paris).

Le Radical (142, rue Montmartre, Paris).

La Lanterne (24, boulevard Poissonnière, Paris).

GERMANUJO

Federacio de l' Germanaj Liberpensuloj. Sidejo : Stuttgart. — Prez., G. Tschirn. Sek., Peter Schmal

(88, Barerstrasse, München). Organo : *Der Freidenker*; red., Bruno Wille (Friedrichshaegen, Berlin).

Federacio de la Liberaj Religiaj Societoj. Sidejo : München. — Prez., G. Tschirn. Sek., Peter Schmal. Organo : *Die Geistesfreiheit*; red., E. Vogtherr (1, Harburgsweg, Wernigerode).

Centra Unuiĝo de la Germanaj Proletariaj Liberpensuloj. Sidejo : Dresden. — Prez., Bernhard Menke (14, Klopstockstrasse, Dresden). Organo : *Der Atheist*; red., K. Beisswanger (Nuremberg).

Komitato Konfessionlos. Sidejo : Berlin. — Prez., Prof. A. Drews (Karlsruhe). Sek. Otto Lehmann (30, Regensburgerstrasse, Berlin). Organo : *Der Weg*; red., Dro G. Zepler (Freidrichsstrasse, 143, Charlottenburg).

Germana Monista Federacio. — Prez., Wilhelm Ostwald. Sek., Dro Aigner (Weinstrasse, 8, München). Organo : *Das Monistische Jahrhundert*; dir. W. Ostwald.

Germana Societo por Etika Kulturo, kaj Germana Federacio por la laika lernejo kaj la moralinstruado. Ambaŭ prez. Ruldolf Penzig (Uhlandstrasse, 169, Charlottenburg). Sek., Lilli Jannasch (Tauenzienstrasse, 9, Berlin). Organo : *Ethische Kultur*; red., Penzig.

Weimar-Kartelo. — Prez., Prof. Heinrich Rürsler. Sek., Max Henning, redaktoro de *Das Freie Wort* kaj *Der Dissident*, (Senckenbergstrasse, 5, Frankfurt a. M.).

HISPANUJO

Hispana Antiklerikala Ligo. — Prez., Prof. Miguel Morayta (16, Pozas, Madrid).

Instruista Raciista Asocio (Casa del Pueblo, Piamonte, 2, Madrid).

GAZETOJ :

El Motin. Red., J. Nakens (Calle Alberto Aguilera, 152, Madrid).

El Pais.

HUNGARUJO

Hungara Unuiĝo de Libera Penso. — Ĝenerala sek., Dro Polanyi Karoly (Vaczi-Körut, 31, Budapest). Organo : *Szabad-Gondolat*.

Societo de l' Pioniroj. — Sek., Dro Samuel Fenyes.

ITALUJO

Nacia Asocio. — Prez., Prof. Giulio Provenzal. Organo : *Bulletino Offiziale del Libera Pensiero*.

Asocio Giordano Bruno. — Sek., A. Reggiani (via di Porta Angelica, 25, Roma).

Gazeto : *L'Azino*. Red., Guido Podrecca (132, via del Tritone, Roma).

JAPANUJO

Sekcio de Rationalist Press Association.

Korespondanto de la Konstanta Komitato de la Internacia Federacio : Yoshiro Oyama (Nakamura Cho 1407, Yokohama).

LUKSEMBURGO

Luksemburga Liberpensulo. — Prez., Aloys Kayser. Sek., Charles Thomas (9, Allée Scheffer, Limpertsberg).

Gazeto : *Der Volksbote*; red., Jean Gusenburger (Michel Rodange Avenue, Luxemburg).

MADAGASKAR

Raciista Societo « La Mutuelle des Arts Laïques ». — Organo : *Ny Masoandro* (rue Augey-Dufresne, 34, Ambatovinaki, Tananarive).

NEDERLANDO

Federacio Dageraad (Aüroro). — Prez., W. Hayers. Sek., J.-G. Götz (Veerstraat, 36, II, Amsterdam).

GAZETOJ :

De Dageraad. Red., J. Van Loo (2, Oude Leliestrat, Amsterdam).

De Vrije Gedachte. Red., J. Cuijpers (106, Nassaukade, Amsterdam).

De Vrijdenker (Nieuwendijk, 103, boyen, Amsterdam).

NORVEGUJO

Norvega Federacio. — Prez., Strom Larsen (Bergen). Sek., Arnfred Olesen (Folkethùs, Bergen). Organo : *Fritaenkeren*.

NOVZELANDO

Novzelandia Raciista Asocio. — Sek., Henri G. Hornibrook (103, Kilmare st Christchurch). Organo : *El Examiner*; red., W.-W. Collins (P. O. Box, 262, Christchurch).

PARAGUAJO

Centro de sociaj studoj Rafael Barret (Casilla de Correos, 574, Asuncion).

PERUO

Korespondanto de la Internacia Federacio : Christian Dam (Espaderos, 544, Lima).
Gazeto : *La Razon* (Apartado, 66, Trujillo).

POLUJO

Gazeto : *Mysl Niepodlegla*; red., Andrzej Niemojewski (48, Marszalkowska, Varsovio).

PORTUGALUJO

Federacio de la Liberpensaj Asocioj. — Prez., Magalhaès Lima (92, rua do Mondo, Lisbono). Sek., Aug. José Vieira (Calçado de Marquez de Tancos, 2, Lisbono). Organo : *O Livre Pensamento* (Largo do Intendente, 45, I, Lisbono).

Asocio de l' civila Registro. — Prez., Gonçalves Neves.

PUERTO RICO

Gazeto : *Conciencia Libre* (P. O. Box, 120, Ponce).

RUMANUJO

Scienca Asocio de pozitiva edukado. — Organo : *Ratiunea*; red., C.-J. Dicescu (Calea Mosilor, 78, Bucarest). Societo de pozitivista kulturo (Jassy).

SERBUJO

Sekretario de la Liberpensularo : Dro Skerlitch, deputato (Belgrad).

SVISUJO

Interkantona Federacio. — Sek., Otto Karmin (11, Avenue des Arpillières, Genève-Chêne).

Romanda Federacio. Sidejo : Lauzanne. — Sek., C. Piguet (Rolle Vaud). Organo : *La Libre Pensée Internationale*; red., Ernest Peytrequin (Louve, 4, Lauzanne).

Germansvisa Federacio. Sidejo : Zürich. — Sek., P. Bonnet (Hedwigstrasse, 16, Zürich). — Organo : *Der Freidenker* (Berlin).

Italsvisa Federacio. Sidejo : Chiasso. — Sek., Giovanni Piadani (Chiasso). Organo : *La Ragione* (Chiasso).

TRANSVAALO

Sudafrika Raciista Asocio. — Prez., E.-P. Beer. Sek., J.-D. Stevens (P. O. Box 1782, Johannesburg).

URUGUAJO

Asocio de Liberala Propagando. — Sek., Dro R. Montero y Paullier (Calle Uji, 223, Montevideo). Organo : *El Libre Pensamiento* (Cassilla de Correos, 175, Montevideo).

USONO

American Secular Union and Freethought Federation. Sek., E. C. Reichwald, (79, W. S. O. Waterstreet, Chicago).

Nacia Raciista Asocio. — Prez., Sino Libby Culberston-Macdonald. Sek., F. James Morton (62, Vesey street, New-York). Organo : *Truth Seeker*.

Federacio de l' Bohemaj Liberpensuloj en Ameriko. — Prez., G. Voska. Sek., Jan Karnik (346, East 86-th street, New-York). Organo : *Vek Rosumu*. Sek. por fremlando, Ch. Krepela (1343 1-st avenue, New-York, City).

Federacio de Liberaj Religiaj Societoj Germanaj. — Organo : *Der Freikender* (Herold Building, Milwaukee).

Pola Liberpensularo. — Organo : *Wolna Mysl* (959, Milwaukee Ave, Chicago).

MEMBROJ DE "LIBERA PENSO"

1914

Honoraj Membroj

Sro Ferdinand Buisson, eksdeputato, rue Bobillot, Paris.

Sro A. Forel, Yvorne (Vaud) Svisujo.

Sro Ghisleri, Istituto Arti Grafiche, Bergamo, Italujo.

Sro F. Lozano, Apartado, 109, Madrid, Hispanujo.

Sro Andrzej Niemojewski, 48, str. Maršalkowska, Varsovio, Polujo-Rusujo.

Sro Karel Pelant, 6, Korunni, Praha-Vinohrady, Aŭstrio-Bohemujo.

Honoraj Membroj mortintaj

FRANCISKO FERRER. — LEV TOLSTOJ. — JEAN DONS.

AŬSTRIO

Sro Richard Felser, fervojoficisto, Spittal a. d. Drau.

AŬSTRIO BOHEMUJO

Dro A. Batek, 377, Malirsha, Praha VII.

Sro Fr. X. Kučera, Knêzeves ap. Rakovnik.

Sro A. Lonkota, Dondleveckà, 11. Plzen.

Sro J. Ludvik, Milevsko.

Sino Olga Ptacnikova, 441, Turnov.

Sro O. Sklenčka, oficisto de Živnostenka banka, Hradec Kralove.

AŬSTRIO GALICIO

Sro Antonio Czubrynski, 88, Dietta, Krakow.
Sro Aüg. Kolomyiski, inĝeniero, 6, Nowy Sacz.
Sro Bohumil Libal, bankoficisto, Lwow.

AŬSTRIO KROATUJO

Sro L. Lorek, Vinkovci.
Sro Paül Stanišić, Vinkovci.

AŬSTRIO MORAVIO

Sro Prof. R. Fridrich, 10, Rejskova, Prostejov.
Fino Ant. Janalikova, instruistino, Bystrice Hostyn.
Sro Jaroslav Tyl, 57, Olomoucka, Prostejov.
Sro Zajchowski Zygmunt, Szkota polska, Przywoz.

BELGUJO

Sro Emilio Baez, 13, rue Montenegro, Saint-Gilles-Bruxelles.
Sro Ch. Goebbels, 89, rue du Tyrol, Saint-Gilles-Bruxelles.
Sro D. Hallet, Esperantista Presejo, Charleroi.
Sro Petit Disoir, 67, rue de Quaregnou, Paturages.

Loka Grupo Antwerpen :

Sro N. Bestermann, 96, Weststraat.
Sro Ceuleers filo, 77, Lange Scholierstr.
Sro J. Dillen, 10, rue des Aulnes.
Sro Drion, 144, Leemstrat E. M. Berchem.
Sro Frans Engels, 36, Borgerhoutschestraat.
Sro Jan Jacobs, 444, Boomsche steenweg.
Fino Nabbe, 94, Offerandestraat.
Sro Peeters, 104, Carnotstraat.
Sro F. Prat, Someestraat.
Sro Marius Roe, 23, Krugerplein, Borgerhout.
Sro Salomon, 15, Oude Kornmarkt.
Sro Frans Schoofs, 45, Kleine Beerstraat. *Komitatano.*
Sro Timperman, 36, Nijverheidstraat.
Fino Timperman, —
Sro J. Uytendroek, 20, Van Immerseelstraat.
Sro Felix Van Gansen, 115, Lange Nieuwstraat.
Sro Weisz, 124, Montenstraat.
Sro Willekens, 27, Dahliastreet.

BRAZILUJO

Dro Methodio Maranhao, Goyanna (Pernambuco).
Profesoro Estanislav Borecki, Caixa Postal, 83, Ponta Grossa (Parana).

BRITUJO

Sro H. T. Bailey, 31, Caversham rd, Kentish Town, London.
Fino D. Braley, 133, Middle Turlong rd, Meadows, Wilford rd, Nottingham.
Fino Violet Crossley, Savile st., Hebden Bridge.
Sino Annie Greenwood, The Gables, Alfreton, Derbyshire.
Fino Helen Fryer, 72, Thurleigh rd, Clapham, London.
Sro W. W. Padfield, 2, Dawlish villas, Dower Oldfield Park, Bath.
Sro F. Ransohoff, 41, Gladstone st., London S. E.
Sro Tom Scott, Riddings ap. Alfreton, Derbyshire.
Sro J. Sellars, Mansfield rd. Selston (Nottingham).
Sro Harry Shaw, Fernleigh villa, Leabrooks ap. Alfreton, Derbyshire.

Sro F. W. Shaw, 40, Gresham st., Coventry.
Sro J. W. Shaw, 1, Lancaster avenue, Didsbury (Manchester).
Sro H. O. Shofield, 54, Caledon rd, Nottingham.
Sro F. J. Strong, 19, Chester st., Coventry.

ĈILUJO

Sro Pasqual Canero, ĉe Gathes & Chaves, Santiago de Chile.

FRANCUJO

Sro Emile Beuve, instruisto, Cours Jacquin, Troyes.
Sro Louis Beuve, instruisto, rue Dideroi, Troyes.
Fino C. Beynard, 83, route de Revel, Toulouse.
Sro Marcel Bouhou, Beaugency (Loiret).
Profesoro Bouçon, Annecy.
Sro L. Bouvier, farmaciisto, Poix (Somme).
Sro Camille Chandelliez, 69, rue des Noes, Troyes.
Sro V. Cimr, Echenoz, près Vesoul.
Sro H. A. Collot, 51, rue de la République, Arras.
Sro Edmond Coppenet, instruisto, Beaune.
Sro Lucien Cornet, senatano, urbestro, Sens.
Profesoro Coutable, rue de Paris, Avallon.
Sro Cros, 19, rue des Marchands, Perpignan.
Sro Depardieu, Usine des Eaux, Arras.
Profesoro René Deshays, Sens, *Sekretario-Kasisto.*
Sro F. Drudin, 93, boulevard du Nord, Lyon.
Fino Flourens, Villa Rokzano, Béziers.
Dro Fromageot, 2, rue de l'Hôtel-Dieu, Beaune.
Sro M. Gasquet, 18, rue Casimir Périer, Béziers.
Sro A. Giraud, instruisto, 2, rue du Nil, Marseille.
Profesoro A. Lecat, 10, rue de Metz, Dijon.
Sro Lhoste, eksinstruisto, 29, rue Cassin, Sens.
Liberiga Stelo en Sens, Kooperativa Societo « L'Econome ».
Sekcio de la Ligo de l' Rajtoj de l' Homo, ĉe Sro Poitou, rue Victor Guichard, Sens.
Sro Lobbedez, 84, rue de Bapaume, Arras.
Sro E. Mathieu, 5, rue d'Abrantès, Montbard.
Fino Marie Meunier, 1, rue de Verneuil, Senonches (Eure-et-Loir).
Sro Michelerne, instruisto, Sens.
Profesoro P. Mossmann, Vesoul.
Sro E. Perret, 20, rue Masséna, Nice.
Dro Perros, rue Charles Leclerc, Sens.
Sro Paul Renard, 9, rue d'Abrantès, Montbard.
Sro Richard P. J., M. Jeannette, chemin Roger, Q. Delaup, Cannes (A.-M.)
Fino F. Rouff, profesorino, Villeneuve-s-Lot.
Dro Roux, 10, place Bisson, Lorient.

Loka Grupo Paris :

Sro F. Blangarin, instruisto, 115, rue Manin.
Sro Th. Cart, 12, rue Soufflot.
Sro Couteaux, 40, rue Bichat.
Sro A. Dauphin, 22, rue Ledion.
Sro René Dubois, 24, rue Berthollet.
Sro F. Duval, 38, rue des Marais.
Sro Jacques Camecasse, 1 bis, rue Lallier.
Sro J. Finkelstein, 26, rue de Chabrol.
Sro Georges Grosset, rue du Trésor.
Sro A. Guillemain, 11, rue Toussaint Féron. *Komitatano.*
Sro J. Habert, 121, rue de la Convention.

Sro Hermant, 16, rue Bucourt, Saint-Cloud (Seine-et-Oise).
 Sro A. Laisant, 5, rue du Conseil, Asnières (Seine).
 Sro Jean Pénélaud, 32, rue de la Colonie.
 Sro F. Rieman, 113, rue Damrémont.
 Sro Sandrin, 20, rue Beaunier, Paris.
 Generalo Sébert, 14, rue Brémontier.
 Sro Souchay, 134, boulevard Exelmans.
 Sino Soledad Villafranca, ĉe Sro Nicaise, Hospice de la Salpêtrière.

GERMANUJO

Sro J. Engst, 18; Klopstockstr., Dresden.
 Sro W. Fricke, Düsternstr., 131, Bremen.
 Sro Gottgetreu, 12, Herrenstr., Hannover.
 Sro H. Th. Grimm, Friedrichshof, Hamburg.
 Sino M. Hankel, 18, Nicolaistr., Dresden.
 Sro C. Hedler, 14, Hahnemannstr., prt., Leipzig.
 Sro Ludwig Istel, 16, Webergasse (I), Wiesbaden.
 Sro Georg Mahn, 43, Albrechtstr., Breslau.
 Sro Von Witzleben, 6, Buschstr., a/bh, Bonn.
 Sro Max Wiener, 21, Dresden.

GREKUJO

Sro Paul Bünemann, ĉe Sroj Hancock & Wood, Patras.

HISPANUJO

Sro Amor Rolan, 18, Guzman el Bueno, Leon.
 Sro Eug. Calvo, 6, Miguel Zazo, Melilla, Marok.
 Sro Heriberto Diaz Lopez, Calle X, n° 5, Santa Cruz de Tenerife, Kanarioj.
 Sro Heriberto Figueras y Rosinol, 30, Carrer nau, Terrassa.
 Sro Paul Linarès, Hto S. Basilio, Cordoba. *Prezidanto.*
 Kapitano Julio Mangada Rosenörn, 85, S. Bernarndo, Madrid.
 Sro Fernando Redondo, Capitania General, Melilla, Marok.
 Sro Trinidad Soriano, 30, Castellar, Sevilla.

HUNGARUJO

Sro R. Raiczi, 11, Oszelop u. IV-4, Budapest.

ITALUJO

Sro Michele Arabeno, 27/4, Salita Prione, Genova.
 Sro Oscar Bünemann, 24, via A. Saffi, Milano. *Komitatano.*
 Sino O. Bünemann — — — — —
 Sro Giuseppe Carazzolo, inĝeniero, piazzetta prefettura, Padova.
 Sro Attilio Clavenna, 8, via Varese, Sampierdarena.
 Sro Ettore Fasce, 4, Chiassone, Genova.
 Dro Alfredo Stromboli, 3/4 via Gropallo, Genova.

JAPANUJO

Sro Kunitaro Fukuta, Kunina Kamura Yazugun Tottori-keu.

KANADUJO

Sro Louis F. Newcomb, Transcontin. railway, Cochrane (Ontario).

NEDERLANDO

Sro W. Nutters, 94, Van Ostadestraat, Amsterdam.
 Sro Dreves Uitterdyk, Hilversum.

RUMANUJO

Sro Mihai Timuș, Rosiori, Ilfov.

RUSUJO

Sro P. Belikov, O-vo Malcevikiĝ zavodov. Ura. Tubinskaja J, Taškend, Azia Rus.
 Sro N. P. Evstifeieff, 7, Tavriĉeskaja, kv. II, S. Peterburgo.
 Sino Tournaeva Belikova, Pošta Kontoro Perĥoviĉi, Lesnoe, gub. Smolensk.

RUSUJO FINNLANDO

Sro A. Korpelainen, kontoristo, Kemi.
 Sro Vilhosetälä, studendo, Merilinna, Helsinki.

RUSUJO POLUJO

Sro T. Matuszewski, 11, Nowo stalowa, Varsovio-Praga.
 Sro Povadowski, Proszowice (gub. Kielce).

SVISUJO

Fino Adam, St-Blaise, près Neuchatel.
 Sro J. Forestier, 23, Av. Pictet de Rochemont, Genève.
 Sro Paul Humberst, instruisto, La Jaluse, Le Locle.
 Sro Georges Stroele, 11, rue Pierre qui roule, Neuchatel.
 Sro Otto Tesch, 57, Buhlstrasse, Bern.
 Dro Fr. Uhlmann, Kurhaus Zugerberg.
 Sro A. Von Arx, 47 Nord, La Chaux de Fonds.
 Sro Jules Wolf, Fabrique Auréole, La Chaux de Fonds.
 Sino Wolf, — — — — —

UNUIGITAJ ŜTATOJ AMERIKAJ

Sro H. H. Bergmann, 1444, Harvard st., N. W. Washington.
 Sro P. J. Doyle, 812, Washington st., Hoboken (New Jersey).
 Sro Karl Fröding, 417, 7 th St., Rockford (Ill.)
 Sro John F. Hector, Box 4, Station P. Brooklyn (New-York).
 Sino Ida Kurtz, 1505, North Capitol st., Washington.
 Sro Francis G. Morin, 831, Ewing st., Chicago (Ill.)
 Sro James F. Morton, Jr, 62, Vesey st., New-York.
 Fino Belle C. Saunders, 1603, third st., Washington.
 Sro B. F. Schubert, 309, B. st. N. E. Washington.
 Dro Tobias Sigel, 507, Breitmeyer Bldg., Detroit (Michigan).
 Sro John H. Vich, P. O. Box, 184, Cleveland (Ohio).

LOKA GRUPO EN PARIS

La 8-an de Junio estis starigata la Pariza loka Grupo de Libera Penso. Elektiĝis prezidanto Sro J. Camescasse, sekretario A. Guillemain, kasisto Dauphin, komitatanoj Blangarin, Couteaux, Finkelstein, Pénélaud.

Ĝustatempo ĝi naskiĝas por la kongresa laboro. Ĝi estas nur la dua, kun la Antwerpna Grupo, sed esperable la ekzemplo estos pli sukcese sekvata, ĉar post la Berna kunveno la kotizaĵo por la membroj de lokaj grupoj rabatiĝis je duono.

Kaso en Majo 1914

Reportite	Fr. 548,40
<i>Enspezoj :</i>	
Kotizaĵo 1913 de Amor Rolan	2,60
Donaco de Linarès	57,40
Sume	608,40
<i>Elspezoj :</i>	
Poŝtmarkoj	7,50
Restas en kaso	Fr. 600,90

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 SM (FR. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretario-Kasisto: RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALIĜOJN KAJ KOTIZAĴOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. F. MORTON, Jr. 62, Vesey st. New-York.

En Anglujo, S-ro HARRY SHAW, Fernleigh villa, Leabrooks, Alfreton (Derbyshire).

En Belgujo, S-ro FRANS SCHOofs, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio, Cordoba, Prezidanto.

En Aŭstrio kaj Germanujo, S-ro TYL, 57, Olomoucka, Prostejov, Aŭstrio-Moravio.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 53, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

LIBERA PENSO ĈE LA DEKA KONGRESO

DIMANĈON 2-an de Aŭg. — *Matene*, post la elekto de la naciaj delegitoj, vizito en Montmartre al la statuo de Kavaliro Delabarre, apud la preĝejo « Sacré-Cœur »; ĝenerala vido al Parizo.

Tagmeze, komuna tagmanĝo de liberpensuloj ĉe Kooperativa Studenta Restoracio, 174, rue Saint-Jacques (prezo, 1 fr. 25 kaj plie).

Posttagmeze, 2 h., KULTURKONCERTO, sub prezido de S-ro Ferdinand Buisson, malfermita al ĉiuj Esperantistoj, en salono de « Cercles Civiques » 49, boulevard Saint-Michel, apud la « place de la Sorbonne ».

MERKREDON 5-an de Aŭg. — *Matene*, 9 h., Unua labora kunveno: alparolo de diverslandaj delegitoj; raporto de la sekretario-kasisto.

Posttagmeze, 2 h. 1/2, dua laborkunveno: diskuto de proponoj kaj prezento de komitatanoj por la skriba voĉdono; se necese, tria kunveno vespere.

POR LA LOĜADO, ni povas mendi ĉambrojn je 2 fr. 50; la ĉambroj estos najbaraj. Ni rememorigas ke ekzistas en alia kvartalo Popola Hotelo tre malmultekosta (5 fr. semajne) en kiu antaŭa mendo ne estas necesa: tien ni gvidos la societanojn, kiuj nin avertos.

LIBERPENSA EKSPozICIO. — Alportu aŭ sendu ĉiuspecajn objektojn, artaĵojn, bildojn, gazetojn, librojn rilatantajn al la liberpensa movado en ĉiuj landoj.

ADRESU ĈION al S-ro A. GUILLEMIN, 11, rue Toussaint-Féron, Paris.

La gloroj de Montmartre

En bela artikolo aperinta en la Gazeto de la Dekaj Kongreso, Gabriel Chavet prezentas agrable Montmartre al la ĉiulandaj kongresontoj, kiuj baldaŭ venos en Parizon.

Laŭ Chavet Montmartre havas trioblan gloron: religian, historian, artan. Kaj mi tre konsilas al ĉiuj legi tiujn interesajn notojn, sed kompreneble, ĉar la Gazeto de la Kongreso devas esti neŭtrala, Chavet ne ĉion diris pri Montmartre, aŭ plibone, diris nur la oficialaĵojn kulimajn.

Ni ne havas ĉi tie kaŭzon por tiel agi, kaj mi tuj permesas al mi iom kompletigi la dirojn de Chavet.

Inter la tri punktoj notitaj estas du pri kiuj mi volas skribi: la religia kaj la historia.

Religio Montmartre estas konata pro la martirigo de Sankta Dionizo kaj liaj kunuloj Rusticus kaj Eleŭteros. Se vi legas en enciklopedioj aŭ en mitologiaj libroj la artikolojn pri Sankta Dionizo kaj pri la antikva Dio Bakus vi trovos grandajn similaĵojn.

Unue, kaj ĉefe, Bakus havis ĉe la Grekoj kaj Romanoj aliajn nomojn, kaj ĝi estis plejofte nomata Djonisios aŭ Dionisos.

Se nun vi rimarkas, ke detaloj de la legendoj de Bakus similas tiujn de la vivo de Sankta Dionizo, ke la morto de Sankta Dionizo memorigas partojn de la Bakusa legendo, ke S-a Dionizo havis kiel kunulon S-an Eleŭteros, kaj ankaŭ ke Eleŭteros estas en la grekaj legendoj la nomo de la unua stariganto de templo al Dionisos;

ke la historiistoj kristanaj disputis kaj ankoraŭ disputas pri la dato nekonata de la martirigo de S-a Dionizo, metante ĝin iuj en la 1a jarcento, iuj en la 3a, k.t.p.;

vi konkludos unue, ke la martirigo de S-a Dionizo estas legenda kaj tute ne historia afero; due, ke preskaŭ certe la unuaj pastroj kristanaj, divastigante kristanisman kaj ne povante akceptigi de la popoloj la novan dion, malaperigante tute la malnovajn, konsentis ilin konservi, nomante ilin nur sanktuloj, anstataŭ dioj.

Tiajn faktojn oni retrovas multfoje en la historio de kristanismo.

Do niaj ĉiulandaj kamaradoj povos viziti en Montmartre kaj en la urbo najbara Saint Denis, la lokojn sanktajn, pensante ke ili estas sur lokoj kie la unuaj kristanoj ne ĉesis adori Bakus'on, komencante tamen adori sanktajn Dionizon kaj Eleüteros.

Ili povos fari same, se tiel plaĉos al ili.

Pri alia punkto religia mi volas kompletigi la dirojn de Chavet, pri la « Sacré-Cœur » (preĝejo de Sankta Koro de Jesuo).

Eĉ nereligiaj, niaj kamaradoj ĉiulandaj devas atenti pri tiu templo per kiu la klerikaluloj antaŭ 40 jaroj penis malglorigi Parizon kaj Francujon, kiuj je tiu epoko estis penintaj por forigi klerikalismen el nia socio, krei veran laikan respublikon kaj eĉ starigi (en 1871) la komunuman respublikon.

Fratoj ĉiulandaj, kiam vi venos Parizon, ne forgesu, rigardante « Le Sacré-Cœur », ke ĝi estas starigita « por peti de Dio la pardonon al Francujo kaj Parizo pri iliaj krimoj kontraŭ la religio katolika ».

Kaj tiel vi komprenos kial kontraŭ tiom da belaj, naturestarigitaj preĝejoj malnovaj, ĝi estas tiel malbela kaj malarta; kial oni povas diri, ke ĝi estas la malgloro de Montmartre; kial ni, liberaj spiritoj francaj, esperas ke ĝi estos iam malkonstruata.

J. C.

DEKDU ARGUMENTOJ KONTRAŬ DIA ESTO

El Sébastien Faure

La fama franca propagandisto kaj pedagogiulo, SÉBASTIEN FAURE, aŭtoro de *La krimoj de Dio*, forjetas en siaj paroladoj la ideon pri Dio per dekdu argumentoj kunigitaj en nova verko ĉi-sube resumita kaj jene titolita: *Dekdu pruvoj de l' neekzisto de Dio*.

1. — Krei, t. e. ion fari el nenio, estas *neeble*. Nenio fariĝas el nenio. Matematikisto vane kovras per nuloj nigran tabulon. Ĉiuj eĉ treege multaj nuloj ne valoras unuon. Horloĝisto ne kreas horloĝon, li ĝin aranĝas, ĝin ordigas, sed li ne ĝin kreas el nenio.

2. — Dio, se ĝi kreis, povis eltiri materion nur el si aŭ ekster si. Ĉar ĝi estas *nemateria*, tial ĝi ne povis eltiri materion el si.

3. — Do materio kunekzistadis kun Dio. Do ĝi estas eterna. El ambaŭ eternecoj, materia kaj dia, oni devas elekti tiun, kiun oni povas senti, vidi, palpi; oni devas preferi la hipotezon pri la *eterna materio* je l'hipotezo pri Dio, kiu do fariĝas senutila.

4. — Oni diras, ke Dio estas perfekta. Sed el ĝi

eliĝis tiu mondo malperfekta, kiu enhavas, tiom da korpaj kaj moralaj suferoj. Sed *Dio neperfekta*, laŭ vorta difino, ne povas ekzisti. Do Dio ne ekzistas.

5. — Dio, laŭdifine, ankaŭ nepre estas neŝanĝiĝebla. Sed *ĝi ŝanĝiĝis*, ĉar ĝi kreis. Eĉ dufoje ĝi aliĝis: unue ĝi estis en senaktiveco kaj senmoveco, poste ĝi kreis. Kaj ĉar ĝi kreis, ĝia esteco denove modifiĝis.

6. — Kial Dio kreis? Ĉu ĝi bezonis krei? Se ĝi suferas *bezono*, ĝi ne estas Dio! Ĉu do ĝi kreis por igi estulojn malfeliĉaj? Sed Dio kruela ne estas Dio! Kial, kial, kial do ĝi kreis? De kia ajn flanko oni studas Dio-Kreinton, ĝi estas tute neklarigebla. Ĝia ekzisto estas do neebla.

7. — Se la kreaĵaro estus perfekta, *Dio ne estus bezoninta pri ĝi poste sin okupi*. Supozante Dio-Providencon, oni konfesas sendire, ke la kreaĵaro ne estis perfekta, kaj do ke Dio, en la momento de kreado, estis nepotenca aŭ neantaŭzorgema. Kaj tio kontraŭas la difinon de l' vorto Dio. La ideoj pri Dio-Kreinto kaj Dio-Providenco sin forjetas unu la alian.

8. — Dio, se ĝi ekzistas, devus *klare sin montri* al al la homoj. Kaj la ideoj de l' homoj pri Dio estas treege diversaj kaj kontraŭaj. Dio, kiu ne sin aperigas evidente al la homoj, ne estas Dio.

9. — Dio lude mokas siajn kreaĵojn. Ĉar *ĝi sola estas libera*, kaj ĝiaj kreaĵoj ne estas tiaj. Ĉiuj scias, ke neniu en la sciencularo kredas je libereco. Nun estas pruvite, ke la tuta mondo estas regita de la neceseco: kial solaj en la mondo ni evitus tiun leĝon. Do, Dio libera, kiu ne faris libera sian kreaĵon, ne estas.

10. — Dio estas ĉionscianta. Ĝi scias de ĉiam, kontraŭ kiom da korpaj kaj animaj malfacilaĵoj ni haltos. Sed el ili ĝi ne nin eltiras. El ambaŭ rezonajoj nur unu povas resti: ĉu Dio povas nin liberigi — tiasupoze, ne tiel kondukante, ĝi estas maljusta — ĉu Dio ne ĝin povas, kaj tioakaze, ĝi estas senpotenca. *Ĉu maljusta, ĉu senpotenca*, ĝi ne estas Dio.

11. — Ĝi estas Dio, kiu volis nin tute tiaj, kiaj ni estas, kiu volis niajn kulpojn, kaj ĉu ni iru en inferon por ilin elpagi, por ilin elpagi poreterne! Sed por kiu do estas tiaj eternaj ĝemoj de l' damnitaj? Ĉu por la ĉielaj elektitoj? Oni ne povas supozi, ke ilia feliĉo estus per tio pligrandigita, ĉar tiasupoze, tiu feliĉo estus abomeninda! Ĉu do ili estas por Dio? *Tiu Dio estus turmentisto kaj torturisto*, jen absurde. Do Dio ne ekzistas.

12. — Estas diversaj meritoj, kiujn Dio devus rekompenci laŭvalore. Sed oni diras al ni, ke tiuj diversaj meritoj estas sammaniere rekompencataj. Do Dio estas *maljusta*, kaj tio estas memkontraŭa je ĝia vorta difino.

Ne, ja dekdufoje, Dio ne povas ekzisti.

Marcel BOUBOU.

Liberpensula Diablo

Esperantista gazeto publikigante respondon de S-ro Niemejewski (honora membro de L. P.), kontraŭ opinio pri similecoj inter hebrea kaj pola gento, sciigas al ni ke la dirita S-ro fariĝis mem esperantisto. Jen sciigo kiu plaĉas al ni, sed videble ne al ĉiuj; la respondo kaj speciale ĝia publikigo en propaganda gazeto estas kolere kritikita.

Neniu rajtas plendi, ke S-ro Niemejewski kontraŭdiras antropologian aŭ etnikan teorion nek miri, ke liberpensulo malaprobas la hebrean same kiel la katolikan religion.

Nuntempe la pasioj estas forte ekscititaj en la lando, kie gentaj kaj religiaj demandoj estas bedaŭrinde tiel intime kunligitaj, ke povos facile fariĝi malfacile sen kiu ajn deflankiĝo trafi la solan kaj ĝustan celon. Per tio mi vidas tre klare kiel la religioj mem subtenas kaj pliakriĝas intergentan malamon kaj ankaŭ mi bone komprenas, kial ambaŭspecaj kredantoj tenas faman liberpensulon kiel enkorpiĝon de Satano, tiu plenrajta kaj sendiskuta reĝano de la plej diversaj kredoj, ĉe kiuj ĝi ludas la utilan rolon de kato en domo, portante ĉiun perditan pekon. Tiu komuna malŝato metas en la plej helan lumon la kuraĝon de Niemejewski kaj pravigas nian admiron.

Kiel Esperantistoj kaj Liberpensuloj ni bedaŭras kiun ajn intergentan malpacon kaj alvokas la homojn al la konkordo, ne dank' al mensoga silento, sed per serioza kaj libera diskutado. Ni deziras lumigi la konsekvencojn por purigi la korojn en la celo efektiviĝi la homan fratecon.

P. LINARÈS.

KRISTOTURMENTO

Eltiraĵoj el tri jarkolektoj de gazetoj : *Katolika Gazeto, Voĉo*, k. t. p., elirantaj en Jeruzalemo dum regado de imperiestro Tiberio.

Verkis fama bohema verkisto J.-S. MACHAR
Tradukis Frant. KUČERA

5an de marto. — Tagraportoj : Nia Palestinujo estas plenigita per stranga malfeliĉo. Kiel en Egiptujo sendis Eternulo diversajn parazitajn fiinsektaron, k. t. p., tiel sendas Lia kolero sur nian patrujon « profetojn ». Aŭdu, mondo! Frenezeta « profeto » jordana Jochaanaan (Johano) ricevis kolegon, kaj konkuranton. Li estas iu ĉarpentisto el Nazareto. Li agas tro memfide. Ni bedaŭras ke ni ne havas pli detalajn raportojn pri tiu nova lumo, ni publikigus ilin volonte — por rido de niaj legantoj.

10an de marto. — Tagraportoj : El nova nazareta

« profeto » ni ekkonis simplan « miraklan doktoron », kiaj friponoj vagas nun en nia patrujo milope. Skribas al mi paroĥestro el Kafarnaŭm, ke en urbo oni rakontas, ke tiu nazaretano sanigis iun homon. Li donis al li malvarman kompreson. Tiu « mirakla doktoro » nomiĝas Joŝuo. Ni konsilas al li ke li revenu al sia ĉarpentistarto, kaj lasu kuracarton — ni havas multe da diplom-doktoroj kaj ili fartiĝis malbone.

18an de marto. — Tagraportoj : Sinjoro Joŝuo, alie ĉarpentisto el Nazareto, jam ne scias, kiu li estas. Baldaŭ li estas « profeto », baldaŭ « kuracas » malsanulojn, sed ni diros al li baldaŭ ion. Tiu vagulo iris ĝis Kana galilea, kie oni ĵus festis edziĝfeston de filino de urbkonsilanto kun S-ro Efraim, famekonata arĥitekturisto. Sinjoro Joŝuo arogante eniris inter gastoj, trinkis ĝis montoj verdiĝis, dancis, kaj estis gaja, kiel decas al lia deveno kaj inteligenteco. Kiam ĉiun vinon ili eldrinkis, li diris, ke li vinon havigos. — Kaj tiu jonglisto — li ordonis starigi antaŭ gastoj... puran akvon. Memkompreneble, ke al ebriaj gastoj festenantoj ĝi bongustis kiel nektaro, kaj senhonta Joŝuo poste diradis, ke li transformigis akvon je vino! Normalaj homoj ĉie alie lin certe eljetus — sed bonintencaj kaj ebriaj Galileanoj kredis al tiu jonglisto. Ni havos tiun ĉi belan birdeton en evidencio, kaj ni petas ĉiujn paroĥestrojn, ke ili sendadu al ni pri li raportojn.

2an de aprilo. — Tagraportoj : Unu frenezulo frenezigas dekdu aliajn. — Joŝuo, ĉarpentisto nazareta, havas siajn lernantojn. Sed ne en ĉarpentarto, sed en sia « profetofico ». Li eltrovis iajn fiŝkaptistojn, iajn vagantojn, kia li mem estas, kaj kun tiu anaro iras de urbo al urbo, de vilaĝo al vilaĝo. Li promesas al tiuj ĉi homoj « ĉielreĝolandon » kaj « riĉaĵon en ĉielo » per kio tiuj ĉi mizeruloj frenezigiĝis. Ni notas, ke iom da tiuj homoj estas patroj de familioj kaj ke iliaj infanoj nun suferas malsaton plej grandan. Ĝojiga estas ke propra lia patro eĉ patrino (patro ankaŭ estas ĉarpentisto en Nazareto), tiun ĉi « profeteman » filon je ĉiam forrifuzis. Ankaŭ liaj fratoj. Ili ĉiuj estas simplaj, sed saĝaj homoj. Tiu ĉi ago povas malfermi okulojn al ĉiuj kiuj vidas en tiu ĉi ĉarpentisto ion pli alian ol vaganton.

15an de aprilo. — El artikolo : « Eksterordinara aroganteco de vaganto », Joŝuo estas en Jeruzalemo! Ni silentis, kiam tiu vagulo vagadis en kamparo; ni devas paroli, kiam li eniris Jeruzalemon, kaj faris skandalon, super kiu ni devas rugiĝi antaŭ tuta Malgranda Azio. Hieraŭ, dum meso en preĝejo, eniris tiu aroganta vagulo, ekdisputis kun honestaj monŝanĝistoj, kiuj jam de pratempoj ŝanĝas al niaj piaj pilgrimantoj monon, renversis al ili tablojn, ĝis ilian malpere akirintan havaĵon

sur planko disŝutis, kaj eĉ batis ilin. Ni vivas en belaj tempoj.

16an de aprilo. — Tagraportoj : Joŝuo malaperis el Jeruzalemo. Certe ne estis al li aero sufiĉe pura kaj sendanĝera.

20an de majo. — Tagraportoj : Oni skribas al ni el Nazareto, ke Joŝuo, ĉarpentisto, vagas ĉirkaŭ sia naskurbo. Per sia babilado, kiun li nomas « prediko » malebligas al homoj laboron.

13an de junio. — Tagraportoj : Paroĥestro el Kafarnaŭm skribas al ni, ke ili havis viziton : Joŝuon. Li parolis kun iu homo, frenezulo, kiu opiniis, ke li havas malbonan spiriton en si. En urbo tio deveniĝis ridon. Paroĥestro aldonas ke « unu malbona spirito parolis kun dua. »

18an de julio. — Tagraportoj : « Galilea gazeto » skribas pri amasiĝo de homoj, kiun kaŭzis konata Joŝuo. Li amasiĝis ĉirkaŭe sur iu monto, multe da homoj, kaj predikis al ili laŭ sia maniero.

17an de decembro. — Tagraportoj : Pri « profeto » Joŝuo ni silentis pli longan tempon atendante, ĉu atentigos lian agadon kompetentaj organoj. Sed malsukcese. Estus dezirinde ke iu diru tion al imperiestro Tiberio.

12an de januaro. — Tagraportoj : Paroĥestro el..... skribas al ni pri skandalo, kiun kaŭzis vagulo, « profeto » Joŝuo. Dirita homo eniris en domo de sinjoro Ŝimon (ni miras al S-ro Ŝimon, ke li havas plaĉon el similaj vizitoj), li sidigis, kaj tiumomente malfermiĝis pordo kaj eniris... konata prostituistino de tiu ĉi urbo, Magdaleno, por ke ŝi povu kun majstro « interparoladi ». Kia interparolado tio estis ekkomprenos certe ĉiu honora homo. Sinjorino Ŝimon kun ŝia filino tuj foriris kun indigno el ĉambro. Sinjoro Ŝimon restis. Ni simple registras...

Daŭrigota.

KONGRESETO DE PACIFISTOJ ESPERANTISTAJ

Honora Prezidanto : S-ro Profesoro CHARLES RICHET, Nobel-premiulo, membro en la « Institut de France » (Akademioj).

Loka Organiza Komitato : F-ino DENAMUR, S-roj WIETING, RAGUIER, LEBRETON, FINKELSTEIN, BROSSIER kaj BOURREAU.

Parizaj Esperantaj Pacifistoj decidis organizi dum la Dek Internacia Kongreso de Esperanto en Parizo veran packongreseton.

Kotizaĵo estos nur du frankoj ĝis la 25-an de Julio; poste ĝi estos kvar frankoj.

Per ĝi, sola, oni rajtos ĉeesti ĉiujn packunsidojn kaj ricevi la postraporton; ne estos postulata aneco en la Ĝenerala Esperanta Kongreso.

Okazos kvin, eble ses, kunvenoj laboraj.

JEN LA PROGRAMO DE LA TEMOJ DISKUTOTAJ :

1. Haltigo de l'armadoj (ĉiuregna, unuregna);
2. Forigo de l'armadoj (ĉiuregna, unuregna);
3. Malpligrandigo de l'armadoj (ĉiuregna, unuregna);
4. Ribelismoj porpacaj;
5. Arbitracio senescepta kaj deviga;
6. Regna federacio : ĉefaj trajtoj;
7. Devigrimedoj en federacio :
 - a) Bojkotado ekonomia (Projekto Bollack),
 - b) Militistaro internacia (Projekto Vollenhoven);
8. Diversaj projektoj de federacio : Novicow, Max Waechter, Brogajota, k. t. p.;
9. Proponoj koncerne la trian Haagan Konferencon.

Oni sendu ĉion koncerne la Packongreseton al jena adreso : S-ro F. BROSSIER, 44, rue de Tréville, Paris.

KONGRESO DE HOMARANOJ

De la 12-a ĝis inkluzive la 14-a de aŭgusto 1914 okazos en Berno (Svisujo) kongreso de « Homaranoj ».

La kongreso estos ekskluzive *labora*, enhavos en si nenian paradajn oficialaĵojn, festojn aŭ amuziĝojn.

Ĉiuj leteroj por la Organiza Komitato de la kongreso devas esti sendataj laŭ la adreso :

S-ro J. SCHMID, Steigerweg 26, Bern, Svisujo.

Kiel eventuala bazo por la diskutoj en la kongreso de Homaranoj servos la provizora **Deklaracio pri Homaranismo**.

Aliĝo en Junio 1914

F-ino Marie-Louise CROS, Villa Beaumont-sur-Grazaille, Carcassonne, Francujo.

S-ino HALLET, rue des Bouchers, Charleroy, Belgujo.

ŜANĜOJ DE ADRESOJ

S-ro H. T. BAILEY, Shorthand Writer, 87 Chancery Lane, London.

S-ro G. GROSSET, 20, avenue Dubois, Vitry (Seine), Franc.

S-ro F. BLANGARIN, 2, rue Brancas, Sèvres (Seine), Franc.

S-ro V. CIMR, avenue Félix-Faure, 50, Paris (XV^e).

S-ro C. CHANDELLIEZ, 49, rue Voltaire, Troyes, Franc.

Kaso en Junio 1914

Reportite	Fr. 600,90
<i>Enspezoj</i> :	
Donaco por pluaj numeroj de l' bulteno, de H. Shaw	5,»
Kotizaĵo 1914 de Habert	2,50
— — Coutable	3,50
— 1913-14 de Hallet, 1914 S-ino Hallet	7,50
Sume	619,40
<i>Elspezoj</i> :	
Poŝtmarkoj	9,50
Saldo al S-ro Hallet (preso de bultenoj 9 kaj 10, 1913	63,25
Preso de bultenoj 5 kaj 6 (duobla)	75,»
Sume	147,75
Restas en kaso	Fr. 471,65

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO : 1 Sm. (Fr. 2.50). — EKSTER FRANCUJO, fr. 2.60

Sekretario-Kasisto : RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

EnParizo, kotizojn kaj aliĝojn ricevas S-ro GUILLEMIN, kaj S-ro DAUPHIN (Librejo HACHETTE).

Deklaracio pri Homaranismo

de D-ro. L. L. ZAMENHOF

Mi estas Homarano ; tio signifas, ke mi gvidas min en la vivo per la sekvantaj principoj :

I

Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion ; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

II

Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

III

Mi konscias, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj, kian ajn supozatan devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas ; la identigadon de la intereso de lando kun la intereso de tiu aŭ alia gento aŭ religio kaj la pretekstado de iaj historiaj rajtoj, kiuj permesas al unu gento en la lando regi super la aliaj gentoj kaj forrifuzi al ili la plej elementan kaj naturan rajton je la patrujo, mi rigardas kiel restaĵon el la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

IV

Mi konscias, ke ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti nomon neŭtrale-geografian, sed ne la nomon de ia gento, lingvo aŭ religio, ĉar la gentaj nomoj, kiujn portas ankoraŭ multaj landoj de la malnova mondo, estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia deveno. Ĝis la tempo, kiam tiuj landoj ricevos nomojn

neŭtralajn, mi devas almenaŭ en interparolado kun miaj samprincipanoj nomi tiujn landojn laŭ iliaj ĉefurboj kun aldono de la vortoj « regno », « provinco » k. t. p.

V

Mi konscias, ke en sia privata vivo ĉiu homo havas plenan kaj nedisputeblan rajton paroli tiun lingvon aŭ dialekton, kiu estas al li plej agrabla, kaj konfesi tiun religion, kiu plej multe lin kontentigas, sed en komunkaĵo kun homoj de aliaj lingvoj aŭ religioj li devas peni uzi lingvon neŭtralan kaj vivi laŭ etiko kaj moroj neŭtralaj. Mi konscias, ke por samregnanoj kaj samurbanoj la rolo de lingvo neŭtrala povas ludi la lingvo regna aŭ tiu kultura lingvo, kiun parolas la plimulto de la lokaj loĝantoj, sed ke tio devas esti rigardata nur kiel prooportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto, sed ne kiel ia humiliga tributo, kiu ŝuldas gentojn mastratajn al gentoj mastrantaj. Mi konscias, ke en tiaj lokoj, kie batalas inter si diversaj gentoj, estas dezirinde, ke en la publikaj institucioj estu uzata lingvo neŭtrale-homa, aŭ ke almenaŭ krom la gentlingvaj kulturejoj tie ekzistu ankaŭ specialaj lernejoj kaj kulturaj institucioj kun lingvo neŭtrale-homa, por ke ĉiuj dezirantoj povu ĉerpi kulturon kaj eduki siajn infanojn en senŝovinisma spirito neŭtrale-homa.

VI

Ĉar mi konscias, ke la reciproka malpaco inter la homoj neniam ĉesos, ĝis la homoj alĉutimiĝos starigi la nomon « homo » pli alte, ol la nomon de gento, kaj ĉar la tro nepreciza vorto « popolo » ofte donas kaŭzon al genta ŝovinismo, disputoj kaj malbonuzoj kaj ofte malmaldividas inter si la filojn de la sama lando aŭ eĉ de la sama gento, tial je la demando, al kiu popolo mi alkalkulas min, mi respondas : mi estas Homarano ; nur tiam, kiam oni demandas min speciale pri mia regno, provinco, lingvo, deveno aŭ religio, mi donas pri tio precizajn respondojn.

VII

Mia patrolando mi nomas tiun landon, en kiu mi naskiĝis ; mia hejmolando mi nomas tiun landon, en kiu mi

estas konstanta, fikshejma loĝanto. Sed ĉar pro la nedifiniteco de la vorto « lando » la vortoj « patrolando » kaj « hejmolando » estas tre neprecizaj kaj ofte kaŭzas disputojn kaj malpacon kaj malamike disigas inter si la filojn de la sama terpeco, tial en ĉiuj dubaj okazoj mi evitas tiujn neprecizajn vortojn kaj uzas anstataŭ ili la pli precizajn vortojn « patruja regno », « patruja regiono », « patruja urbo », « hejma regno », « hejma regiono », « hejma urbo ».

VIII

Patriotismo mi nomas la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kiam ajn devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas. La servadon speciale al la interesej de unu gento aŭ la malamon kontraŭ alihejmuoj mi neniam devas nomi patriotismo. Mi konscias, ke profunda amo al sia patrujo kaj al sia hejmo estas afero tute natura kaj komuna al ĉiuj homoj, kaj nur nenormalaj eksteraj cirkonstancoj povas paraliziti tiun tute naturan senton. Tial se en mia hejmo ĉiuj laboroj estas ekspluatataj por la oportuneco aŭ gloro de unu speciala gento kaj tio paralizas mian entuziasmon por socia laborado aŭ eĉ devigas min revii pri alia hejmolando, mi ne devas malesperi, sed mi devas min konsoli per la kredo, ke la nenormala stato en mia hejmo pli aŭ malpli frue pasos kaj miaj filoj aŭ nepoj plene ĝuos tiun fortigan entuziasmon, kiun en mi paralizis la maljusteco de miaj samhejmanoj.

IX

Konsciante, ke lingvo devas esti por la homo ne celo, sed nur rimedo, ne disigilo, sed unuigilo kaj ke la lingva ŝovinismo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de malamo inter la homoj, mi neniam gentan lingvon aŭ dialekton devas rigardi kiel mian sanktaĵon, kiel ajn mi ĝin amus, nek fari el ĝi mian batalan standardon. Kiam oni min demandas speciale pri mia lingvo gepatra, mi nomas senŝovinisme tiun lingvon aŭ dialekton, en kiu mi en mia infaneco parolis kun miaj gepatroj ; kiam oni min demandas speciale pri mia lingvo persona, mi — gvidante min per neniam ŝovinismaj konsideroj — nomas tiun lingvon, kiun mi persone plej bone posedas aŭ plej volonte uzas ; sed kia ajn estas mia lingvo gepatra aŭ persona, mi devas posedi ankaŭ tiun neŭtrale-homan lingvon, kiun miaj samtempuloj uzas por rilatoj intergentaj, por ke mi ne bezonu miakulpe altrudi al aliuloj mian lingvon kaj por ke mi havu moralan rajton deziri, ke aliuloj ne altrudu al mi sian, kaj por ke mi povu sur senŝovinisma bazo servi al la kulturo neŭtrale-homa.

X

Konsciante, ke religio devas esti nur afero de sincera kredo, sed ne ludi la rolon de hereda genta disigilo, mi nomas mia religio nur tiun religion aŭ religianstataŭntan sistemon, je kiu mi efektive kredas. Sed kia ajn estas mia religio, mi konfesas ĝin laŭ la neŭtrale-

homaj principoj, « homaranaj », kiuj konsistas en jeno :

a) La plej altan por mi ne kompreneblan Forton, kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala, mi povas nomi per la nomo « Dio » aŭ per alia nomo, sed mi konscias, ke la esencon de tiu Forto ĉiu havas la rajton prezenti al si tiel, kiel diktas al li lia prudento kaj koro aŭ la instruoj de lia eklezio. Neniam mi devas malami, moki aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo pri Dio estas alia ol mia.

b) Mi konscias, ke la esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo de konscienco kaj ke la ĉefa, por ĉiuj homoj deviga principo de tiuj ordonoj estas : agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi ; ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn, kiujn ĉiu homo, konforme al sia kredo, havas la rajton rigardi aŭ kiel devigajn por li dirojn de Dio, aŭ kiel komentariojn, kiujn miksite kun legendoj donis al ni diversgentaj grandaj instruantoj de la homaro, kaj kiel morojn, kiuj estas starigitaj de homoj kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de nia volo.

c) Se mi kredas je neniu el la ekzistantaj revelaciaj religioj, mi ne devas resti en iu el ili sole pro motivoj gentaj kaj per mia restado erarigi la homojn pri miaj konvinkoj kaj herede nutri por senfinaj generacioj intergentan disecon, sed mi devas — se la leĝoj de mia lando tion permesas — malkaŝe kaj oficiale nomi min « liber-kreda », ne identigante tamen la liber-kredon speciale kun ateismo, sed rezervante al mia kredado plenan liberecon. Kiam en mia loĝloko ekzistos komuninterkonsente aranĝita, plenforme organizita sengenta kaj sendoktrina komunumo de liber-kredanoj, al kiu mi povos aliĝi kun plena kontenteco por mia konscienco kaj por la bezonoj de mia koro, tiam — por fiksi fortike kaj precize mian religion neŭtralecon kaj savi mian posteularon kontraŭ senprogrameco kaj konsekvence kontraŭ refalo en gente-religian ŝovinismen — mi devas aliĝi al tiu liber-kreda komunumo tute oficiale kaj heredigeble kaj akcepti por mi ĝian neŭtralan nomon, ĝiajn komunumajn aranĝojn, ĝiajn nedevigajn neŭtrale-homajn festojn kaj morojn, ĝian neŭtrale-homan kalendaron k. t. p. ; ĝis tiu tempo mi povas resti oficiale alskribita al tiu religio, en kiu mi naskiĝis, sed mi devas ĉiam aldoni al ĝia nomo la vorton « liber-kreda », por montri, ke mi alkalkulas min al ĝi nur provizore, laŭmore kaj administre.

ANTIKLERIKALAJ HUMORAĴOJ

de José Nakens

Antaŭparolo de la aŭtoro

Dum al kiu ajn religio oni dediĉas kulton kun vera fido, ĝi inspiras grandan respekton eĉ al tiuj, kiuj ĝin ne kredas ; kiam tiu ĉi fido malaperas, nenio prezentas pli da motivoj por ridindeco kaj satiro. Kio antaŭe estis tenata kiel vera, rezultas absurda ; kio majesta, vulgara ; kio ideala, karikaturo. Vane la homo fermas siajn

okulojn por ne vidi kaj ŝtopas siajn orelojn por ne aŭdi; la moko spionas tra liaj lipoj la okazon sin elmontri, kaj la satiro glitas nerimarkite ĝis la pintoj de lia plumo, avidante disversiĝi sur la paperon.

Se homo estas simplanima, li senkaŝe konfesas sian animstaton; se li ne estas tia, li kaŝas siajn impresojn kaj penas trograndigi sian respekton antaŭ la kredoj, kiujn li jam ne havas, estigante per tio kun sia konscienco vivmanieron, kiu permesas al li moki interne tion, kion publike li respektas. Ne mankas, kiu enfermiĝas en malsateman indiferecon. La unua sistemo estas lojala, la dua konvena, la tria havas ĉiujn malutilojn de la unua sen neniu el la utiloj de la dua.

Mi tie ĉi analizos kaj kritikos nenium el ili, ĉar tio ne estas mia celo, sed mi diros, ke mi uzadis nenium el ili tial, ĉar mi neniam sentis ian bezonon pri religia kredo.

Cu spirita malsupereco? ĉu supereco? feliĉo? malfeliĉo? manko? privilegio? mi ne scias. Mi simple citas la fakton. Nur tion mi certigas, kun la tuta respekto ŝuldita al tiuj, kiuj profesas religion: ĝin mi neniam bezonis. Ke estus al mi utilinte ĝin havi, mi sciiĝis je mia kosto. « La ateismo, diris al Henriko Heine lia patro, profesia bankisto, estasambio senvalora en Borso ».

Jes, mi senigis min el multaj kontentiĝoj, kiujn ĝuas la popolamaso, tial ke mi ne sekvis la komunan opinionon pri religiaj aferoj ŝajnigante kredi tion, kion mi ne kredas, eĉ tion mi ne faris; mi eĉ ne kontraŭstaris la malbenitan tenton ridi kaj laŭte ridegi pri tio, pri kio tiom da aliaj sinkaŝe ridas.

Kial, pensante tiel, mi kelkafoje batalis kontraŭ la pastroj de ĉiuj religioj? Tial, kiel mi diversfoje diris, ĉar ekzistas personoj por kiuj satiro kaj humoreco estas nealireblaj, kaj mi bezonas kompreniĝi de ĉiuj, por alporti al ĉiuj la konvinkon, ke la pastro estas la malamiko de la libereco kaj de la homa indeco, kaj sekve la kaŭzo de ĉiu morala, intelekta kaj materiala malprogreso. Kaj ke, koncerne Hispanujon, li estas krom tio la instiganto kaj defendanto de la du civilaj militoj, kiuj kaŭzis nian ruinion kaj per larmoj kaj sango enmarĉigis nian landon. Al tio, kaj al la timo, ke li okazigu trian militon, kiun li estas prilaboranta, estas ĉefe ŝuldataj miaj antiklerikalaj laboradoj. Sen tiu timo mi certe estus imitinta tiujn, kiuj ridetas, kiam oni parolas al ili pri religio.

La antaŭajn liniojn mi skribis nur por antaŭrebatu la argumenton, ke mi kontraŭdiras min memmokante en tiu ĉi libro kredon, kiun ĉe aliaj mi konsideras serioze. Kaj se mi sukcesus, ke sur la lipoj de miaj legantoj ofte ekaperos rideto, mi kredus min rajtigita peti ilin pri dankemo: ĝin ja meritas homo, kiu ĉe tiuj ĉi tempoj, kiam tiel multe da aliaj nin plorigas jen de ĉagreno, jen de kolerego, penas meti inter tiujn ambaŭ sentojn parentezon da gajeco.

Trad. P. L.

J. NAKENS.

LIBERECO DE KULTOJ

En Milano kaj junio de 313a, antaŭ 1,600 jaroj, estis proklamata la libereco de kultoj. La romana Eklezio festas nun tiun datrevenon, sed ĝi zorge kaŝas al la fide-luloj la konstantenan dekreton, almenaŭ en la landoj, kie ĝi havas privilegion. Jen la teksto:

« Ni, Konstanteno kaj Lucinio aŭgustaj, kunveninte en la urbo Milano en la celo studadi ĉiujn aferojn rilatajn al la ordo kaj intereso de l'Imperio kredis, ke neniu el ili estos tiel utila al niaj popoloj, kiel iu konsistanta reguligi antaŭ ĉio la manieron honori la Diecon. Ni decidis cedi al la kristanoj, same kiel al ĉiuj aliaj, la liberecon praktiki la religion kiun ili preferas, en la celo ke la Dieco kiu loĝas en la ĉielo estu favora al ni kaj al ĉiuj, kiuj okupas niajn regnojn.

Ŝajnis al ni, ke estas la plej bona kaj prava sistemo rifuzi al neniu el niaj subuloj, jen kristano, jen partiano de alia kulto, la rajton praktiki la religion kiun li opinias pli konvena. Tiamaniere, la superega Dieco, kiun ĉiu de nun honoros libere, povos laŭkutime doni al ni sian favoron kaj bonvolon. Konvenas do, ke via (provincestro) Moŝto sciuj, ke per tio ĉi ni forigas ĉiajn limigojn de la Dekreto, kiun ni antaŭe sendis al vi pri la kristanoj, kiuj de nun povos sen kiu ajn malhelpo praktiki sian religion. Tion ni komunikas al vi en la plej firma maniero, por ke vi sciuj ke ni lasas al la kristanoj la plej plenan liberecon en la praktikado de ilia kulto. Kaj tial ke tion ni cedas al la kristanoj, vi komprenos ke ĉiuj aliaj devas ĝui la saman rajton. Jen kio estas inda je la jarcento en kiu ni vivas, kio konvenas al la paco de la Imperio: ke por ĉiuj regnantoj estu absoluta la libereco adori la Dion, kiun ili elektis kaj, neniu kulto estu senigita je la honoroj, kiujn ĝi meritas... »

Tr. P. L.

Esploristoj (bojskotoj)

Devo ŝajnas al mi kaj al kelkaj amikoj deklari, ke sub pedagogia vidpunkto, la ideo krei Societon de naciaj Esploristoj (bojskotoj) estas bedaŭrinda eraro.

Antaŭ ĉio por eniri en la Societon, oni postulas de la knaboj religian fidon kaj deklaron pri fideleco al la reĝo. Do, la Asocio estas nova sektana grupiĝo. Vane estas enmeti en la regularon, ke polemikoj pri politikaj kaj religiaj aferoj estas malpermesitaj. Des pli malbone. Al junulo oni devas neniam rifuzi la justan rajton elmeti sian honestan opinionon pri ĉio dia kaj homa, des malpli kiam de antaŭe oni altrudas al li religiajn kaj politikajn devojn. Sekve de tio okazos ĉe tiu Asocio, kiel ĉe vulgarmodaj kunvenoj, kie oni konsideras malbonmaniera elmontri ideojn, kiuj ne estas tiuj de la mastrino kaj kie la fanatikuloj povas diskrevigi laŭplaĉe, ĉar la malpermeso dogmoprediki ne atingas ilin.

Eble ĉiu infano bezonas filozofion, komprenon pri la mondo kaj la tuta vivo, por pravigi ian Etikon. Tia es-

tas la opinio de A. Costa kaj de Angiulli, Vacherot, Pelletan, k. c. Sed tiuj pedagogoj, same kiel Hippeau kaj Galton avertas, ke filozofio ne estas dogmo. Tiu ĉi povas kontraŭdiri la progresojn de la moderna pensado kaj esti maljuniĝinta produkto de la homa spirito. La filozofio kiun bezonas la infano konsistus simple en tio, ke la elementaj konoj pri Fiziko kaj naturaj sciencoj unuigu en elementan komprenon pri Kosmologio (plej simpla formo de Filozofio), kaj ke ĉe la instruado de Historio kaj Etiko oni montru, kiel la leĝo de la socia progreso kunligiĝas kun la leĝoj de la vivo kaj de la Naturo. Tiamaniere, el la instruoj pri naturaj kaj moralaj leĝoj propramove elspruĉos kompreno pri la mondo kaj la celo de la vivo ; tro ĝuste estas la filozofia instruado, konsiderata kiel supera kondutregulo.

Ne tion volas la instruantoj de la Esploristoj kaj oni povas kun granda verkisto diri al ili : kiel do ? esti religiano, kaj ne povi paroli pri religio ! Lerni katekismojn kaj ne pensi pri filozofio ! Sed estas ja la samaj problemoj ! Diru pli vere, ke vi pretendas kun sektanaj celoj aliformigi la infanojn en maŝinojn.

* * *

La tabelo de konoj postulitaj de la Esploristoj pravas, ke same kiel ĉe la infanaj aŭ lernejoj bataloj, oni pretendas ne eduki homojn, sed formi soldatojn. Trakuri piede du kilometrojn dum dekminutoj, ekbruligi fajron kaj senfeliĝi kapridojn, fari ligotuberojn per ŝnuroj, transdoni depeŝojn per flagoj, bandagi vunditon haltigi ĉevalon, fari demandojn al kamparanoj kaj kuiri manĝon, estas sendube tre utilaj konoj, sed kiuj ne rajtigas la instruantojn diri, ke ili estas kreontaj novan junularon, kiu plenumos siajn devojn kaj estos kapabla efektiviĝi sian fincelon en la vivo. En la mondo estas pli multe, ho Lisardo ! Interalie, la ĉefa afero estas posedi sendependan juĝpovon, ĉiam malamika de antaŭtempaj disciplinoj ; senti por la homoj amon kaj por la bestoj kompaton, kio estas rekte kontraŭa al la arto senfeliĝi kapridojn ; koni la principojn de la scienco, kiujn oni ne lernas grimpane sur la arbojn, sed antaŭ la libroj kaj la nigra tabulo ; legi kaj skribi multe, anstataŭ ludi je la regimentoj kaj la plifortigitaj brigadoj per kio oni senigas la infanon el lia sendependeco kaj gajeco.

Kaj kio pri fizika edukado ? oni demandas. Sajnas, ke jam fariĝas tempo deklari, ke Amoros, Linck, Marcelo Sanz, Dekret, Fraguas, Fernandez Zabala kaj Kindelan puŝis nin tro pretercelen. La publiko ne bone komprenis la konsilojn de tiuj meritplenaj personoj, kiuj rekomendas la fizikan kulturon « kiel helpantan de la intelekta kaj morala », kaj neniam kiel ĉefan por la civitanoj. Laŭ la maniero kiel ni iradas, baldaŭ oni nur sin dediĉos, en la lernejo, fabriki ludilojn el ligno kaj papero ; ekster ĝi, transsalti fosaĵojn, trakuradi mejlojn, pedali, sin glitlasi, doni pugnobatojn kaj friti ovojn. Kaj tio ne estas precize la edukado. Ankaŭ ĉe la « Libera Institucio de

Instruado » la infanoj kutimas marŝi per stangokruroj, sed post kiam ili priparoladis libere pri ĉio, kion inspiras al ili ilia propramoveco, tra legis librojn kaj manuzis aparatojn. Da homoj kapablaj trakuri kvindek kilometrojn, rompi pordon per la kapo, sin loki antaŭ virbovon, kaj implikiĝi pugno aŭ ponard-bate kun la plej kuraĝa, estas tro multe en tiu ĉi patrujo. Fari la infanojn militemaj en la lando de la ŝtonbataloj ! Kion ni bezonas, estas havi civitanojn instruitajn, saĝajn, « lertajn laŭ spirito » kaj « fortikajn ĉe konduto ».

Homojn ni volas, ne antropopitekojn. Tion pli, ke la militoj nun ne estas faritaj per lancbatoj kaj katapultskuoj, sed per scipovo, indeco, mono, aferoj kiujn oni ne akiras farante laŭmaristajn ligotuberojn, nek vidigante nudajn tibikarnojn en kontraŭeco al ĉiuj reguloj de la higieno, kiuj diferencas de la postuloj de la « snobismo » (afekta elegantamo). Homo ne estas pli forta, kiam li povas suprenlevi la akson de ĉaro aŭ treni tiun ĉi, sed kiam li estas kapabla elpensi maŝinon, kiu tion faras pli senpene ; ne kiam li batalas, sed kiam li scias kial li batalas ; li ne estas pli potenca, kiam li povas ataki tranĉeon (militan terŝirmilon), sed kiam li scipovis antaŭe krei post ĝi interesojn kaj korsentojn, kiuj faciligas al li la venkon.

Nun ni ne pensas tiel ; ni kredas, ke nia gento fizike degeneris, opinio kontraŭdirita de la kiraso kaj kaskoj de l' muzeoj, vestiloj hodiaŭ malgrandaj por kiu ajn knabego ; ni volas je ĉia kosto nin eduki kiel brutservistojn ; ni forlasas la studojn kaj nin faras cirkanoj. (Ankaŭ mi mi kulpigas, mi ankaŭ estis probatalanto de mi ne scias kio). Ni malŝatas niajn patrojn, kiuj ne konis la « bojskotojn », sed havis « liberpafistojn » ; ni sekvas la konsilojn de tiuj, kiuj ne havis vorton por antaŭvidi la katastrofon de 98, kiel ni la ceteraj ĝin havis, sed kiuj lernis *a-posteriori*, amasegon da maksimumoj, interalie, ke estas necese esti fortika. Malfeliĉa fundamentita sur la imitado kaj ekzercado de la muskolo fortikeco ! kiu malbone direktite povas esti kontraŭcela ! Maltrafa entrepreno, krei aventuremajn legiojn en la lando de la civilaj militoj !

Pardonu la entuziasmojn de la ŝovinistaj sportoj. Eble ni eraras. Eble estas necese por altigi la patrujon eduki ĉiajn idojn same, kiel en la tempo de Asdrubalo. Sed laŭ mia opinio, anstataŭ Indivilo kaj Viriato mi nuntempe preferas Cajal, Galdos kaj Torres Kevedo kaj cent aliajn eminentulojn, pri kiuj oni ne scias, ke ili iam faris aerturnigojn aŭ senfeliĝis leporojn. Mi deziras, ke Hispanujo ne estu kunmetita el marŝadistoj maske vestitaj nek el recitadantoj je katekismo, sed el puraj homoj, kiel Don Kihoto ; malfortikaj, sed kuraĝegaj ; malriĉaj, sed entuziasmaj por la idealo ; malgrasaj laŭ karno, sed kapablaj en lasta okazo doni kvarcent bastonbatojn al ega la nombro da trupanoj de la Sankta Fratara.

(El Motin).

Antonio ZOZAJA.

17-4-1913.

Tr. P. L.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO: 1 Sm (Fr. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretario-Kasisto : RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALIĜOJN KAJ KOTIZAĴOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. P. MORTON, 62, Vesey st. New-York.

En Belgujo S-ro FRANS SCHOFFS, 45 Kleene Beerstrat Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio, Cordoba.

En Italujo S-ro O. BÜNEMANN, prezidanto, 24, via A. Saffi. Milano.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 57, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

LA EDUKADO DE LA VIRINOJ

France verkita de P. P.

Esperanta Traduko de FRANCISKO DELGARBO

La antaŭparolo, per kiu oni komencigas la klarigon de iu temo, ofte ŝajnas, unuavide, sen grava rilato kun la temo mem. Tio estas iomete vera en la nuna okazo.

Oni povas tamen konstati la intimajn rilatojn de la enkondukaj vortoj kun la subjekto mem; ĉar tiu introduko koncernas la riproĉojn faritajn, *samtempe de kontraŭuloj kaj amikoj*, al iuj el niaj propraj sampensanoj, pro la maniero laŭ kiu ili edukas siajn infanojn, riproĉoj kiuj konstatas ke ne ekzistas en ili homogeneco kaj logikeco inter la pensmaniero kaj la agmaniero.

Unue ni parolos pri la riproĉo de la kontraŭulo. Antaŭ ne longe, konservativa gazeto kritikis liberpensulojn, montrante la profundan mallogikecon de tiuj « kiuj klopodas per siaj ĵurnaloj por forpreni de la infanoj de l'aliaj la kristanajn kredojn » kaj la religian edukadon, sed kiuj, siaflanke, « prizorgas ke iliaj propraj infanoj ricevu tiun « religian edukadon, kaj tiacele forlasas siajn « idojn dum iu tempo al la zorgoj de pastroj aŭ « de bonaj fratinoj. »

Aliparte, — nun la riproĉo devenas el amiko — S-ro L. Van der Kindere, gratulante antaŭ 11 jaroj la bruselajn studentojn pro tio ke ili vekigis la senton de alligiteco al la libera ekzameno, deklaris ke ĉi tiu estis minacata ne nur de hereda mal-amiko. (1)

« La alta burĝaro estas kulpa — li diris — ĉar ĝi

(1) Paroloj laŭ la raporto de la gazeto *L'Indépendance*.

« estas malkonfesanta la principon de la libera ekzameno: la aristokratoj, de antaŭ kelkaj jaroj, estas anstataŭitaj de la liberalaj burĝoj, kaj decas konstati ke por multaj inter ili, la profitamo regas ĉiujn aliajn demandojn. Jen kial ni vidas inter ili kelkajn, kiuj donigas al siaj infanoj religian instruadon, kontraŭ al siaj propraj konvinkoj, kaj iuj kiuj sendas ilin en religiajn lernejojn. »

Kiam iu fakto estas tiel preparolata de du tiom kontraŭaj voĉoj, ĝi devas esti sufiĉe ofta; kaj se ĝi estas tiel ofta, ĝi meritas ke oni serĉesploru pri ĝia kaŭzo.

Sendube, ni tro bone scias ke, se nuntempe en nia lando, oni batalas kontraŭ la reganta opinio, kaj se oni ne iamezure oferas al ĝi, oni povas en ĉiu okazo esti malutiligita en siaj intereso materialaj; — ke en neniu administracio estas esperebla, nek ofico, nek rangaltigo, nek honoroj, kia ajn estas la merito, — ke oni estas malhelpita en siaj aferoj, en sia industrio aŭ komerco kaj submetita al ĉikanegoj de la administracioj potencaj, kun kiuj la rilatoj pli kaj pli multigigas kaj oftigas, kaj kiuj estas kunmetitaj pli kaj pli ekskluzive de servantoj de la Eklezio.

Estas versajne pro tio ke kelkaj, tion sciante, foroferas sian opinion al la malfeliĉo de la tempo; kaj — decas ke ni tion diru, — ne ĉiam ili estas la malpli sendependaj.

La batalo por la principoj tiele emas ŝanĝiĝi iom post iom en disrabado de profitoj. Kaj ni ne plu vidos, kiel antaŭ trideko da jaroj, la tutan inteligentan landanaron, unuanime jaluzan pri siaj rajtoj, decidema pour uzi ĉiujn siajn liberecojn.

Ĉar oni forgesas ke por ĉi tiuj liberecoj ekzistas garantio pli potenca ol tiuj enskribitaj en la

leĝon : estas la neprofitemo kaj sendependeco de karaktero de la landanoj.

Sed tio estas specialaĵo ne nur en Belgando, oni ja konstatas la fakton ankaŭ aliloke, de sufiĉe longa tempo.

Kaj la evoluado de la Eŭropa civilizacio, en tio helpita de multaj bone konataj regnestroj, havigis al si spiriton esence komercan, vulgaran, emantan preferi la frivolajn plezurojn pli ol la grandajn ideojn kaj noblajn pasiojn, incitantan al celo de ia tuto de ĝuoj, fakte tuj efektiveblaj, por kiuj oni oferas la aferoj de konscienco kaj de prudento; tiamaniere, la militema kontraŭstaro de la principoj, kies graveco estis iam tiel granda, inklinas cedi la lokon al maldelikataj bataloj de apetitoj, deziregoj kaj ambicioj.

Konstatinte tiun situacion, unu el la plej famaj pensuloj niatempaj, Ernest Renan, diris (kaj tio ĉi nin fine kondukas al nia temo): « Mi kuragoŝ montri la kulpulojn; ESTAS LA VIRINOJ ».

Tiun virinan influon en la intelektaj medioj, en la familioj de liberpensuloj, ni devas precizigi, por ke ni povu ĝuste serĉi kiel la virina edukado devas esti aliigita.

Renan pri tio klarigis:

« Estas nekontraŭdireble, diris li, ke la virinaj instinktoj okupas nuntempe pli da loko en la ĝenerala aspekto de l'mondo ol antaŭe, laŭ tiu senco ke la mondo estas pli ekskluzive okupata pri aĵoj, kiujn oni kutimas konsideri kiel la proprajon de l'virinoj ».

« Ānstateŭ ol demandi de la viroj grandajn farojn, kuraĝajn entreprenojn, heroajn laborojn, la virinoj postulas de ili riĉecon, por kontentigi vulgaran luksemon ».

La ĝenerala vivo sin dungigis de la instinktoj de l'virino, kaj de la instinktoj *malsuperaj*, kiuj formas la malpli noblan parton de ŝia vivcelo ».

Kaj se ni nun serĉas la kaŭzon de tio kion Renan riproĉas al la virinoj, ni ĝin trovas en la edukado al ili donita...

Inter la burĝaro, kie varbiĝas la liberpensulo kaj kie ofte la malgrandaj imitas la grandajn, la edukado ricevita de la juna virino faras *ĝenerale* de ĉi tiu personeton, kiu vestiĝas ege bone, kiu multege babilas, kiu pensas nur pri dancado kaj kiu nenion seriozan scias.

El tio devenas ke, tiel ofte, la viro timas ke, per siaj solaj fortoj kaj rimedoj, li ne povos krei « feliĉan » familion, t. e. familion en kiu la virino povos libere ekzerci ĉiujn vanajojn enradikigitajn

en si per la formado de sia spirito, tial ke ŝi kredigas al li ke la personoj de ŝia rango aŭ edukado ne povas simple vivi, kaj ke ŝi mem ne povas dece, malpli multe elspezi ol siaj antaŭaj lernejamikinoj aŭ nunaj mondumkunulinoj.

Pro tiuj ŝanceliĝoj de la junaj viroj kaj ilia malgranda fervoreco naskiĝis tiu kurado, tiel plena je ruzoj kaj insidoj kiel je festoj kaj akceptoj, en kiu tiom da patrinoj kaj filinoj kunigas sian intelekton kaj agadon: *la kurado al edzo!*

Kaj eĉ se oni ne konsideras la laste nomitan vidpunkton, pli malgajan ol ridindan, la nuna virina edukado estas ankoraŭ malfeliĉiga laŭ multaj koncernoj.

Unu el la unuaj estas la tro granda diferenco, kiun ĝi en la fundo mem kaj en la ĝenerala spirito prezentas kun tiu de la knaboj.

Kaj okaze de tio, oni povas fari malgrandan komparon inter la edukado de knaboj de diversaj naciecoj kaj la edukado de infanoj de la du seksoj en unu sama nacio.

Inter viroj de diversaj naciecoj civilizitaj, identa klasika kulturo kreas ja iun spiritan fratecon, iun internacian intelekton, konforman al la principoj de libera penso, kiun malaperigus la forigo de tiu klasika kulturo, t. e. la kompleta forigo de la malnovaj humanismaj studoj.

Tutsame, estas nekontraŭdireble, ke la bona harmonio kaj spirita intimeco en la geedza vivo estas trege favorigita per tio kion la edzo kaj edzino, estantaj junaj, ambaŭ lernis, kaj per tio kion ili ambaŭ scias. Nu:

La edukado de la knaboj kaj tiu de la knabinoj, malsame ellaboritaj kiel ili nun estas, povas eble iufoje kombiniĝi, pli ofte sin kontraŭi, sed neniam sin interanstateŭi en la edukado de la infanoj.

Kaj tamen la vidveco ofte ekŝanĝas la familiajn interrilatojn kaj, kiel la statistikoj *konstante* montras al ni, ekzistas pli da vidvinoj ol da viroj. Estas do la virino, kiu konservas pli ofte, en tiu okazo, la respondecon *sola* influi sur la sorton de la idaro.

Tiamaniere ke, konservante la kutimon certigi ke la patrino cerbo devas esti la multe malpli supera kaj la malpli klerigita, oni suferigas la plej malgajan kaj la plej bebaŭrindan estingon de spiritalumo al tiuj kiuj estas patrorfaj.

Aliflanke, se la virino ne volas aŭ ne povas edziniĝi, okazas, pro ŝia edukado kiu ne faris el ŝi individuon fortan kaj kapablan, ke ŝi ne posedas la sendependecon kaj la viran helpon, nek laŭ materia, nek laŭ morala vidpunkto, kaj se ŝi ne povas, krom en tre maloftaj ekceptoj, havi la fierecon sin sola helpi en la vivo.

Decus do ke tiurilate ekzistus malpli da mal-sameco inter la knaba edukado kaj tiu de la knabinoj; kaj al ĉi tiuj oni devus doni la edukadon de la knaboj sufiĉe malplisarĝitan, kompreneble, por ke ĝi ne estu malloga al ili.

Per la sistemo de la duseksa lernejo, tiu rezulto estus verŝajne atingita; kaj, krom tio, oni trovas en ĝi aliajn profitojn; ĉar ĝi helpas perfektigi la moralecon de la junuloj, enradikigante en ili la respekton al siaj kunulinoj; kaj ĝi liberigos tiujn ĉi de la timemo, kiu tiel ofte estas konsekvenco de la edukado aparte de l'alia sekso.

Kaj, se la kompleta kunedukado de geknaboj ne jam estas alkutimiĝinta al niaj komprenoj, por ke ĝi estu ĝenerale enkondukita, oni ne devus almenaŭ tiel obstine disigi la du seksojn dum la junaĝo. Tiuj kiuj kelkan tempon vivis la anglan aŭ germanan vivon scias kial supera estas tiu metodo, kiu samtenpe ne prezentas danĝeron iun.

* * *

Tio ĉi kondukas nin al la atentigo pri dua vidpunkto, al kiu la nuna edukado de l'virino estas malutila, kaj al la rimarko ke flanke de la propredirita kulturo, ekzistas ankoraŭ la formado de la karaktero kaj la difino de la spirita inklinoj.

La zorgo instrui nur la pozitivan veron kelkafoje tremigas pro respondeco tiujn, kiuj havas, je ia ajn grado, la taskon eduki parton de la nacio.

Ĉar tio kion oni devas eviti, estas la enigo de imagitaj kaj eksterrealaj tendencoj en la junajn intelektojn; kaj, nome, oni devas ŝirmi ilin kontraŭ la mistika spirita influo, propra al religia edukado, tial ke ĝi kondukas al akcepto de ĉiuj eraroj kaj de ĉiuj superstiĉoj; kaj estos fermitaj por ĉiu logiko tiuj intelektoj al kiuj oni estus lerninta kredi anstataŭ ol lernigi al ili prudente rezoni.

Tio kion oni devas eviti ĉe knabinoj estas la danĝero pro la supernaturaĵo, ĉio kio povas vekigi, nutri kaj eksciti la imagokapablan parton de ilia intelekto.

Nu, la knabinoj neniel estas edukitaj en la nescio de la supernatureco, de l'imageco, de la ekster-realeco, sed en la nescio de preskaŭ ĉiuj realaĵoj! La rutino kaj la mondumaj aŭ religiaj antaŭjuĝoj volas que ili ne sciu, aŭ ke, se ili scias, ili ŝajnigu ignori tion, kion ili kaŝe lernis per nerektaj vojoj, kiuj estas tiel danĝerplenaj, kiel ne estas tia la klarigo sincera kaj natura.

Ĉiurilate, la scio armas kaj plifortigas. Decus do ke la moderna junulino estu pli armata per kono de la realaĵoj, ne nur por ke ŝi povu senĝene kaj sentime sin sola trovi antaŭ la viroj, sed ankaŭ por que ŝi ne imagu al si, ke senigita de gepatroj aŭ edzo por ŝin gvidi kaj defendi, estas danĝere

por ŝi, riski unu solan paŝon en la vivon, kaj ankoraŭ por fari el ŝi spiriton largan kaj malfermitan, anstataŭ spiriton mallargan, kie regas nur malgrandaj ideoj kaj malgrandanimaj sentoj.

(Daŭrigota).

Kongreso de la Libera Penso en Lisbono

Ni estis reprezentataj de nia amerika societano S-ro J. P. MORTON, delegito de l'usona l. p. societo. Li publike kaj private propagandis sukcese, lerte profitante la permeson jam donitan dum la lasta kongreso en München kaj ree konsentitan dum ĉi tiu, uzi la helpajn lingvojn Esperanto kaj Ido. La kongreso ne volis sekvi idistan ĉeestanton, S-ron Peus, en lingva diskutado.

Jen traduko de la protokolo presita en la belga l. p. jurnalo « La Pensée »:

MORTON (Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj) esperas ke la malpaciga demando pri lingvoj malaperos el la kongresoj, kiam oni bonvolos renkontiĝi sur la neŭtrala kampo de la universala helplingvo Esperanto. Dume li estas feliĉa reprezenti la grandan amerikan respublikon. Tutkore la amerikaj respublikanoj sendas sian saluton al siaj portugalaj fratoj.

Li alportas ankaŭ la saluton de la Esperantistaj liberpensuloj, kiuj kredas, ke la uzado de internacia lingvo estos granda paŝo farita al la frateco de l'popoloj kaj la disvastigo de la raciistaj ideoj.

Libera Penso kaj Politiko

La Kongreso de Liberpensuloj en Lisbono, diris ĝia prezidanto S-ro Magalhaes Lima, estas neniel politika sed nur scienca, filozofia, kiel pruvas multaj el raportoj prezentitaj. Ni pretendas fari sciencon laboron, de moderna penso, de enciklopedia toleremeco, de mondamikiga mentaleco. Por atingi tiun celon estas necese evoluigi la liberan penson, farante ĝin pli pozitiva kaj malpli negativa, pli sinteza kaj malpli analiza. Estas necese krei ligilon ĉiufoje pli streĉan inter ĉiuj grupoj kiuj batalas sur la sama kampo, etnikaj societoj, racianistoj, tiuj de la libera penso kiuj kunfandiĝas en unu komunan deziron.

La afero estas starigi ne doktrinon sed metodon.

Prudenta estas, komentarias *El Pays*, tiu filozofa sintenado de Magalhaes Lima, sed ŝajnas tre malfacile eviti la intervenon de la alta politiko ĉe la diskutoj pri la rolo de la ŝtato en rilato kun la

religiaj dogmoj kaj la batalantaj eklezioj. La laika lernejo, la tombejo, la civila edziĝo, la forigo de la juro, la libereco de kultoj, la kristana kaj musulmana fanatikeco kontraŭ la hebreoj, la apartigo de la eklezioj kaj la ŝtatoj, estas demandoj esence politikaj.

Pravaj estas la ĉi supraj ambaŭ opinioj. Ni nur rimarku, ke la oficiala subteno donita al la Kongreso de la portugala estraro, kiu devas atenti pri siaj internaciaj rilatoj kun la aliaj ŝtatoj, sufiĉas por klarigi la sintenadon de la eminenta kaj simpatia Kongresprezidanto.

P LINARÈS.

Laikaj Esploristoj

La plendoj de S-ro A. Zazaja trovis ĉhon. La « Instrua Hejmo de la Radikalaj Respublikanoj » de la Madrida distrikto « La Latina » iniciatas la formadon de korpuso da esploristoj, konsistigota et la infanoj de la madridaj laikaj lernejoj kaj ceteraj junuloj kiuj petas pri aliĝo.

Tiu organizaĵo estos inspirita de la Moderna Pedagogio, amo al la Naturo, Libereco kaj Progreso. En la regularo ne estas parolite pri Dio nek pri Ŝtatestro.

P. L.

EL BELGUJO

Dimanĉon la 19an de oktobro en Bruselo granda manifestacio organizita de la Nacia Federacio de Liberpensaj Societoj kontraŭ la nekonstitucia projekto de Instruada Leĝo, kiu nuntempe estas diskutata en la belga parlamento. Multaj socialistaj kaj liberalaj grupoj de la lando ankaŭ partoprenis la manifestacion. Laŭ la plej moderaj gazetoj de Belgujo, la nombro de manifestantoj estis dudek mil, venintaj el ĉiuj flankoj de la lando. La manifestacio laŭiris la ĉefajn stratojn de Bruselo kaj alvenis sur la Granda Placo. Sur la perono de la historia urbdomo parolis S-roj Bayot kaj Georges Lorand, kaj oni akceptis energian tagordon esprimantan la volon de la popolo ke la jezuita leĝprojekto de ministro Poulet estu malakceptata de la deputitaro.

Poste la liberpensaj societoj iris ĝis la monumento Francisko Ferrer, antaŭ kiu S-roj Hins kaj Pepin ree instigis la ĉeestantaron persiste daŭrigi la batalon kontraŭ la multcentjara premado de la Eklezio, kiu sin denove manifestas per la prezento de la leĝprojekto. La belgoj montru al la registaro ke ili ne volas ke oni mortigu la neŭtran oficialan instruadon, kiu, ekster la grandaj urboj estas jam sufiĉe ruinigita: tiun volon ili montru ĉiamaniere, eĉ kontraŭ la Parlamento.

En la tuta lando la kontraŭregistaraj partioj sin tre okupas pri la temo, kaj oni antaŭvidas, ke post kelkaj tagoj la protestmanifestacioj pli kaj pli multigis kaj gravigos.

FR. DELGARRO.

Aliĝoj en Septembro 1913

S-ro M. Gasquet, 18, rue Casimir-Périer, Béziers, Franc.

S-ro O. Sklenčka, oficisto de Zivnostenka banka, Hradec Králové, Bohem.

Entute 189 membroj

Kaso en Septembro 1913

Enspezoj:

Reportite	Fr. 294,00
Kotizaĵo de Belikov 1913-14.....	4,90
— Sklenčka	2,50
— Gasquet.....	2,50
Sume.....	303,90

Elspezoj:

Poŝtmarkoj.....	3,00
Restas en kazo.....	300,90

Aliĝoj en Oktobro 1913

F-ino Violet Crossley, Savile st. Hebden Bridge Angl.

S-ro J. W. Shaw, 1 Lancaster avenue Didsbury, Manchester.

S-ro H. O. Schofield, 54 Caledon Rd, Nottingham Angl.

S-ino Annie Greenwood, The Gables, Alfreton, Derbyshire, Angl.

Entute 192 membroj.

Kaso en Oktobro 1913

Enspezoj:

Reportite	Fr. 300,90
Kotizaĵo de Czubrynski 1913.....	2,40
— F-ino Fryer 1913.....	5
— Forestier 1913.....	2,60
— Padfield 1913.....	5,50
— F-ino Crossley, F. W. Shaw et Schofield 1914.....	7,50
— Fridrich 1913-14.....	5,55
Sume.....	329,45

Elspezoj:

Sendo al S ^o Nutters (Bulteno Junio- Aŭg: preso, 18,55 guld.; afranko, 4,90; 2 pakoj, 1,50 = 25 guld.)....	53,55
Poŝtmarkoj.....	2
Al S ^o Fridrich (afrankoj).....	5,55
Sume.....	61,10
Restas en kaso	Fr. 268,35

ŜANĜITAJ ADRESOJ:

S-ro James F. MORTON, 62, Vesey street, New-York.

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTEÑO: 1 SM (FR. 2.50) — EKSTER FRANCUJO, FR. 2.60

Sekretario-Kasisto : RENÉ DESHAYS, Sens (Francujo)

ALĜOJN KAJ KOTIZAĴOJN RICEVAS

En Ameriko, S-ro J. P. MORTON, 62, Vesey st. New-York.

En Belgujo, S-ro FRANS SCHOOF, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen.

En Hispanujo, S-ro P. LINARES, Hto S. Basilio, Cordoba.

En Italujo, S-ro O. BÜNEMANN, prezidanto, 24, via A. Saffi, Milano.

En Parizo, S-ro GUILLEMIN, 53, rue Damesme, kaj S-ro DAUPHIN, ĉe librejo Hachette.

SENDU al la Sekretario ADRESOJN DE PERSONOJ INTERESEBLAJ al nia Societo per propaganda numero de l' bulteno.

LA EDUKADO DE LA VIRINOJ

France verkita de P. P.

Esperanta Traduko de FRANCISKO DELGARBO

(Fino)

Estas tre versaĵne ke, ŝanĝante la virinan edukadon laŭ la duobla montrita direkto, oni sukcesus aliformigi ilian moralan influon en la mondo, kaj ke tiel, oni havus malpli da virinoj kiel tiuj kiujn Renan kulpigis pri la mankoj de nia civilizacio, kaj pli da virinoj kiel tiu de François Laurent: « Kiam ĉi tiu publikigis siajn unuajn volumojn pri la kristanismo, en siaj " Studoj pri la historio de l'Homaro ", li endanĝerigis sian estontecon, li havigis al si mallaŭdon ministran kaj li riskigis sian situacion. Tiam lia edzino sciopovis subteni lian kuraĝon kaj estas ŝi kiu diris al li: « Se tiaj estas viaj konvinkoj, vi povas ŝanceliĝi antaŭ nenia malhelpaĵo » (1).

Sed, se oni volas atingi tian rezulton kaj se oni volas eduki la knabinojn laŭ sana kaj racia maniero oni fatale revenas al la komence farita rimarko, tiel turnante en ia neelirebla rezonrondo.

Oni devas ja unue kontraŭbatali la malhelpon komence montritan: tio estas kontraŭagi en la familio la konservativan influon de la nungeneraciaj virinoj, la « kulpuloj » pri kiuj parolas Renan; kaj oni devas ĝin kontraŭbatali kaj ĝin venki, por ne plu senfine rekomenci surlokan

(1) Lameere. — Notice sur François Laurent (1905).

marŝadon, konservante de patrino al filino la antaŭjuĝojn kaj la rutinojn, kaj akceptante foroferi al ili, sub la trompa preteksto de reciprokaj cedoĵoj (1).

Ĉar la unuaj cedoĵoj sur tiu vojo estos, kiel aliloke okazas, kuraĝigo por pli da grandaj postuloj; kaj tio kion oni estos farinta por la paco ne donos la pacon. Tie ĉi, kiel en la medicina praktiko, oni pli facile kontraŭagas la komencon de malsano ol oni povas kuraci ĝiajn ekscesojn. Kaj oni alvenas al la eksceso de la malbono, kiam oni en la komenco donas pruvon de karaktera malforto.

La karaktera malforto kaj la manko de energio morala aperas ja ĉe la nekredantoj kiel ĉe la kreduloj.

Kaj tiu malforto tiom pli grandigas la fortunon de niaj kontraŭuloj. Ĉar la prestiĝon de politika ekleziularo kaŭzas la fakto ke tiuj kiuj ĝin ĉiutage kontraŭbatalas, pasas tamen inter ĝiaj manoj je la plej gravaj okazaĵoj en la vivo.

Inter tiuj kiuj batalas kontraŭ la religia instruado kaj la religiaj kredoj, ekzistas malfeliĉe kelkaj, kiuj en sia familio ne agas kontraŭ la religiaj antaŭjuĝoj de sia edzino, akceptas por sia idaro doktrinojn, kiujn ili malaprobas, kaj tiel estas kaŭzo de tio, ke iliaj infanoj poste perdos la plej bonan parton de siaj fortoj por sin kuraci de la bedaŭrinda veneno inokulita en ili dum ilia juneco.

Kaj plie, ĉiuj ne povos sin kuraci, ĉar kelkfoje okazas — la fakto estas memorinda — ke post duo da generacioj, familio de liberpensuloj liveras

(1) Kelkfoje oni aŭdas rememorigi kiel senkulpigon la ekzemplon de Jaurès, kiu edukigis sian filinon laŭ religie, pro interkonsento kun sia edzino. Sed la ekzemplo de Jaurès senkulpigas nenion, eĉ ne lin mem. Estas permesate bedaŭri ke tiu rimarkinda oratoro, kun sia alloga kaj konvinkiga elokventeco, ne provis konverti sian edzinon al liaj propraj filozofiaj ideoj.

kondukantojn por la reakcia anaro, kiel okazis en tiu de la fama fondinto de la Libera Universitato de Bruselo.

La manko de karaktero donas tiajn fruktajn; anstataŭ tio, firmaj konvinkoj donas la rimedon por varbi tiujn kun kiuj oni vivas, kaj ili malhelpas ŝanceliĝi inter la devo kaj la profito, kiam la okazo sin prezentas.

Ĉar preskaŭ ĉiam oni havas la ŝultrojn pli fortikajn ol la koron, tio signifas, ke oni ĉiam havas pli da fervorego ol da vera forto, aŭ, kiel diris La Rochefoucault: « Ni havus ĉiam sufiĉe da forto, se ni havus sufiĉe da volo (1) ».

Decas do ke, speciale insistante pri ĝi, oni montru la eraron en kiu vivas tiuj kiuj kredas ke ili povas kunigi la lojalan serĉadon de la vero kun la iel ajn malgrava obeo al la Eklezio kaj ĝiaj reguloj; oni ne povas samtempe servi du mastrojn tiel absolute malsamajn.

Sendube, ni ne intencas (kaj ni aliparte ne rajtas) ekskomuniki tiujn ŝancelulojn; ni tamen juĝas ke estas senprudente fidi je ili en ĉiaj cirkonstancoj; — ĉar ni ne povas esti certaj pri tio ke ili scipovos defendi kontraŭ ĉiaj kritikoj la ideojn kaj principojn, kiujn ni tiel kore ŝatas triumfigi.

Nu ni ne povas forgesi ke en la politikaj bataloj, la partio kiu fine venkos, estos tiu, kiu havos malplej da malenergio kaj malplej da senfortiĝoj — tiu kiu estos forminta energi — kaj konvinkplena homojn, homojn ne alireblajn al la timo, neniel perfide interkonsentantaj kun la supertiĉoj kaj la fanatismo, kies detruo estas unu el la ĉefaj celoj de ilia agado.

Tiunmaniere ni alvenas, kiel oni vidas, por fini, al la konkludo ŝajne paradoksa: ke la edukadon de la virino devas necesege anstataŭi la edukado de la viro.

P. P.

Esperanta Traduko de Fr. Delgarbo.

NOVA KATEKISMO

TRADUKITA DE HARRY SHAW (ANGLUJO)

La aŭtoro de ĉi-tiu katekismo, S-ro M.-M. Man-gasariar, kies antaŭuloj estis Armenoj, estas la Lekciisto de la Sendependa Religia Asocio en Chicago (Ĉikago), Usono. Ĉiudimane li paroladas pri raciismaj temoj al pli ol 2.000 aŭskultantoj. En la antaŭparolo de sia verko, li diras: « La malnovaj katekismoj, kiujn oni trudis al ni en nia infaneco, kiam nia inteligento ne povis sin defendi

(1) Varianto de la maksimumo 30: « Ni havas pli da forto ol da volo; kaj estas ofte por senkulpigi nin mem ke ni imagas ke la aĵoj estas neeblaj ».

kontraŭ ili, ne plu gajnas nian respekton. Ili farigis ŝimhavo pro malatento! La tempo en kiu ili estis elpensataj kaj verkataj estas mortinta, tute mortinta! Nova katekismo por esprimi la pensojn de homoj kaj infanoj nuntempe vivantaj estas bezonata. Jen modesta pruvo en tiu direkto. »

LA UNUA ĈAPITRO

La Racio kaj la « Malkaŝo » (religia rivelado)

1. DEMANDO. — Kio estas la religio?
RESPONDO. — Fido en la vero.
2. D. — Difinu la veron.
R. — La vero estas la plej perfekta scio atingebla pri ia demando.
3. D. — Kion signifas tio « fido en la vero »?
R. — Certeco ke oni povas sin apogi sur tia scio en la plej gravaj aferoj de la vivo.
4. D. — Kiel oni povas elmontri sian fidon en la vero?
R. — Vivante laŭ sia plej klara vidkapablo aŭ scio.
5. D. — Kiamaniere oni povas akiri la veron aŭ la « plej perfektan scion »?
R. — Per spertado kaj studado.
6. D. — Ĉu ne estas alia metodo?
R. — Ne.
7. D. — Ĉu vi donis al mi kutime konsentitan difinon de la religio?
R. — Ne. Laŭ la populara opinio, la religio estas tio, kion oni kredas pri supernaturaj estajoj kaj pri tio, kion oni faras por havigi al si ilian favoron.
8. D. — Kio estas la supernatureco?
R. — Kio ajn, je la nuna tempo, estas neklarigebla per la konataj leĝoj de la naturo.
9. D. — Kian opinion oni devas havi pri ĉiuj tiaj demandoj?
R. — Oni ne devus malpaciĝi pri ili sed permesi ke oni pridiskutu ilin libere.
10. D. — Ĉu la « Malkaŝo » aŭ la « Vorto de Dio » ne instruas nin pri multaj aferoj ne scieblaj alimaniere?
R. — Ĉar troviĝas multaj « Malkaŝoj » oni devas unue decidi tiun kiun vi priparolas.
11. D. — Nomu kelkajn el ili.
R. — La Zoroastra, la Bramana, la Budda, la Juda, la Kristana, la Mahometana, la Mormona...
12. D. — Ĉu ĉiuj ĉi-tiuj « Malkaŝoj » aŭ Bibliojoj pretendas havi dian devenon.
R. — Jes.
13. D. — Ĉu ili respektas sin reciproke?
R. — Kontraŭe, ĉiu malaprobas la alian kiel nefidinda aŭ nekompleta.
14. D. — Kiel ekzemple?
R. — Laŭ siaj sekvantoj, Budda diris ke trov-

- iĝas sur la tero aŭ en la ĉielo neniu kiu egalas lin. « Ni sola estas la perfekta Budda ».
15. D. — Donu alian ekzemplon.
R. — Laŭ la Kristanoj, Jesuo Kristo diris: « Mi estas la pordo por la ŝafoj.... Ĉiuj, kiuj venis antaŭ ol mi venis, estas ŝtelistoj kaj rabistoj.... Neniu alvenas al la Patro escepte per mi ».
16. D. — Kiu estus konsiderata pli granda pruvo ol ĉi-tiuj?
R. — La fakto ke la disĉipuloj de ĉiu religio provas konverti la kredantojn de la aliaj.
17. D. — Kion signifas « konverti »?
R. — Igi aliulojn pensi kaj kredi precize same kiel vi mem.
18. D. — Kial oni tion faras?
R. — Interalie, ĉar oni kredas ke se iu ne kredas same kiel si, tiu estos kondamnata por eterne.
19. D. — Kiu inter ĉi-tiuj malsamaj « Malkaŝoj » estas la prava?
R. — Neniu el ili estas aŭ tute prava, aŭ tute malprava.
20. D. — Kiel oni povas scii tion kio estas prava, kaj tion kio estas malprava koncerne ilin?
R. — Uzante sian plej bonan juĝkapablon.
21. D. — Ĉu tio ne sugestas ke la racio superas laŭaŭtoritate la « Malkaŝon ».
R. — Sendube.
22. D. — Se ni havas interne de ni la plej altan aŭtoritaton, ĉu ni ankoraŭ bezonas « Malkaŝon »?
R. — Ne.
23. D. — Se vi kredus ke iu libro enhavas la « Vorton de Dio », ĉu vi absolute obeus al ĝi, ĉu via racio aprobus aŭ ne.
R. — Ne.
24. D. — Kial?
R. — Se mi obeus al ĝi blinde mia obeo ne estus meritinda; se devige mia obeo ne estus memvola. Sed se mi obeus al ĝi inteligente kaj kun la aprobo de mia racio, tiam mi obeus ne al la libro, sed al mia racio.
25. D. — Donu ekzemplon.
R. — Se iu el la mondaj sanktaj Bibliojoj instruas ekzemple, ke la tero estas nesfera, mi ne povus kredi tiun libron, ĉar mia sperto kaj esploro instruas al mi la malon.
26. D. — Se, tamen, la Malkaŝo ordonas al vi fari tion kion via racio kondamnas kiel erara, ĉu vi ne obeus al la « Vorto de Dio » prefere ol al via racio?
R. — Se mi agas kontraŭ mia plej bona konsultato mi ne estas morala estajo.
27. D. — Ĉu ne estas eble konsideri kiel prava tion kion la racio pravas esti malprava?
R. — Estas neeble. La racio estas la absoluta suvereno. Nenia potenco povas igi la racion

konsideri kiel prava tion kion ĝi deklaras esti malprava.

28. D. — Sed ĉu la « Bibliojoj » efektive instruas tion kio estas kontraŭracia?
R. — Efektive, jes.
29. D. — Kiel ekzemple?
R. — La rakonto pri la « kreado ».
30. D. — Kaj plue?
R. — La « superakvego ».
31. D. — Ankoraŭ plua ekzemplo?
R. — La homa « defalo ».
32. D. — Kion vi scias en la nuna tempo pri ĉi-tiuj demandoj?
R. — Mi scias, certege, ke tiaj sensencaĵoj, kiaj la homa « defalo », la « tutmonda superakvego », la « kreado », priskribitaj de la antikvaj Bibliojoj, ne okazis.
33. D. — Kiujn pluajn erarojn faras ĉi-tiuj « Bibliojoj »?
R. — Ili ofte eraras pri historio kaj scienco; ili multfoje sin kontraŭdiras kaj pli ol unufoje ili instruas tion, kio laŭ nia scio estas malvirta.
34. D. — Kiel vi prirespondas ĉi-tiujn erarojn en la Bibliojoj?
R. — Erari estas home.
35. D. — Ĉu ili ĉiuj estas verkitaj de homoj?
R. — Ili estas nur la enskribadoj de la saĝo kaj la malsaĝo, la virto kaj la malvirto de homoj.
36. D. — Pro tio, kiel do vi devus agi?
R. — Ni devus sekvi la plej bonan lumon kiun ni havas.
37. D. — Kio estas tio?
R. — Nia racio.
38. D. — Sed, ĉu via racio ne povas vin konduki en eraron?
R. — Jes.
39. D. — Kial do ĝin sekvi?
R. — Ĉar vi havas nenion pli bonan kaj estas via devo sekvi la plej bonan lumon kiun ni posedas.
40. D. — Kial la religiuloj konsideras tiel grava la religian « Malkaŝon »?
R. — Ĉar ili trovas ke sen tia « Malkaŝo » ne troviĝus moraleco.
41. D. — Ĉu tia timo estas subtenebla?
R. — En la nomo de la « Malkaŝo » aŭ la « Vorto de Dio » multaj el la plej malnoblaj krimoj estas elfaritaj: dum aliflanke ne malmultaj el la plej noblaj homoj sciis nenion pri la « Malkaŝo ».
42. D. — Ĉu ĉiam troviĝis « Malkaŝo » en la mondo?
R. — Ne, oni kredas ke nur antaŭ kelk-kvinmil jaroj estis donata la « Malkaŝo ».
43. D. — Ĉu la moraleco ne troviĝis antaŭ tiu tempo?

- R. — Sendube jes, ĉar homoj, komunumoj kaj nacioj ekzistis jam de longe antaŭ tiu tempo.
44. D. — Ĉu ĉiu nacio ricevis « Malkaŝon » ?
R. — Ne, ĝenerale oni kredas ke nur la Judoj favore ricevis « Malkaŝon ».
45. — Ĉu la Judoj do estis la sola morala popolo en la mondo ?
R. — Tute ne. La Grekoj kiuj havis nenian « Malkaŝon » estis la plej kulturita popolo de la antikva tempo.
46. D. — Kion signifas tio ?
R. — Ke la moraleco estas sendependa de la « Malkaŝo ».
47. D. — Ĉu estas bone instrui ke la moraleco estas nebla sen « Malkaŝo » ?
R. — Ne, ĉar unue tio ne estas vera kaj due, ĉar tiuj kiuj kredas kaj poste perdas tiun kredon en « Malkaŝo » samtempe perdis la fidon en la justo.
48. D. — Kiamaniere la fido en la justo povas konstantiĝi ?
R. — Amante kaj bonfarante pro la amo kaj la bono mem.
49. D. — Nomu aliajn motivajn por la laŭjusta konduto.
R. — La plej gravaj estas tiuj kiuj devenas de la amego por la memestimo; la altruisma impulso kaj la sento de devo.
50. D. — Kiu estas la signifo de devseento ?
R. — La sento ke ni devas fari tion kio *plimultigas* la vivon kaj ĝin beligas kaj la evito de tiuj agoj kiuj post-trovas post si la mizeron kaj la maljuston.
51. D. — Ĉu estas ĉiam agrable fari nian devon ?
R. — La antikvaj religioj instruas ke la devo estas « kruco » (ŝarĝego) kaj ke esti bona signifas abnegacion.
52. D. — Kio rezultas el tia instruo ?
R. — Tia instruo timigas la homojn pri la bona vivo kaj kunigas kun tio en ilia penso la mal-kuraĝon.
53. D. — Kaj krom tio ?
R. — Ĝi supozigas al la homoj ke nur la mal-virtuloj povas esti feliĉaj en ĉi-tiu mondo.
54. D. — Kio estas la prava koncepto de la devo ?
R. — Ke ĝi ne estas ŝarĝego, nek abnegacio, sed harmonio, belo kaj ĝojo. Ni nin oferas kaj suferigas nin kiam ni malobeas al la leĝoj de la korpo kaj de la penso.

Fino de la unua ĉapitro.

ŜANĜITAJ ADRESOJ :

S-ro Max WIENER, Dresden, 21, Germanujo.
S-ro OTTO TESCH, 57, Bühlstrass, Bern, Svisujo.

S-ro P. D. BELIKOV, Tergansk. obl. kv. Turnaeva, Skobelev, Azia Rusujo, deziras interŝanĝi opiniojn por konstrui ligan de oficialaj senreligiuloj-ateistoj.

La laboro de Libera Penso en Bohemujo malpermesita

Neniam oni havas bonan opinion pri justeco kaj rajta certeco en Aŭstrio, sed tamen oni ne atendis, ke povas en la dudeka jarcento okazi tio kio okazis.

La 18/XI venis en domon, kie havas *Libera Penso* en Praha siajn oficejojn multe da policistoj kun du komandantoj kaj laŭ ordono de polica direktoro konfiskis kaj forveturigis ĉion, kio sin tie ĉi trovis. Poste estis la oficejoj sigelitaj. En oficaj lokejoj sin trovis ne nur proprajoj de *Libera Penso*, sed ankaŭ de societo por bruligo de kadavroj (krematorium), la societo Demosthenes, kaj societo por reformo de geedza rajto. Ĉiuj tiuj tri societoj estis tute memstaraj, ne dependantaj de *Libera Penso*. Sed ankaŭ ilia propraĵo estis konfiskata. Kiel argumento por sia ago sciigas la policana direktoro, ke en la jaro 1911 estis kelkaj membroj de *Libera Penso* juĝe kondamnitaj. Sekve la tuta societo laŭ lia opinio estas kontraŭleĝa.

Oni opinias, ke ĉio okazis laŭ deziro de klerikala partio, al kiu estas la laboro de *Libera Penso* tre maloportuna. Precipe ili timas la preparajn laborojn de *Libera Penso* al la jaro 1915, kiam la bohema nacio solene rememoros la martiran mŝrton de majstro Jan Hus, kiu estis en la jaro 1415 bruligita de la katolika eklezio.

Ĉar la ago de la policana direktoro tute ne povas esti motivita per leĝo, oni opinias, ke baldaŭ povos *Libera Penso* denove labori.

Ant. Janalikova.

Aliĝoj en Novembro 1913

S-ro VON WITZLEBEN, Buschstrasse, 6, Bonn a/bh, Germanujo.

S-ro LHOSTE, eksinstruisto, 29, rue Cassin, Sens, Francujo.

Eksigas :

Santamarina, Konstanti, Muinos, Cooperativa Luz, Ferencowicz, Poradowski, Vogel.
Entute 187 membroj.


Kaso en Novembro 1913

Enspezoj :

Reportite	Fr. 268,35
Por pluaj numeroj, de H. Shaw.....	5,»
Kotizaĵo 1914 de S-ino Greenwood.....	2,50
— 1913 de Zajchowski	2,90
— -- Ligo de l'Rajtoj de l'Homo en Sens	2,50
— — de Sigel.....	10,30
— — S-ino Hankel.....	2,50
— 1912-13 de Wiener.....	4,90
— 1913 de Mathieu kaj Renard	5,»
— — de Von Witzleben.....	3,55
Sume.....	307,50

Elspezoj :

Poŝtmarkoj, sendo de l'bulteno.....	6,»
Restas en kaso	Fr. 301,50



BUCHBINDEREI
VRBA HELMUT
1180 WIEN, BASTIENG. 23